

Mia poliomjelito malŝlosis pardon al daŭripova paco: Invento, Sano, Lingva egaleco

Invento, sano,
lingva egaleco

Honora prezidanto de
akcia kompanio Swany

MIYOSHI Etsuo



Rekomendo
por aktiva vivo,
kiu ŝanĝas
malesperon
al espero

**Mia poliomjelito maŝlosis pordon al daŭripova paco:
Invento, Sano, Lingva egaleco**

Verkita de: Etsuo Miyoshi
Tradukita de: Ŝigeki Maeda

Kopirajto© 2022 Etsuo Miyoshi
Ĉiuj Presita en Japanio. rajtoj rezervitaj. ASA Publishing Co., Ltd.
(ASA Shuppan)
<http://www.asa21.com>

Kovrildezajn: Hiroki Nakamitsu

Pri la aŭtoro

Miyoshi Etsuo

Honora prezidanto de akcia kompanio Swany

Mia dekstra piedo estas paralizita pro la sekvaĵo de poliomjelito, kiun mi havis en la sesa monato post la naskiĝo. Ĉar mi spertis multajn suferojn, mi povis fari artiklojn, favorajn ne nur por homo kun handikapo, sed ankaŭ por homo sen handikapo.

Historio pri naskiĝo de Swany bag

La gvidprincipo de mia agado

Por venki tutforte

Vidu realon

Starigucelon

Konstatu la nunan lokon

Maeda Ŝigeki

en 1945 naskiĝis en la urbo Okazaki, la gubernio Aiĉi,

en 1963 enoficiĝis en la centra oficejo de la religia jura persono Oomoto,

en 1985 enoficiĝis en EPA (Esperanto-Propaganda Asocio) kiel unu el ĝiaj estraranoj,

en 1990 enoficiĝis kiel konstanta direktoro de EPA,

en 1990 aliĝis al EVA (Esperanta Verkista Asocio) en Nederlando.

en 2004 iris al Brasilia kiel direktoro de Oomoto Internacia,


en 2015 eldonis la japanan tradukaĵon “La Libro de Mediumo” el Brazila Spiritisma Asocio.

Tradukaĵoj: “Fabeloj de Botaemon” “Kie penso, tie mondo” “Diaj Vojsignoj” “Diaj Revelacioj” “La Rakontoj el la Spirita Mondo” k.a.





Antaŭ la ĉefoficejo de Swany



Mempotreto en olepentraĵo



La aŭtoro promenanta kun Swany Bag en ambaŭ manoj



Swany Bag, sako subtenanta la uzanton en ĉiutaga vivo kaj vojaĝo

Komence

Mi naskiĝis en la urbo de gantoj, en la orienta regiono de la gubernio Kagaŭa, kaj, heredinte de mia patro, mi okupiĝis je la entrepreno de gantoj. Sed, en la daŭro de ĉi tiu duonjarcento, ducent kelkdek kompanioj, kiuj daŭrigis inter si furiozan konkurencon, reduktiĝis ĝis kvarono. Estis fatalo de la laborintensaj industrioj, facile influitaj de la plialtiĝo de salajro, dum peze subpremis ilin alia malavantaĝo: iliaj artikloj estas sezonaj kaj vendeblaj nur en vintro.

Post la heredo de la familia okupo, mi daŭrigis la klopodon por internaciigi la malgrandan entreprenon, kaj tamen la elŝeliĝon el la limigoj de “sezonaj artikloj” ĉiam akompanis malfacila problemo. Por solvi ĉi tiun, troveblis neniu alia rimedo, ol realigi la novajn artiklojn, kiuj mirigu uzantojn.

Post la barakta penado mi elpensis la sakon *Swany bag*, kiu subtenu homan korpon, kaj realigis la rulseĝon *Swany mini*, faldebla en la plej malgranda formo en la mondo.

La perturbo tielnomata infanparalizo, kiun mi

suferis tuj post la naskiĝo, donis al mi motoron por elpensi kaj realigi novajn artiklojn. Mi malkovru tiun dramon en ĉi tiu libro.

Poste, kiam mi suferis la malsanon de reno, mi sukcesis komplete kuraci ĝin, danke al la fastoterapio.

Plue, mi traktos pri “internacia lingvo”.

“Eĥ!” surpriziĝus legantoj, sed jam de la juneco mi pozitive partoprenadis en la disvastiga movado de Esperanto. Mi klopodu proksimiĝi al la kerno, kial mi rilatis al tia mistrafa kampo, kaj kiel fariĝos la mondo, se ni lasos la fluon de la plua anglalingviĝo de la mondo.

En tiu ĉi libro mi rakontu la historion de mia reviviĝo: mi luktadis farante risorto la denaskan fizikan perturbon.

“Ĉar la sorto estis severa, prosperis al mi feliĉo,” tiel mi komencis pensi de iam, sed mi fariĝis jam 81-jara kaj iom post iom levis la kapon la persisteco al la vivo, laŭgrade kadukiĝanta.

Ĝenerale, kiam oni rakontas pri si mem, oni pretervole emas fanfaroni. Eĉ se oni humiliĝus aŭ konfesus siajn malsukcesojn aŭ parolus pri siaj malfortaj flankoj, en plej multaj kazoj ili povus esti ankaŭ fanfaronoj, se rigardi en ties korfundo. Supozeble, koncerne ankaŭ la historion, kiun mi rakontos de nun, mi ne povos nei, ke ankaŭ la miaj apartenas al la samaj ekzemploj.

Sed tamen, povas esti, ke miaj vivspertoj enhavas

iajn praktikajn informaĵojn por tiuj homoj, kiuj vivas la vivon plej diligente, ŝargante sin per sama handikapo kun mi, aŭ por tiuj homoj, kiuj nun en la mondo de la kronviroza plago rekte frontas kontraŭ diversaj malfacilaĵoj en siaj laboro kaj familio. Mi pensas, ke mi humile priskribu miajn spertojn, kun tia kordecido “salti malsupren de sur *Scenejo de Kijomizu*”*, sen pavi kaj sen ŝajnigi min eminenta,

**Scenejo de Kijomizu: Kijomizudera, unu el la plej famaj Budhismaj Temploj en Japanio; kreita en 778; laŭ la krutaĵo staras granda scenejo, kie okazas spektaklo ĉe la speciala evento: deveno de la vorto “malsuprensalti de sur la scenejo de Kijomizu”, kiam oni decidas ion gravan en sia tuta vivo; monda kulturhereda, nacia trezoro.*

enhavo

Komence

La unua ĉapitro

Eksciinte la bezonon de subteno

La dua ĉapitro

Respondante al subtenaj bezonoj

La tria ĉapitro

Scienco pri fasta terapio

La kvara ĉapitro

Mondlingvo en Estonteco

Ĉe la fino

La unua ĉapitro

*Eksciinte la bezonon
por subteno*

1. Sorto surdorsa

Infaneco

Mia domo staras ĉe la bordo de Interna Maro Seto. Kiam oni malfermas la malantaŭan pordon, oni jam troviĝas sur la marbordo, kaj fronte al la maro malproksime kuŝas la insulo Ŝoodoŝima.

Kiam mi estis knabo de elementa lernejo, somere mi ludis en flako, kiun mi faris sur la strando, kaj naĝis apud la bordo. Kun sableroj sur la korpo mi supreniris sur la tataman ĉambbron. Skoldi min kaj miajn fratojn estis taglaboro de mia patrino.

Ĉe la maro ĉiam restis kun mi Naruse Cuneo, mezlernejano, loĝanta najbare. Prenante mian piedon, li kondukis min malproksimen, kaj nur rigardis la staton: mi ripetis surakviĝon kaj subakviĝon. Sed, kiam li sentis min preskaŭ dronanta, li puŝis min al malprofundejo. “Rukt, rukt” trinkante marakvon, mi furioze klopodis por la naĝado. Ĉar mi sciis, ke en finfina momento li nepre min savos, mi povis amuziĝi pri la sento de minacanta danĝero.

Dum mi ripetis la krizan momenton, mia naĝkapablo tiom kreskis, ke mi povis naĝi 4 aŭ

5 metrojn. Ĉiutage mi naĝis kaj mia naĝtekniko rimarkinde progresis; kiam mi fariĝis mezlerneano, mi jam sukcesis naĝi kelkcent metrojn malproksimen. La serena blua ĉielo, la meduzoj min tuŝantaj proksime de la bordo, la kelkcentimetraj fiŝsetoj naĝe rifuĝantaj tien kaj reen, kaj, kiam mi subnaĝis en la maron, la panoramo, kie loĝis marsteloj, ĉio ĉi ensuĉis miajn korpon kaj koron.

Kvankam surtere mia dekstra piedo estis mallibera, en la maro mi ne sentis handikapon. Sur la kalma maro, fronte al la insulo Ŝoodo-ŝima en la nordo, mi naĝis kelkcent metrojn malproksimen. Surmare mi ripozis kun la vizaĝo supren al la ĉielo, senigante la tutan korpon je la forto. Marakvo volis kovri miajn nazon kaj buŝon, sed mi apenaŭ tion trinkis. Tiuj kvar aŭ kvin minutoj, dum kiuj mi flosis sur la maro kun nenia penso, donacis al mi la paradizon de ĉi tiu mondo, en kiu mi povis gustumi la sengravitecon —.

La 16-an de decembro 1939 mi naskiĝis en okcidente najbara domo de la budhisma templo Kjoorenĵi en la urbeto Ŝirotori de la nuna urbo Higaŝi-Kagaŭa (*en 2003 kunfandiĝis la tri urbetoj Ooĉi, Ŝirotori kaj Hiketa*).

Ses monatojn post la naskiĝo mi ekhavis altan febron. Portante min sur la dorso, mia patrino rondvizitis diversajn hospitalojn. Oni diagnozis “infanan paralizon”, kaj la malsano postlasis la

sekvaĵon al mia dekstra piedo.

Por mi plej malŝatata estis la leciono de gimnastiko. Kutime ni faris gimnastikon en la pinarbaro en la teritorio de la jaŝiro Ŝirotori, nomata Mijama, situanta okcidente de la elementa lernejo. En la vasta strando elstaris miloj da pinarboj, grandaj kaj malgrandaj. “Miyoshi! Vi gardu vestaĵojn de ĉiuj!” diris la instruisto. Ĉar mi ne kapablis bone gimnastiki, la instruisto donis al mi la konvenan taskon. Mi komencis instinkte malŝati la tempon de ĉi tiu leciono.

Kun la korpo, kiu ĉe ĉio tute ne povis venki aliajn, por mi sole venkeble estis paŝi per la manoj. Ĝuste la muskola forto, kapabla stariĝi kapmalsupren, bonvolis alporti profiton al mia posta vivo.



La aŭtoro okjaraĝa, 1947

En la 1-a de sept., tri jarojn antaŭ ol mi naskiĝis, Nazia Germanio invadis Pollandon, kaj komenciĝis la Dua Mondmilito. Kaj du jarojn poste, la 8-an de decembro, Japanio atakis Perlan Havenon, kaj eksplodis la Pacifika Milito: la tutan mondon kovris la konflikto.

Sed, por mi la rememoroj pri la infaneco estis, unuflanke, embarasiĝo pro la paralizita piedo, kaj aliflanke, la granda maro eterne disvastiĝanta, kaj la brileto de blua ĉielo.

Eskapo per malnova boato

Kvincent metrojn okcidente de mia domo troviĝis plaĝo, kie estis boatluejo, kaj oni povis uzi boaton dum unu horo per la pago de 25 enoj. “Malnovaj boatoj estos forĵetitaj” mi aŭdis de mia amiko. “Aĉetu al mi la boaton!” mi petis al la patro, akcentante, ke mi estas jam altaklasulo de elementa lernejo. “Ne, ne, nur danĝera estas tia, kia boato!” skoldis la patro, kvazaŭ forhaki min per unu glavbato.

“Mi ne povas venki sur la tero, sed sur la maro mi estos venkita de neniuj!” mi asertadis obstine.

“Kiom kostas?” diris la patro post iometa konsidero.

Por mia patro, kiu laboradis rektanime, posedi boaton estis afero, neniom imagebla.

“Vi nepre suferos, kiam atakos tajfuno. Mi ne

helpos vin,” li diris, kaj ŝarĝis min per respondeco. Mi, gajninta la boaton, kriis “Hura!”.

Vokante samklasanojn, en posttagmezo aŭ en libertago, mi min amuzis kun ili per remado. Sur la seĝo por duopa remado, sidis kvar amikoj, kaj alia unu, sidanta sur la malantaŭa seĝo, indikis la direkton. “Jen! Insulo Hitogojima estas tiu!” kriis ni ĉiuj. Vivriske remante, ni rondvojaĝis ĉirkaŭ la insulo, distanca je tri kilometroj kaj iom pli laŭ la ĉirkaŭo, kaj tuj poste returnis nin.

“Iro estas plezura, sed reveno estas terura,” ni furioze remadis per la tuta forto malgraŭ tro longa distanco por knabo. Sen perdi kuraĝon kaj senrezigne ni remadis kaj apenaŭ suriris sur la strandon.

La sudan venton, alblovantan al la insulo Ŝodoŝima de sur la montaro Asan ĉe la limo inter la gubernioj Tokuŝima kaj Kagaŭa, oni nomas “maze”, kaj en tago de tiu “maze” vizitis min samklasanoj.

Sur la kalma maro kun vento al povo ni atingis la insulon Hitogojima en palpebruma tempodaŭro.

Ĉirkaŭ la insulo troviĝis blankaj disondoj, sed nia rimarko estis tro malfrua. Jam estis neniel prokrasteble! Troviĝis jam neniam rimedo krom remadi por reveni. Drivante okcidenten kaj orienten, turnante suden la kapon de la boato, ni vivriske remadis. Dekoj da fojoj nia boato estis batblovata de forta vento, sed iel ni savis nin transveturante la furiozajn ondojn. Nin trafis teruro: se renversiĝus

la boato kaj ni estus forĵetitaj en la maron, ni nepre drivos en la direkto de la insulo Ŝoodoŝima.

Feliĉe ni povis eviti ŝiprompiĝon, kaj ni remadis kun viviriska mieno. Kaj kiam ni revenis, surborde mia avo Senzoo atendis levante lavaĵstangon kaj kriante:

“Se ili surbordiĝos, mi nepre frakasos ilin!”

Pro la terura mieno de la avo, ege koleranta, ni nur timis siatempe. Sed, se bone pripensi, tiam li, persekutata ĝis ekstrema situacio de la maltrankvileco pri nia vivo, faris edukon: “Neniam veturu sur boato en maze.” “Ja timinda estas la avĉjo de Etĉan (Etĉjo)!” diris la klasanoj, kaj ili ĉesis veni dum kelka tempo.



Kun la familianoj en la insulo Hitogoĵima, 2017 (de maldekstre: La aŭtoro, la una filino Ajako, la nepinoj Akari kaj Saori, kaj la Ekzekutiva Direktoro de Swany Kaŭakita Jasunobu)

Kiam mi fariĝis lernanto de dua mezlernejo, sur la marbordo konstruiĝis digo, alta je 2 metroj, kaj perdiĝis la konservejo de boato.

Lernante la severecon de la naturo kaj la terurecon de la maro, mi estis hardita kune kun la muskoloj. Dume la malnova boato tiom pli kadukiĝis. Kaj la epoko de mia remado finiĝis.

Infaneco de mia patro, unu el la reprezentantoj de Oomoto

Mia patro Tomio naskiĝis la 3-an de oktobro 1908 en la urbeto Sanbonmacu (*nuna urbeto Ooĉi*) kiel la tria filo inter Kjooŭa Genzoo kaj Sumi, kaj inkluzive de Tomio estis kvin filoj kaj kvar filinoj. La familio Kjooŭa administris butikon de diversaĵoj, vendante mastrumaĵojn kaj aliajn necesaĵojn. Tuj post la naskiĝo lia patrino ĉesis mamnutri; Tomio do estis konfidita al la familio Miyoshi. De Jone, la nutristino, li estis multe amata kiel la vera filo, kaj tial li tute ne spertis la torditan koron kiel duoninfano.

Ĉirkaŭ unu jaron poste, la patrino de la familio Kjooŭa naskis pli junan fraton de mia patro. Kaj, ĉar ŝi estis okupita je la prizorgo de la nova bebo, Tomio daŭre restis vartata en la familio Miyoshi. Baldaŭ lia propra patrino forpasis, kiam li estis kvarjara. Kaj, ĉar la familio Miyoshi ne estis favorata per infano, Tomio estis laŭleĝe adoptita kiel heredanto.

La adoptpatro de la familio Miyoshi estis nomata Jasuji; li estis granda drinkemulo kaj eĉ la laboron ŝanĝadis unu post alia. Tio trudis al la familio ekstreme malriĉan vivon. Onidire, ĉiutage daŭris la manĝo laŭlitere nur el hordeo. Krom tio, li ne povis pagi la prezon de komercaĵoj al farmacia kompanio “Teikoku Seijaku”, por kiu li laboris kiel negocisto. Estis terura situacio, ke eĉ la meblaro estis juĝe konfiskita. Poste, naskiĝis Akiko, la unua filino, Takako, la dua, kaj plie sekvis Rjootaroo (filo), kaj la mastrumado por ses familianoj fariĝis pli kaj pli malfacila. Ne estas malfacile supozi, kiom profunde afliktiĝis la familianoj, kiam pro la Dua Ĉina-Japana Milito la familio perdis la filon Rjootaroo, 23-jara, eledukita kiel familia ĉeflaboranto.

La lerneja vojaĝo de la elementa lernejo estis planita: veturi vaporŝipe ekde la marbordo de Ŝirotori al la urbo Takamacu kaj viziti en la urbo la vidindaĵojn. Sed, “se mi petos tiun koston, tio ĝenos mian adoptpatrinon” pensis Tomio, kaj anstataŭe li pasigis la tempon en la ekskurso de plijunaj lernantoj.

Mia patro komencis labori loĝante en la najbara soj-vendejo Takeuĉi, kondiĉe ke ĝi igu lin enlasiĝi en la altan klason de elementa lernejo. Ĉar en tiu tempo metilerna sistemo estis tre severa, mia patro devis elteni la ĉagrenon: eĉ la ankoraŭ balbutanta infano de la mastro ci-vokis mian patron “Tomio! Tomio!”

Por eskapi el la ekstrema malriĉo li nutris

kokinon. Invitante amikon, li piediris al la malproksima vilaĝo Fukuemura kaj revenis aĉetinte unu kokinon. Li nutris ĝin kaj igis ĝin naski ovojn kaj iomete gajnis profiton.

Renkontiĝo kun mia patrino post la elporto de sufero

Kiam mia patro estis 20-jara, la vilaĝoficejon atingis la mortanonco de lia adoptpatro, kiu malaperis senspuro post la vizito al Hokkaido ok jarojn antaŭe. Ĉar mankis la mono, li ne povis akompani la adoptpatrinon, do nur Tomio sola iris al la loko.

Lia adoptpatro estis sepultita en ĉirkaŭurbo de Hakodate; estis soleca sepulitejo kovrita de neĝo. Kiam mia patro, atinginta vespere, disfosis tombotruon kaj identigis la kadavron, malferminte la ĉerkon, tiu estis sendube la adoptpatro. Kvankam jam pasis 10 tagoj post la morto, ekfluis sango el la naztruo de la kadavro. Ĉi tio multe surprizis mian patron.

Mia patro tuj petis kremacii, kaj estis la 10-a vespere, kiam oni finis la kolekton de cindro. En tiu tago neĝegis, cetere en lia monujo estis tre mizera; en la frosta budo, najbara de la sepulitejo, li sola dormis kun la cindro surbrake, tremante pro malvarmeco.

En sekva tago, pere de la pramo inter Aomori kaj Hakodate kaj fervojo al Tokio, li atingis la stacion Ueno. Estis la unuafoja vizito en Tokio, sed en lia monujo tute ne troviĝis disponebla mono. Trenante pezajn piedojn li paŝis malgaja kun la cindro surbruste de la stacio Ueno ĝis la stacio Tokio. Jen estis lia unuafoja spektado de la flora metropolo. Du tagojn kaj du noktojn poste, li finfine sukcesis atingi la hejmlokon.

Kiam li estis 15-jara, post la fino de la altklasa elementa lernejo, li dungiĝis je Butiko Kanzaki kun ok oficistoj, en Hukuŝima, Osaka. Li laboris senripoze, de la 8-a matene ĝis la 10-a vespere, kaj kiel la salajron li ricevis ok enojn kun manĝoj. Krom tio, novan dungiton atendis ankoraŭ unu laboro, nome balaado. Ĉar estis tia tempo, kiam unu ŝoo* da rizo kostis 10 senojn*, lia salajro estis tre bona kiel enspezo de tiutempa knabo. Sed, viziti la publikan banejon li ne povis ĝis post la 12-a nokte.

Ŝoo: japana malnova mezurunuo, ĉ.1,8 litroj

Seno: japana monunuo, centono de eno

Mia patro, kiu laboris dum tri jaroj kaj proprigis al si la metion, kiel matura metiisto revenis al sia hejmloko, la urbeto Ŝirotori, kaj komencis labori en la gant-fabriko Jamamoto kun dekoj da oficistoj. Ĉi tie li renkontiĝis kun Tani Shimeko, mia patrino kaj sia kunulino, kun kiu li dividis la sorton.

Kiel vi poste legos, en tiu periodo, kiam li estis 17-jara, mia patro, aŭskultinte la prelegon de Deguĉi Onisaburo (1871~1948), Kunfondinto de la religio Oomoto, emociiĝis kaj tuj oomotaniĝis.

En la jaro 1935, kiam li estis 27-jara, mia patro, kiu okupiĝis je la administrado de la filio Ŝirotori de Oomoto, estis malliberigita subite en la loka policejo, kiam eksplodis la Dua Oomoto-Afero. Estis granda afero: Oomoto ricevis la subpremegon de la japana ŝtato, surbaze de akuzo ke la Fondinto estas ribelulo, gvatanta la ŝancon uzurpi la imperiestran tronon. Li refutis per tiom da faktoj, kiom li sciis, sed kontraŭe li ricevis minacon: "Forlasu la kredon, se ne, ni lasos vin ĉi tie dum senlime multaj jaroj!" Se tio okazus, lia familio tuj falus en malfacilecon, kaj sekve, eltenante la maljustecon, li ŝajnis la konvertiĝon, kaj evitante la uraganon hejmenrevenis.

Naskiĝo de mia patrino kaj sufero

Mia patrino Ŝimeko (1911~1998) naskiĝis en Macubara en la urbeto Ŝirotori-Honmaĉi, la 28-an de aŭgusto en la jaro 1911, kiel la dua filino inter Tani Senzoo kaj Nobu. Sed, ĉar antaŭ ol ŝi naskiĝis, ŝia pliaĝa fratino june mortis, do ŝi estis la sola filino. La familia vivo ne estis riĉa, sed la gepatroj, kiuj amegis la filinon, kvankam siatempe estis tre malofte ĉe kamparana familio, igis ŝin enlasiĝi en la

altklason de elementa lernejo (dujara alta klaso post la sesjara normala eduko) kaj ekzerciĝi en la danco kaj ŝamiseno.

Miaj gepatroj, kiuj renkontiĝis unu kun la alia en la gantofabrika Jamamoto, de iam komencis ami unu la alian. Sed, Senzoo, la avo, ekstreme malŝatis, ke mia patro estas kredanto de Oomoto, ĉar li timis, ke li estas fanatikulo de “la suspektinda religio Oomoto”. Poste, koncerne mian patron kiel homon, mia avo fieris, “li estas unu el la tri elstaraj adoptitoj en la urbo”. Malgraŭ tio ...



Gantfabriko Jamamoto, 1929
(patrino Ŝimeko, la sesa de dekstre)

Ĉar mia patro estis la adoptita filo de la familio Miyoshi kaj mia patrino estis la sola heredanto de la familio Tani, ŝi ne povis edziniĝi kaj aliĝi al la familio Miyoshi, sen la estingiĝo de la familia linio Tani. Mia patrino Shimeko nespiteble al la

sentimento de siaj gepatroj, kiuj timis Oomoton kaj ne volis la genealogian malaperon de la familio Tani, plore rezignis mian patron (Tomio) kaj konsentis akcepti adoptiton el la sama urbo kiel sian edzon.

En 1931, kiam eksplodis la Manĉuria Afero, mia patrino, 20-jara, naskis la unuan filon nomatan Hajime, kaj poste la geedzoj disiĝis. Post la disiĝo, la patro de ŝia unua filo militiris al la Dua Ĉina-Japana Milito kaj mortis en la batalo. “Li dormas en la plej alta loko en la tombejo de militistoj,” sciigis al mi la patrino, post kiam mi maturiĝis.

Mia patro, kiu eksciis tion, tuj proponis geedziĝon al mia patrino. Estas certe, ke mia patrino larmis pro la grandanimeco de mia patro.

“Malice” rigardata geedziĝo de la gepatroj

Miaj gepatroj komencis la geedzan vivon, kiam mia patro estis 24-jara kaj mia patrino estis 21-jara. Mia patro eliris el la familio Miyoshi kun unu kofro, plena je siaj posedaĵoj, kaj komencis kunloĝi en alia domo en la tereno de Senzoo, la gepatra domo de mia patrino.

Mia avo permesis la geedziĝon kaj kunloĝadon, sed ne akceptis Oomoton. “Forlasu Oomoton!” li postuladis de mia patro, iam metita en la detenejon pro la Dua Oomoto-Afero. Tio povis okazi, ĉar

siatempe eĉ en la kamparo ĉie oni parolis pri la “Oomoto-Afero”, kaj la impresoj “Oomoto estas senekzemple terura religio” estis profunde gravurita en la koro de la publiko. Kiam paŝis mia patro, vilaĝanoj fingromontris lian dorson, dirante “tiu estas Miyoshi, ĉu ne, la Oomotano”. Jen estis tia stato. Tiutempe, la kompreno de mia avo pri Oomoto estis sama kiel la komuna konscio de la publiko, verŝajne.

Krome, en tiu tempo, la geedziĝo post reciproka enamiĝo estis tre malofta, kaj tial la irado de la geedzoj ofte fariĝis paroltemo inter vilaĝanoj.

Mia avo ankaŭ poste ne akceptis Oomoton dum longa tempo, kaj ne permesis laŭleĝe edzigi mian patron. Pro tio, ĝis la postmilita abolo pri la Leĝo de Publika Ordo kaj la aprobiĝo de nova civila juro, longe daŭris la laŭleĝa konkubeco.

La familio Tani, kiu estis la gepatra domo de mia patrino, finfine povis eviti sian genealogian malaperon, kondiĉe ke ĝin heredu mia plej maljuna frato.

Ekde la subpremege afero de Oomoto, mia patro falis en anoreksion kaj malpeziĝis ĝis 39 kilogramoj. La religio, kiun elkore kredis mia patro, ricevis la subpemecon de la ŝtato, kaj la sidejo de la organizo estis detruita. Por mia patro la ŝoko estis tro granda.

La fratoj de mia patro en Sanbonmacu, kiuj zorgis pri la vivo de sia frato, donacis al li 80 enojn anstataŭ kondolencan offermonon, pensante, ke la

mono pli utilos dum li ankoraŭ vivos. Per ĉi tiu mono li ripozis ĉe varmfonto en la gubernio Ooita, sed, ĉar lia stato ne boniĝis, li vizitis iun sinjoron Nakao, spiritkapablulo de Kyoto, kiu tiam restis en la urbo Takamacu .

“Kaŭzas la ŝanceliĝo de via dikredo,” orakolis la sinjoro. “Ensanktejigu la protektan dion de la loko kaj adoru ĝin kiel la sanktan objekton de Oomoto. Ambaŭ familioj Miyoshi kaj Tani ne konsentas la geedziĝon, tial faru ankoraŭfoje geedziĝan ceremonion. Per kia ajn maniero sendependiĝu, tiam vi sukcesos.”

Mia patro ensanktejigis la sanktan objekton de la jaŝiro Ŝirotori kaj komencis preĝi al ĝi. En kimono kun blazono li ankoraŭfoje eliris el la familio Miyoshi kaj refaris la ceremonion de geedziĝo. Kaj, kiel indikis la orakolo de sinjoro Nakao, la malsano de mia patro tagon post tago boniĝis kaj post kvar monatoj li tute resaniĝis.

Nia familio — “kiom da familianoj, tiom da karakteroj”

En la jaro 1935, la jaro de la Dua Oomoto-Afero, naskiĝis Kiĉiko, la unua filino; en 1937 naskiĝis Joriaki, la dua filo; kaj en 1939 naskiĝis mi Etsuo, heredanto de la familio. Poste, en 1942 naskiĝis Asao, la kvara filo; kaj en 1946 naskiĝis Haruo, la plej juna. Naskiĝis familio el 5 filoj kaj 1 filino

entute.

Tani Haĵime, mia plej maljuna frato, finis la mezlernejon Ookaŭa (*la nuna altlernejo Sanbonmacu*), transsaltante kursojn, kaj estis akceptita de la sesa altlernejo Okajama (*laŭ malnova sistemo*) kaj, fininte la tutan kurson de la universitato Okajama (*antaŭe la sesa altlernejo Okajama*), eniris en la Direkcion de Impostaj Aferoj, kaj post la plenumo de la ofico de estro de la Buroo de Impostaj Aferoj de Kumamoto k.a. li transiris al Orient Corporation (*kredita entrepreno*), kie li plenumis la oficon de la vicprezidanto. Premiito de la Ordeno de la Sankta Trezoro, li loĝas en la urbo Kaŭasaki.

Kiĉiko kaj Joriaki ĉiam alkroĉis sin al libroj, kvazaŭ ili apartenus al tute alia mondo, malsama kun ni, tri gefratoj. Sur la librobretaro de mia fratino vicstaris sep libroj en granda formato, t.e. franca novelo “Les Thibault”. Bedaŭrinde, mia fratino forpasis, kiam ŝi estis 36-jaraĝa, kaj ŝiaj postlasitaj infanoj, nome, Ĉinami kaj Makoto, estis vartitaj de miaj gepatroj.

Joriaki, kiu estis libroamanto sama kiel la fratino, finis la kurson de la Universitato Ŭaseda, kaj poste estis dungita de la televidstacio TBS; en ĝia informa sekcio li sinsekve servis kiel direktoro, produktoro, sekciestro kaj sekciestro pri personaro. Ni plurfoje petis lin revizii dokumentojn, necesajn al Swany (*la nomo de la kompanio de gantoj, fondita de mia patro, ni ŝanĝis al la nuna Swany en 1972*), kaj artikolojn por

kontribui al ĵurnaloj. Li nun loĝas en la urbo Maĉida.

Se retrospekti, diris Joriaki, siatempe mi (Etsuo) estis hetmano kaj du plijunaj fratoj estis miaj servistoj. Laŭ li, la fratoj estis en tia rilato.

Ankaŭ Asao, la kvara filo, finis la kurson de la universitato Ŭaseda, kaj estis dungita de Swany. Kiel la estro de Swany Ikeda, Swany Kooĉi, Swany Tokia Filio kaj Swany Koreio, li ŝarĝis sin per la rolo de fortulo post la kulisoj. Li klopodis por savi la grandan malordonde Swany Ĉinio. Li ekŝiĝis, kiam li estis 50-jara, kaj komencis administri agrikulturon en la urbo Suzaki, Gubernio Kooĉi, kion li deziregis. Nun li ĝoje prikantas la vivon de memprovizo.

Haruo, la plej juna filo, finis la kurson de la universitato Azia, kaj dungita de Swany, li sukcese plenumis markigon de la gantoj por plenaeraj aktivecoj. Li sendependiĝis, ricevante la rajton de marko anstataŭ ekŝiĝmonon. Ankaŭ nuntempe, pere de “Grip-Swany” lia entrepreno estas subtenata de entuziasmoj. Sed, bedaŭrinde, li mortis 42-jara pro la medola kancero; la entreprenon heredas lia sekvanto.

Kiam mi, 20-jaraĝa, iris al la ĉefurbo, kolektiĝis la fratoj. “La patro de Haĵime-niisan (*pliaĝa frato Haĵime*) malsamas kun la nia...” iu frato diris. “Kion li diras?” mi restis senvorta pro la konsterniĝo.

Tiam, mi unuafoje aŭdis “la fakton” pri mia familio.

2. Konkero de perturbo

La bazo de Swany estas malnova tendo de Usona Armeo

En 1937, mia patro, 29-jara, elmetis la ŝildon de “Firmao la Kudromaŝino Miyoshi” ĉe la aparta domo, apartenanta al la hejmo de Tani Senzoo, kie troviĝis la gepatra domo de mia patrino, kaj komencis vendi kudromaŝinojn k.a. Ekde la sekva jaro li komencis fari trikotajn gantojn, kaj la unuan etaĝon li utiligis kiel loĝejon de servistoj.

Dum milita tempo, mia patro kaj aliaj kvin samprofesiuloj fondis la entreprenon “Tooa Hikaku” (Orient-Azia Ledo) kaj mia patro enoficiĝis en la postenon de administranto. Ĉirkaŭ 150 homoj faris militajn objektojn, ekzemple, ledan kaskon por piloto de aviadilo k.a.

Pro la postmilita reformo mia patro denove fariĝis memstara, kaj lia entrepreno troviĝis antaŭ turnopunkto. Aŭdante, ke la usona armeo vendos malnovajn tendojn, li vidis komercan ŝancon. “Se ĝi estas fortika tendoŝtofo, oni povas uzi, por ĉio ajn.” Mia patro negocis en Osaka kaj sukcesis enmanigi la tendojn — trude konsentigante ŝipposedanton

de motorizita velboato, li enŝipiĝis kaj revenis kun la tendoj. Sed, la kudristoj rezignis, dirante “Neniel ni povas kudri ĉi tion pro la malmoleco.” Post la cerbumado oni surŝutis la tendon per rizobrano kaj frotis per ŝvabrileto, kaj fine sukcesis forpreni la akvoimunigilon.

Akirinte de la registaro la aĉetraĵton de 900 tunoj da malnovaj tendoj, la entrepreno estis financita de la banko 114 (*Hjakujuuŝi*) per la giganta sumo da kapitalo, t.e. 10 milionoj da enoj (*se transkalkuli en la nunan sumon, 200~300 milionoj*). Tiuj tendoj ja transformiĝis al la pantalonoj por karboministoj, kaj estis aĉetataj kvazaŭ flugi. Ĉar estis periodo post la militmalvenko, kiam ekstreme mankis vivnecesaĵoj, okazis granda mendado.

Mia patro dungis ĉirkaŭ 10 personojn, kaj li igis ilin surŝuti la tendojn per rizbrano, kaj forte froti ilin per lavbrosoj. La ĝardeno fariĝis kvazaŭ ŝlimejo. Kiel ili forigis la malpuran akvon post la frotado? Ĉu ili fluigis ĝin sur pli malaltan vojon? Poste, ili faris la laboron sur vadejo de la rivero Maekaŭa, proksime de la domo.

Kiam mia patro revenis de la vojaĝo, ne troviĝis tri kudristinoj, nome, Okada Hisae, Haŝimoto Asako kaj Ooniŝi Masako, kiuj ĉiuj ankoraŭ ne atingis la 20- jaraĝon. Mia patro ĉirkaŭserĉis tien kaj tien. Ili naĝis ja senĝene en la maro malantaŭ la domo.

“Tuj revenu kaj komencu la laboron!” kriegis mia patro, fronte al la maro.

“Ĉar ni estas sen kalsono,” respondis la virinoj ĝojkrie, “ni ja restas sen eliri el la maro!”

Estis nekredebla sceno. Se nuntempe, tio tute ne okazas. Ja estis epoko, tiel libera.

Kiam mi estis knabo de elementa lernejo, la malmola pantalono por karboministo estis fluge aĉetata je 100 enoj por unu (*ĉirkaŭ 4,000 enoj en nuntempa kalkulo*); tiam la komodo estis plenŝtopita per 100-enaj bankbiletoj. La retrato de nova eno estis limigita ĝis po 300 enoj por ĉiu dommastro; tial, mia patro deponis monon en la komodo por ke li ĉiam povu plenumi la pagon de materialkosto.

Iam en homplena trajno okazis tia afero, ke malaperis lia kofro, plena je novaj bankbiletoj, kiam mia patro iris al la necesejo. Tiu krimulo certe surpriziĝis pro la kofro, plena je granda sumo da bankbiletoj. Kaj, kiam amasiĝis mono, li ŝtopis la kofron per novaj papermonoj kaj ĝin sendadis al Oomoto. Pro la dufojaj grandaj subpremejoj fare de la japana registaro, preskaŭ ĉiuj instalaĵoj de Oomoto estis detruitaj; povas esti, ke la mono kontribuis por la rekonstruado. Tia enspezo fariĝis fundamento de la posta Swany, mi pensas.

Jes! la orakolo de la medio, kiun ricevis mia patro — “Ne gravas, kion ajn vi faros, sed se vi sendependiĝos, vi sukcesos” — trafis centprocente.

En 1950, mia patro pligrandigis la kapitalon je miliono da enoj, kaj renovigis la entreprenon kun la nomo “Miyoshi Sen’i Koogyoo (Akcia kompanio

Fibrindustrio Miyoshi)”, kaj revenis al sia vera profesio, t.e. fabrikado de gantoj.

Li klopodis por kulturi klientaron en Tokio, Osako kaj Nagojo, k.a. kaj kun sia edzino (*mia patrino*) li laboris en la fabriko, iniciate ekzemplante. Kaj tiel li faris sian rangon solida en la industria mondo de gantoj, kiu estas industrio origina en ĉi tiu regiono.

En la posta jaro 1969, mia patro enoficiĝis kiel la ĉefdirektoro de la Japana Ganto-Industria Kooperativo, al kiu apartenis 223 kompanioj, kaj en 1972, kiel la prezidanto de la Komerca Ĉambro de la urbeto Ŝirotori. Poste, li ricevis la Ordenon de la Sankta Trezoro, kvaran klason.

Favoro de la Patro

De la patro mi ricevis diversajn instruojn.

Kiam mi estis mezlerneano, mia patro ordonis al mi, ke mi eltiru najlojn el malnova ligna kesto kaj rektigu ilin; sed mi ne rektigis manplenon da najloj, kaj forĵetis ilin en kanaleton kaj iris eksteren por amuziĝo. Kiam mi revenis hejmen, la patro min demandis, “Kien vi lasis la najlojn?”. “Mi rektigis kaj metis ilin en la keston,” mi respondis kun ŝajne senkulpa mieno. “Kio do estas ĉi tio?” severe pridemandis mia patro, montrante la nerektigitajn ankoraŭ kurbaĵajn najlojn. Mi timis la patron, nepardoneman pri tiu, kiu malŝparas aĵojn.

Meti enskatoligitajn gantojn en lignan keston, najli la lignan keston, kaj ĉirkaŭligi ĝin per dika pajlŝnuro, estis mia tasko. Eĉ se mia korpo estis malgranda, mi havis memfidon pri fizika forto kaj lerteco; eĉ nun mi povas forte kaj rapide streĉi la pajlŝnuron.

“Helpu la enkestigon!” ordonis al mi la patro, kiam mi revenis de la lernejo.

Malferminte kartonan skatolon, mi enmetis gantojn, kaj la kovrilon de tiu skatolo denove mi surmetis. “Ba!” riproĉis la patro. “La unuan kovrilon lasu flanken kaj uzu la kovrilon de la sekva skatolo!” li diris. Tiamaniere, duobliĝas la efikeco. Mi estis severe edukata de la patro, ke la plej grava estas la rendimento ĉe tajlado kaj ankaŭ ĉe apreto. De tempo al tempo mi vizitis la klientojn kun la patro, kiu kutime sola negocis. Mi akompanis lin al Osako, Nagoyo, Tokio k.a. “La kvanto da mendoj ricevitaj proporcias al la tempodaŭro de interparolo” kutime diris la patro, kaj tre ofte okazis, ke ni ne povis preni tagmanĝon pro la plilongiĝo de negoco. Por mi kun juna korpo tio estis nenio alia ol sufero.

Ni atingis la urbon Osako per la nokta vaporŝipo de Katoo-kisen, kaj je la sesa matene, prenis matenmanĝon ĉe la strata ĉar-manĝejo en Tenpoozan, kaj frapis la pordon de ledkomercejo en la urbeto Daikokuĉoo. Ĉe la vendejo Mijamae ni estis akceptitaj kun saluto “Bonvenon!”, kaj kun la prezidanto Mijamae, kiu provizore forlasis la

matenmanĝon, ni faris negocon. De la oka matene, ni aĉetis ledon en la najbara vendejo Nakamura-hikaku, kaj post la rondvizado de klientoj en Senba, ni revenis per la nokta ŝipo.

La patro rondvitis la urbojn Koorijama, Niigata, Kanazaŭa k.a., unu post alia nur per nokta vagonaro, foje eltenante unusemajnan penigan vojaĝlaboron sen tranokti en hotelo eĉ unu nokton, kvazaŭ li celus aperigon en la *Guinness-libro de Rekordoj*. Supozeble, elteni du noktojn da trajna veturado estis tute facile por mia patro.

Favoro de la patrino

Stranga estis la stato de la surdorsa suĉinfano.

Rimarkis la patrino, ke la bebo ne kapablas ekstari pro la senforta dekstra piedo. Alta febro daŭris dum kelkaj tagoj. La patrino konfuzita hastis al hospitalo. Ŝi rondvitis ian ajn hospitalon senelekte.

“Poliomjelito” diagnozis kuracisto kaj asertis, ke ĝi postlasos sekvaĵon.

Ĝuste tiu suĉinfano estis mi post ses monatoj ekde la naskiĝo.

En mia infaneco, la ventro de mi, sindorlota, ĉiam tuŝis la dorson de mia patrino, kaj de kiam aperis la simptomo de poliomjelito, mia ventro des pli ne povis deiĝi de ŝia dorso. La patrino kun mi sur la dorso vizitadis diversajn hospitalojn en Osako

kaj ĉiu loko en la insulo Ŝikokuo. Mi ricevis iam elektroterapion kaj iam masaĝon.

“Ha, la piedon de Etsuo mi volas kuraci!”

Post la afliktiĝo, kiu ripete trafis ŝin, mia patrino decidis trovi la savon en la kredo de Oomoto. Ĝis tiam ŝia dikredo estis pro la devo al sia edzo, sed, okaze de mia perturbo, ŝi fariĝis pli kaj pli entuziasma.

Se en mi trovĝas eĉ iometo da elstara kapablo, tion mi ŝuldas al mia patrino.

Mia patrino estis tre solida en sia koro kaj tiom malkaŝema, ke ŝi tuj fariĝis amikino kun iu ajn. Ŝi estis mirege simpatia kaj eĉ miajn amikojn traktis tute senpartie. Krome, ŝi estis malavara. Se iu el ŝiaj parencoj aŭ konatoj admiris ion en la ŝranko, ŝi tuj diris senhezite, “Ne gravas, bonvole portu ĝin al via domo”.

Estis tia afero: en la urbo Takamacu ŝi donacis al iu malriĉulo la tutan monon, kiom ŝi havis tiam, kaj ŝi do petis stacioficiston senpage veturi ĝis la stacio Ŝirotori. Ĉar ŝi estis tiom malavara, mia patro neniam konfidis al ŝi la monujon. Ankaŭ la patrino tute ne ĝin deziris.

Kiam ĉiumonate ŝi vizitis la centran oficejon de Oomoto, la patrino ne veturis en la eksprestrajno; ŝi uzis la ĉiehaltan trajnon por ŝpari la vojaĝkoston. “Ĉar en la trajno mi povas legi tre trankvile la *Rakontojn el la Spirita Mondo*, do al mi estas tre oportune!” ŝi diris, kaj laŝparitan monon ŝi donacis

al la agadelspezo por Oomoto.

Mia fundamenta sinteno por la granda flugilbato en la vivo — tutforte klopodi por la venko, rigardi realon, starigi celon kaj interkonsiliĝi, ĉu tio estas plenumata aŭ ne, ktp. ktp. — se bone pripensi, ĉi tiuj ĉiuj havas la originon al la influo de mia patrino.

Laborante tre fidele ĝis la malfrua nokto por helpi mian patron, ellernante la florarangon kaj ĉanojon (teceremonion), la patrino vivis riĉe kaj plezure. La patrino montris al mi la ekzemplon, kiel devas vivi homo.

Sed tamen, ĉio ne finiĝis sen severa repago, se mi trompis tian patrinon. Se oni perfidis ŝian fidon, mia patrino neniun pardonis, sed aliflanke ŝi havis tian grandanimecon, ke ŝi povis atendi la memkzamenon de tiu homo.

Kiam mi renkontis obstaklon, ĉiufoje min instigis tia rektanima vivmaniero de mia patrino.

La patrino, senzorge pri tempo kaj loko, tuj elbuŝigis vortojn, kiuj venis al ŝi, kaj ili tre ofte trafis. Pro tio, povis esti, ke troviĝis homoj, kies koro estis vundita de ŝiaj vortoj, sed ŝia koro estis ĉiam malfermita kaj tial ŝi estis konfidata de ĉirkaŭaj homoj.

Tian konduton de mia patrino la patro nur trankvile rigardis kun nenia vorto.

La gepatroj ambaŭ egale klopodis por la ekonomia vivo: ili tute ne uzis klimatizilon kaj ili pasigis vintron nur per elektra kotaco (japana subtabla

varmigilo).

Ili ĝuis la modestecon kontente, kaj silente dediĉis por la granda celo sian tutan havaĵon.

Kio estas Oomoto

Ĉi tie mi simple prezentu, “Kio estas Oomoto?”

Majstro Deguĉi Hidemaru (1897~1991), la Tria Kungvidanto de Oomoto, jene skribas en sia verko:

“Ĉiuj estaĵoj en la universo inter si rilatas kaj unueciĝas. Krome, ili moviĝas senĉese. Kiel ajn ili moviĝas kaj kiel ajn ili ŝanĝiĝas, ili ĉiam rilatas unu al la alia kaj troviĝas en la plena harmonio. Tute ne okazas, ke tia unuecigita korpo, kompleksa kaj delikata, hazarde aperas. Ĉi tio okazas, ĉar post ili allaboras ia unueca grandega volo. La posedanton de ĉi tiu grandega volo oni nomas “Dio”.

Dion ni ne povas vidi, sed senti Lin ni povas. La mondon nevideblan, la forton nevideblan ni pripensu. Komprenu tiun, kiu nin kreis kaj kiu igas nin vivi.

En 1892 matrono Deguĉi Nao (1837~1918), loĝanta en la urbo Ajabe, Gubernio Kioto, subite eniris en la staton de Diposedo, kaj komencis elbuŝigi abundajn revelaciojn. “Min ĝenas Vi!” ŝi plendis al la Dio. “Do, prenu penikon!” proponis la Dio. “Mi ne scipovas literojn” respondis Nao. “Vi ne bezonas

skribi, Mi skribos” diris la Dio. La revelacioj, tiamaniere produktitaj, atingis 200,000 foliojn da japana papero. Ĉi tiu estas nomata Ofudesaki (*Diaj revelacioj*) kaj Nao, analfabeta, fariĝis la Fondintino de Oomoto.

Tri jarojn poste, junulo nomata Ueda Kisaburo el la urbo Kameoka, Gubernio Kioto, kiel adoptito edziĝis al Sumiko, la plej juna filino de Nao, kaj poste li ŝanĝis siannomon al Onisaburo. Nao kaj Onisaburo, eĉ forgesante dormon kaj manĝon, disvastigis la Diajn instruojn, kaj la fundamento de Oomoto laŭgrade konstruiĝis.

Ofudesaki estas instruo de Oomoto, kaj tamen, ĝi inkluzivas diversajn aferojn, ekzemple, pri astronomio, geografio, socio, historio, politiko, ekonomio kaj homa vivo. Estas Onisaburo, kiu klasifikis kaj ordigis ĝian enhavon, por ke oni komprenu pli facile. Plue, al ĝi aldoniĝis religiaj luminiĝo kaj kredo de Onisaburo, kaj laŭgrade formiĝis la teoria sistemo de la organizo Oomoto. La Oomoto-Centro de Ajabe fariĝis la sankta tereno de diservaj aferoj, dum la Oomoto-Centro de Kameoka fariĝis la sankta tereno de la misiado.

La ruino de la kastelo Kamejama (*en la urbo Kameoka*), konstruita de Akeiĉ Micuhide, fariĝis bazpunkto ekde la jaro 1919. De la loko, kie Micuhide planis sian provon fariĝi reganto de Japanio en la 16-a jarcento, komenciĝis rimarkinda progreso de Oomoto. La organizo Oomoto prosperis grandskale

inter la Taiŝoo- kaj Ŝooŭa-periodoj en la frua 20-a jarcento, kaj eĉ intelektularo kaj militistaro deziris la savon de “malkonstruo kaj rekonstruo”; tiamaniere ĝi fariĝis unu granda potenco. Tio estis grandega movado por socia reformo. La japana registaro sentis la timon al la energio, kia povus renversi eĉ la tennoan aŭtoritaton, aŭ al la diferenco de religikoncepto, kaj al la organiza movado, kiu apelaciis pri kontraŭmilito, dum venka etoso regis la socion, kaj dufoje en 1921 (*la 10-a jaro de Taiŝoo*) kaj en 1935 (*la 10-a jaro de Ŝooŭa*) la registaro ĝisfunde subpremegis Oomoton, akuzante ĝin pri krimoj kontraŭ la tennoo, kontraŭ la Leĝo por Publika Ordo k.a. (*la Unua kaj la Dua Oomoto-Aferoj*). La temploj de ambaŭ sanktaj terenoj estis komplete detruitaj per dinamito, kaj la estraranoj estis metitaj en malliberejon. Miloj da homoj estis arestitaj kaj 16 homoj perdis la vivon.

Kune kun la malvenko de Japanio, la Leĝo por Publika Ordo kaj malrespekta krimo kontraŭ la tennoo, ambaŭ ricevis la verdikton de senkulpeco, kaj la justeco de Oomoto estis atestita. La juristoj rekomendis, ke Oomoto postulu kompencon pro la damaĝo kaŭzita, sed Onisaburo rifuzis, dirante, ke tia kompenso venus de la popolo, kiu jam sufiĉe suferis pro la milito. La fakto, ke la organizo ne reklamaciis kontraŭ la registaro, ankaŭ signifis, ke multaj faktoj pri la afero ne estis publike prilumitaj.

Oomoto tenas la maksimumon “*Unu Dio, Unu Mondo*,

Unu Interlingvo”, kaj antaŭenpuŝas: interreligian agadon, kunlaborante kun multaj religioj, ekzemple, Tao-Juan, naskita el Ĉinio, kristanismo, islamo, k.a.; Mondfederacian movadon, kiu celas la realigon de monda registaro; kaj la propagandan movadon de la internacia lingvo, senpartia kaj facile lernebla.

Resume, eblas diri, ke la celo de Oomoto estas la transformado de la mondo kaj la feliĉo de la homaro.

Oomotaniĝo de miaj gepatroj

Mia patro vizitis Oomoton kiam li estis 17-jara, kaj unuafoje aŭskultis la prelegon de la Fondinto Onisaburo, tiam 54-jara. Geniulo, kiu versas ununokte centojn da tankaĵoj. Superhoma figuro, kiu estis cirkule priparolata kiel “granda profeto”, “monstro”, “heroo” pro la elstarantaj spiritkapablo, aktiveco k.a. Sed, ĉe li neniom troviĝis la sinteno ŝajni sin Religia Fondinto; mia patro admiris lian ĉarmplenan popularecon. Aŭskultinte la klarigon pri la cirkonstancoj de la Spirita Mondo kaj la ekziston de la eterna vivo, mia patro sentis grandan lumon en la estonteco, kaj tra la tuta korpo abunde pleniĝis forta spirita energio, laŭ li.

Mia patro, kiu, jam de infaneco, gustumadis suferojn kaj humiliĝojn, animskuiĝis pro la instruo, ke la mondo, regata de mono, estos malkonstruita

kaj rekonstruita, kaj li tuj oomotaniĝis. Li decidis dediĉi sian tutan vivon al la misiado de Oomoto, ne dezirante socian rangon kaj riĉaĵon, kaj vivante humile.

En 1935 mia patro enoficiĝis kiel la estro de la filio de Oomoto en Ŝirotori, kaj en 1956 kiel la estro de la loka centro Ŝirotori de Oomoto. De 1964 li plenumis la oficon de prezidanto de la loka organizo de Oomoto en la gubernio Kagaŭa dum 5 periodoj (12 jaroj), kaj de 1964 kiel unu el la reprezentantoj de Oomoto dum 10 periodoj (26 jaroj).

Praktikante la instruon “*arto estas la patrino de religio*”, mia patrino praktikis tankaon, kaligrafion, japanstilan pentradon, ĉanojon kaj ludadon de la jakumo-kotoo (*dukorda citro*). Mia patrino sinfordonis, kvazaŭ ŝi forgesus la laciĝon de laboro, kaj de iam ŝi tiujn artojn posedis. Krom tio, ŝi preskaŭ la tutan vivon skribadis en la taglibro, ja ŝi estis homo de kredo.

En 1952 ŝi enoficiĝis kiel la prezidanto de la Virina Societo de Oomoto en Ŝirotori, en 1961 kiel la prezidanto de la Ligo de la Filioj de Oomoto en Kagaŭa, kaj en 1965 kiel la prezidanto de la kontakta konsilio de virinoj por Ŝikoku en Oomoto. En 1971 ŝi enoficiĝis kiel la direktoro de “Laboristina Domo” en la urbeto Ŝirotori. De 1982, kiel la unua prezidanto de “Ĵikiŝinkai”, la organizo de kredantinoj en Oomoto, ŝi daŭrigis la preleg-agadon en diversaj lokoj en la tuta lando. De 1983 ĝis 1988, ŝi estis

nomumita kiel estrarano de Oomoto, kaj de 1986 servis kiel prezidanto de “*Esperanta Amikaro de Oomoto*”.

Batalo kun perturbo

Malgraŭ la fervora klopodo de mia patrino, ĉe mia piedo restis perturbo.

Feliĉe, mi povis paŝi per mia propra forto, sed ne bone kreskis la dekstra piedo kaj krome ĝi estis malforta, kaj komenciĝis la dumviva batalo kun ĉi tiu malsano. Sed, se mi ne estus atakita de ĉi tiu malsano, nun ne ekzistus mi, nek la nuna kompanio.

Ĝis kiam mi lernis en la malaltaj klasoj de la elementa lernejo, mia patrino Ŝimeko kun mi vizitadis la hospitalon de Universitato Oosaka. En la frua Ŝooŭa-periodo, necesis uzi la pramŝipo *Utaka* (*inter Uno kaj Takamacu*), kaj atinginte la havenon de Uno trans la maro, amasego da pasaĝeroj, en kaosa interpuŝiĝo, ekkuris cele al la trajno al Okajama. Repuŝitaj flanken ni postsekvis ilin. En la trajno de la linio San’joo, ni celis al Osaka, sidante pli ol kvar horojn sur la papero de ĵurnalo.

Sur la koridoro, plena je pacientoj atente rigardantaj, oni igis min paŝi portante nur kalsonon. Kvankam eĉ mia infana koro volis kaŝi la dekstran piedon maldikiĝintan! “Panjo, helpu min!” kore mi

kriis.

Kiam mi lernantiĝis, daŭris la tagoj, en kiuj mi ne povis sekvi amikojn — de mia domo ĝis la elementa lernejo troviĝis la distanco je 250 metroj. Se mi klopodus, mi povus paŝi; sed estis tagoj, en kiuj mi min dorlotis sur la dorso de la patrino. Sed, “per miaj propraj kruroj mi volas kuri, salti kaj ludi” — nur tion mi deziradis.

Ĉar iuj amikoj mokis min fingromontrante kaŝite, ĉiufoje mi ricevis ŝokon kaj kelkajn horojn mi restis sen endormiĝi kun larmoj. Pro la honto, ke oni vidis mian paralizitan piedon, tagon post tago mi detenis min de la paŝado; sekve, ŝajnas ke la kreskado de mia malsupra korpo rimarkinde prokrastiĝis dum la kreska periodo.

Rezulte de tio, dum la staturoj de miaj fratoj ĉiuj superas 170 centimetrojn, sole mi devas kontentigi min per nur 160 centimetroj.

Sed, min tian miaj amikoj timis. Ĉar ĉiufoje, kiam mi estis priridata de ili, mia venĝo estis enakvigo de iliaj lernolibroj.

“Ni ĉiuj senescepte devas helpi s-ron Miyoshi” persvadis la samklasanojn la instruisto Abe Kenzoo, respondeca pri la 5-a kaj 6-a lernojaroj, kaj ĉe la ekskurso bonvolis porti mian pakaĵon. Nur la instruisto Abe, kiu ĉiam min protektis, estis mia morala apogo.

Verŝajne, al mi la spirito estis kulturata laŭgrade kaj fariĝis forta, tiel ke mi povis elteni malfeliĉajn

situaciojn, eble, ĉar mi ripete spertis paciencon, en la infaneco. Poste, eĉ se mi renkontiĝis kun la oftaj senkuraĝiĝoj, mi neniam pensis, ke mi nun havas suferon — nur krom unu granda amoperdo.

Fuĝtumulto post la amperdo

En la juneco, vizitis min la plej granda malfeliĉo en mia vivo. Mi, 22-jaraĝa, estis rifuzita de virino, kiun mi amis daŭre ekde la tempo de altlernejano, kaj falis en la fundon de senesperigo.

“Ja tion kaŭzis la perturbo de mia piedo,” mi forte pensis kaj perdis la esperon por plu vivi.

“Mi jam volas morti. Mi min mortigu.”



La aŭtoro sur sia skotero

Kun la intenco min ĵeti en la maron kaj kun nenia plano, kien iri, mi ekrajdis sur la hejman skoteron, kaj forlasis la domon en frua mateno de marto. Enpramiĝinte de Naruto, mi celis al Insulo Aŭaĵi. Irante norden tra Aŭaĵi, mi transveturis Markolon Akaŝi. Dum mi ne rimarikis, la skotera mantenilo celis en la direkto de la domo de Joriaki, la dua pliaĝa frato en Tokio. “Jes! Mi petu la fraton aŭskulti mian korinklinon deziri fuĝi el ĉi tiu mondo,” mia celo estis decidita.

Estis tia tempo, kiam Nacia Vojo 1, la ĉefa arterio, estis tiom mallarĝa, ke apenaŭ du aŭtoj povis vid-alvide trafiki; do, ne troviĝis tia disponebla spaco, en kiu ruliĝu durada veturilo. Tuj apud mian skoteron, rantmovekurantan kun la rapido de 20 kilometroj por horo, preteriradis centoj aŭ miloj da kamionoj, postlasante furiozan ventokirlon kaj bruon. Pasante tra Kioto kaj Hamana Lago, transirante la riveron Tenrjuu, kaj frostigante la tutan korpon, mi ruligadis la skoteron nur rektanime. Mi multfoje ripozis vojflanke, kaj tamen min multe suferigis la nokta malvarmeco. Haltigante la skoteron, mi skuis la tutan korpon, piedfrapadis kaj frotadis la manojn, por min varmigi. Kiam mi venis al la montokolo de Hakone, mia forto ja kadukiĝis pro la deklivo, kiu daŭris, kiom ajn mi supreniradis.

Kiam mi manĝis udonon ĉe la ĉarrestoracio, najbara kamiona ŝoforo alparolis al mi, “Malbona estas via vizaĝkoloro, ĝis kiu loko vi iros?” “Al

Tokio,” mi respondis. “Ĉar estas danĝere,” li diris, “mi portos vin sur mia kamiono.” Apenaŭ li diris, kun sia asistanto li suprenĵetis mian skoteron sur la kamionportejo de Seinoo-Unju (Frajta Kompanio Seinoo) kun la kuraĝiga krio “unu, du, tri!” Kaj sur la varma asistanta seĝo mi duondormis.

En posta tago, la plej maljuna frato diris, “Tiu homo donis al Etsuo ree la vivon.” Kaj li vizitis la ĉefoficejon de Seinoo-Unju kaj serĉis la homon. Sed, ĉar la kompanio permesis al neniuj ŝoforoj porti homon, la favorinto ne aperis.

Kvankam danke al la ŝoforo mi sukcesis atingi la urbegon Tokio, mi ne sciis la adreson de la dua pli aĝa frato; sencele mi devis kuradi tien kaj reen en Tokio. Tokio estas eksterordinare granda! Mi konvinkiĝis el la korfundo. Baldaŭ mi ekrememoris, ke la domo de la dua pli aĝa frato situis apud la Municipa Universitato de Tokio en la kvartalo Meguro. Kaj, kiam en vespero mi serĉis apud la universitato, ĉe la dekliva malsupro de Avenuo Universitato, mi hazarde renkontiĝis kun Kazukosan, la edzino de la dua pli aĝa frato. “Etĉan, kion vi faras en tia malvarma loko!?” Ŝi alvokis min.

Apenaŭ mi eniris en la domon, revenis la frato, kiu min serĉadis, kaj li diris mirigita, “Ha, kiamaniere vi venis ĝis ĉi tiu loko!?”

Dum kvin jaroj mi sopiradis je la knabino de mia unua amo kaj tamen de ŝi mi estis rifuzita; la sufero dum kvin jaroj ĝis ŝia rifuzo eksplodis, kvazaŭ

riverakvo rompus la digon.

Mi plorkriegis dum ĉirkaŭ unu horo. Estis la unua fojo, ke mi larmis antaŭ homoj.

La gepatra domo, kie okazis granda tumulto pro “fuĝo de Etsuo”, ricevis la telefonon “li venis al Tokio”, kaj tuj flugvenis la patro. Por min konsoli per la plej granda klopodo mia patro igis min unuafoje flugi en aviadilo ĝis Osako, kaj kuniĝis kun la patrino ĉe la varma fonto Sakakibara en Ise, kaj tie ni tranoktis. “Mi volis eniri en la Spiritan Mondon sen ĉi tiu malbela korpo,” mi plore plendis.

La zorgo de la gepatroj kaj la vizaĝo de la patrino en tiu okazo eĉ nun reviviĝas en mia cerbo.

Subtenata de la varma amo de tiaj gepatroj kaj familianoj, mi, povinta edziĝi kaj ricevi tri filinojn kaj kvar genepojn, nun remaĉas la feliĉon.

La trovo de mia misio

“Konsiderante vin jam mortinta, studu en Oomoto,” rekomendis la gepatroj en la varma fonto Sakakibara.

La cirkonstancoj de mia domo estis tiaj, ke multaj homoj frekventis mian domon kiel la filion de Oomoto, tiel ke, kiam mi vekiĝis, apud mia kapkuseno okazis kunsido. Sed ĝis tiam mi dubis pri religio, kiu sin ĵetis al mongajno malbonuzante dikredon, kaj kiu katenis homojn per severa

disciplino, kaj finfine kaŭzis eĉ militon. “Ĉu tio estas vera, ke religio savus homojn?” mi pensis, kaj tute ne volis partopreni en la rondo de interkonsiliĝo.

Sed, ĉar ĝuste mi en la juneco, ĵus perdinta la esperon por plu vivi, renkontinte la plej malfacilan vojon de la homa vivo, al mi estis donita la granda turnopunkto pri dikredo.

Mi vizitis en Ten'on-kyoo, unu el la sidejoj de Oomoto, disetendiĝanta antaŭ la stacio Kameoka sur la fervoja linio San'in. Kiam mi trapasis la densegan arbaron, alte elstaris la tegola tegmento de la templo Ban'oo-den. La kastelo Tanba-Kamejama, de kiu Akeĉi Micuhide (*la kastelmastro*) ekiris cele al la budhisma templo Honnooji (*en Kioto*) kun 10,000 samurajoj, estas la nuna sankta tereno de Oomoto.

Izolute de la socio, en la natura medio kun la dense kreskantaj arbegoj, mi pasigis 43 tagojn. Mi ellitiĝis je la kvina, kaj faris unu post alia, purigon de necesejo, preĝadon al Dio, aŭskultadon de lekcio ... rektanime mi min purigis, kaj mi jam ne sentis malpura eĉ la purigadon de necesejo nudmana. Estis tiaj tagoj, en kiuj mi vivis, elmontrante la tutajn korpon kaj animon antaŭ la granda forto nevidebla. Per la honesta koro, kredante ke teorio ne estas absoluta, mi ensorbis ĉion ajn.

Vespere mi atente kaj profunde legis “Memornotojn pri Dikredo”, la verkon de Majstro Deguĉi Hidemaru. El la korfundo mi emociiĝis kaj estis frapita de ĝia persvadpovo.

“La homo ĉiu naskiĝas en ĉi tiu mondo kun la grava misio, neplenumbla krom de li mem.”

Senĉese fluis larmoj pro emocio. Kaj tremis la tuta korpo.

Kia stultaĵo, ke mi volis morti. Mi eraris!

Jes! De nun mi igu la kompanion de mia patro unuaklasa fabrikanto!

Pozitive mi travivu la homan vivon! Naskiĝis kuraĝo! “Pozitivo apartenas al la ĉielula regno, negativo al infero” en la verko “Memornotoj pri Dikredo” fariĝis mia devizo.

La Majstro Deguĉi Hidemaru estas ankaŭ tiu persono, kiu sciigis al Oomoto la ekziston de la Internacia Lingvo Esperanto. Kiam li estis studento de la ŝtata universitato Kioto, li sendis al Majstro Onisaburo, Doktrin-fondinto de Oomoto, ĵurnalan artikolon pri *Esperanta kurso en Universitato Dooŝiŝa*. Ĉi tio donis la okazon: en 1923 estis fondita “Esperanto-Studsocieto de Oomoto” (*la nuna Esperanto-Populariga Asocio*).

Poste, la verko de Majstro Hidemaru, “Memornotoj pri Dikredo”, estis eldonita kiel “Esplorado de Vivĝojo” el la eldonejo Koodanŝa, kaj ĉi tiu fariĝis furora libro. Mi legis ĝin, ripetante centojn da fojoj, tiel ke la libro ĉifoniĝis.

“Trezoro” post la rifuzo

Miaj gepatroj komencis serĉi mian kunulinon.

Unue mi intervidiĝis kun virino, mezdika kaj mezalta, nobla kaj ŝajne grandanima, laboranta en la centra oficejo de Oomoto, sed estis rifuzita, “bonvolu konsenti, ke ne okazis la intervidiĝo.”

“Aha, konsentite! Duonon de la homoj en la mondo okupas virinoj,” mi tenis min grandsinjore, kaj post duonjaro, iom da tempo mi havis interrilon kun virino el la sama regiono, malaltastatura kaj trankvila. Sed ankaŭ ĉi tiu rilato ne bone iris; ŝi iam foriris de mi—.

Ankaŭ kun flino de Oomoto-kredanto en Ŝizuoka mi intervidiĝis. Mi veturis skuata en ĉiehalta trajno, pasante preter staciojn Okajama kaj Nagojo, transirante la riveron Tenrjuu, kiun mi antaŭe transkuris per skotero, kaj de la stacio Ŝizuoka mi vizitis ŝian domon. Ŝi, maldika kaj ŝajne malforta, ne vokis mian intereson, kaj, antaŭ ol mi revenis hejmen, jam atingis la telegramo por la rifuzo.

Mi ankoraŭ freŝe memoras, ke miaj korpo kaj animo kvazaŭ fandiĝus, frapite de la imponeco de Monto Fuĵi, diece elstaranta. Mi elkore konvinkiĝis, ke ĝi estas ĝuste japana trezoro, pri kiu ni povas fieri mondscale.

Ankaŭ la geavoj, laŭdire, afliktiĝis pri la serĉado de mia edzino, kaj ili havis intereson pri Kamada Joŝiko, nepino de la plijuna fratino de mia avino. Ili

jam komencis agi antaŭ ol la tumulto de mia fuĝo.

Senzoo, mia avo, esploris pri ŝi kaj el tio rezultis, ke ŝi estas fidinda persono, kaj, vizitante ŝin kvarfoje, li invitis ŝin al la kompanio de mia patro, por ke ŝi estu dungita. Kaj ŝi kaj mi fariĝis dungitoj de Swany en la sama periodo.

Yoshiko estis la kvina filino inter la geedzoj Kamada Eikiĉi kaj Hideno, kiuj okupiĝis je la agrikulturo en *Njuunojama* en la antaŭa vilaĝo Fukuemura, iom distanca de mia domo. Ŝi estis tri jarojn pli juna ol mi, finis la kursojn de la mezlernejo Fukue, kaj estis alta je 155 centimetroj. Ŝi estis svelta kaj ĉarma. Koncerne la tumulton de mia fuĝo, laŭdire, ŝi detale konis.

Miaj geavoj klopodis por mallongigi la distancon inter ni: dirante ke hodiaŭ estas festatago, ili regalis nin du, aŭ dirante ke hundo vagis en la domon, ili nin invitis.

Eksterordinare rapide ŝi proprigis al si la kudrometion, kaj baldaŭ ŝi komencis rondviziti subkontraktajn fabrikojn kun mi. Ŝi kapablekalkulis pecojn, ŝargis la aŭton per ili kaj povis fari la traktadon senmanke. Se diri aŭdace, ŝi ŝajnis al mi iom fiera, kaj tio povis esti ŝia sola manko.

“Kian impreson vi havas pri Yoshiko?” demandis la geavoj en iu tago. “Sufiĉe bona knabino ŝi estas,” mi respondis kiel mi pensis. “Bone, vi diru al ŝi per via propra buŝo jene,” diris la avo.

“Kvankam mi havas paralizitan piedon, nepre mi

igos vin feliĉa. Tiel konvinku ŝin vigle.”

Pro la eksterordinara insisto penetris al mi en la koron, kiom mi timis la malsukceson. Mi pensis, ke miaj koro kaj korpo estas jam renovigitaj per la asketismo en Oomoto, sed mi eksciis, ke mi ankoraŭ restas sen konkeri la psikan traŭmaton de la unua amperdo. Tial, ĝis nun ne bone iris la intervidiĝo. Simpatiente kun tia vundebla koro, la geavoj tre fervore kuraĝigis min. Kiam mi imagas tian amon de la geavoj, eĉ nun venas larmoj al miaj okuloj.

En iu nokto, mi elvenigis Yoshiko al la marbordo malantaŭ la domo, kaj min sternis apud ŝi. Favoris tio, ke mi ne povis bone vidi ŝian vizaĝon en mallumo, kaj tial mi povis plenumi la instruon de la avo, ne cent-procente, sed preskaŭ.

Mi altiris ŝian manon, sed ŝi ne rifuzis. Mi vagis ĉirkaŭ ŝiaj nazo kaj buŝo, kaj tamen, mi ekstaziĝis en la unuafoja kiso.

Jam pasis pli ol duonjarcento de post nia geedziĝo. Al la edzino mi havas nenion krom dankemo; mi volas esprimi “Dankon pro via granda subteno!”



La aŭtoro 23-jara edziĝis kun Yoshiko Kamada, 1963

3. Serĉado de klientoj

Gant-industrio en Kagaŭa

En Gubernio Kagaŭa, kun nur 10 procentoj da areo de Insulo Shikoku, svarmas ĉirkaŭ miliono da loĝantoj, kaj koton, sukero, salo, rizo, gantoj, lakaĵoj, sojsaŭco, kaj rondaj ventumiloj estas specialaj produktaĵoj; lastatempe, oliv-bovaĵo kaj oliv-serioleto estas famaj.

Faris la okazon, ke en Kagaŭa prosperis gant-industrio, persono nomata Futago Ŝunrei, kiu estis ĉefbonzo de la budhisma templo Senkoŝi en la vilaĝo Fukue, en la antaŭa urbeto Ŝirotori. Li sekulariĝis en la mezo de la periodo Meiĵi kaj lernis la far-teknikon de gantoj en Osako. Tanacugu Tacukiĉi, la disĉiplo, kiu heredis la teknikon, revenis al la hejmloko en 1900 kaj fondis la firmaon nomatan “Ŝakuzen-Ŝookai”; ĉi tiu estis la unua gant-fabrika en la regiono.

Dum la Unua Mondomilito ĝi ricevis de Britio amasmendon kaj tio alportis prosperon al la firmao, kaj la malnova urbeto Ŝirotori en la urbo Higaŝikagaŭa eksaltis kiel “Urbeto de Gantoj”. Ankaŭ en la najbaraj malnovaj urbetoj Hiketa kaj Oouĉi

disvastiĝis ĉi tiu industrio, kaj du firmaoj, “Gantoj de Osako” kaj “Orientaj Gantoj”, aparte solidigis la fundamenton. En 1918 post la milito ili fabrikis 730,000 dekduojn.

La kialo ke la gant-fabrikado fariĝis plej granda loka industrio, estas tial, ĉar la procedojn, nome, tajladon, ornamon, kudradon kaj apretadon, subtenis “la virinaj manlerteco kaj kudr-tekniko”.

Okaze de la rondvojaĝo de la tennoo de Ŝooŭa en 1950, estis organizata ĉiujare “Gant-festo”, kaj komencis multiĝi la eksporto, konkerante diversajn malfacilojn; tiel, oni reprenis la prosperon antaŭ la Pacifika Milito.

En Japanio 230 gant-kompanioj grandaj kaj malgrandaj prosperadis, sed, pro la Nixon-shock en 1971, okazis surpriza plialtiĝo ĉe dolara valuto (*unu dolaro kostis 200 enojn*) kaj ili perdis la konkurencon kapablon en la eksportado: sceno ŝanĝiĝis en mallumo.

Samtempe la plialtiĝo de la kosto de salajroj donis plian atakon.

Tiu industrio estas neeviteble laborintensiva, kaj sinsekve aperis la kompanioj, kiuj translokis siajn produktbazojn al fremdlandoj; en la momento de la jaro 2008, 78 kompanioj apartenantaj al la Japana Gant-industria Sindikato, kiuj okupis 80 procentojn da membroj, jam elpaŝis en la landojn, nome, Ĉinio, Vjetnamio, Indonezio ktp. Sed, la nombro de entreprenoj abrupte malmultiĝis, kaj nun troviĝas

malpli ol 70. Koncerne ilian jaran vendsumon, en 1991 ĝi atingis entute 66 miliardojn da enoj, sed nun kalkuliĝas je nur 35 miliardoj da enoj.

Koncerne produktaĵojn, kun la kontraŭfrostaj, kiuj estas ĉefaj artikloj, ĉekape, ili temas pri ĉia ajn necesaĵo, ekzemple, por skio, por la defendo kontraŭ ultraviolaj radioj, por la maraj aferoj, por bazopilko, por geedziĝa ceremonio, ktp., sed estas neeviteble, ke la ĉefa forto temas pri la sezonaj artikloj nevendebblaj escepte en vintro. Aperis do tiaj kompanioj, kiuj starigis propran markon, serĉante sian vojon en la nova kampo de ledaj artikloj, ekzemple, de monujo, luksa sako ktp.

De nun do mi detale rakontu, kiamaniere nia kompanio Swany frontis kaj luktis kontraŭ malfacilaj problemoj.

Naskiĝo de Swany

Kiam ni komencis negocon kun eksterlandoj, nia kompanio ekhavis novan problemon. Koncerne la kompanian nomon de “Miyoshi-Sen’i (*Fibro Miyoshi*), la origino de la nuna Swany, en eksterlandoj por plejparto da homoj ĝi estis ne intima; ili ne povis ĝuste prononci, ili prononcis “Maijoŝi”. Do, estis la jaro 1968 antaŭ 50 jaroj, kiam leviĝis la propono “ŝanĝo de kompania nomo”.

Interne de la kompanio ni komencis la varbadon

kun premio kaj kolektiĝis 150 ideoj; el ĉi tiuj estis alprenita la propono de s-ro Macumura Hacu, veterana oficisto. Ĝi estis “Swany”, kiu naskiĝis el la nomo de la loka urbeto Ŝirotori (kiu signifas cigno, anglalingve “swan”). En la telefonlibro de Nov-Jorko multe troviĝis “Suwannee” el Suwannee River, sed ne troviĝis Swany. Same kiel Sony aŭ Sunny (aŭto de Nissan) aŭ Suntory (viskio), ĝi estis facile prononcebla kaj cetere belsonora.

La agado de debitebligo en eksterlandoj komenciĝis en la jaro 1959, kiam ni komencis eksporton tra la “Firmao Strong”, la internacia komerca kompanio en Kobeo. En 1964, kvin jarojn poste, mi, enoficiĝinta kiel administra direktoro, unuafoje transiris la maron. Samtempe, ni translokis ankaŭ la komercan konstruaĵon disde mia domo apud la marbordo al la loko laŭ la linio Takamacu-Tokuŝima de JR (*Japana Fervojo*), kaj la debitado pligrandiĝis kun ekstrema rapideco.

Vi poste legos la detalon, sed jena estas ĝia resuma fluo.

1968~70: Fondiĝis “Swany Ikeda, Swany Tokushima, Swany Kochi”, kaj pligrandiĝis la produktivo per la laborforto de ĉirkaŭ 200 homoj.

1972~78: Fondiĝis en Koreio “Swany Koreio” (Koreio), “Swany Toyo” (Oriento), “Swany Azia”, kaj produktiĝis diversspecaj gantoj per la laborforto de 1,200 homoj.

1980~: Fondiĝis en Nov-jorko, Usono, “Swany America” (Usono), kaj komenciĝis la vendado cele al detalejoj.

1984~89: En tri urboj ĉirkaŭ Ŝanhajo fondiĝis “Swany China”, “Swany Great Wall”, “Swany Glove”, “Swany Taicang”, kaj naskiĝis la produktsistemo per laborforto de 1,500 homoj.

1989~: komenciĝis la vendo de ski-gantoj kun la marko de Swany, kaj realiĝis ĉiujare la vendosumo de miliardo da enoj. De 2012 en la daŭro de 7 jaroj ĉiujare la vendosumo okupis la unuan lokon en Usono.

1997~: Swany-Bag (sako) kiel korpa apogilo, kaj ĝi fariĝis la sukcesa artiklo kun la vendiĝo de 110 mil pecoj.

2012~: Fondiĝis en Kamboĝo “Swany Cambodia” kaj, kvankam 300 homoj estis dungitaj, en la flanko de profitgajno ĝi troviĝas en malfacila stato.

2014~: Komenciĝis la vendo de Swany Mini, rulseĝo, faldebla en la plej malgrandan formon en la mondo. Plejparto da rulseĝoj estis traktata en la lu-merkato kaj en la vend-merkato, laŭdire, ili estis traktataj iom pli ol 10 procentoj. En tia stato, Swany Mini vendiĝis ĉiujare ĉirkaŭ 1,000 seĝoj. De 2021 komenciĝos la vendado de artikloj por luo, kio estas la ĉefa celo de la kompanio. Ĉi tiu ricevos la patenton, validan en la merkato de tri landoj japana, ĉina kaj usona: ekŝvelis mia revo al unu el la kadroj de la mondskala entrepreno.

2018~: “Skigantoj Swany” disvolviĝis en la japana merkato, kaj rilate al “formalaj gantoj”, oni celas la starigon de la marko “Elmer”.

Revolucia kostoredukta tekniko

Kiam mi kun la patro duope negocis, mi spertis la ĝisfundan marĉandon de la alia flanko; de tiam mi komencis fordoni min ekskluzive al la malpliigo de neta kosto.

La tajlado de ledaj gantoj okazas tiel, ke sur ledon oni metas la glacon kun 28-centimetraj flankoj kaj laŭ tiuj flankoj tajlas per kuirtranĉilo. Sur tiu leda korpo oni metas la metalan ŝablonon kun 10 fingroj kaj eltajlas per la premtajla maŝino.

Mi eliminis la procedon por uzi kuirtranĉilon kaj, anstataŭ tio, eltajlis per metala ŝablono; mi reduktis la elspezon, ŝparante la diferencon inter la metala ŝablono kaj la vitra, kiu estis pli granda ol la metala, t.e. la perdon de 2 procentoj da ledkosto, kiu okupis 60 procentojn da neta prezo. Ĉar la raciigo duobligis la tajlrapidecon de la leda korpo, ankaŭ la tuta industria mondo sekvis la sistemon saman kun mi.

Fruktiĝo estis tajltekniko de garnaĵo, kiun oni prenis el la ledrubo post la eltranĉo de leda korpo. Por unu paro necesis 12 garnaĵoj por gardi la ĉirkaŭon de la fingroj. Troviĝis tia maldika rubo, el kiu oni ne povis preni garnaĵon; el tia rubo, el

kiu oni kutime prenis du garnaĵojn, oni sukcesis preni tri garnaĵojn, se pripensi. Kvankam aspekte unufingra, se cerbumi, oni sukcesis preni du, t.e. laŭcerbume oni povis elpreni garnaĵon 30 aŭ 40 procentojn pli multe. Dum la neta profito de la industria mondo estis averaĝe 4 aŭ 5 procentoj, ni gajnis la kromprofiton je ĉirkaŭ 3 procentoj.

Siatempe, ni havis 9 tajlmaŝinojn, grandajn kaj malgrandajn. Fiksitaj sur betona planko, ili estis ligitaj kun motoro per rimeno. Ĉar mi sentis la rotaciajn rimenojn multe danĝeraj, mi fiksas la motoron sur la tajlmaŝinon kaj rekte kunligis ilin per V-rimenoj. S-ro Nakagaŭa Isamu, prezidanto de la forĝejo Nakagaŭa, al kiu mi komisiis la reformon, admiris: “Se kontaktigi kun elektra fonto, oni povas rekte manipuli kaj garantii sekurecon; ĉiuj tajlmaŝinoj ŝanĝiĝis al la maniero de Miyoshi.”

Mi plibonigis ankaŭ la finfaran procedon. Metante fingrojn en gantforman kupran platon, varmigitan de gaso, oni gladis ledojn kaj bone ordigis ilin. Ĉi tiujn oni disetendis po du paroj sur la kartono, kaj la dekojn da kartonoj kun ledaj gantoj oni akumulis unu sur alian kaj metis sur ilin betonan blokon; tiel oni atendis la venontan matenon. Sed, tre danĝere, ĝi ofte renversiĝis.

Mi kreis tielnomatan Piedpedalan Aprettablon: levante pedale ĉirkaŭ 3 centimetrojn la muldan pezilon kun 70 kilogramoj, oni metis gantojn, bele ordigitajn, en tiun spacon inter la pezilo kaj la tablo.

Ĝi estis tia aparato: al la fera tablo, sammezura kun la tablo de kudromaŝino, mi instalis 4 pezilojn kaj pedalon. La kapablo pri pentrado kaj la interesiĝo pri maŝino, t.e. miaj hobiaj komencis montri efikon, mi pensis.

Laŭgrade konkretiĝis roloj: negoco al la patro kaj al mi administrado pri neta prezo. “La opinio de Etsuo estas konfidinda,” komencis diri mia patro. Al mi ŝajnis, ke la patro bonvolis agnoski mian laborsintenon.

Mi promociiĝis al administranta direktoro kvin jarojn post kiam mi estis dungita. Ju pli mi cerbumis, des pli malaltiĝis la kosto kaj vendiĝis produktaĵoj. La laboro min amuzis.

“Malpuraĵo”, kiun mi vidis sur la vojo de eksporto

En la jaro 1958, kiam mi estis dungita, ne vendiĝis gantoj pro la varma vintro. De novjaro oni maldungis ĉiujn dungitojn, kaj la tuta industrio igis ilin vivteni per la asekuro kontraŭ senlaboriĝo en la daŭro de tri monatoj, kaj en aprilo ili ĉiuj revenis al la laboro.

Por sin savi el la malfacila situacio miaj gepatroj komencis la surstratan vendadon. “Ĉu troviĝas tiu, kiu bezonas gantojn? Bonvolu aĉeti!” kriis la gepatroj, kaj tiel ili ĉirkaŭvizitis urbojn Osako, Kobeo kaj Okajama dum unu monato.

La patro ĉiutage vizitis la urbon Kobeo por la kulturo de internacia merkato, kaj sukcesis partopreni en la komercado de kompanio “Strong”, kiu bonvolis interveni, sed ni ne povis ne akcepti la kondiĉon pagi du procentojn da neoficiala mono al la sekciestro. La unua mendo estis el bova ledo kun subŝtofoj leporfela kaj trikota.

Ĉar la kompanio “Strong” ne estis fabrikanto, ĝi ne povis tuj respondi al la postuloj de eksterlandaj aĉetistoj. Sekve, mi, kvankam flavbekulo, ĉeestis. Al la en-valora prezo kontraŭ dekduo da artikloj, oni donis plu ĉirkaŭ 30-procentan profiton de mia kompanio kaj kvin-procentan makleraĵon de la kompanio “Strong”, kaj la tutan sumon dividis per 360 enoj. Kaj tiamaniere oni difinis la dolaran prezon de ŝipkargo. Mi eksciis, ke tion oni nomis “FOB-Kobe”.

“What do you think? (*Kiel vi opinias?*)” demandis al mi aĉetisto, kaj kiam mi restis konfuzita, li plue demandis, “Give me your opinion. (*Mi volas aŭdi vian opinion.*)” Mi kuraĝis respondi, “Brown is better than black. (*Bruna estas pli bona, ol nigra.*)” “You are a smart boy.” laŭdis la aĉetisto. Mi sentis min kvazaŭ ascendi al la ĉiela regno. Kun tiuj aĉetistoj mi komencis havi tagmanĝon kaj vespermanĝon, kaj eĉ akompani la viziton al drinkejo kaj kabareto (amuzejo).

Dum negoco, mi rimarkis, ke aĉetisto atendas senpacience la kalkulon de prezo. Post la profunda

konsidero, mi sumigis eksterajon, internajon, laborpagon kaj pakkoston, kaj al ĉi tiu sumo donis la 30-procentan malnetan profiton de mia kompanio kaj la kvin-procenton de la kompanio "Strong"; tiamaniere, anticipu mi preparis la indicon, dolare transkalkulitan. Per la manieroj t.e. sorobane adicii kaj glitkalkulile multipliki: la neta prezo de mia kompanio momente ŝanĝiĝis al la vendprezo en dolaro.



S-ro Milton Schwartz de Avon Glove (dekstre) kun s-ro Brown, administranto de Strong, 1960

Se la malneta profito kontraŭ la neta produktprezo kalkuliĝas al 30 procentoj, la indico en dolaro (*se kalkuli unu dolaron por 360 enoj*) fariĝas 4.3-obla, se 31 procentoj 4.35-obla, se 32 procentoj 4.4-obla. Observante la vizaĝesprimon de la aĉetisto, mi ŝanĝis la tarifon de malneta profito alten kaj malalten de ĉe la marko kaj sondis la reagon de la aĉetisto. Kvazaŭ venus la plej bona

ŝanco, mi bombardis, “Jen ĝuste nun estas ŝanco!” 800 dekduoj, 1000 dekduoj — unu post la alia mi ricevis mendon.

Post la finiĝo de la afero mi transiris al alia stilo. Dum senĉese interflugadis la ŝercoj, de aĉetistoj mi eltiris artiklajn numerojn, kiujn ili antaŭdecidis aĉeti. Mi klopodis por gajni vendkontraktojn laŭeble multe.

Sinjoro Brown, la ĉeestanta administranto de firmao estis duonbrito.

Iam, dum mi ne sciis, vigliĝis interparolo sub la temo de la germana filozofo Immanuel Kant. “Ĉu ni ne interparolos pri la temo, ankoraŭ pli amuza, ol tia malfacila?” mi alparolis. Alproksimigante sian buŝon, la administranto flustris ĉe mia orelo: “Nu, la sekretan lokon de virino oni nomas tiel en la angla lingvo. Kial do ĝi samas kun la nomo de filozofo?”

Kiam vizitis aĉetistoj, kun kelkaj homoj el aliaj rivalaj kompanioj ni kunvenis en la kompanio Strong, kunportante specimenojn. Ĉar foje oni igis nin konkurenci inter ni super sama artiklo, ni restis kun granda maltrankvileco, timante ies manovron kun neoficiala mono al la sekceiestro.

En la tago de la komerca priparolo kun s-ro Milton Schwartz, la prezidanto de la kompanio Avon Glove en Nov-Jorko, akceptis kvar kompanioj. Post la vespermanĝo ni gvidis lin al granda amuzejo kaj tie lin prizorgis verŝistino, kapabla en la angla lingvo.

S-ro Milton estis ĉarmita de tiu matura virino,

blankhaŭta, ovalvizaĝa kaj flueparola en la angla lingvo. Pro la virino, kiu sin cedas per la mono de 4,000 enoj (*kvar kompanioj ĉiu pagis po 1,000 enoj*), mi ege ŝanceliĝis. Mi ne memoras, kiamaniere ni likvidis la neoficialan pagon al la sekciestro M kaj la elspezon sen kvitanco. Ĉu ne ekzistus la komerco sen makulo? Sed en ĉi tiu mondo jam ne troviĝas mia patro, al kiu mi demandu.

Al la rondvojaĝo tra la mondo — por komerca afero

En la jaro 1964, kiam okazis “Olimpikaj Ludoj en Tokio”, liberiĝis internacia vojaĝo, kaj en ĉi tiu jaro mi unuafoje transiris al eksterlandoj. Ĉar 500 dolaroj, kiom estis la maksimuma sumo por elporto, ne sufiĉis por pagi la koston de interpretisto, mi ĉiutage vizitis la filion Takamacu de la Japana Banko kaj povis rezervi 2,000 dolarojn (*720,000 enojn*). Kun la bileto por la rondvojaĝo tra la mondo, kostanta ĉirkaŭ 700,000 enojn, en la mano, mi kun streĉiĝo ekflugis de la Flughaveno Haneda.

En la sekva mateno post la tago, kiam mi atingis Nov-Jorkon, mi vizitis la kafejon, najbaran de la hotelo Prince George, kie mi tranoktis. “Hot milk, toast, lemon tea!” mi kriis. Sed la kelnerino restis tute ne komprenata. Kun ruĝiĝinta vizaĝo mi plurfoje ripetis. Dum mi tiel embarasiĝis, eniris

japana studento. “*Hat milk, tea with lemon*” li diris, korektante mian japanan prononcon de la angla lingvo. Mi ŝvitis sur la tuta korpo.

Kune kun interpretisto, prezentita de turisma oficejo, kondiĉe ke mi pagu 25 dolarojn (*ĉirkaŭ 9,000 enojn*) por la tago, mi vizitis la alte elstarantan Komercon Ĉambron. Tie mezaĝa viro kvazaŭ ruĝa ogro bonvolis serĉi gantkompaniojn. Surslipigante telefonnumerojn, la nomojn de firmaoj, k.a. li faris la liston de ĉirkaŭ 30 firmaoj. Mi restis kun kapo malsupren pro la respekto al la viro, kiu donis favoron al tute fremda japano.



Sur la teraso de Empire State Building, 1964

Unue mi telefonis de strattelphonejo al la firmao NY Merchandise. Sed, “ĉar nia vendokvanto estas malgranda, ni nin detenas de importo,”

respondis la firmao. “Eĉ se nur 5 minutojn,” mi petis interpretiston, ke li alkroĉigu, kaj mi povis renkontiĝi kun la estro. Ĉi tiu estis malgranda homo ŝajne milda kun bona karaktero, sed 10 minutojn post nur iometa rigardo de specimenoj, mi ne povis ne retiriĝi, ĉar li ne interesiĝis.

Mia vizito estis rifuzita ankaŭ de la sekva kliento, kaj la tria estis kompanio de gantoj el trikoto, nomata Gelmart. Ankaŭ ĉi tiu diris, “Ni ne havas intereson pri ledaj gantoj.” Mi sincere petis la mastron nepre rigardi la specimenojn. “Se temas pri ĉi tiuj, bonvolu iri al la kompanio IBC,” li diris kaj, tre afable, bonvolis surslipigi la adreson kaj eĉ la nomon de la prezidanto. Sed, ĉar la prezidanto forestis pro vojaĝo, mi decidis rezervi en la listo por la alia ŝanco.

Mi alkroĉiĝis kaj postulis la rendevuon, sed la kvara estis kompanio por laborgantoj. En la daŭro de 9 tagoj mi kontaktis 30 kompaniojn, sed tiuj, kiujn mi povis viziti, estis malpli ol triono. Multaj estis entreprenoj de laborgantoj, inter kiuj plimultaj estis kompanioj de produktaĵoj el trikoto. Ne estis alia rimedo, ĉar nur tiujn oni bonvolis elekti el la jarlibro de kompanioj. Nur la kompanio NY Merchandise promesis al mi malfermi konton post kelkaj jaroj.

Kun senesperigo pro la mizera rezulto, mi ekflugis al Germanio per la aviadilo de Pan American Airways al Hamburgo. En la aviadilo ne troviĝis japano. Sen kono pri detaloj en la aviadilo mi iris al

necesejo. Kiam mi tuŝis la pordon, ĉi tiu spontane malfermiĝis, ĉar ĝi restis rompita. “Ja sendeca vi estas!” koleris virino kun terura mieno.

Ĉe la hotelo Atlantic apud la lago Alster, mi, nekapabla legi la menuon skribitan en du lingvoj germana kaj angla, montris fingre la plej supran linion. Ĉar aperis legoma supo, mi montris la linion tuj sub la unua: ĉifoje alportiĝis konsomeo. Dezirante ke mi trafu ĉefan pladon, mi petis la plej malsupran. “Ĝi estas la nomo de ĉi tiu restoracio,” diris la kelnero.

Nokte mi glitiĝis en la liton, kaj, komencante zorgi, ĉu morgaŭ mi povus trovi interpretiston, finfine, min turmentis maltrankvileco, ĉu mi povus reveni al Japanio. Ĉu influis tempodiferenco—dumnokte mi restis sen dormi, kaj matene larmoj venis al la okuloj.

En Hamburgo mi vizitis Komerčan Ĉambron kun interpretisto, kiu sin titolis “ekskompaniano”.

Laŭ la papero, sur kiu estis notitaj ĉirkaŭ 10 kompanioj, ŝajne de gantoj, mi rondvizitis ilin dum du tagoj, sed ne troviĝis eĉ unu kompanio, kiu konsentis enporti la gantojn.

Apud la hotelo mi trovis ŝildon kun ĉinaj literoj (Kogecu). Siatempe, tia malofte troveblis. Estis restoracio de japaneska kuirado. Mi eniris kun kuraĝo kaj ĝojo, kaj manĝis la fiksan menuon kun saŝimo. Mi akiris momentan trankviliĝon. Sur la breto viciĝis la libroj, ekzemple “Mijamoto Musaŝi”,

verkita de Joŝikaŭa Eiji” k.a., kaj kompanianoj dronis en legado.

Ankaŭ en Londono mi kuradis tien kaj ĉi tien, sed mi sukcesis trovi neniun valoran klienton. En la mezo de malespero mi ekflugis al Milano en Italio, la lasta vizitloko. Mi loĝis en la hotelo Meridian. Mi sidiĝis sur la ceramikaĵon, najbaran de neceseja kuveto, kaj provis turni la kranon. Ekŝprucis varmega akvo kaj mi ricevis brulvundon ĉe la testiko. Mi devis moderigi la temperaturon per la akva krano. Kelkajn tagojn mi havis doloretan, sed estis feliĉe ke mi povis reveni al la patrio.

Dum unu monato, kiam mi luktis kun soleco, mi malfacile toleris lingvan muron, manĝdiferencon, hordiferencon kaj kulturan ŝokon. Ĉe la Flughaveno Haneda min trafis stranga sento kvazaŭ somnambulismo; miaj plandoj, sen tuŝi la plankon, leviĝis supren.

Anhela studo pri konversacio de la angla lingvo

Antaŭ ĉio mi povu paroli la anglan lingvon—se ne, komenciĝos nenio. Ĉi tion mi sentis en la spertoj de la transmaraj vojaĝoj, en kiuj min trafis multaj provoj.

Unue mi komencis lukti plenenergie kun “Konversacio de la angala lingvo — en radioprogramo

de NHK” sub la gvido de la instruistoj, nome, Toogo Kacuaki kaj Helen Reynolds. La kosto de lernolibro estis nur 120 enoj por monato. Ĉar restis superflua tempo, se mi kune parolis kun la gvidantoj, mi ripetis dufoje. Dum mi vojaĝis, mia edzino registris la programon.

Ĉe la veturigo de la aŭto, samtempe kun startigo de la motoro, mi aŭdigis la paroladon de la prezidento John F. Kennedy per senfina sonbendo. Mi laŭtvoĉe parolis kune kun li, kaj mi ripetis kelk-mil fojojn en la daŭro de tri jaroj. Kvankam tio multe superis mian kapablon, la rezulto klare montriĝis ĉe la posta negoco.

Dum la vojaĝo, ie ajn kaj iam ajn mi senhonte paroladis la anglan lingvon per la stereofonia kapaŭdilo de Kompanio Macuŝita-Denki (*elektraj maŝinoj*). En la buŝo murmure mi sola faris la trejnadon de prononco.

Iun tagon mi prenis la elektran trajnon ĉe la stacio Takarazuka kaj veturis al la stacio Umeda, kiu estis la finstacio. Post iom da tempo mi deprenis la ricevilon. “Takarazuka! Takarazuka!” aŭdiĝis anonco. Mi ĉirkaŭrigardis malkviete. “Vi ja restis sen elvagoniĝi ĉe la stacio Umeda!” sciigis al mi najbara virino. Ĉar mi tro koncentriĝis al la leciono de la angla konversacio, ŝajne mi restis en la trajno kaj returnen veturis denove de la stacio Umeda. Najbara studento rideksplodis laŭtvoĉe. Mi volis min entiri en truon en la tero, mi tiom embarasiĝis.

Sama afero okazis ankaŭ en la aviadilo al Bostono. Kiam mi dronis en la leciono de la angla konversacio, stevardino torente paroladis al mi kun ruĝiĝinta vizaĝo. “Laŭeble frue elaviadiliĝu” ŝi furioze koleris. Mi scivolis, kio okazas? Mia aviadilo jam atingis Bostonon, kaj ĉirkaŭ mi troviĝis neniu pasaĝero. Dum kvar jaroj mi daŭrigis tian klopodon, plenan je ŝvito kaj larmoj, kaj, dank’ al tio, la negoco komencis havi rezulton, tamen ja apenaŭ...

En 1968, kvar jarojn post la unua vizito en Usono, mi lernantiĝis en la lernejo de la angla konversacio, nome, Berlitz School, la plej granda en la mondo, kaj faris la unumonatan totalan studon. La lernokotizo estis ĉirkaŭ miliono da enoj. Siatempe, la Branĉo de la lernejo en Kobeo troviĝis en la periodo de sia fondiĝo; min gvidis kvar instruistoj. Post 40 minutoj da intensiva trejnado oni donis al mi 5 minutojn da ripozo, tiel daŭris rigora leciono entute 10 horoj en la tago. Noktomeze mi havis la koŝmaron pri la angla lingvo. Ankaŭ la tagmanĝon mi havis kun la instruistoj; la plej granda plezuro por mi estis la tagmanĝo kun Judy Smith, bela gvidantino el Aŭstralio.

Por posedi unu lingvon necesis pacienco kaj klopodo, kaj aldone persisteco estas nemalhavebla. Dum tiuj kvar jaroj mi dediĉis mian tuton, miajn koron kaj korpon, vikle kaj gaje kaj dankplene. Estis sencohava investo, mi pensas. Se mi ne kapablos paroli la anglan lingvon, tio bremsos la elpaŝon de

Swany en la mondon.

Estis la angla konversacio, por kiu mi tiom penige studis; iun tagon, kiam proksimiĝis al mi 80-jaraĝo, al mi venis telefono: “Are you Mr Miyoshi?”

“Yes, yes, A—, a—. Momenton! ĉu vi estas...?”
elsaltis el mia buŝo Esperanto, kiun mi ĉiutage studis, sed ne aperis la angla. Kia mizera rezulto post dekkelkaj jaroj da neuzo.

Ha, nekomprene!

Absorbite mi lernis la anglan lingvon, kaj tamen neniel mi povis forigi la kutimon de japaneska angla lingvo, iasence, t.e. malforta punkto de japanoj.

Tio okazis, kiam mi manĝis en la urbo Ĉikago ĉe la tria vizito en Usono. Mi mendis spagetojn al kelnerino kun bluaj okuloj. Sed ŝi nur klinis la kapon. Kvankam mi plurfoje elparolis, ŝi ne povis kompreni. Ankaŭ al la kuiristo, kiun venigis la kelnerino, mi ripetis, “spagetojn!”. “Ho, spagetoj!” ili finfine komprenis kaj mi sukcesis havi tagmanĝon. Problemo estis tio, ke mi ne sufiĉe forte prononcis la silabon “ge” en spagetoj.

En aviadilo, ekfluginta de Nov-Jorko, mi ricevis demandon, “Kien vi iros de nun?” Mi respondis, “Going to Canada.” “Kien?” “Canada” “Mi ne komprenas! Kion vi diris?” “I said Canada!” “Kie estas Canada?” “Canada, Canada, ĉu vi komprenas?”

“Mi ne komprenas! Eble vi volas diri Kjanada, ĉu?”

Tio okazis, kiam mi vizitis la Katedralon de la Sankta Johano, la plej granda kristana preĝejo en Nov-Jorko. “Ĝis la Avenuo Amsterdamo!” mi petis al la ŝoforo de taksio, kaj ĉi tiu klinis la kapon nekompreninta. Kvankam mi kelkfoje ripetis, li ne povis kompreni. “Bonvolu sidiĝi sur la antaŭan seĝon,” diris la ŝoforo kaj malfermis al mi la pordon. En la taksio de Nov-Jorko, danĝerplena, la ŝofora seĝo estis barita per ferkrado. Kiam mi montris la pozicion sur la mapo, li diris, “*Am-ster-dam*”. Mi eksciis, ke oni devas forte prononci la silabojn “am” kaj “dam”.

Ke mi povis egalforte batali, tio estis nur ciferoj kaj centoj da terminoj pri gantoj. En la japana, ni esprimas grandajn nombrojn kiel oblojn de *man* (dekmil), *oku* (dekmiloble dekmil = 100 milionoj), kaj tiel plu. Kalkulante la loĝantaron de Japanio je 100 milionoj, kaj de Ĉinio je miliardo, mi enbatis tiujn en la kapon kiel “one hundred million” kaj “one billion”. Imagante grandajn nombrojn kiel oblojn de la loĝantaroj de Japanio kaj Ĉinio, mi povis facile kompreni kaj uzi la anglalingvan sistemon.

Sed, la ĉampiono el la vortoj, ne komprenataj, ja estas “gloves”, t.e. gantoj.

“Glove (*glov*)?” “Gloves (*glavs*)?”

Do, kiel mi prononcu, por ke ĝi estu komprenata?

Komenciĝo de internacia komerco senpera

Ĉe la tria vizito en Usono mi finfine konsentigis fabrikantojn fari kun ni la komercon sen perado de alia firmao, kion ni deziregis.

Tio fariĝis la okazo, ke mi telefonis al la prezidanto de la kompanio Avon Glove, sinjoro Milton Schwartz, kun kiu mi faris la komercan priparolon, kiam li vizitis Japanion.

“Ha, tiu voĉo — Etsuo, estas vi, ĉu? De tiu hotelo nur kelkaj minutoj, do, tuj venu.” li diris. En ĉi tiu periodo ankoraŭ ni havis la komercon kun la kompanio Strong, la firmao de Kobe. Estis la afero antaŭ ol la realiĝo de la senpera komercado de Swany.

“Pro granda zorgo pri la kompanio Strong, mi ne povis fari telekson al vi,” mi diris al la prezidanto.

“Kial? Ĉu la sekciestro M? Li estis nur maldungita pro la ricevo de neoficiala mono, ĉu ne? Danke al tiu kompanio, povus diri, ni povis teni longan komercadon. Sed la administrado de la kompanio pri siaj dungitoj estis tre malbona, krome li rabis de mi grandan sumon da mono! Kiom vi pagis?”

Ne venis vortoj; mi fariĝis muta.

“Mi pagadis,” li daŭrigis, “5-procentan makleraĵon, kaj krome neoficealan monon. Kia aĉulo!”

Denove mi ne povis trovi vortojn por respondi.

“Ĉar vi venis por renkonti min, vi devas havi la volon daŭrigi la komercon. La ligo de fabrikanto kun ni pliigas la forton de konkurenco, ĉu ne?” li diris.

“Tio, kion mi pagis, estis nur poŝmono!” mi respondis, sed ne diris, du procentoj. Se mi konfesus honeste, la prezidanto svenus pro bedaŭro.

Mi restis muta kaj fiksita la rigardon al liaj okuloj.

“Bone, jam sufiĉas!” li malfermis la buŝon post iom da momentoj, “laŭ via kapablo de la angla lingvo ni komencu negocon.”

Milton abrupte fariĝis milda. Mi pensis, ke li sendube alte taksis la kvaliton kaj produktivon de Swany. Tiel mi proponis al li kelkajn ofertojn kaj ricevis la mendon.

Estis la momento, kiam komenciĝis la senpera komerco, t.e. kun nenia peranto, kion mi deziregis.

Mi jam ne memoras la mendsumon.

“Ne sufiĉas via angla lingvo, sed eblas, se vi klarigas montrante la efektivajn varojn,” diris la prezidanto kaj kapklinis al interpretisto, dirante, “sekvafoje jam ne necesas interpretisto.”

S-ro Bob, la frato de la prezidanto, kaj ĉiuj aliaj stabanoj, unu post alia etendis sian manon al mi por manpremo. La oficejon administris ses personoj kaj en liverejo dekoj da personoj, laŭdire. Kaj poste mi eksciis, ke la sistemo sendi el la eksterurba magazeno al ĉiuj lokoj en la tuta Usono, kun komandturo en Manhattan, estas la tipa maniero de

importantoj en Nov-Jorko.

“Venontjare mi invitos vin al mia hejmo, tial, bonvolu studi ankoraŭ pli la anglan lingvon,” diris la prezidanto ĉe la adiaŭo. Larmoj venis al miaj okuloj iomete. Kaj ni adiaŭis post firma manpremo.

En nokta plezurejo

Dum la verkado de ĉi tiu libro, mi decidis telefoni al la prezidanto Ŝikatani Tokuichi de la industrio Fuĵi-Sangjoo, kun kiu mi konkurencis, por ekscii la detalojn, kiel la sekciestro M en la kompanio Strong estis maldungita,. Tio okazis ĉirkaŭ duonjarcenton antaŭe. Li atestis, ke la sekciestro postulis al li 5 procentojn kaj tamen li persistis en la rabato redukti ĝis 2 procentoj. Tiel la sekciestro ja proprigis al si 2 procentojn da kurtaĝo de 4 kompanioj. Estis sufiĉe da mono por aĉeti dekojn da apartamentoj.

Siatempe, laŭ la prezidanto Ŝikatani, li estis alvokita de la administranto de la kompanio Strong kaj demandita: “Ĉu vi ankaŭ pagas la neoficialan monon al sinjoro M? Mi aŭdis de Miyoshi-Sen’i (*la fibroindustrio Miyoshi*).”

La prezidanto Ŝikatani honeste respondis kaj la administranto decidis tuj tiuloke: “Mi komprenas. Mi do maldungos sinjoron M jam hodiaŭ posttagmeze.”

Supozeble, mia patro rekte petis al la

administranto, zorgante pri mi, tiel ke mi ne estu entirita en “malpuraĵon”, mi intuis.

Ĉe la sekcio de gantoj en la kompanio Strong laboris tri viroj kaj unu virino. Kutime la sekciestro kaj la virino tuj forlasis la oficejon post la regula horo. Post la vespermanĝo kun la viroj mi ĉiufoje vizitis drinkejojn aŭ amuzejojn, de loko al loko.

Ĉe Sannomija (*homsvarma kvartalo de la urbo Kobo*) ni frekventis la grandan amuzejon “Ŝinseiki (*nova jarcento*)” kun 200 verŝistinoj. Okazis tia akcidento, ke la kurteno, kovrinta la plafonon ekbrulis, kiam gastoj komencis ebriiĝi. Okazis paniko. “Ĉiuj verŝistinoj rifuĝu kun gastoj!” ripetiĝis anonco. Mi forkuris kune kun la verŝistinoj. Sed ni enkuris en la vestejon, kaj ni troviĝis en granda konfuzo, serĉante la havaĵojn. Sen kondukantoj, mi elkuris el la ĉambro. Per momenta juĝo mi sekvis alian grupon kaj mi sukcesis ekstereniri.

Kiam ili venis al la gubernio Kagaŭa, mi ilin gvidis al la kvartalo kun neonlumoj. En la granda amuzejo “Rainbow Garden” troviĝis pli ol 100 verŝistinoj krom aliaj.

Venis fama kantistino Jukimura Izumi kaj kantis la kantojn “Sopiro” kaj “Oriento de Edeno”. Ankaŭ Frank Nagai plurfoje aperis kaj kantis la kanton “Sopiro al vi” kun dolĉa voĉo.

Kulturi klientaron en balbuto de la angla lingvo

Mi ĉiujare rondvojaĝis tra la mondo por la kulturo de klientaro, dungante interpretiston en ĉiu loko. Por mi, kun la dekstra kruro mallibera, la pezeco de la sako sen radoj estis semo de sufero. Martelante en la cerbon la gant-terminojn, kiuj aperis dum la intertraktado de komercaj aferoj, mi klopodis por min puŝi antaŭen, paŝon post paŝo, kiel testudo, por provi akiri klientojn.

Tio okazis, kiam, laŭ la promeso, mi vizitis la privatan domon de la prezidanto Schwartz, kiun mi jam menciis. Post la trinkado mi transiris al la manĝotablo. “*Up sidan plee*” petis la edzino al mi. Portante la marmiton kun kuirajo, ŝi plurfoje rapidigis al mi. Kiam mi embarasiĝis nekomprenante, ŝia edzo min helpis. “*Ŝi diris ke Up side down please,*” li diris. Renversu la pladon, li sciigis al mi per mangestoj.

“Ĉu vi havas negocon kun grandaj gant-fabrikantoj kiel Grandoe aŭ Fownes,” demandis min s-ro Schwartz, iom ebria. “*Gloversville, la vilaĝo de gantoj*, situanta ĉirkaŭ 100 mejlojn norde de la urbo Nov-Jorko, estas ilia centro,” li diris. “Vi povas iri, ne gravas, ĉar kun mi ili ne konkurencas.”

Ĝi estas loko, en kiun enmigris gant-metiistoj el Eŭropo, kaj kiun oni komencis nomi *Gloversville* (vilaĝo de gantoj). Sed la gant-kompanioj, kiuj

troviĝis 300 antaŭ la milito, abrupte malmultiĝis ĝis ĉirkaŭ 10. Ankaŭ la loĝantoj malmultiĝis je 30 procentoj, nome, 15,000 homoj; la situacio estis sama kiel la urbo Higaŝi-kagaŭa. Orient- najbare de tiu vilaĝo troviĝis Tannersville (tana vilaĝo) kaj plue ĝin sekvis Hunterville (ĉasista vilaĝo).

Kiam mi vizitis la kompanion Grandoe, la granda gant-fabrikanto, ĉi tiu diris, ke ĝi ne havas la planon aĉeti de aliaj kompanioj, ĉar ĝi produktas en la fabrikoj de la usona teritorio Porto-Riko kaj de Filipinoj. Sed, ĉe la kvara vizito, Prezidanto Richard Zuckerwar, regalis min per luksa hakviandaĵa rostsandviĉo. Kaj, ŝajne al li plaĉis Jelmin, la mola sinteza ledto, kaj tamen, la prezo pri la subŝtofo de trikoto, de vilaro kaj de lepore peltto estis tro kara, laŭ li, do estis kriza momento de la negoco.

Ĝuste tiam estis la jaro, kiam Swany Korea komencis iri sur glata vojo, kaj ni povis malaltigi ĉirkaŭ 10 procentojn; ni do sukcesis ricevi la mendon de 35,000 dekduoj per la averaĝa prezo 25 dolaroj. Ĉar estis la jaro, kiam unu dolaro kostis 250 enojn, por Swany tiu estis la unua kontrakto, kiu superis 200 milionojn da enoj.

En mielvojaĝo Richard vizitis Japanion kun sia freŝa edzino kaj mi gvidis ilin al la parko Ricurin kaj la pitoreska loko Jaŝima; tiamaniere daŭris interfamiliaj rilatoj, sed poste ili eksgeedziĝis.

Mezuro de eŭropanoj kaj usonanoj

Dum 10 jaroj mi daŭrigis la defion kontraŭ Fownes, la granda fabrikanto; kvankam la muro ne disfalis, oni permesis al mi viziti la fabrikon de Manilo por studo. Kiam mi vizitis ĝin, ĝi estis giganta unuĉambra fabriko, kie 2,000 homoj okupiĝis je la produktado de ledaj gantoj. Inter oficejo kaj laborejo estis septo tute vitra, kaj el la unuaetaĝa ĉambro de la prezidanto oni povis rigardi ĉiujn dungitojn. En la angulo troviĝis la ĉambro de malvarmakva duŝo; laŭdire, ne necesis varma akvo en ĉiamsomera lando.

“Se gajni al si la favoron de estraranoj, administrado estas facila,” emfazis la prezidanto. Sed, li ne lasis min rigardi la laborejon; eble li pensis, ke mi estas konkuranto. La averaĝa monata enspezo estis 20 dolaroj (7,300 enoj); ĝi estis pli malalta ol 8,100 enoj, kiuj estis salajro de Swany Korea. Mi komprenis, kial la detala prezo ne altiĝis dum longa tempo.

Mi aŭdis de la prezidanto, ke Gold Glove en Kanado fabrikas gantojn en Manilo. Mi tuj flugis al Montrealo, kie troviĝis la kompanio. S-ro Danny, la tria prezidanto de la kompanio Gold, havis saman aĝon kun mi, kaj, eksciinte la rilaton inter la granda kompanio Grandoe kaj mi, li montris grandan intereson. Sed, “Koncerne la gantojn fabrikitajn el Swany, la forko inter la dikfingro

kaj la aliaj kvar fingroj estas tro mallarĝa, tial oni sentas striktecon, kiam oni elvolvas la manplaton,” li diris. Plue, ankoraŭ ne estis difinita la maniero redukti la mezuron de produkto por junuloj kaj por infanoj; la du modifendaj punktoj estis kondiĉoj por komercado.

Jen estis lia postulo: rilate al la gantoj por sinjoroj, de la mezuro M pligrandigi 3-procente al mezuro L, 6-procente al XL, kaj al S redukti 3-procente. Rilate al gantoj por junuloj, la mezuro L estu en 93 procentoj de la mezuro M por sinjoroj, M estu en 90 procentoj, kaj S en 87 procentoj. Rilate al gantoj por knaboj, la mezuro L~S estu en 83 procentoj, 80 procentoj, kaj 77 procentoj; rilate al gantoj por infanoj, en 73 procentoj, 70 procentoj, kaj 67 procentoj. La manumon de junuloj, plilarĝigi 3-procente, por knaboj 6-procente, por infanoj 9-procente. Por japanoj unumezura malaltigo ĝuste konvenis.

De s-ro Danny mi ricevis la ŝablonon de la mezuro M por sinjoroj, kiu enkalkulas ledan elastecon, por ke ĝivalidu de infanoj ĝis maturuloj. Laŭ tio ke mi sekvis lian sugeston, evidente plivigliĝis la vendado.

La cirkonstancoj de importistoj en Eŭropo

La kompanio Kauko en Heksinko, metropolo de Finnlando, estis agentejo, kiu makleris pri artikloj al magazenoj. Al s-ro Kajoste la ŝarĝito, mi klarigis, kial mi kun mallibera piedo povis enoficiĝi en administranta direktoro, mi klarigis ankaŭ la skalon de mia kompanio, kaj la mezuron, konvenan al eŭropanoj, kaj tiel mi sukcesis en lia ekzameno.

En ĉi tiu lando, jam de frua tempo, estis preta la sistemo por rekte vendi al magazenoj, nome, Stockmann, Sokos, Kesko k.a. Mi sinsekve ricevis la specimeno-mendon, kaj povis gajni la kontraktan validiĝon ĉefe pri gantoj el bova ledo, el planka ledo (sub arĝenta surfaco) kun subŝtofo. Pro la kreditletero, emisiita de ĉekbanko de kliento, mi povis monricevi tuj post la kargado, kaj 5 procentoj de komercsumo estis kompensitaj por la kompanio Kauko.

Por ke ne glaciĝu la pordoj de la aŭto, lasita en parkejo, dum la komerca preparolo, mi devis lasi la aŭton kun funkcianta motoro. La temperaturo en vintro fariĝis 30 gradoj sub nulo, la ĉielo apenaŭ komencis tagiĝi de la naŭa matene, kaj en la 15-a horo jam mallumiĝis. La aŭto en ĉi tiu lando kuras ĉiam kun fronta lumo, kaj eĉ la infanoj vizitadis sian infanĝardenon prilumante la vojon per poŝlampo.

Finnlando, kiu longe suferis la subpremon de

Rusio, montris favoron al Japanio, gajninta la militon kontraŭ Rusio, kaj laŭdegis Admiralon Toogoo Heihaĉiroo kiel heroon. Ke mi enpaŝis en Nordan Eŭropon pli frue ol konkurantoj, aŭ ke feliĉe la sentimento de finnoj al Japanio estis tre bona, ĉi tiuj povis esti la kaŭzo de mia sukceso en la oferto.

Ankaŭ la kompanion Aug. Eklöw, kiu troviĝis en Stokholmo, la ĉefurbo de Svedio, mi vizitis ĉiufoje, kiam mi troviĝis en Eŭropo. Poste, al la prezidanto de Eklöw kun mallibera piedo, mi promesis trakti pri komerca afero en la hotelo Royal en Osako. Sed, ĉu pro aŭd-eraro, mi atendis en la hotelo Royal en Kobeo. La prezidanto koleregis, postlasis parolaĉon telefone “jam sufiĉas!” kaj rompiĝis la rilato kun li....

Kelkajn jarojn poste, tio okazis, kiam mi malsuprenvenis al la teretaĝo de la moderna domo post la komerca preparolo kun alia kompanio en Svedio. La taksioj en Stokholmo ekstrikis. Kiam mi estis embarasita sen scii, kiel iri al la loko por la sekva negoco, antaŭ min glitvenis poŝt-aŭto. “Bonvolu helpi min, portu min ĝis la Kooperativa Asocio!” mi fervore petegis al la ŝoforo. “Neniel! Ĉi tiu estas poŝtaŭto!” tuj rifuzis la ŝoforo. Certe, mi povis bone kompreni lian aserton. Poŝtaŭto ne temas pri taksio. Sed, kiam mi kunmetis la manplatojn kaj preĝis fronte al li — ĉu li simpatiis kun mi pro mia mallibera piedo? — “Ĉi tio estas sekreto, diru al neni!” li diris kaj, kvankam malvolonte, min veturigis. Okazistia miraklo kaj

tio fariĝis la komenco por la malfermo de konto ĉe la Sveda Kooperativa Asocio, kiu estis kliento de la kompanio Eklöw.

La kompanio AGAM en Italio estis direktata de la prezidanto Chiodi. Ĉiujare, en printempo kaj aŭtuno, li venis al Japanio, kaj subtenis mian sperton pri fasto kun vortoj, “jes, jes”. Li mem observis la manĝon de kruda rizo, kaj estis tia fortika homo, kia nur per unufoja manĝo en vespero povis persiste labori tra la tuta tago. La sekreto estis: naĝi ĉiutage 500 metrojn, laŭ li. De li mi estis plurfoje persvadita: “per naĝado plifortigu vin!” Kaj poste, naĝi 250 metrojn fariĝis mia ĉiutaga tasko.

Lernante la kulturojn de nekonataj landoj, mi iom post iom konatiĝis kun la komercaj situacioj en Eŭropo.

La vojo al Sears, la magazenego unua en la mondo

Ĉirkaŭ la jaro 1975, la grandaj ĉenmagazenoj en Eŭropo kaj Usono jam komencis rekte importi artiklojn el Azio. Mi esploris la rangon de vendsumo aŭ la karakterizaĵojn de magazenoj ktp. kaj eltirante el akceptisitoj la nomojn de importistoj, mi ilin enlistigis.

Mi telefonis al s-ro Graf de la kompanio Zayre (*en la 17-a rango*) en Bostono. Sed, “ne bezonas!” li tuj

malŝaltis la telefonon. Eĉ se plurfoje mi telefonis, “ne plu telefonu, mi petegas!” li diris. Trovinte nenian rimedon, mi seninvite lin vizitis. Mi telefonis de la akceptejo kaj persistis, “sufiĉas 5 minutoj!”. “Ne, ne bezonas! Kiam vi povos kompreni? Kiom da fojoj mi devas diri?!” li kriegis. “Sed, la informoj pri Japanio estas tre praktikaj, mi pensas,” mi alkroĉiĝis.

“Vere nur kvin minutoj, ĉu bone?” li diris. Kaj, kiam mi supreniris al lia ĉambro, staris afrikdevena aĉetisto. Mi ja konfuziĝis. Mi estis malmaturulo. Mi devis ne surpriziĝi, eĉ se troviĝis homo eksterimaga.

Tuj pasis unu horo. Ekstersupoze, li diris, “Plaĉis al mi artiklo kaj prezo.” Poste, li bonvolis veni al Insulo Ŝikoku, kaj komenciĝis inter ni komerca afero. Laŭ miaj spertoj, povas diri, per la senrendevua vizito 50-procente mi sukcesis intervidiĝi kaj, en la plejmulta okazo, alportiĝis bona rezulto.

La kompanio Korvettes en la 15-a rango troviĝis en Nov-Jorko. Post la 13-foja atako finfine komenciĝis la komercado. De kiam mi renkontis la trian aĉetiston, kiu ankaŭ estis afrikusonano, mi povis malfermi la konton. La aĉetisto, altstatura kaj belnaza, estis nomata Fitzpatrick, sed, ĉar la nomo estis tre malfacile prononcebla, plurfoje telefonistinoj malŝaltis mian telefonon.

Baldaŭ mi eksciis, ke nur la silabon “pa” en Fitzpatrick oni forte prononcas. Mi memorigis al mi tiel, ke mi skribis la literumon pli-malpli kvinfoje.

Por la ofertado al Sears, la plej granda magazeno en la mondo, kun jara vendsumo de 5 duilionoj da enoj kaj la nombro de 400 mil dungitoj, mi flugis al Ĉikago 20-kelkfoje dum 7 jaroj. Mi ripetis persistecan viziton ĉe ĉiu trimestro; dum mi dormis, mi havis koŝmaron pro la bruoj de jetmotoro, tiel ke Yoshiko tre maltrankviliĝis pri mi. Koncerne la sidejon de Sears, en la vasta tereno troviĝis domaroj sporade. En ili mi trovis pompan konstruaĵon kaj miaj kruroj ŝtoniĝis imonite de la ŝildo “la unua en la mondo”.

En la malgranda ĉambro de aĉetisto, ĉirkaŭ sesatama, mi eksponis specimenojn sur la tablo. S-ro Hanson, mezdika kaj mezalta viro, prenis unu ganton kaj demandis, “kiom kostas?” “25 dolaroj kaj 40 cendoj!” “El kio la ŝtofo de la averŝa flanko?” “Jelmin! El Japanio.” “Tre mola! Kio la reverso?” “Estas akrilo!” kaj pasis ĉirkaŭ 15 minutoj. “Pardonon! Sekva fabrikanto...” signo por retiriĝo. Kun li mi renkontiĝis 4 aŭ 5 fojojn, sed poste min ne favoris la ŝanco.

En la 6-a jaro, la tria estis la vendisto, nomata Bridges. Ĉar ni ambaŭ estis radioamatoroj, floris nia interparolo pri tiu temo. Ĉe la parolkomenco moviĝis la buŝo kvazaŭ maĉadi — jen estis kutimo de la eta vendisto. Li tre bone aŭskultis min kaj lia sinteno estis plena je sincereco kaj fideleco. Li alte taksis mian fervoron: dum 6 jaroj mi vizitadis. Li bonvolis viziti la fabrikojn de Ŝikokuo kaj Koreio. Mi

akceptis lin en Seulo kaj, post 7 jaroj, finfine estis aranĝita la granda komerco. Ĉiujare, mia kompanio enspezis pli ol ducent milionojn da enoj.

Ĉi tiun s-ron Tom Bridges ni akceptis kiel vicprezidanton en 1980, kiam fondiĝis Swany America, kaj li tre aktive laboris en la plej antaŭa fronto. La kontribuo, kiun li plenumis rompante la murojn de kulturo kaj kutimo, estis senlime granda.

En 2004, li retiriĝis pro aĝlimo. Lian edzinon s-ino Judy, plenan je favoro, kaj ŝian patron mi plurfoje vizitis, kaj eĉ en la geedziĝa ceremonio de lia filino mi ĉeestis.

Invitite de la prezidanto de Sears

En 1982, vizitis Japanion la geedzoj de la prezidanto de Sears, kaj proksimume 500 kompanioj-liverantoj estis invititaj al la hotelo Ookura. En ĝi ĉeestis multaj famaj personoj kun s-ro Cucumi Seiĝi, ĉefkomandanto de la distribua grupo Seibu, ĉe la kapo.

Geedzoj Swift, ŝajne mildaj, staris ĉe la enirejo, kaj akceptis la gastojn manpremante unu post alia. Kiam mi eniris en la salonon, jam pasis 30 minutoj. “Kio estas liverata de vi, sinjoro?” “Gantoj!” “Eĥ, kio?” “Estas gantoj!” Pardonon, mi ne komprenas” “Estas gantoj por vintro,” mi geste montris la formon.

“Ha! gantoj, ĉu jes?” li iom rondigis la okulojn

kun rideto. Kvankam mia angla lingvo ne estis komprenita, mi ege emociiĝis pro tio, ke li bonvolis inviti malgravan homon kiel mi. Mi ekrememoris, ke mi flugis 20-kelkfoje al Ĉikago, kun ĉagreniĝo de jeta metala bruo, kun ŝvito, kun frapado de pluvo kaj vento, kaj kun neĝo min kovranta.

“Jen mi venkis min!” mi kriis en korfundo. Mi preskaŭ larmis. Se troviĝus neniu ĉirkaŭ mi, mi volus plori laŭtvoĉe el la korfundo. Mi forte retenis tion kaj, post la manpremo kun la sinjorino, antaŭenpaŝis.

4. La trajaraj artikloj estis mia ambicio

Kruta vojo al la konkero de malfavora sezono

En la mondskala disvolviĝo de la komerca agado la vendsumo de Swany glate kreskadis. Sed la plej granda problemo de gantoj — ke ili ne estas vendataj escepte en vintro — la liberiĝo el la karaktero “sezona artiklo” estis la afero malfacilega.

Ĉar mankis la mendoj, produkteblaj de decembro ĝis marto en la malfavora sezono, ofte haltis la fabrika funkcio. Inverse kalkulante de la periodo por enmanigi materialojn aŭ de la konstato de specimenoj k.a. en julio somere, dum la tuta monato, mi komencis rondviziti kvin aŭ ses urbojn, farante Nov-Jorkon bazpunkto. Ĉi tio okazis en la 1970-a jaro.

Mi ĉiutage vizitis la ĉefsidejon de la kompanio “Fownes” en Nov-Jorko, kies fabrikon en Manilo mi antaŭe vizitis por studo. La vicprezidanto Gluckman rigardis la kompanion Swany kiel intensan konkurenculon, sed mi havis esperon, ke ni povos disfaligi la muron per la kvalito kaj prezo. Tamen, eĉ se mi vizitadis dum sep aŭ ok jaroj, tute ne

progresis nia komerco, nur forprenitaj estis la gravaj informaĵoj pri la industria mondo. Mi ne povis ne rezigni.

La kompanio Aris Gloves, en Kvina Avenuo, ĉiujare elspezis kelkcent milionojn da enoj por la televida reklamado, kaj igis furori la ganton Isotoner, tre elastan kaj kun unu grandeco, donacebla al iu ajn, kiel ganton por ŝoforado kun la funkcio eviti la gliton de stirilo.

“La ganto liberigis usonanojn de la malvarma stirilo,” oni diris. Ĝi estis la plej granda marko en la mondo.

Kun s-ro Harman, la ŝarĝito de ĉi tiu kompanio, mi daŭrigis la komercan interparolon, vizitante je la 7-a ĉiumatene, kiam li venis al la oficejo, sed la negoco ial ne progresis. Ĉar mi juĝis, ke la frumatena horo estas tre utila, mi daŭrigis dum 6~7 jaroj, sed...Krom tio, poste, li venis por proponi, ke li enoficiĝu kiel vicprezidanto de Swany America, sed ne atingis la interkonsenton pro la malsameco de kondiĉoj. Kaj ni decidis dungi s-ron Tom Bridges, kiun mi jam menciis.

Koncerne la kompanion Gates, fabrikanton en Usono, ties plenan potencon havis s-ro Nessel, avĉjo ŝajne bonkora. Ĉe la ĉefoficejo de Gloversville, kiun mi vizitis per trajno, ofte la avĉjo parolis pri sia familio kaj golfludo, tial mi suspektis, ĉu li havas ian kaŝitan intencon? Sed tio estis mia troa pensado. Li ĉiujare mendis al fabrikanto en la orienta Azio 3,000

dekduojn (ĉirkaŭ cent kvindek milionoj da enoj) da skiaj gantoj, el malpeza polipropilena ŝtofo kun dika subŝtofo.

Koncerne la ganton, kiu kostis ĉirkaŭ 25 dolarojn, mi faris 10 procentojn da rabato, kaj obstinis: “bonvolu decidi ene de julio!” Tio estis ega malaltigo de la prezo, sed du semajnojn post la reveno al Japanio mi ricevis la mesaĝon, “Bonvolu veni al Seatlo”.

Ĉar la oportunaj flugoj estis plene rezervitaj, mi flugis en la unua klaso por la unua fojo en mia vivo, tamen nur irvoje, kaj ni faris la komercan priparolon en la flughaveno. La ŝarĝo de duono estis konsentita en marto, sed, koncerne alian duonon, ni devis konsenti la trudon de alia flanko, nome, la ŝarĝon en septembro kiam naskiĝas la elspezo por la konservejo. Sed, estis tre dankinde, ke ni povis funkciigi la fabrikon senhalte.

Eĉ se ni malprofitos en la malfavora sezono, ni reakiros en la aferplena sezono kaj celos 5~6 procentojn da neta profito. Ĉi tio estis komercmodelo de mia kompanio.

Mia kompreno pri la strategio jaron post jaro profundigis, sed ĉe ĉiu aldona mendo estis rifuzita la 10-procenta plialtigo de prezo. Ĉar la ricevo de mendo por la malfavora sezono en la sekvonta jaro fariĝos malfacila, mi klopodis por ne fari rabaton, sed, laŭ la rezulto, povas diri, ke mi multe baraktis por gajni nur 4~5 procentojn da neta profito.

Koncerne importistojn, mi ĉiujare vizitadis la kompaniojn New York Glove, Avon Glove, Grandoe, Monark en Montrealo, k.a. Sed, la klientoj, kiuj povis aĉeti antaŭkalkule kun risko, estis limigitaj; dum mi klopodis pli ol 10 jarojn, mi apenaŭ povis gajni la mendojn por du monatoj, t.e. duono de la celo.

Malfavora sezono, ĉe la aŭstrala hemisfero...

Tio estis necesa fluo, ke la gant-kompanio Swany deziris en la aŭstrala hemisfero, kie inversas la sezono, la laboron dum la malfavora sezono.



Kun la ĝenerala direktoro de Dents Gloves kaj lia edzino, 1977

Estis la jaro 1977, kiam mi renkontiĝis kun la prezidanto de Dents Gloves en Sidnejo, Aŭstralio.

Ĉu sukcesis la anticipa sendo de la gvidilo pri la kompanio? Estis surprize, ke la geedzoj Gasson, la prezidanto de la kompanio, regalis min per japana kuirajo. Sed, ĉe la komerca priparolo en la sekva mateno, kiun mi multe atendis, mi tre malkuraĝiĝis. Mi ricevis nur tiom da mendoj, t.e. kelkdek parojn por unu artiklo.

En Melburno mi povis intertrakti komercan aferon kun kelkaj kompanioj kaj ricevis pozitivan respondon, kaj tamen ĉiu ne multe diferencis. La loko, kie oni havas tiom malvarman klimaton, ke gantoj estas vendataj, povas esti nur la suda parto kiel Tasmanio k.a. Tio ke la nombro de loĝantaro estas malgranda, estis unu kaŭzo. Mi pensis, ke ankaŭ la situacio de Sud-Afriko estas sama, sed mi decidis rezignacii nur post la konfirmo de la aktuala loko.

Por la benzinprovizo mia aviadilo surteriĝis unufoje ĉe Perth en la sudokcidento de Aŭstralio, kaj faris unu flugon super la Hindan Oceanon, kaj transflugis Madagaskaron kun la areo 1.6-oble pligranda ol tiu de Japanio. Mi rondvizitis Johanesburgon kaj Kaburbon en Sud-Afriko. En ambaŭ urboj mi povis renkontiĝi kun kelkaj komercistoj de gantoj, sed, ankaŭ ĉi tie mi ricevis la mendon, t.e. nur kelkdek parojn por unu artiklo.

Ĉar mi venis tiel proksimen, mi iris por stari sur

la Bonespera Kabo. La panoramo de sur la klifo estis belega; troviĝis neniu ĉirkaŭ mi. Kiam mi tie staris sola kun sento, iel melankolia, venis germanaj geedzoj kaj la edzo bonvolis foti min kun la edzino. Estis renkontiĝo nur unufoja en la vivo.

Ekfluginte de Kaburbo, tra la Flughaveno Kinŝaso de Kongo, mia aviadilo flugis cele al Londono; ĉar la Flughavenon Heathrow dense vualis nebulo, kun aliaj pasaĝeroj mi devis elaviadiliĝi en Madrido, Hispanio.

En la hotela ĉambro, preparita de la aviada kompanio, servisto lasis mian valizon kaj, batferminte la pordon, eliris. Tiumomente, tre facile rulfalis la porda anso. Mi tuj telefonis al la akceptejo, sed mia angla lingvo ne estis komprenata. Konfuzita mi kriis, "S.O.S.!" Venis koncernulo kaj riparitis.

La klopodo — kun ŝvito mi rondvojaĝis en la suda hemisfero — bedaŭrinde ne utilis por la rezervo de la laboro en la daŭro de malfavora sezono.

Malfavora sezono — progreso kaj regreso

En Usono la skigantoj kun la marko Swany komencis esti vendataj ĉiujare kun enspezo je miliardo da enoj, kaj unu parton ni povis fabriki laŭ antaŭkalkulo. En la malfavora sezono ni povis rezervi la laboron dum unu monato, sed ĉar la

gantoj estas fabrikataj en Ĉinio, ni nun troviĝas en malfacila situacio pro la doganrebato de Prezidento Donald John Trump.

De la jaro 2018, mi sendis al Swany America s-ron Kuŭhara Iĉiroo kiel prezidanton. Li tuj komencis entrepreni la fabrikadon de la gantoj por biciklado, cele al la elŝeliĝo el la sezona artiklo.

La plej granda vendejo de la skigantoj troviĝis ĉirkaŭ Rokmontaro, kaj en somero estas vendataj la necesajoj de montbiciklado. Sed, ĉar ne degelis la restanta neĝo en la jaro 2018, ne povis okazi la somera Montbicikla Vetkuro en 2019.

La duonjarcenta klopodo sekurigi la dumvintran laboron daŭris ĝis hodiaŭ, ripetante progreson kaj regreson, kaj la realigo de la sportaj gantoj por printempo kaj somero estas la plej grava tasko por la nuna Swany.

Realigo de la dumjara produktado per UV-gantoj

En la jaro 1982, proksimume antaŭ 40 jaroj, plej frue en Japanio Swany komencis okupiĝi je UV-gantoj. En iu tago min vizitis konata virino kun postulo “Mi deziras tiajn gantojn, kiaj povas defendi virinajn manojn kaj brakojn kontraŭ sunbruniĝo”. Ĉi tio faris la ŝancon. Kiam mi parolis pri tio al mia edzino Yoshiko, ankaŭ ŝi pozitive respondis,

“La vendantino de la vivasekura kompanio Ĉijoda-seimei, mia amikino, diras, ke ankaŭ ŝi deziras tiajn”.

Mi faris la specimenojn de ĉiu speco, mallonga, meza kaj longa, per maldika ŝtofo, kiu povis fariĝi ŝirmilo kontraŭ la suno, kaj portis ilin al la laborejo de la asekura kompanio. Tie, “Nigra koloro povas bari la ultraviolajn radiojn pli efike, ol la pala,” diris la vendantinoj, kaj mi konvinkiĝis. Mi gajnis ekstersupozan aplaŭdon de ses virinoj, tie ĉeestantaj. Mi sentis bonan reagon, “esperplene!”

Komercan laboron mi konfidis al la branĉo Takamacu de la reklamagentejo Dentsu kaj, koncerne pakadon k.a., mi multe kaj skrupule cerbumis.

Mi nomis la artiklon “My Care Lady”, parodiante la titolon de kino “My Fair Lady”, kiu multe furoris kun Audrey Hepburn kiel la ĉefaktorino.

En 1984, estis dungitaj de la kompanio s-roj Okudai Jasuŝi, Mitani Hidenobu, Iŝŝiki Kazumasa kaj Muromaki Taku.

Ĉi tiuj kvar personoj komencis la vendadon de My Care Lady tra la tuta lando; sed malgraŭ la espero, multaj klientoj indikis, ke ili estas tro malgrandaj, kaj ĉirkaŭ 4~5 jarojn ni malfacile batalis por la elvendo de la restanta stoko.

S-ro Okudai Jasuŝi, kiu poste enoficiĝis kiel la prezidanto de Swany Cambodia, jene retrorigardas siatempan aferon. (*el la Novaĵo Swany en 1999*)

“Pro la ordono de transoficiĝo mi portis al Osako litaĵojn, kotacon kaj televidilon, kaj ĉiutage mi ĉirkaŭvagis por vendi la karmemoran artiklon My Care Lady. Mi vizitadis cele al la afektemaj kaj bruskaĵaj oficistinoj de la kompanio de kosmetikaĵoj. En varmego kvazaŭ en forno, portante specimenojn, mi vivriske vendadis kun ŝvito. Kvazaŭ mi estus kolportisto de medikamento el Tojama! La laboro estis ne nur hontinda, sed preskaŭ malesperega por mi. Ĉu oni kompatis mian malesperegion? Multaj butikoj konsentis trakti la komercaĵojn.”

La komercaĵo, nuntempe, ĉie nature troviĝas, sed siatempe eĉ la gantoj por la defendo kontraŭ sunbruniĝo mem estis nekonataj. Estas grave havi la klarvidan kapablon, sed la komerco ne povas okazi, se oni tro frue anticipas la estontecon. Ŝajne la ekvendo estis 10 jarojn tro frua, des pli sen agentejoj. Malgraŭ la klopodo, kun defecito de kelkdek milionoj da enoj, ni nin retiris de la afero.

Ĉirkaŭ la jaro 2000, 15 jarojn poste, kelkaj kompanioj komencis vendi la artiklon kiel “UV-ganton”, kaj oni komencis ĝin rekoni. Nuntempe, ankaŭ Swany komencis partopreni kaj ĉiujare produktas milionon da paroj. Formiĝis la merkato, kiu okupis 20 procentojn da vendsumo de la industria mondo, kaj disvolvante la intensan prezkonkurencon, ĝi kreskis kiel la granda komercaĵo, kaj tamen, ankoraŭ la malekvilibro al

vintra komercaĵo restas nesolvita.

Ni atingis dumjaran komercaĵon post gantoj

Daŭris palpa serĉado. En la 1980-aj jaroj, la elastaj gantoj “Big Swany”, uzeblaj de maturuloj ĝis infanoj, malvenkis en intensa konkurenco, kaj ankaŭ “Hot Swany” gantoj kun subŝtofo ne povis longdaŭre vendiĝi kaj havis la afliktan retiron.

“Yes Swany”, trikotaj gantoj en la travidebla skatolo kun subŝtofo kaj kun 32 koloroj (laŭplaĉe elekteblaj), estis vendataj dum dek kelkaj jaroj kaj kreskis al granda komercaĵo, sed ĝi ne estis dumjara komercaĵo.

En la jaro 1985, imitante la komercaĵon “Grips”, kiu furoris en Usono, mia frato Haruo nomis bovledajn eksterdomajn gantojn “Grip Swany” kaj elfaris merkaton; mi jam menciis, ke la artiklo estis fame konata inter entuziasmuloj.

Mi pensis, ke eventuale ie ekzistas nova mondo krom gantoj. Mi alteniĝis al gantoj pensante: “ĉar ĉiuokaze Swany estas vendejo de gantoj.” Sed fari pantalonon el la materialo de la tendo, koncesiita de armeo, estis la komenco de nia entrepreno. Ne necesas alteniĝi nur al gantoj — ni bezonis havi ideon ankoraŭ pli flekseblan.

Mi trovis sugeston apud mi.

Fizika handikapulo, mi, ĉiufoje, kiam mi vojaĝis eksterlanden, estis ĉagrenata kaj ellaciĝis. Pro tio, antaŭ ĉio, mi komencis la revolucion de sako, kaj atingis la sakon “Swany Bag” por apogi la korpon. Tiel mi trovis la vojon de la elŝeliĝo el la sezona komercaĵo.

Kaj post tio, mi infektiĝis je la sindromo PPS (*pri post-poliomjelito poste mi detale klarigos*) kaj ĉirkaŭ tri jarojn mi estis devigita vivi sur la rulseĝo. Ĉar la ĝisnuna estis malfacile movebla pro la batiĝo kun pordo aŭ neceseja kuveto, mi kuraĝis fari la supermalgrandan rulseĝon por mi mem. Pelrado kun diametro de 40 centimetroj, kaj tiom malalta, kiom oni povas kapti eĉ objektojn sur la planko.

Desegnante mi ripetis provfaron, kaj la elfaraĵo estis “Etsuo Swany”, por kiu mi elspezis keldek milionojn da enoj.

Sed, ĝia malgrandeco havis tian malavantaĝon, ke ŝoforo malfacile ĝin rimarkis sur la vojo.

Ni eksponis provaĵojn en Internacia Bonfarta Ekipaĵ-Ekspozicio de Tokyo Big Sight, sed, kvankam ili altiris la atenton de multaj homoj, la 70 provaĵoj tute ne vendiĝis. Mi rezervis unu ekspoziciaĵon kiel la historian materialon de la kompanio, kaj aliajn ĉiujn mi forĵetis. Pro bedaŭro tremis mia korpo. Mi siatempe neniom supozis, ke tiu malsukceso alligiĝos al postjara sukceso.

“Ni bezonas realigi tian artiklon, kian homoj korfunde deziras, se ne, ni ne povas pluvivi,” mi

forte gravuris en la koro, travivante diversajn malsukcesojn.

Koncerne la nekonatan historion pri la ekspluato de la korpoapogebla sako kaj la rulseĝo, faldebla en malgrandan formon, la komercaĵoj, kiuj nun faras du krestojn kune kun la gantoj, mi rakontos plene en la dua ĉapitro.

5. Disvolvo al eksterlando

Kreskigo de produktivo en Japanio

Kiamaniere unu eta gantkompanio en la gubernio Kagaŭa pligrandigis sian skalon kaj disvolvis al eksterlando? Ĉi tie mi volas klarigi laŭorde la fluan en la vidpunkto de “produkto”.

Kial Swany disvolvis sian kompanion al eksterlando? Tio estis, se diri unuvorte, ĉar peze sin ĵetis sur nin la problemo de salajro, t.e. elspezo por funkciuloj, karakteriza al industrio. Serĉante talentulojn, kiuj povis distinge labori por malkara salajro, ni iris eksterlanden por instali produktejojn. Sed, ĉar ankaŭ en ĉi tiu okazo ni anticipis estontecon, ni fariĝis la celo de la intensaj rezisto kaj antaŭjuĝo de naciismo kaj amaskomunikado.

Nun mi revenu al la malnova okazaĵo en la tempo, kiam mi estis dungita de la kompanio. En la jaro 1960, kiam ni sentis la fabrikon malvasta, ni konstruis fabrikon de ĉirkaŭ 100 cuboj (ĉ. 300 kvadrataj metroj) najbare de mia domo, laŭ la plano de la patro. La teretaĝo temis pri la loko de tajlado, kaj la unua etaĝo temis pri kudrofabriko, kaj la nombro de dungitoj pligrandiĝis ĝis proksimume 100.

Tio, kio tiam leviĝis, estis la entrepreno por konstrui la novan kompanian domon kiel mi jam menciis. En la jaro 1964, per 7 milonoj da enoj mi rezervis kelkajn parcelojn da kampoj kun 2,300 cuboj (ĉ. 7500 kvadrataj metroj), kiel la terenon por konstruo, ĉe la linio Takamacu-Tokuŝima de JR (*Japana Fervoja Kompanio*). Mi, ankoraŭ flavbekulo, faris la desegnon kaj elspezis 20 milionojn da enoj por la fabriko kun 420 cuboj (ĉirkaŭ 1,388 kvadrataj metroj). Ĉi tiu estis teretaĝa konstruaĵo, kiu ampleksis de la oficejo en centro al fabriko kaj konservejo; mi reduktis elspezon, farante la strukturon el la tubo de Daiwa House.

En la jaro 1968, ni fondis la kompanion Swany Ikeda en la urbeto Ikeda (*en la gubernio Tokuŝima*), fame konata pro la bazopilka matĉo de la dua mezlernejo en Japanio, kaj en sekva jaro Swany Tokuŝima, luante la lernejan konstruaĵon en la urbeto Ikeda, kaj plue Swany Kooĉi sub la digo Sameura. En la produktoj centrantaj malnovan urbeton Ŝirotori, mankis laboristoj; ni do komencis paŝi en la mezon de la Insulo Ŝikokuo, serĉante la dommastrinojn en kamparaj vilaĝoj. Nia intenco trafis: kolektiĝis 200 personoj en tri fabrikoj.

Koncerne la teknikojn de tajlado kaj kudrado, s-ro Okada Jasuo, kiu hardis la kapablon jam de la tempo de fondiĝo kaj respondecis pri la tekniko de tri kompanioj en Koreio kaj de kvar kompanioj en Ĉinio, dume Asao, mia pli juna frato resumis la

administradon de la tri kompanioj.

Malfacila estis livero kaj administrado de ledon. Mi petis laboristojn, ke ili prenu kaj tajlu la ledon ŝnuritan en unu fasko da 30 aŭ 40 pecoj, kaŝante gratvundon sub interna flanko de mano; ekstreme limigi la uzkvanton por paro estis kondiĉo por transvivi. Ĉar tajlistoj emis preni ledon sen gratvundo, en rezervejo, dum oni ne rimarkis, restis nur ledpecoj kun vundoj. Ĉu povi konvinki subulojn, ne lasante tajlistojn laŭplaĉe kondukti, dependas de administranto, kiu devas esti anstataŭanto de prezidanto.

Alia problemoj estis maniero por difini laŭrendimenta salajro ĉe ĉiu procedo de kudroj, nome, dikfingra, komplementa, de kunkudro de partoj mandorsa kaj manplata. Ec iometan maljustecon ne pretervidis la okuloj de ĉiuj kudristoj, kaj ĉiam estiĝis la konfliktoj pro la laŭrendimenta salajro. La kriterio de la laŭrendimenta salajro sen elvoki malkontenton eĉ nun troviĝas en ĝangalo kiel eterna problemoj.

Koncerne ledgantojn, ni produktis en tri fabrikoj, t.e. la ĉefsidejo, la gubernioj Tokuŝima kaj Kooĉi; koncerne ŝtofon aŭ artiklojn el sinteza ledaĵo, de kudrado ĝis finfaro, ni mendis ĉefe al la subkontraktaj fabrikoj enguberniaj aŭ en la gubernio Tokuŝima. Oni antaŭen puŝis la laboron en la skalo, t.e. de kelkaj homoj ĝis la dekkelkaj, kaj la solideco de kvalito kaj liverdato dependis de

la posedanto de la subkontrakta fabriko. Aliflanke, kio delikate influis la produktrendimenton kaj kvaliton, estis metala matrico de ganto, desegnita facile kudreble. La modelo de la kompanio Gold en Kanado estis sufiĉe utiligita.

En la tempo, kiam ankoraŭ ne troviĝis portebla telefono, ni faris la administradon de mendoj per tri kamionoj du-tunaj kun radiotelefono; ĉar foje estiĝis malbona kvalito kaj malfruiĝo de liverdato, ni komencis pristudi la investon al Koreio kaj Tajvano, en kiuj tieaj kompanioj memproduktu.

Koreion kiel bazpunkton de fabrikado

En la komercado, surbaze de pligrandigo, ni devis investi al Tajvano ĉiujare 20 aŭ 30 procentojn da kapitalo, kaj leviĝis Koreio kiel la celo de elpaŝo. “En la malvarma Koreio, kie nepre necesas gantoj, ni povas produkti pli bonajn artiklojn, ol en Tajvano,” opiniis mia patro, kaj ni komencis dividi saman sorton ja kun Koreio.

En la jaro 1972, la fondo de Swany Korea, la unua eksterlanda fabriko, al kiu ni investis 750,000 dolarojn (*250 milionoj da enoj*), fariĝis sparko por eviti la abruptan plivaloriĝo de eno. Ĉu ĉi tio okazis hazarde aŭ pro bona sorto? Pro la Nixon-ŝoko subite plialtiĝis la valuto, t.e. de 360 enoj al 240 enoj, ĉe la centra oficejo momente malaperis la profito de 100

milionoj da enoj. Sed la damaĝo influis nur la parton de profito kaj la materialojn fabrikatajn en Japanio, kaj ni eltenadis, kvankam barakte kaj sufere, abruptan plialtiĝon de pli ol 80 enoj pro la Plaza-Interkonsento en 1985. Ni ripete respondis per la klopodo por la ekvilibro de eksporto kaj importado, plimultigante la importon en Japanion.

Al la sortkomunumo fondita en industria zono de la urbo Masan ni vivriske frontis. El mia libro pri maksimumoj mi elektis kiel gvidprincipon de la kompanio jenan devizon, “Por mi, por la socio kaj por la mondo”. Temas pri tia ideo, ke ni klopodu por ni mem, sed samtempe ni kontribuu por la socio kaj la mondo. La gantojn de 1,000 enoj, kies neta prezo estis 700 enoj, ni aĉetis de Swany Korea per 850 enoj, kaj tiel Japanio kaj Koreio egale dividis la profinton. Ni povas diri, ke ni sukcesis kolekti eminentajn talentulojn, lasante profiton ankaŭ surloke.

S-ro Li Sol Pi en Urbo Seulo, kun kiu mi fariĝis intima amiko, emociiĝis pri mia apuda libro *Esploro de vivĝojo*; ĉi tiun li mem tradukis en la korean lingvon kaj eldonis 2,000 ekzemplerojn. S-ino Kang Hong Que, amikino de s-ro Li, perdis karan edzon en la korea milito, kaj nun okupiĝas kiel la prezidanto de la tutlanda vidvina asocio pro la milito. Ŝian filon, s-ron Song Young Chol ni akceptis al Swany Korea, post kiam li finis la studon de universitato Seulo. Plenuminte la funkcion de la prezidanto de Swany Korea, poste li enoficiĝis en Swany America kiel

ties prezidanto; en 2013, li retiriĝis de la posteno pro aĝlimo, kaj nun ĝuas agrablan vivon en la urbo Pusano.

Ĉe la dungo de alilandanoj kun malsama lingvo, ni sukcesis bari la dungon, influatan de persona konsidero, efektive utiligante “la aparaton por kalkuli la lertecon en manlaboro (*kompilita de Ministerio de Laboraj Aferoj por Publika Bono*)” — Oni metas en plurajn truojn sur la panelo de 30cm×30cm×3cm, renversante pinglon, kiessupro kaj malsupro havas malsaman koloron — ĉar la plej grava estas lerteco en manlaboro.

Imitante la kompanion Wells Lamont, plej granda laborganta kompanio en Usono, fame konata kiel pinta fabriko, ni celis unu fabrikon por unu speco, kio ebligas bonan kvaliton kaj malaltan koston; ekzemple, Swany Korea estis ŝarĝita per kontraŭfrostaj gantoj el sinteza ledo kaj bova plankledo (*la malantaŭa parto de la dua tavolo de la forigita felo*), Swany Toyo per la skia el sinteza ledo, kaj Swany Azia per la naturledo.

Ni dungis 400 homojn, kaj iam eĉ atingis 650 homojn. En la tempo, kiam japanoj estis salajrataj ĉirkaŭ je 30~40 mil enoj monate, ilia unua salajro estis pli-malpli 8000 enoj. Sinteza ledto estis produktata kaj 70 procentojn de salajro okupis la laŭrendimenta. Ni povis sukcesi pro la helpo de la granda entuziasmo de koreoj.

En la jaro 1976, ni fondis Swany Toyo en la urbo

mez-okcidenta, kaj en la najbara urbo Swany Azia.

Sed ni malvenkis en la prezkonkurenco kontraŭ Ĉinio, kaj ĝis la jaro 1990 ni fermis la tri kompaniojn kaj forvendis ilin al la lokaj entreprenoj.

En la jaro 1979 Prezidanto Pak estis murdita, kaj oni ne sciis, kiel forviŝi la bizaran atmosferon en la kompanio. Sur la strato interbatiĝis unu kontraŭ alia manifestaciantaro kaj soldataro, kaj ĉi tio poste etendiĝis ĝis kontraŭjapana movado. Sed nia administrado ne ricevis tiom da influo, kiom informis amaskomunikiloj.

Akuzo “migrobirdo”

En Koreio, kie plialtiĝis la elspezo por funkciuloj, laŭgrade fariĝis malfacila la provkalkulo, kaj baldaŭ ni ricevis grandan provon. Nia lasta retiro okazis en la jaro 1989, kiam ni fermis la kompanion Swany. Jarfine kvin junulinaj estraranoj de laborista sindikato vizitis Japanion, kaj mi akceptis ilin ĉe la Flughaveno Tokuŝima. “Ni volas respondi finance,” mi komencis. “Nia estas vizito ne por trakti finanĉan problemon, sed por defendi la dignon de la popolo,” ili diris. Mi ja ricevis fortegan baton.

S-ro Im, administranta direktoro, sciigis al mi, “Virinoj iros por traktado.” Kiam mi restis iel nesingardema, li ankoraŭfoje certigis: “En Koreio viroj ne faras la agadon de la laborista sindikato,

ĉar ili ne povas esti redungita, se ili estas registrita en nigra listo. Sed vere teruraj estas la virinoj, kiuj povas rifuĝi al edziniĝo!”

Japanaj naciaj ĵurnaloj ĉiuj salve informis: “La traktado inter kapitalisto kaj dungitoj trapasis jarfinon” “Migrobirdo, kiu deziris doni malaltan salajron” “Tro partiema sen observi la konvencion”. Ĉirkaŭ 100 fojojn informadis amaskomunikiloj: “Tumulto de interpuŝiĝo kun sindikatanoj el Koreio” “Rifuzis postan intertraktadon” ktp. Dum ĉirkaŭ tri monatoj daŭris protestado pere de poŝtkartoj kaj leteroj, kaj ili superis 7,000 fojojn. “Prezidanto Miyoshi, malhumana homo!” “Savu la malriĉajn virinojn” ktp. ktp.

Venis ĵurnalisto de la ĵurnalo Asahi. “Ĉu estas principo de via kompanio retiri, kiam malmultiĝas profito?” li diris. “Kiun vi aĉetus, ĉu artiklon kun prezo je 1,500 enoj aŭ artiklon je 2,500 enoj, kvankam la artiklo temas pri unu sama ganto?” “Tio estas tute alia afero,” ili deflankigis mian demandon. “Ni jam longan tempon kontribuis, liverante laborejon, sed ni ne povis venki Ĉinion. Bonvolu klarigi la fakton,” mi petis, sed tute ignoris min la ĵurnalisto.

Dum 100 tagoj okazis 19 kolektivaj intertraktoj kaj sep tranoktaj; dum la intertraktoj estis alĵetitaj magnetfonoj kaj cindrujoj. “Kiel vi opinias la invadon dum 36 jaroj? Provu respondi!” oni kriis ĉe mia orelo sennombre. Mi eltenis ĝis mateno,

kunpremante la dentojn.

S-ro Song, koreo kaj la prezidanto de Swany America, bonvolis diri, “Kun tia mildeco vi neniom povos solvi la problemon. Prezidanto Miyoshi, vi ne kulpas. Dungitoj povas iam ajn ekŝiĝi per sia oportuno. Prezidanto havas la rajton maldungi, kondiĉe ke li pagu maldungmonon; ĉi tio estas vera egaleco.” Mi, savita de ĉi tiuj vortoj, decidis ŝanĝi la sintenon nur peti pardonon.

Venis marto kaj en ĉiu sabato kaj dimanĉo, mi estis ĉirkaŭita de la virinoj kaj iliaj 400 subtenantoj. Mi senpere donis la leteron: “Ni ne pagos eĉ unu enon, kiom ajn vi postulos. Jam rezignu proteston!” Profitante iometan malatenton, enpenetris dungitoj kaj eksplodis pelmela luktado. La situacio estis savita de la kontraŭtumulta trupo kaj revenis la ordo, sed en ambaŭflankoj aperis vunditoj. Tuj poste al mi venis telefonvoko de la reprezentanto de la laborista sindikato, “Nu, s-ro Prezidanto, ni priparolu pri mono, ĉu jes?”

La 6-an de marto, en la tranokta intertraktado daŭra dum du tagoj en najbara hotelo, la postulon de 150 milionoj da enoj mi malakceptis, “Ne! Superas limon, sufiĉas kvin milionoj!” “Per tia bagatelmono!” diris la alia flanko. Tio ŝokis min.

“Faru laŭplaĉe!” mi kriis frumatene en la dua tago, kaj hejmenrevenis. Mi glitiĝis en la liton, sed mi ne povis endormiĝi. Poste, per la pago de 30 milionoj da enoj kiel kompenso, ni jam povis meti la finon al

la intertraktado.

Mi rondvizitis ĉirkaŭ 500 domojn por pardonpeti, kaj tiel mi povis konkeri la krizon.

Kio estas la “migrobirdo”, esprimita de amaskomuniloj? Entrepreno serĉas la lokon, kie ĝi povas ŝpari la elspezon de funkciuloj; tio estas memdefendo por plu vivi, mi pensas. Per la fabrika translokiĝo evoluantaj landoj subpremas la plialtiĝon de prezo, evoluantaj landoj klopodas por plialtigi la vivnivelon, gajnante laboron. “La bonkvalitajn malkare” — por disvastigi la aferon tra la mondo, troviĝas neniu alia maniero ol ĉi tiu sistemo, t.e. divido de laboro. Nuntempe, ia ajn entrepreno praktikas tute nature, siatempe tamen ankoraŭ estis celo de severa kritiko. Ĉar mi estis reprezentanto de Swany, kiu pionire provis ĉi tiun sistemon de “labordivido”, iasence oni faris min propeka kapro.

Fondo de Swany America

En la 70-aj jaroj, kelkaj grandaj ĉenaj detalvendejoj proponis, “Ĉu vi ne volas havi stokon en Usono, ĉar ni povos fari aldonajn mendojn, se venos malvarma sezono.” S-ron Hasegaŭa Isamu mi sendis kiel prezidanton, kaj kiel vicprezidanton akceptis s-ron Tom, antaŭe aĉetisto de Sears, kaj en 1980 estis fondita Swany America.

Ni luis ĉirkaŭ 93 kvadratajn metrojn sur la 12-a etaĝo de Empire State Building kun jara lupago de 25,000 dolaroj (50 milionoj da enoj). La lupago estis egala al tiu en Tokio. Ĉirkaŭ la konstruaĵo kolektiĝis kompanioj de gantoj, kaj eĉ en pluva tago oni povis rondviziti ilin sen ombrelo. Ankaŭ la klientoj diris, “tre oportune!” Luante konservejon en Nov-Ĵerzejo, en ĉirkaŭurbo kun lupago de 50 mil dolaroj (ĉirkaŭ 10 milionoj da enoj) jare, mi iom post iom ordigis sistemon kvazaŭ palposerĉi en mallumo.

Okaze de la entreprena pligrandiĝo en Usono, la centra oficejo komencis esplori novajn komercaĵojn konvenajn por la Usonaj kondiĉoj. Ĝuste siatempe la kompanio Pilot Ink, fabrikantoj de fontplumoj, komencis vendi tian presteknikon, kia igas koloron ekaperi ĉe la temperaturo de ok celsiaj gradoj aŭ malpli, kaj, uzante tiun teknikon, ni faris gantojn por infanoj: kiam en malvarma tago ili eliras eksteren, komencas aperi tia bildo, ke pavo streĉasflugilojn kaj reliefiĝas tanko. Ĉi tiun ni nomis “Freezy Freakies (FF)”.

Ni elspezis 3 milionojn da dolaroj (ĉirkaŭ 700 milionoj da enoj) por televida reklamado, kaj ni vendis 2 milionoj da gantparoj dum 9 jaroj, t.e. vendsumo de 12 milionoj da dolaroj (ĉirkaŭ 3 miliardoj da enoj). Unu infana gantparo kostis 4 dolarojn, sed finfine per 12 dolaroj ĝi furoris kaj la klientoj disvastiĝis tra la tuta lando de Usono.

“Mi ja estis venkita de Etsuo!” cedis al mi s-ro

Richard, prezidanto de Grandoe, kiu estis pinta fabrikanto. Li rakontis al mi, “kiam unu estrarano revenis hejmen kaj malfermis la fridujon, li estis surprizita, ĉar aperis FF el ĝi.” “Se temas pri gantoj, troviĝas ankaŭ en nia kompanio,” predikis la estrarano. “Sed mi ja deziras tiun ganton, sur kiu aperas bildo,” plorpetis la infano.

En la jaro 1987 ni aĉetis la kompanion Elmer Little, malnova butikoj kaj kliento de nia kompanio. Por liveri al magazenego ni pagis 385 mil dolarojn (60 milionj da enoj) kiel honorarion. Sed, ĉar ni akceptis ankaŭ ĝian stokon, ni suferis pro monflujaj problemoj; inkluzive de la neceso malmultigi la funkciulojn ni ĉagreniĝis dum ĉirkaŭ 10 jaroj. Estis sperto tre valora.

En la jaro 1989 ni lanĉis la projekton de la nova komercaĵo Swany Ski, la unua usona marko por Swany. Ni fariĝis la patrono de “USST (*Usona Ski-Teamo*) Speed Skiing (*rapida skiado*)” kaj “World Cup (*Monda Pokalo*)”, kaj komencis ekspozicii en “SIA Ski Show” en Las Vegas.

Koncerne la artiklon Flexor, ĝi estas Ski-ganto kun artikoj, t.e. danke al ili, oni povas fleksi fingrojn en gantoj tre facile. Ĉi tiun ni faris aĉetinte la teknikon de NASA per 100 mil dolaroj (ĉirkaŭ 20 milionoj da enoj).

“Flexor Toaster” temas pri mufgantoj, kiuj ebligas malfermon kaj fermon de zipo kun manoj lasitaj en gantoj kaj tiel oni povas enmeti kaj elmeti la fingrojn

en kaj el gantoj. Ĝi estas akvoimuna, spirebla kaj varma kun dorsa flanko de “Triplex” (*algluita per trispecaj izolaĵoj*).

Tiel, tia ganto, kies unu paro kostas pli ol 100 dolaroj, estis akceptita unuafoje en la merkato de Usono.

Naskiĝo de Swany China

Venkite de la ĉine fabrikitaj, la konkurenceblo de la tri kompanioj de Koreio fariĝis malforta, kaj oni do bezonis radikalan strategion. “Ĉu vi ne volas enpaŝi en Ĉinion?” invitis s-ro Mino Hiroŝi, Prezidanto de la banko Hjakuĵuushi, kiu estis la ĉefa banko de mia kompanio. La ĉefo de la Banko de Ĉinio, vizitinta Japanion, lin petis, “Bonvolu prezenti iun gant-kompanion.” “Tiu devas esti s-ro Miyoshi!” en lia kapo tuj aperis mia figuro, laŭ li.

Kiam mi vizitis Ĉinion kun la prezidanto Mino k.a., estis en februaro, 1984. Tremante pro malvarmeco, ni rondvizitis Hangĝoŭon, Ŝanhajon, Nankinon, Suĝoŭon kaj Kunŝanon. Kaj ĉiun tagon kaj nokton ni estis ege bonvenigitaj per tostoj. En marto, en la dua vizito, ni limigis la komerclokon en la urbo Suĝoŭo, kaj en aprilo ni nin sidigis en la urbo Kunŝano inter Suĝoŭo kaj Ŝanhajo. Ĉiumonate, ni vizitis dum unu semajno, kaj traktis komercaĵon kun s-ro Xuan Binglong, ĉefo de la Ekspluata

Kvartalo, kaj aliaj 10 personoj. Miliono kaj duono da dolaroj (300 milionoj da enoj) estis investitaj en la kapitalo; la japana flanko investis 52 procentojn kaj la ĉina 48 procentojn. Dumjare 5.5 juanoj x 10,500 kvadrataj metroj x 20 jaroj, t.e. la terena uzrajto, nome, 1,150,000 juanoj (ĉirkaŭ 100 milionoj da enoj) fariĝis la investo de la ĉina flanko. La komuna periodo de ambaŭ entreprenoj estis limigita dum 20 jaroj, kaj la monata salajro por 400 laboristoj, inkluzive de sindikata kotizo (por asekuro, pensio k.a.), fariĝis 150 juanoj (ĉirkaŭ 9,000 enoj). Estis sufiĉa nivelo por subteni la konkurencan forton, sed tuj ni stumblis pro la kompania nomo.

Mi proponis la nomon "Swany China", sed la alia flanko postulis "China Swany". Ĉar en la nomoj de la ĝisnunaj kompanioj, en kiuj mi investis kapitalon, antaŭis Swany, mi ne cedis. La afero abortis. Eĉ se ni interkonsiliĝis tra la tuta tago, ni ne povis meti finon. Songante frumatene, mi estis inspirita: "En la ĉina nomo ni povas esprimi China Swany, kaj en la angla Swany China, ĉu ne?" Kaj ĉi tiun ideon mi proponis. "Se tiel, ni ambaŭ estas egalaj!" post dutaga pritrakto ni finfine povis meti punkton.

En la tria fojo ni diskutis en la daŭro de tri semajnoj pri la investa proporcio de ambaŭ flankoj, sed suriris rifon. Koncerne la investan proporcion inter Japanio kaj Ĉinio, mi forte rekomendis 60 procentojn, kiom Japanio okupis la plimulton, sed la ĉina flanko ne cedis. Dum la intertrakta periodo mi

vizitis la japanan fadenan kompanion Toojoo Booŝi. “La plej gravaj estas personaj rilatoj, do antaŭ ĉio ni devas konstrui la konfid-rilaton,” mi ricevis konsilon de la prezidanto Kobajaŝi. Alpreninte ĉi tiun konsilon, nia flanko cedis kaj atingis la rezulton: investu po duono ambaŭ flankoj Japanio kaj Ĉinio.

La maratona intertraktado fariĝis konsiliĝo dum 30 tagoj en kvinfoja vizito en Ĉinio kaj ambaŭ atingis la interkonsenton ĉe 63 punktoj. Poste, por la klarigkunveno pri la investo de la urbo Kunŝano, kiun la ĉina flanko okazigis en Osako kaj Tokio, ni kunlaboradis tutkompanie.

En la venonta jaro, kiam finkonstruiĝis la fabriko, okazis la surloka inaŭguro. Antaŭnokte, al 10 oficistinoj ni klarigis la portmanieron de teo. Por la *teceremonio*, prezentata de mia edzino Yoshiko, kolektiĝis multaj raportistoj el amaskomunikiloj. Ankaŭ al la geedzoj de la prezidanto Mino, s-ro Ling Zhiwei, vicprezidanto de Ĉina Banko k.a. ni prezentis tason da teo laŭ la ceremonio kaj ili gustumis ĝin.

Ni enportis entute 300 kilogramojn da objektoj, ekzemple, 400 portlunĉoj kun haringo envolvita de laminario k.a. kaj instrumentoj de ĉanojo (teceremonio), kaj ni faris ankaŭ la memorplantadon de 50 sakuraj arbidoj. Tiel ni faris la tagon Festo de Japano Kulturo. Ni klopodis por ŝpari la elspezon en 300 mil enoj inkluzive de bankeda kosto, kaj tiel ni pretigis nin por la eventuala malsukceso de la

nekonata socialisma lando.



Yoshiko prezentas japanan te-ceremonion
ĉe la inaŭguro de Swany China, 1985

En la jaro 2001 post 16 jaroj, estis liverita la angulo de ĉefvoja kruciĝejo en la urbocentro; la aleo ampleksis 12 mil kvadratajn metrojn. Tien ni translokis la kompanion kaj en 2003, la kapitalon de ĉina flanko Swany aĉetis per 6 milionoj da juanoj (ĉirkaŭ 50 milionoj da enoj).

La elpaŝo de Japanio okazis tiel, ke Macuŝita Koonosuke respondis al la postulo de Deng Xiaoping: “Bonvolu helpi por la modernigo de elektrona industrio.” Dum kelkaj grandaj entreprenoj elpaŝis, Swany fariĝis la unua kompanio kun fremdlanda kapitalo en Ĝjansuo. Sed en la jaro 2019 la nombro de dungitoj malmultiĝis al kvarono, kaj nun ni antaŭenpuŝas la planon translokiĝi en ĉirkaŭurbon.

Trans la muron de kulturo

Kvankam kun 500 miloj da loĝantoj, la urbo Kunŝano estis provinco en kamparo. En la jaro 1984 mi estis eksterlandano, unuafoje tranoktinta, en la invitejo Kunŝano.

La ĉambro havis ĝemelan liton kaj banejon, sed la tapiŝo ĉirkaŭ unutatama, sternita centre, estis tre malpura kun multaj brulsignoj de cigaredo, kaj en la bankuvo troviĝis kota varma akvo tiom ruĝbruniĝinta, ke oni ne povis vidi ĝian fundon. Unu tranokto kostis 15 juanojn (ĉirkaŭ 2700 enoj), sed eksterlandanoj estis devigitaj pagi per konvertebla papermono.

Sen povi ricevi ŝlosilon, nenie troviĝis privateco. Matene mi etendiĝis sur dorson kaj tutnude praktikis la Niŝi-manieran san-gimnastikon (*mi detale klarigos en la tria ĉapitro*). Kiam mi turnis la rigardon flanken, mi surpriziĝis pro iu, kiu staris. Estis virina servisto. Japanan striptizon ŝi ja senpage spektis.

Ĉar la kaldronego de la hotelo haltis je la 8-a ptm., post la bankedo ĉiam ne venis varma akvo. Mi petegis la servistinon porti de la manĝejo 10 potojn da varma akvo. Mi donacis al ŝi mil-enan papermonon kiel trinkmonon, sed ŝi ne prenis la japanan monbileton, post kiam ŝi kaj trarigardis filigranon kaj faris tian geston kvazaŭ foliumi ĝin fingre. Mi do montris papermonon de unu dolaro,

kaj ŝi tuj akceptis ĝin kun plezuro, dirante “Vi ja estas luksemulo. Ĉinoj lavas la korpon per nur unu pota da varma akvo!”

Kontraŭmoskitaĵo troviĝis en la ĉambro, sed mi ne povis endormiĝi pro la sufokiĝo de ĝia fumo. Tial, post la konstato, ke moskito pikis, mi frapmortigis po unu kaj poste enlitiĝis. Antaŭ 4~5 jaroj ankaŭ ĉi tiu hotelo estis ekipita per la moskita mato “Vape”.

Ĉar pro la influo de poliomjelito mi havis malvarmiĝon ĉe mia piedo, tial mi kutime kunportis elektrovarmigan litaĵon kaj transformilon, kiu ŝanĝas la tension, de 220 voltoj al 100 voltoj. Sed min ĝenis la elektra paneo en noktomezo. Ankaŭ la tuta urbo estis trafita de abrupta elektra paneo. Pro la manko de elektropovo, elektro estis liverita laŭtage al sep kvartaloj, kaj la tago de elektra paneo estis ripoza tago de Swany China.

Sur la strato, sinkinta en grizo, ĉiu ajn paŝis en popolvestaĵo, kaj virinoj neniom ŝminkis. Manĝaĵoj, sapoj, ŝtofoj, kaj eĉ alumetoj estis porciumataj; por aĉeti ilin necesis atestiloj. La loĝejoj en urbegoj havis la areon de 30 kvadratajn metrojn averaĝe, kaj necesejo kaj duŝejo estis komunaj (*en 2017, tio fariĝis 57 kvadrataj metroj kun necesejo*).

En matenmanĝo de la invetejo bongustaj estis rizkaĉo kaj *zhacai*. Troviĝis ankaŭ *qingcai*, subrostitaĵo de legomoj kaj fritvermiĉeloj. Aperis *pidan*, fermentaĵo de anasa ovo, envolvita per argilo. Al mi ne plaĉis la fortega putroodoro.

“Bonvenon! Bonvenon!” min akceptis ajnaj restoracioj surstrataj kaj, forbalainte manĝrubon per karbonigre malpuriĝinta viŝtuko, servistino diris, “Nu, kion vi volas?” Ĉiufoje mi manĝis pilafon kun la prezo de 1.5 juano (ĉirkaŭ 50 enoj). Estis tre bonguste!

Ĉe la salono sur la unua etaĝo de la invitejo mi rigardis televidan dramon “Oŝin”, elsendata de NHK (*Japana Dissenda Korporacio*). Kobajaŝi Ayako, tiam 10-jaraĝa infanrolulo, malsupreniris la riveron Mogami sur flosa. Siatempe ankoraŭ ne disvastiĝis televidilo, kaj la salono fariĝis plenplena de pli ol 100 homoj loĝantaj najbare. Mi multe timis, ĉu la unua etaĝo ne disfalus. “Oŝin” eĉ en Ĉinio tre furoris kaj, laŭdire, en Pekino la plej alta spektokvanto atingis 76 procentojn.

“Batalo de Sekigahara”

Ni sendis de Japanio 5 personojn, nome, Micunaka Tooru, ĝenerala administranto de financaj aferoj k.a. kaj en februaro, 1985, ni funkciigis la fabrikon en la urbo Kunŝano.

Sep monatojn poste, mi ricevis la raporton, “ĉirkaŭ 100 homoj siestas sen labori.” Kiam mi rapidege vizitis, dekoj da homoj siestis sur la materialoj kaj, min rigardante, prenis sintenon: kiu ĉi tiu estas? Mi tuj interparolis kun s-ro Xuan Binglong, ĉefo de la Eksploatita Kvartalo, sed li asertadis, ke tute ne eblas

ilia maldungo. “En la kontrakto estas registrite, ke eblas maldungo,” mi postulis al li. Mi puŝis kaj tiris, sed ne iris facile.



Ĉe la inaŭguro de Swany China, de maldekstre: S-ro Micunaka, S-ro Xuan, S-ro Xu (interpretisto), la aŭtoro

Estis finfina rimedo — mi petis helpon al mia pli juna frato Asao, administranta direktoro, kiu tiam okupiĝis en la ĉefoficejo, ke dum iom da tempo li restu en Ĉinio. Kvankam suferplena tasko, li konsentis por eviti la bankroton.

La frato tuj komencis gardostari sur unumetre alta loko en la fabriko, amasiginte tabulpletojn unu sur alia. Li sukcesis iel bari ilian sieston, sed ili ne laboris diligente, rigardante ĉirkaŭon malkviete. Ĉiuj dungitoj venis bicikle; ili amase aliris al la biciklejo. Ĉar ili ĉiuj maldiligente lasis siajn biciklojn ĉe la enirejo, tiel ke la interno estis malplena kaj ĉiam ĉe la enirejo okazis stagno. Mia frato ŝlosis la biciklojn lasitajn ĉe la enirejo kaj revenis al sia loĝejo. Ili ne povis ne kapitulaci, ĉar ili ne povis hejmenreveni.

En la sekva mateno ili komencis lasi la biciklojn bonorde interne.

La labora rezulto troviĝis en la plej malbona stato. Mi ĉiumonate vizitis Ĉinion kaj interkonsiliĝis kun Xuan, prezidanto de la Ekspluata Kvartalo, sed ne progresis. Baldaŭ venis la jarfino kaj aperis la bilanco kun granda deficino. En januaro okazis la unua administracia kunveno, kaj mi defiis kun s-ro Micunaka, ĝenerala administranto de financaj aferoj, al la “batalo de Sekigahara”, la decida batalo. La rivaloj estis la prezidanto de la Ekspluata Kvartalo kaj aliaj ĉirkaŭ 10 homoj.

Mia postulo estis jena: “Nun, dumtempe, konfidi la administron al la japana flanko” “agnoski laŭlaboran salajron” “maldungi 100 personojn, kiuj siestis”. Koncerne la antaŭajn du aferojn, ni metis punkton post du tagoj, sed koncerne la maldungon, en la punkto de la dua tago ni suriris sur rifon.

“Ankaŭ en Ĉinio troviĝas komuna saĝo. Maldungo? Ne, tute ne povas esti!” skoldis min prezidanto Xuan, frapante la tablon. “Ĉu vi ne scias, ke la komuna saĝo de Ĉinio estas absurdaĵo de la mondo!” mi respondis al li per skoldo. Ĉiuj eksilentis. Mi ĝisfunde vundis la honoron, kion plej malŝatis ĉinoj. “Dum kelka tempo ni interkonsiliĝu en alia ĉambro!” ili eliris kolere.

Post kelkaj horoj rekomenciĝis la kunsido. “La postulo de vi, prezidanto, estas maldungi 100 homojn, sed, ĉu vi ne povas ŝanĝi al 50,” ili montris

la intercedan proponon. Mi rifuzis. “Neniom ni bezonas tiajn pigrajn dungitojn,” mi diris. Post la apero de multaj opinioj ili proponis al ni, “Prenante do mezon inter 50 homoj kaj 100 homoj, ni decidu maldungi 75 homojn. Kiel vi opinias?” Mi multe atendis tiujn vortojn.

Sed, eĉ se pasis unu semajno, ne plialtiĝis la rendimento. Malgraŭ tio, mi paciencis kaj toleris. En la dua semajno kelkaj homoj komencis labori tre fervore. Ili sciis, ke ilia salajro plialtiĝos je 20 aŭ 30 procentoj pro la laŭlabora salajro, kiun mi proponis. Baldaŭ dungitoj lavange komencis labori, kaj kvankam la laborkomenco estis difinita je la 8-a matene, plimultaj venis al la fabriko je la 7-a. Krom tio, ili komencis kuri eĉ al necesejo, kaj du jarojn poste, ili malaperigis la deficiton. Estis certe, ke ni transiris la unuan grandan obstaklon, rompante la muron de la trenata totalisma reĝimo.

Sed sur la domo de la prezidanto Xuan iu petolskribis per freŝa sango “Mi mortigos vin”.

** la batalo de Sekigahara: ĉirkaŭ la loko de la nuna urbeto Sekigahara, Fuŭa-gun, Gubernio Gifu, kie en 1600 okazis la plej granda interna batalo de Japanio, inter la orienta armeo kaj la okcidenta. Tokugaŭa Ieyasu, la ĉefo de la orienta, venkis, kaj fondis la ŝogunan registaron, kiu daŭris ĝis la jaro 1868, nome, 260 jaroj.*

Notoj de plijuna frato Asao

Mi volas prezenti notojn de Asao, skribitaj pri la tiutempa Kunŝano.

“Kvankam por mi estis la unuafoja Ĉinio, mi estis malinklina al la tasko. Mi ne povosciis la lingvon, nek havis memfidon. Mi ne povos neglekti s-ron Micunaka, la ĝeneralan administranton; se mi farus tion, li eksigus. Klara estis tio, ke el tri kompanioj de Koreio unu estas jam fermita kaj aliaj du havas deficiton, t.e. se ni ne sukcesos en Ĉinio, Swany bankrotos.

En la nove konstruita pensiono por japanoj okazis: kiam mi dormis, ratoj paŝis sur mia vizaĝo, kaj kiam mi ellitiĝis, ĉirkaŭ la litaĵo someraj insektoj piedpremitaj kuŝis kiel nigraj sezamoj. Eĉ se mi fermis retpordeton kaj aranĝis moskitkurtenon, ili envenis tra la spacetoj. Sur bankuva surfaco troviĝis cementpecoj, ŝajne algluitaj dum konstruado, kaj de ili la haŭto de mia dorso havis vundojn kvazaŭ disŝiritaj.

La kompanion ĉiutage okupis striko kaj neniu jam sekvis miajn ordonojn. Kiam mi instrukiis “vin turnu dekstren!”, ili sin turnis maldekstren, kaj volvinte la ŝtofon por gantoj ĉirkaŭ sia korpo, ili siestis. Eĉ se mi riproĉis, ili nur malrapide leviĝis. De la 3-a kaj duono ptm. ili komencis la balaadon de la laborejo kaj gaje bruante atendis la sonoriltintadon, kiu anoncis la laborfinon.

S-ro Micunaka estas mia posteulo en la universitato Ŭaseda, krome kun li mi havas longan amikecon ekde la tempo de Koreio. Do, eĉ se mi estos malŝatata, nenia problemo, se mi revenos al Japanio. Sekve, mi pensis, ke mi estu malŝatata ĝisfunde, kaj mi laŭeble klopodis por tio.

En dimanĉo mi proponis al s-ro Tanaka Takahiro kaj s-ro Mitani Hidenobu iri al fiŝkaptado, kaj bicikle ni iris, transirante kanalon. Tie, kien ni atingis trans la kanalon, s-ino Zhang Fengyi, oficistino, rekomendis al ni havi tagmanĝon; neeviteble ni akceptis ŝian proponon. Malgraŭ tio, ke la rizo estis kuirita per la malpura akvo de la kanalo, ni manĝis kuraĝe. Sed trafis nin nenia problemo. Ĉe la reveno ŝi donacis al ni tufon da legomoj kaj ses ovojn.

Ŝia patrino estis 45-jaraĝa, ankoraŭ juna kaj la trajtoj estis bonaj, tamen la vizaĝkoloro estis vere nigra kaj faltoriĉa. Ĉu tiom maljunigas agrolaboro? Eĉ larmoj venis al la okuloj, kiam mi pensis pri la severa situacio de kamparanoj.

La ŝipa veturprezo sur la kanalo, kune kun biciklo, kostis 6 fenojn (ĉirkaŭ 2 enoj). 500 gramoj da rizo kostis 1.5 ĵiaojn (ĉirkaŭ 7 enoj), biciklo kostis 200 juanojn (ĉirkaŭ 8,000 enoj) kaj TV kostis 100 juanojn. Terproduktaĵoj estis malkaraj, kaj industriaĵoj produktaĵoj estis karaj.”

Breĉon en la iama Manĉurio

Post la fondo de Swany China, ĉe ĉiu vizito mi estis invitita de Wu Kequan, la estro de la Gubernio Kunŝano. “Bonvolu prezenti al mi diplomiton, kiu finis la japanlingvan fakon de universitato,” mi petadis al li, sed la afero ne progresis, malgraŭ lia nur favora respondo. S-ro Micunaka, ĝenerala administranto, ricevis specialan trejnadon de ĉina lingvo en Berlitz School, sed por ke li povu plenumi sufiĉan interkomunikiĝadon, ankoraŭ multe mankis.

Tri jarojn poste, dum forestis la guberniestro, interpretisto diris al mi: “koncerne diplomiton de universitato, eĉ inter guberniaj funkciuloj troviĝas nur 6 homoj, t.e. unu procento.” Krom tio, mi eltiris de li tian informon, ke en alia kvartalo oni sukcesis dungi diplomiton de japanlingva fako. Mi tuj rekte iris al tiu loko, nome, al la urbo Dongguan en la nordo de Honkongo.

Kiam mi vizitis la fabrikojn de ŝtrumpoj, moldoj, kaj ludiloj, en ĉiu kompanio troviĝis la funkciuloj, kiuj povis paroli japanan lingvon. “Se oni varbos en la tutlandaj gazetoj, el tri provincoj en Nord-oriento multaj venos,” mi informiĝis de prezidanto. Laŭdire, venos varbitoj, skuataj en vagonaro dum unu semajno. Kvankam kvar universitatoj en la urbo Harbino, en la provinco Heilongĝiango, havis la fakon de la japana lingvo, ne troviĝis japanaj

entreprenoj.

Surprizita de la favora informaĵo, mi tuj celis al la flughaveno. Mi aliĝis al la longa vico por aĉeti la iran bileton, kaj flugis al Harbino en la iama Manĉurio tra Ŝanhajo. Ĉe la flughaveno troviĝis nur kvar taksioj. Venkinte dekojn da rivaloj en la aŭkcio, mi dungis ŝoforon per 350 juanoj (ĉirkaŭ 14,000 enoj) por tago. Tra la planka truo de la aŭtaĉo mi povis vidi la teron, kaj mi mane tiradis la krake bruantan pordon.

Mi rondvizitis senrezerve la universitatojn en la regiono: Politekniko de Harbino, Medicina Universitato, Universitato de Scienc-tekniko, kaj Instruista Universitato. Tiuj kvar lernejoj surpriziĝis: “La laborpropono de Japanio estas la unuafoja.” En la ĉambro por instruistoj mi montris la laborkondiĉojn: 500 juanoj da salajro, livero de loĝejo k.a. Ĉe ĉiuj lernejoj la dekano pri japana lingvo sin ŝovis antaŭen pro interesiĝo. Ili flustris ĉe mia orelo tiel mallaŭte, ke ilin neniu aŭdu: “Ankaŭ studentoj estas bonaj, sed, ĉu mi ne povus?”

Mi invitis al manĝo s-ron Jin Dehua, dekano de la Politekniko de Harbino, kaj ĝentile rifuzis lian proponon, “ĉar nepre necesas tri-jara lernotempo en la aktuala fabrika laborejo.” Sed, tre dankinde, li bonvolis akompani min ĝis la gazeta eldonejo Heilongĝiang, kaj helpis min, kiam mi liveris al la eldonejo la dunganoncon en la formato B5, tradukita en la ĉinan lingvon.

La efiko estis grandega: ene de du monatoj 55 homoj venis al la Swany China responde al la laborpropono. Ni decidis daton kaj horon, kaj kiel la lokon por intervidiĝi destinis la internacian hotelon de Harbino.

Rezulte de la intervidiĝo, ni alprenis s-ron Gao Zhangfeng de la Instruista Universitato, kapablulo de kvar lingvoj, ĉina, japana, korea kaj angla. Ni konfidis al s-ro Gao la enketon de antecedentoj de la aliaj 21 partoprenantoj. Ĉirkaŭ du monatojn poste, atingis grava raporto, kiun s-ro Gao akiris de amikoj kaj konatoj de la partoprenantoj.

Tiu loko estis la iama Manĉurio, kie militfine, sennombraj kolonianoj el Japanio daŭrigis mortan fuĝon kaj sinsekve falis, kaj kiu naskis la tragedion tielnomatan “georfoj restigitaj en Ĉinio”. Kion do rakontas tiu “studvervo pri la japana lingvo”, eĉ nun restanta sur la tero de iama japana invado, neniam forgesenda por ni japanoj?

Fidante la raporton mi revizitis la lokon en marto. Mi vizitis la apartamenton de s-ro Huang Yubin en la Politekniko de Harbino, ĉirkaŭpasante glaciigitajn rubmontetojn. Laŭdire, tie en la apartamento loĝantoj lavas la korpon, tiamaniere ke ili aldonas malvarman akvon al unu kruĉo da varmakvo, uzante la bankuvon en salono, sin mergeblan apenaŭ ĝis talio.

Koncerne s-ron Zhang Taifu en la Instruista Universitato, anstataŭ li vizitis lia edzino. La pordo de lia loĝejo havis 15-centimetran dikecon kaj por

ŝirmi de travento oni ŝtopis ĝian spacon per tuko. Mi komprenis, ke nia propono liveri loĝejojn estis ilia kialo por partopreni en la dung-ekzameno de nia kompanio.

Kaj, enfermite sep personojn en hotelĉambbron en la malvarmega regiono kun 30 minusaj gradoj, ni igis ilin diskuti inter si kaj daŭrigis la ekzamenon por taksi ilian personecon. Rezulte de tio, ni decidis dungi jenajn kvin personojn, inkluzive de la unuan s-ron Gao, nome, s-ron Zhang Taifu, kies edzino venis anstataŭ sia edzo, s-ron Kong Shitai en la Universitato de Scienc-tekniko, s-ron Jin Dehua en la Instruista Universitato de Mudanjiang, s-ron Huang Yubin en la Universitato de Scienc-tekniko, kaj lian edzinon en la Instruista Universitato.

Ili ĉiuj, atingintaj la stacion Kunŝano, kie troviĝis Swany China, petegis nin, “Bonvolu permesi nin tuj kuŝiĝi”. Laŭdire, pro la 40-hora vojaĝo sur la malmola seĝo de la duaklasa vagono ilia sanga cirkulado malboniĝis kaj ili jam ne povis teni la sidpozon.

Sed ilia ofcado ne daŭris longe. Poste s-ro Huang enoficiĝis kiel ĝenerala administranto de Swany Ĉina, kaj tamen, 12 jarojn poste, li transloĝiĝis kun siaj familianoj al Kanado. Boniĝis la komunikapablo de la universitataj diplomitoj el la iama Manĉurio, sed ili ĉiuj ekŝiĝis kaj nur povis alporti frukton kiel stafetan funkcion. Nuntempe lokaj kompanianoj, edukitaj, okupas gravajn postenojn.

Daŭris la furoro, investa al Ĉinio, kaj la kandidatoj al estrarano sinsekve transiris al la japanaj entreprenoj de etpova elektro k.a. Povis esti la epoka fluo aŭ la maltrankvilo pri la estonteco de sezonaj artikloj — aŭ ili havis la maltrankvilon pri mia administra kapablo, ĉu?

Fokuso en Ĉinio

En 1988, kiam Swany China komencis iri glate, mi vizitis kun s-ro Gao, forta en kvar lingvoj, la registaron de la subprefektujo Jiashan en la provinco Ĝeĝjango, okcidenta je unu horo kaj duono per aŭto. Mi havis intencon kompari la investan kondiĉon kun tiu de la provinco Ĝjangsuo. Multe bonvenigita, ni atingis la rezulton de la komuna entrepreno kun la loka gantfabriko, kaj ni fondis la gant-kompanion Swany Great Wall (GW), por kiu ni (la japana) investis 1,150 milojn da dolaroj (egalaj je ĉirkaŭ 130 milionoj da enoj), kiom okupis 51 procentojn da kapitalo.

S-ro Chu Byong Su, deveninta de la korea fabriko, enoficiĝis kiel la ĝenerala administranto. Nuntempa salajro estas averaĝe 4,200 juanoj (60,000 enoj) kaj laŭrendimenta salajro okupos 53 procentojn. La kompanianoj, kiuj troviĝis 400, nuntempe malmultiĝis ĝis duono; ŝtofaj kaj ledaj fabrikaĵoj estas produktataj 2.1 milionoj da paroj jare, kaj

daŭre gajnas altan profiton, t.e. proksimume 10 procentojn.

Nun mi resumu la GW-raporton de s-ro Hajase Eiji, fakestro, en la jaro 2018:

“En la industria mondo nun progresas la ciferecigo de send-rego, faden-streĉo kaj prem-reguligo fare de la Kudromaŝino Ĵuuki k.a. Sed ĉe GW eĉ nun oni uzas la ordinaran stebmaŝinon, tamen la ordinara maŝino, superante la ciferecan, rapidege finkudras la malgrandajn pecojn, tiel ke la maŝino kaj la maŝinisto estas unu. Rigardanta la staton, mi ege emociiĝis.”

Memore al la fondiĝo, mi eldonis la verkon “Esplorado de Vivĝojo” en la ĉina lingvo je 2,000 ekzempleroj.

En la sama jaro 1988, du kilometrojn sude de Swany China en la urbo Kunŝano, ni luis la terenon kun 10 mil kvadrataj metroj, kaj la japana flanko sola fondis la kompanion “Swany Glove” per la kapitalo je 1.35 milionoj da dolaroj. S-ro Kim Hyang Jun en korea periodo enoficiĝis kiel ĝenerala administranto. Komence laboris 400 kompanianoj, tamen tio duoniĝis en la jaro 2010. Ŝtofaĵoj, ledaj gantoj kaj gantoj por golfludo estis fabrikataj, tamen fermiĝis la kompanio post plenumo de granda rolo.

En 1989, ni fondis la kompanion Swany Taicang (TG) komunan kun loka kompanio, en la urbo Taicang, en la provinco Ĝjansuo. S-ro Shu Jinzhu enoficiĝis kiel ĝenerala administranto. Poste, ni

aĉetis la kapitalon de la ĉina flanko, kaj sukcesis memstariĝi kiel sola investinto kun 100-procenta kapitalo, sed nun laboristoj malmultiĝis de 320 ĝis 170 kaj post kvin jaroj, ĝis 130 laŭ nia antaŭkalkulo. La artikloj estos produktitaj je 1.3 milionoj da paroj.

Ĉe TG alta estis la proporcio de alifirma fabrikado, kaj la leda elekto kaj eĉ la gantoj el ledrubo estis farataj en la propraj domoj de kompanianoj. Kvankam ni defiis la limon de “malmulta produkto de multspecaj artikloj”, ni malfacile luktadis por gajni la profiton.

Ĉinio rapide kreskanta al la ekonomie potenca lando

Nun mi prezentu la raporton, kiu sciigas la nunan situacion de Ĉinio.

Unue el la novaĵo de Swany, farita de s-ro Tu Zhengdong, la ĝenerala administranto de Swany China.

“En 2019, dimanĉe mia amiko venis kun sia edzino kaj min invitis, ‘Ĉu vi ne iros kun ni al Pekino por festi la datrevenon de la nacia fondiĝo’. Mi rifuzis, dirante ke pasintjare mi iris por vojaĝo de la kompanio. ‘Do, nur ni!’ li diris, kaj tie tuj rezervis per inteligenta telefono la sidlokon de la kuglotrajno kaj hotelon kun kvar tranoktoj, kaj pagis 4,800 juanoj (72,000 enoj).

Ĉimatene, je la 8-a kaj duono, mia edzino mendis salon kaj lakton en la superbazaro Darunhua kaj per Alipay pagis 53 juanojn (ĉirkaŭ 800 enoj), kaj la aĵoj atingis je la 10-a kaj duono. Kaj, ĉe la laŭreta koresponda vendejo Taobao mi mendis marmiton kun la kosto 388 juanoj (ĉirkaŭ 6,000 enoj) kaj ĝi atingis en la sekva tago. Por la aĉetaĵo kun la prezo je pli ol 39 juanoj (ĉirkaŭ 600 enoj) estas liberigita la sendkosto. Per inteligenta telefono oni povas pagi manĝaĵojn, elektron kaj eĉ taksion.

En malnova tempo, ĝis Ŝanhajo, 65 kilometrojn orienta disde Kunŝano, oni bezonis unu horon per vagonaro, sed nun nur 18 minutojn per la kuglotrajno. Multaj ŝanhajanoj, transloĝiĝintaj al la urbo Kunŝano, ĉiutage vizitadas sian laborejon en Ŝanhajo.

Pli ol 90 procentoj el ili loĝas en novaj apartamentoj kaj posedas plurajn nemoveblaĵojn. De la unua jaro de elementa lernejo ĝis la tria jaro de mezlernejo la elspezo por studo estas liberigita, kaj, rilate al la elspezo por kuracado, asekura kompanio sin ŝarĝas per 80 procentoj por laboristoj kaj 90 procentoj por eksigitoj.

Tiamaniere, 40 jarojn post la politiko 'reformo kaj malfermo' Ĉinio faris rapidan progreson; ĝi alproksimiĝas al la ekonomie potencaj landoj kiel Japanio kaj Usono, kaj la progreso altiras la atenton de la mondo. Ankoraŭ ĝi troviĝas sur la vojo al la progreso, sed la estonta Ĉinio fariĝos granda regno

de ekonomio kaj reputacie kaj reale.

Direkto de manifestacio kontraŭ Japanio

La sekva estas iomete malnova, t.e. el la novaĵo Swany de s-ro Micunaka, ĝenerala administranto, en la jaro 2012, kiam okazis konflikteto inter Japanio kaj Ĉinio pro la disputo pri la Senkaku-insuloj.

“La 15-an de sept. apud la restoracio Aĵisato, de ni ofte vizitata, en la centro de la urbo Kunŝano, eksplodis senprecedenca afero, ke junuloj, kiuj fariĝis ribelantoj, rompadis unu post alia ŝildojn de japanaj drinkejo, restoracio, vermiĉelejo k.a. kaj eĉ furiozis penetrante en konstruaĵojn. Laŭdire, hisante ĉe enirejo ĉinan nacian flagon laŭ momenta sprito de la mastrino de Aĵisato, tieaj restoracioj aŭ butikoj povis sin savi el la danĝero.

La japanaj butikoj kaj restoracioj en la urbo ĉiuj estis devigitaj interrompi la laboron, kaj la polico ordonis al japanoj atendi en sia propra domo; do, troveblis neniu alia rimedo ol observi la situacion senage, sin detenante de ekstereniro kaj eĉ de spiro. En najbara vendejo de Toyota kelkaj aŭtoj ekspoziciataj estis batitaj tiel, ke ili havis tie kaj tie sur la korpo kavetojn, kaj estis renversitaj. Kompaniaj aŭtoj de japanaj entreprenoj hisas ĉinan naciflagon, kaj kiel japano, kiu rilatis al Ĉinio

dum 30 jaroj, mia koro estas plena je sentimento kompleksa kaj bedaŭra.

La kaŭzo estis, ke s-ro Iŝihara Ŝintaroo, prefekto de la gubernio Tokio, anoncis, ke la gubernio Tokio aĉetos la pridisputatan insularon. Poste, li gardas silenton, kaj mi volas demandi, kiel li nun sentas pri la afero. De la 13-a de septembro ĉe la impostejo de Kunŝano aperis surskribaĵo “Ne estas permesite eniri japanoj kaj hundoj”. Sed, mi deziras, ke ankaŭ Ĉinio faru trankvilan respondon kiel plenaĝulo.

Malfermo de ĉina merkato

En 1993, kune kun s-ro Gao, kapabla paroli kvar lingvojn, mi rondvizitis Pekinon, Ŝenjangon, Ĉangĉunon kaj Harbinon.

En Pekino mi unuafoje traktis komercan aferon kun virina importisto en la vendejo de gantoj en la Ĉiovendejo Beijing sur la strato Wangfujing. La alia partio ŝajne interesiĝis pri la artikloj, vira kaj virina, el ledoj ŝafa kaj porka, kaj pri la altnivela mufganto por infano. “Ni unuafoje akceptas la ofertan el Japanio. Dankon pro via klopodo!” ŝi diris, kaj, pro tio ke la artikloj el Japanio altiris ŝian atenton, ni ricevis la mendon de ĉirkaŭ 800 paroj. En Pekino ni rondvizitis ses vendejojn, ekzemple, Butikumcentro Xirong, Butikumcentro Baode ktp.

Laŭ la forto de komercaĵo estis malfermita la

konto; de la duono el 21 magazenegoj en kvar urboj dum unusemajna vizitado ni ricevis la mendon de 12 mil paroj. La malneta profito estis malalta: 30 procentoj de vendprezo (40~60 procentoj en la mondo). Problemo tamen estis tio, ke Ĉinio ofte ne pagas.

Al Ŝenjango en la provinco Ljaŭningo de Pekino ni transmoviĝis per vagonaro. Ni aĉetis biletojn atendante unu horon kaj duonon en homa vico; La vagonaro, kiu ekiras je la 18-a, estis plenplena kaj oni ne povis stari eĉ en necesejo. Mi igis konduktorinon enmanigi 10 juanojn (160 enoj). “Nur ĝis Ŝenjango,” ŝi diris. Tiel mi uzis ŝian liton kaj atingis je la 23-a horo. Ni vizitis kvin vendejojn, nome, “Shenyang Shangyecheng”, forta je altnivelaj markoj, aŭ “Xiwu Baihuo” (devena de Honkongo), reputacia per bona servo. Eĉ nun en gravaj lokoj estas utiligataj la ŝtataj oficejoj kaj komercaj instalaĵoj de la periodo de la japana regado; la tuta urbo restas kiel altvalora historia heredaĵo.

Sekva estas la urbo Ĉangĉuno, en la provinco Jilinio. S-ro Gao trude sin glitigis en longan vicon antaŭ biletvendejo kaj apenaŭ eliris kun biletoj enmane. Sed, kiam ni envagoniĝis, niaj estis biletoj sen sidloko kaj krome la vagono estis plenplena je pasaĝeroj. Fendante homojn ni eniris en la unuaklasan vagonon. “Ni aĉetos la bileton per triobla prezo. Bonvolu cedi la sidlokon al japana handikapulo,” petegis s-ro Gao al pasaĝeroj, kaj de la

kvina persono ni povis akiri la bileton. Tiel mi povis sidiĝi, kaj en la celita loko ni vizitis kvin butikojn, nome, Baihuo Dalou, Guoji Maoyi k.a.

La lasta estas Harbino, 300 kilometrojn norda de Ĉangĉuno, kaj ĉi tiu vizito en Harbino estis mia kvarfoja. S-ro Gao luktoprete sin glitigis en grupon kaj rezervis seĝon. Ni rondvizitis kvin butikojn, nome, Hulian Shangsha, Qiulin Baihuodian k.a. Ili estis magazenoj, tre prosperantaj siatempe, sed lastatempe, mi aŭdas, same kiel en Pekino, ili falas en malfacilegan situacion, pro la potenco de koresponda vendo de “Taobao” aŭ “Xiaomi”.

La moderna strato far carisma Rusio, ŝtona pavimo, pinta turo de la rusa ortodoksa preĝejo, kaj akacia aleo — jen estas urbo, esprimita de vizitantoj kiel “Parizo de Oriento”. Se diri en la rilato kun Japanio, Ito Hirobumi, iama japana ĉefministro, estis murdita ĉe la stacio Harbino, kaj ĉi tiu ankaŭ estis la loko, kie okazis kruela homkorpa eksperimentado fare de la trupo 731 dum la milito.

Nu, ĉi tie mi estis ĉagrenata de la stacia manĝaĵo. Ĝi kostis 2.5 juanojn (ĉirkaŭ 40 enoj) kaj tamen, suspektinda estis la stufaĵo de dolĉa kapsiko, ĉar ĝi estis acideta. Sur rizo troviĝis ĉirkaŭ 20 eroj de arakido kaj sekloliga pluvoro disŝutita. Mi timeme manĝis sentante sableron surlange. Siatempe, ŝajne, ankoraŭ ne troviĝis senbranigilo, kapabla forfrapi ŝtonetojn, aperis tri ŝtonetoj. S-ro Tanaka Takahiro, kiun mi sendis al Swany China, laŭdire,

rompis antaŭajn dentojn pro la ŝtonetoj.

Rezulte, la malneta profito de detalvendejo, kiel mi jam menciis, estis duono de okcidentaj landoj, kaj krome, estis komisi-sistema; do oni povas diri, ke ĝi estas sufiĉe severa merkato. Pro tio ke la elspezo por funkciuloj estis nur unu kvinono de Japanio, ni ne povis venki la ĉinajn fabrikantojn, krome troviĝis tia situacio, ke la kolektado estas tre malfacila. Post la dufojaj rondiroj ni decidis ĉesi la enlandan vendadon en Ĉinio.

Disvolvo al Sudorienta Azio

En la nuna prosperanta Ĉinio malfacile estas teni dungitojn, tial en la jaro 2011, ni fondis la kompanion “Swany Cambodia” en la industria parko Tai Seng Bavet de Kamboĝo, distanca je du horoj per aŭto for de la urbo Hoĉimino de Vjetnamio. Ni investis al la kompanio tri milionojn da dolaroj (*ĉirkaŭ 300 milionoj da enoj*), kaj komencis produkti gantojn, ŝtofajn k.a. per laboroj de tri cent personoj.

Ni pagas al la dungitoj la salajrojn, konsistantajn el 59 procentoj da rendimentaj, 192 dolaroj (*ĉirkaŭ 20 mil enoj*) kiel mezajn enspezojn monatajn, plus pagojn por kromtempaj laboroj, por kompleta asidueco, kaj trafikokostoj, ktp. Tio estas obstaklo, ke la dungitoj, kiuj gajnas la rendimentajn, pli multe ol fiksaĵajn salajrojn, troviĝas nur 10 procentoj, dum

troviĝas 90 procentoj en la ĉinaj dungitoj, La unua prezidanto de la kompanio estis s-ro Imataki Sakuĵi, kaj s-ro Okudai Jasuŝi transprenis tiun postenon.

Kamboĝo estas ĉirkaŭata de Tajlando okcidente, Vjetnamio oriente, kaj Laoso norde. En la areo, egala je ĉirkaŭ 80 procentoj da japana ĉefinsulo, loĝas 15 milionoj da homoj, kaj parolata estas ĥmera lingvo, onidire la plej malfacila en la mondo.

Tio ke ni dissendis kamionon al ĉiu najbara kvartalo por tie loĝantaj dungitoj, la malfacila lingvo, la produktiveco malalta je 20 procentoj, kompare kun aliaj landoj, la provizado de materialoj tra Vjetnamio, kaj la tempo kaj kosto necesaj por transmoviĝo ktp. — pro la kaŭzoj jam menciitaj ni bezonis ok jarojn por gajni la ekvilibron de enspezoj kaj elspezoj. Sed estas hazarda feliĉo, ke la produktiveco plialtiĝas malgraŭ tiu ĉi kronviroza katastrofo.

Eĉ se nur la sekcio, kies laboro malfruiĝas, kromlaboru por la plibonigo de la stato, estas malfacile, ĉar necesas porti unu kamionon da tutaj dungitoj, loĝantaj en proksimaj kvartaloj. Prononcado kaj gramatiko de la lingvo estas tiom malfacilaj, ke eĉ la senditaj rezidantoj ne povas ellerni ĝin. Tial nun troviĝas multaj kompanioj, kiuj igas lokajn dungitojn lerni la japanan lingvon en sia ĉefoficejo. Koncerne ankaŭ la nombrovortojn, oni kalkulas de 1 ĝis 5 en sama maniero kiel ĉe ni, sed por 6 oni kalkulas 5+1, por 7 5+2, kaj tiel plu; ĉi tiu

maniero nin multe konfuzas. Krome, 23 festotagoj en unu jaro malhelpas la produktivecon.

Portempe, pro la malsato kaj torturo kaŭzitaj de la kruelaj politikoj de la reĝimo de Pol Pot, viktimiĝis ĉirkaŭ tri milionoj da homoj. En poste veninta paca periodo, kvankam kun handikapo, kamboĝanoj klopodas celi al ekonomia revivigo kaj sendependeco.

Dume, ni investis 500 mil dolarojn al la vjetnama fabriko de la kompanio Well Mart en Tajvano. Tie ni nun produktas gantojn el ŝtofo, sinteza ledo, kaj el vera ledo por skio. La nombro de dungitoj estas 430 kaj iliaj monataj enspezoj estas averaĝe 300 dolaroj (*ĉirkaŭ 30,000 enoj*), kaj al la enspezoj estas alkalkulataj la rendimentaj, proporciaj al la laboroj. La festotagoj estas malmultaj: kvin tagoj en unu jaro krom novjaraj ferioj laŭ la luna kalendaro, kaj la homoj estas manlertaj kaj diligentaj. Pro tio, la kvalito de iliaj produktaĵoj estas alta. Ni sendis al la fabriko s-ron Okumura Kenĵi, vicdirektoron provizoran, kaj li nun okupiĝas je la administrado de produktado kaj de kvalito.

Ni subkontrakte produktas ankaŭ en Indonezio, kie abunde troviĝas junaj laboristoj kaj de tie al Japanio ni povas transporti produktaĵojn en ne pli ol du semajnoj, tiamaniere ni fabrikas gantojn por golfo, por batado de pilkoludo, por fiŝkaptado kaj por skiado.

6. Trarompu, trarompu!

Lasu al junuloj por igi ilin kreski

Ni sendis s-ron Micunaka Tooru, kiu diplomiĝis ĉe Universitato Ŭaseda en 1979, al Swany Korea dum tri jaroj kaj duono kiel kandidato de estrarano, kaj poste ni sendis lin al la trejna institucio por talentuloj de Fujitsu "JAIMS" en Havajo dum duonjaro.

Poste, 27-jaraĝa li enoficiĝis kiel la unua ĝenerala direktoro de Swany China. Legantoj, vi jam bone vidas, kiel klopode li laboris, rigardante la nunan prosperon de Swany China. Por gvidi grandskalan familion de 400 laboristoj lia sperto trakti malfacilajn situaciojn estis nekalkuleble valora.

En 1988, mi establis la firmaon "Swany GW" en la subprefektujo Jiashan, Provinco Ĝeĝjango, proksime de Ŝanhajo. La sekvantan jaron, s-ro Micunaka, ĝenerala direktoro, negocis kun la urbaj oficistoj de Kunŝano kaj fondis 100-procente japan-posedatan firmaon "Swany Glove", la unua en la provinco. La firmao naskiĝis nur per mia subskribo sur kontrakto. En la sekva jaro 1990, ni establis la

kompanion "Swany Taicang" en la urbo Taicang, Provinco Jianguo, apud Ŝanhajo, kaj s-ro Micunaka subskribis anstataŭ mi.

Li direktis la materialojn, dungitojn kaj komercan administradon de kvar ĉinaj kompanioj, kaj poste li rezidis en Kamboĝo ekde 2015.

S-ro Chu Byong Su akiris la postenon de la ĝenerala direktoro de "Swany GW", kiam li estis 35-jara, kaj s-ro Shu Jinzhu, 33-jara, akiris la postenon de ĝenerala direktoro de "Swany Taicang". Ĉe Swany America s-ro Hasegaŭa Isamu, 27-jaraĝa, akiris la postenon de prezidanto.

Tiamaniere junuloj respondecis pri administrado de niaj filaj kompanioj, kio neniam okazus en ordinaraj kompanioj. Tio aliflanke tamen invitas riskon, sed mi komencis pensi, ke la junuloj, kiuj respondecas pri posteno, povas posedi la homan totalan potencon.

Rezulte, Swany sukcesis eduki talentulojn, dungante junulojn; se diri la veron, troviĝis neniu krom junuloj.

Posteuloj

En 1992, mia plej juna filino Jasuko vizitis min kun sia amato. Li estas s-ro Itano Cukasa, kun kiu ŝi konatiĝis ĉe la kompanio Naka Ŝooĵi" en Takamacu, kie ŝi laboris. Opiniante ke eĉ gepatroj ne rajtas ĝeni

amon de gefloj, mi kaj Yoshiko klinis la kapojn kun la vortoj “Bonvolu bone gvidi ŝin, ni petas”.

Ĉe la kompanio Naka Ŝooji li laboris koncentre por akiri scion pri kimono, kaj post pluraj jaroj li akumulis la vendospertojn. Laŭ li, li lernis la gravecon de la vortoj de Ihara Saikaku, “kalkulo, inĝenio, kaj finaranĝo”, kaj ke aldone al ili same grava estas “karaktero”.

Post tio, mi renkontis lin plurfoje kaj sentis, ke li entuziasmas pri komerco kaj havas precizan komprenon pri la merkato, do mi invitis lin aliĝi al Swany kiel kandidato por heredanto. En 1993 li aliĝis al Swany China, en la sekva jaro al la sekcio pri fasona entrepreno, en 2000 li fariĝis ĝia fakestro, en 2004 ĝia direktoro, kaj en 2007 administra direktoro de la fasona entrepreno. En 2009 li enoficiĝis kiel la prezidanto de la kompanio. Tiel la bastono transiris al la posteulo.



Ŝanĝo de Swany-Prezidanto (la kvara de maldekstre estas la aŭtoro; la kvina de maldekstre estas Prezidanto Itano: la sesa de dekstre estas Ekzekutiva Direktoro Kaŭakita), 2009

Daŭras marŝado de la kompanio. En 2019, ni evoluigis luksajn neformalajn gantojn kun usona gusto, kaj ĉe la Pariza ekspozicio "THE MAN", nur nia budo estis videble plenplena je vizitantoj. La aĉetantoj de la eŭropaj grandmagazenoj laŭdis, "Ĉi tiuj gantoj estas tre bonaj!". kaj la gantoj estas aplaŭdataj kaj aĉetataj en kreskantaj nombroj ankaŭ en japanaj grandmagazenoj.

En varbada agado, kiu direktos la estontecon de la kompanio, s-ino Ueda Fumi, dungita antaŭ kvin jaroj, gvidas teamon kun ses membroj, kies meza aĝo estas 30-jara, kaj kiu prizorgas la studentojn. Plene diskutante kun la geoficistoj, kaj montrante al la studentoj eĉ ĝis la profundo de Swany, la teamo ofertas ekscitan sperton al ili. La rezulto estas bonega.

Nun antaŭenpuŝataj estas: "la personon-taksa sistemo" kiu rigardas grava la gradon de kontribuo; "refreŝiga ferisistemo", kiu provizas 50,000 enojn dum pagataj ferioj; subteno por 12 kluboj por muziko, golfo, fiŝkaptado ktp.; "la sistemo por subteni memevoluiĝon" ekzemple, per interreta angla konversacio, persona komputilo, librotenado; ktp. ktp.

Eledukante talentulojn kaj konektante la valorojn de individuoj kaj de la organizo, ni celas "personan kreskon kaj sukceson de la vivo" pere de laboro. Tamen, estas senbezone diri, ke la vera kontento de klientoj venas de la aktiva koro de ĉiuj dungitoj.

Post-procedo estas kliento

“Post-procedo estas kliento” signifas, ke ni laboru por la sekvanta procedo. Ĉi tio konformas al tio, ke “oni ne malpurigu la necesejon, elviŝu la areon ĉirkaŭ urinujo antaŭ ol forlasi” por la sekva uzanto. Por mi, kiu komercadis tra la mondo, tio signifis, ke mi faru decidojn kun konsidero pri la sekvaj paŝoj dum intertraktado kun klientoj.

Tio okazis longan tempon antaŭe, kiam s-ro Milton Schwartz, Prezidanto de la kompanio Avon Glove, postulis malplialtigi prezon.

Mi petis lin ŝanĝi la enhavon: de la konsisto “2 paroj da S, 4 paroj da M, 4 paroj da L, kaj 2 paroj da XL por dekduo, al la konsisto “6 paroj da M kaj 6 paroj da XL por dekduo” kaj mi akceptis ĉirkaŭ 1 procentan prezmalaltigon. La kombinaĵo estis akceptita dum longa periodo, kaj pli ol tio ke iom multiĝis la uzkvanto de materialoj, ni havis daŭran fruktiĝon, ĉar tra multaj jaroj kreskadis la produktiveco.

Rimarkendaj punktoj dum produktado de gantoj inkluzivas: elasteco de ŝtofo, malfacileco de ornamado, ligrimedo de ŝtofoj, kudrmaniero ĉirkaŭ manumo, fleksebleco de la kaŭĉuka parto, tridimensia strukturo ktp. Kiam mi negocis por gajni mendojn, mi pripensis la produktivecon preskaŭ tiom multe, kiom mi zorgis por gajni mendojn.

Swany China malfacile luktis kun la produktado

de 691 paroj por “kompanio M”. Produktefikeco falis ĝis triono, ĉar oni devis meti 6 butonojn sur ĉiun paron, kaj la presita bildo sur la mandorso devis esti zorge kudrata, por ke ĝi ne defalu.

Swany GW malfacile luktis kun la fabrikado de 30,000 ~ 40,000 paroj el sinteza ledo menditaj de “Kompanio F”. Ĉi tiu mendis 30 tipojn kun 5 koloroj kaj 5 grandecoj. Unu tipo bezonis 17 muldilojn, kaj kvankam la prezo estis malkara, la kvalitpostuloj estis altaj, kaj eĉ subkontraktistoj emis eviti ilin. Krome, necesis etiketoj, mezuretikedoj, material-indikoj kaj kvalit-indikoj.

Swany Taicang malfacile luktis kun 100,000 paroj da rubledaj gantoj, fabrikataj ĉiujare. La nombro da tranĉitaj gantoj malmultiĝis ĝis triono, ĉar necesis ordigi ilin laŭ grasoenhavo, koloro kaj grandeco, kaj konformigi la maldekstrajn kaj dekstrajn laŭ koloro. La malmolan ledon oni kudris, frapante ĝin per martelo. Nuntempe tio ne povas esti, sed por eviti deficiton, laŭdire, la manlaboro estis farita senpage ĉe la domoj de dungitoj.

Fakte, dum intertraktado kun klientoj, estas decidite 100-procente, ĉu ni havos profiton aŭ malfacilon.

La streĉgrado de la ŝtofo malsamas senlime, kaj eĉ eta misjuĝo ĉe kudrmaniero de dekoracio k.a. ĵetos la fabrikon en kaoson. Krome, konformiĝo al diversaj leĝoj ankaŭ estas severe postulata jaron post jaro.

En la fabriko tre ofte okazas korhaltigaj okazaĵoj, sed la plej multaj el ili devenas de la decidoj faritaj dum mend-ricevo. Por la fabriko estas malfacile diri veran opinion al la vendista fako, kiu estas pli alta posteno.

Ni devus firme memori, ke la administra direktoro Iŭazaŭa Hirojoŝi, kiu june ekŝiĝis en 2004 por prizorgi sian edzinon, diris: “La oficistoj de la ĉef-kompanio ne bone komprenas la malfacilecon de la fabriko.”

Naĝi 250 metrojn estas mia ĉiutaga tasko

Ĉirkaŭ la tempo, kiam mi komencis fari komercadon kun la kompanio Dorfman en San-Francisko, en la flughavena hotelo la hor-diferenco ofte malhelpis min ekdormi. Por ke neniu min veku en la nokto, per lankovrilo mi envovlis la telefonon, tamen post iom da tempo, iu forte frapis la pordon. “Jam estas la 10a matene!” tie staris s-ro Hyman, prezidanto de la kompanio. “Naĝado estas la plej bona metodo por plibonigi infanan paralizon” iam li emfazis, kaj la vortoj restis kiel forta impreso en mia kapo.

Ĉar ankaŭ la itala s-ro Chiodi diris same kiel s-ro Hyman, post la reveno al Japanio, mi komencis naĝi en la maro malantaŭ mia domo. Per blanka farbo mi

metis signojn apartajn je 50 metroj sur la digo, altaj je ĉirkaŭ 2 metroj, kaj, de majo ĝis novembro, mi naĝis 150 metrojn okcidenten laŭ la marbordo kaj returnis min reveni. La agrablan senton post la naĝo mi povis kompari kun nenio.

La maro en majo estis glacie malvarma, sed mi povis elteni por pli fortigi la fizikan forton.

La akvotemperaturo iom post iom altiĝis. En septembro ĝi estis la plej varma, kaj eĉ en oktobro ĝi estis nekredeble milda. Kaj mi eksciis ankaŭ, ke ĝi estas pli varma en novembro, ol en majo. Tamen, en mara naĝado sin kaŝis ankaŭ danĝero. Ĉar mia dekstra kruro estis malforta, mi povis naĝi nur kraŭl-stile. Naĝante sen rigardi antaŭen, mi kunbatiĝis kun drivanta granda peco de ligno kun najloj, kaj mi grave vundiĝis la bazan parton de mia brako.

Por la sekuro, mi konstruis naĝejon elspezinte 1,5 milionojn da enoj. Mi konstruis naĝejon, larĝan je 1,5 metroj, profundan je unu metro kaj longan je 12 metroj, ene de vitra varmejo sur la suda loko de mia domo; tie antaŭe staris fabriko. En tiu naĝejo, ĉiutage de la 7-a matene, mi ripetis iro-reiron 10-foje, sume 250 metrojn. Por la naĝado mi konsumis 15 minutojn, tamen entute 30 minutojn, inkluzive de la tempo por rearanĝi la hararon kaj vesti min.

Post la naĝado dum 14 jaroj, mi transiris al "Niŝi-stila san-ekzercado". En tiu daŭro mi trifoje provis naĝi 1,500 metrojn, t.e. 60-foja ripeto de iro-reiro.

Mi provis lukti kun mia limo de fizika forto, kaj spertis duonmortan anheladon. Post la naĝado, kuŝante iom da tempo, mi devis atendi la revenon de mia fizika energio. Tamen, dank' al la klopodo por venki la handikapon, eĉ kun sufero pro post-poliomjelita simptomaro, apogante min sur valizoj de Swany ambaŭmane, mi, eĉ 81-jaraĝa, ankoraŭ povas piediri, kio estis mia forta deziro. Mi ne scias, ĝis kiam mi povos piediri, sed mi ĉiutage dankas la forton de miaj brakoj, kiun mi havas pli ol ordinaraĵ homoj.

Antaŭe, ĉe la Usona Naĝ-ĉampioneco en Los-Anĝeleso (1949), Furuhaŝi Hironoŝin, kiu fariĝis fame konata kiel la "Flugfiŝo de Fujijama", naĝis 1,500 metrojn en 18 minutoj kaj 19 sekundoj. Kvinoble pli rapida, ol mi kun la rapideco de unu horo kaj duono. La malforta kruro dekstra estis kaŭzo de mia malrapida naĝado, sed kiom multe min helpis la fortika brakforto!

Ŝtormo de bankroto

Tio okazis, kiam mi estis flavbekulo. Komerca kompanio Iĉiba-Ŝooĵi, kliento de nia kompanio, bankrotis. La ŝuldo, koncerna al ni, estis milionoj da enoj, kaj ĉe mia domo okazis la kunsido de ĉirkaŭ 20 kreditoroj. La prezidanto H, kiu estis la plej granda kreditoro, brue metis japanan glavon antaŭ

la prezidanto Iĉiba. “Mortigu vin per ĉi tiu!” li diris. Kun grandaj larmoj, li petegis vivsavon surfrotante sian kapon sur la tatamo; mi tremis pro timo. Vere miaj testikoj kuntiriĝis. Por administrantoj troviĝas nenia pli granda sufero ol bankroto.

En la jaro 1975, kiam nia fabriko translokiĝis al Koreio, mi serĉadis laboron en Japanio. “Niĉimen”, la komerca kompanio, proponis al ni la entreprenon de kegloludo, kiu furoris tiutempe. En la periodo, kiam mia patro estis prezidanto, li aĉetis terenon de ĉirkaŭ 5,000 kvadrataj metroj en Ŭakimaĉi, en la gubernio Tokuŝima, kaj elspezinte pli ol 300 milionojn da enoj, li malfermis la kegloludejon “Swany Ŭakimaĉi”.

Li ekstaziĝis pro la ĉiutaga pleno da vizitantoj, kaj fine li malfermis la duan ludejon en la najbara urbeto Oouĉi. Baldaŭ komencis malmultiĝi la vizitantoj, sed feliĉe ni povis vendi la ludejon al superbazaro sen malprofito.

Malgraŭ diversaj malfaciloj ni povis vendi la ludejon “Swany Ŭakimaĉi” al loka supervendejo. Se ni fuŝus, ni falus en ekstreme mizeran situacion.

“Nepre aĉetendas najbara tereno” iam al mi instruis mia plej aĝa frato; laŭ li, tio signifas, “se ĝi koncernas vian komercon, estas ebleco sukcesi”. Tio estis tute ĝusta; ni etendis la manon al la komerco en tute alia kampo, tamen feliĉe ni povis eviti perein damaĝon.

En 1997, nia kliento, S-Bussan (Produkto S) petis

konkordaton, kaj gantfaraj kompanioj kiel T-Ganto, kompanio S, kaj kompanio U, bankrotis unu post alia, kaj nia kompanio ankaŭ suferis ŝuldon de preskaŭ 300 milionoj da enoj pro mia nedecidemo. Ĉirkaŭ tiu tempo, en la industria mondo furiozis ŝtormo de bankroto, kaj proksimume duono da kompanioj malaperis unu post alia.

En la jaro 2004, por vendi ski-gantojn kun la marko de Swany, ni fondis kompanion “Swany Europe”. Ĉu estis problemo lasi ĝin al la lokuloj, ni retiris en 2011 kun defcito de preskaŭ 200 milionoj da enoj. Mi devas diri, ke niaj planoj kaj perspektivo estis tro naivaj.

Rilate al la detaloj de Swany Bag mi poste priskribos, kaj en 2003, kiam la artikoloj komencis esti aĉetataj en Japanio, ni komencis vendi ilin en Usono. La stilo kun seĝo altiris atenton, kaj estis prezentita en la artikolo de New York Times, kaj ankaŭ en la televidbutiko “QVC” ĝi estis alprenita. Tamen, ĉar oni nur ronde turnis la sakon, ne estis certe, ĉu ĝia ĉefa efiko “subtena funkcio” estis bone prezentita. Ni retiris en 2013 kun defcito de miliono da dolaroj (ĉirkaŭ 100 milionoj da enoj). Povas esti rezulto, ke ni ne povis fiksi la “sakkulturon por subteni la korpon” al personoj kun malfortaj kruroj.

Kvankam mi ricevis gratulmesaĝon de s-ro Graf el Bostono, nia kliento, “Mi estis surprizita pro apero de vi kaj via sako sur New York Times”.... Mi bedaŭris, bedaŭris kaj bedaŭregis.

S-ro Suzuki Osamu, prezidanto de la kompanio “Suzuki” diris, “Malsukcesas 50-procente, sukcesas 50-procente, tio estas normala, se esti prezidanto, li devas klopodi por superi 51 procentojn”.

Estas mirinde, ke Swany, kiu tiom multe malsukcesis, povis pluvi kiel unu inter la 60-kelkaj restantaj, el 230 gantfaraj kompanioj iam ekzistintaj.

Bildkartojn en feriaj tagoj

Mi ne povas trinki alkoholaĵon, do homoj diras, ke mi estas malsocietema persono. Por kovri tiun malfortan punkton, mi daŭrigis skribi bildkartojn ekde mia juneco. Ĉar en la administra seminario de s-ro Funai Jukio, mi adŭis: “Oni nepre povos kapti konton, se oni skribas poŝtkarton trifoje”, kaj li eĉ asertis, “Mi garantias rezulton”.

Mi restis en Nov-Jorko dum la tuta julio ĉiujare por prizorgi ekstersezonan fabrikon. En sabato kaj dimanĉo, mi ekskribis poŝtkartojn kun arda entuziasmo, tiel ke mi skribis en antaŭtagmezo 50 kartojn, kaj en posttagmezo 50 kartojn. Kutime, mia dekstra mano ekdoloris en la vespero.

Pli malmultekosta estas fasko da 10 aŭ 20 folioj de bildkarto ol aĉeti po unu. En Pollando, mi eĉ aĉetis 2,000 kartojn, la tutan stokon de la vendejo, kio tamen kostis nur 8,000 enojn. En Kamboĝo,

unu karto kostis nur 3 enojn, do mi aĉetis kelkmil. Koncerne la poŝtkartojn de aviadaj kompanioj, mi petis ricevi 50 aŭ 100. Ĉi tiujn mi sendis el Nov-Jorko, Toronto kaj Helsinko. Eble mi skribis proksimume 600 kartojn jare, tamen, post la aĝo de 80 jaroj, la nombro malmultiĝis al 100.

“Ĉar Etĉan (mia karesnomo) estas riĉa...” diris miaj amikoj. Mi tre bedaŭris ilian miskomprenon. Oni ne povas skribi sen scii eĉ minimume pri la adresato, kaj oni ne povas daŭrigi tion sen sinteno ne ŝpari klopodon. Eĉ se unu karto kostas 100 enojn, fariĝas sume nur dek mil enojn tage. Miaj hobiaj estas “aŭskultado de sonlibroj” kaj “skribado de bildkartoj”; ĉi tiuj hobiaj kostas nur iomete da mono, se kompari kun golfo, vetludado kaj nokta amuzado.

En 1995, inter mia kompanio kaj kvar okcidente najbaraj domoj kuŝis tereno, larĝa je ĉirkaŭ unu metro, apartenanta al la ŝtato, kaj mi decidis ĝin aĉeti. Dum oni diras, ke intertraktado kun du aŭ pli da domoj estas nekonkereble malfacia, al ili mi sendis bildkartojn el Ĉinio kaj Germanio, kaj vizitadis la domojn, kaj fine mi sukcesis ricevi ĉies konsenton post ok monatoj. Mi plurfoje sendis bildkartojn ankaŭ al la intertraktanto de la Financa Buroo, kaj mi ricevis la akiran permeson post kelkaj monatoj. “Ĉu vi havas iun konaton en Financa Buroo?” min demandis iu bienmakleristo.

“Mi ricevis bildkarton de la prezidanto Miyoshi el Germanio. Bonvolu diri al li, ke mi multe dankas,”

tiel mi ricevis sennombrajn reagojn.

Mi multfoje skribas dankleteron al la poŝtkartoj de enketo pri Swany Bag. La ricevinto de mia poŝtkarto surpriziĝas, kaj mi ricevas respondon. Mi eĉ estis invitita plurfoje, “Mi deziras regali vin, kiam vi venos al Tokio.” La invitoj estis ĉiuj de virino. Ha, kia feliĉo!

La poŝtkartoj por enhospitaluloj en Gubernia Hospitalo Ŝirotori estis runde legitaj de multaj homoj. “Mi legis la poŝtkarton de s-ro Miyoshi!” ja estis la reago de la amiko de mia amiko. Mi estas ĝoja, ke multaj homoj plezuras kaj la rondo de dankemo disvastiĝas. Tamen mi ricevis de iamaj samklasanoj ankaŭ konsilon: “Ne skribu malfacile legeblajn literojn”.

Estis ankaŭ respondo de stevardino de JAL.

“Mi rimarkis nekonatan sakon dum honkonga flugo, kaj alvokis vin. Mi estas nova stevardino, ankoraŭ unujara. Mi ĝojis ricevi vian mesaĝkarton ĉe komenco de la novjaro. Ja refreŝigita mi sentas min! Mi esperas, ke mi nepre revidos vin iam kaj ie. Bonvole vi estu sana!

Sincere via ...”

Ĝuste ĉar nun estas epoko tia, ke io ajn estas cifereca kaj oni emfazas nur efikon, homoj serĉas varmecon en tiaj “analogaj” komunikrimedoj, ĉu ne?

Simpligo, Specialigo kaj Normigo

Onidire, la produktado estas “la sumo de movadoj, de unu punkto al la alia”, kaj la raciigo de loĝistiko estas ja esenca. En la 1970-a jaro, kiam la paperformatoj B5 kaj A4 estis miksite uzataj en nia kompanio, s-ro Iŭasaŭa Hirojoŝi (direktoro tiutempa) diris, “En Honda ĉiuj dokumentoj estas unuecigitaj en la formato A4”, kaj ankaŭ nia kompanio komencis uzi la formaton A4 por ĉiuj dokumentoj.

En 1972, kiam ni disvolvis la komercan agadon en la sudkorean merkaton, ni amasproduktis rezinajn “skatolojn”, kiujn ni povis ŝarĝi per po 20 paroj, kaj alte stakigi. Ni povis liberigi nin de la ŝnurado de nestakigeblaj faskoj de 50 aŭ 60 paroj. Ni metis sur la paledon 3 x 4 skatolojn, kaj ilin akumulis unu sur la alia en kvin tavoloj; se uzi manlifton, eĉ unu persono sola povis porti 1,200 parojn. Materialoj en kartono estis metitaj sur paledojn, kaj ŝtofrulaĵoj estis stakitaj en kontenero kun grandeco: larĝo 1 x alto 1.3 x profundo 1.5 metroj.

Ĉe la supra breto de la oblikva rultransportilo, gravito tiris malantaŭen la skatolojn da partoj, kaj poste la kudristoj ilin prenas. Kiam ili finas kudri, ili metas la skatolojn sur la malsupran breton, kaj la laboro bone fluas. Tio estas la sistemo de labordivido laŭ ses procezoj: almeto de garna tuko, ronda kudrado k.a. La teknikon, por kies akiro oni bezonis

kelkajn jarojn, oni akiris nur dum kelkaj monatoj, ĉar oni povis koncentri sian tutan forton nur al unu procezo. En la koreaj tri kompanioj, la trejnado al 1,200 homoj naskiĝis el mia frumatena sonĝo.

En la jaro 1982, ni konstruis la magazeton kun funkcio, kiu povas aŭtomate en- kaj elpreni materialojn kaj produktaĵojn dum ĉirkaŭ du minutoj. Tridek du paledoj estas ordigitaj en kvar vicoj, de oriento ĝis okcidento, kaj 896 paledoj povas esti stokitaj en sep stakoj. Tamen, en 2002, s-ro Jamada Masaharu, kiu estis konsilanto de la kompanio kaj eksprezidanto de la kompanio Shoei, atentigis nin, "Se oni ne povas vidi, oni ne povas malmultigi la stokon." Tio estas grava tasko ankoraŭ ne solvita.

En 1985, ni alprenis la usonan kolorsistemon "Pantone", kiu numere montras 10 milojn da koloroj laŭ internacia normo, kaj ni povis numeri la kolorojn de la antaŭo, dorso, fadenoj, etikedo ktp... Tiel unu el niaj grandaj problemoj estis solvita.

En 2008, oni ĉesis la produktadon de la plasta 30-trua A4-dosierujo, kaj nia kompanio ŝanĝis al 2-trua tipo. Tamen, ĉe la administra kunveno oni kontraŭis: "La 30-trua estas uzebla multoble pli facile." Ni do rekonsideris.

50 sekundoj necesis por enmeti kaj elpreni la 2-truan paperon, sed por la 30-trua necesis nur 26 sekundoj; se la papero havas du truojn, ni devas mane premi la ŝvelantajn dokumentojn dum ni

legas aŭ prinotas ilin. Plie, koncerne la 30-truan, ĝia unua truo komenciĝas ene de 1 cm de la rando, kaj la spaco de tajpado estas 20% pli larĝa. Laŭdire, miloj da tiaj 30-truaj dosierujoj estis en cirkulado, tial mi revenigis ilin.

En 2020, s-ro Itano Cukasa, heredanto kaj vicprezidanto, enkondukis novan “dosieran sistemon”. Laŭ ĝi, paperoj estas metitaj en malgrandan skatolon senbinde, kio certe pliigas efikecon kaj helpas protekti la medion. Ni celas sep specojn de raciigo, inkluzive malhelpi privatigon, mallongigi serĉtempon kaj redukti la nombron de paperoj. Se sukcesos la sistemo, ĉi tion mi enkondukos ankaŭ en la grupon.

Ĉiuokaze simpligo, specialigo kaj normigo estas la kondiĉoj por postvivado.

La paŝado kun subtenilo

Tuj post la naskiĝo, mia dekstra maleolartiko skuiĝis, kaj mi ne povis marŝi dum longa tempo. Kiam mi fariĝis mezlernejano, komencis multiĝi la movokvanto; kuracisto konsilis al mi kovri la kruron per fiksbendo, de miaj genuoj ĝis la bazo de piedfingroj. De tiam mi komencis marŝi komforte. Sed ĝi devis esti renovigita en ĉiu 10-a jaro, kaj la aparato multekostis (60,000 ĝis 70,000 enoj), tamen 90 procentojn subvenciis la registaro.

Ĝi konsistis el rezina bazo kun fera apogilo, kaj el sinteza ledo interne, kaj el bovinhaŭto ekstere. Ĉi tiu estis ellaborita post ripeto de malfacilaj akuŝoj en “Proteza Laboratorio Takamacu”. Se la interna surfaco ne konformis al la haŭto eĉ je unu milimetro, mi suferis pro la doloro de haŭtodeŝiriĝo aŭ inflamo. Post kelkaj delikataj ĝustigoj, finfine mi atingis la kontentecon.

S-ro Cuĵimoto Toŝiĵi, la inĝeniero ekde mia juneco, fabrikis la aparaton, do li estas mia favoranto. Se li ne bone konus emojn de miaj piedoj, li ne povus fari kontentigan laboron. Pro tio la respondeculo neniam ŝanĝiĝis.

Mi surmetas maldikan ŝtrumpeton nur sur la dekstra piedo, kaj poste sur ĝin mi metas la aparaton. Poste mi surmetas paron da ŝtrumpetoj. Ĉar ĝi antaŭe enhavis metalon, ĉiufoje mi estis kaptita de la inspektisto ĉe la enirpordego de flughaveno, sed tiu problemo estis solvita, ĉar poste oni ĉesis uzi metalan garnaĵon. Sed al mi tre doloriga estas tio, ke mi ne povas eskapi de la sento de subpremo...

Komerca vojaĝo de handikapulo 1

Kiam mi faras komercan vojaĝon, mi kutime uzas la unuan aviadilon, tial, je la 6-a horo mi celas al Flughaveno Tokuŝima Aŭaodori, per la aŭto Toyota

Prius. Kiam mi iras eksterlanden, mi ekiras je la 5-a matene, cele al la Flughaveno Kansai, de la bushaltejo Oouçi laŭ la ekspresa vojo Takamacu. Kvankam frumatena ekiro por mi estas iom suferiga, mi povas ofte renkontiĝi kun gantfaristoj. Ĝi do fariĝis valora loko por interŝanĝi informojn.

Mi iam vizitis la sidejon de K-mart en Detrojto je 7:30 matene. Tute silentis antaŭ la vasta enirejo. Mi puŝis la pordon, pensante, ĉu estas iom tro frue...; "Good morning!" tiam homoj bonvenigis min kun rideto. Mi eksciis, ke miloj da dungitoj jam laboras. Oni diras, ke la laboro finiĝas je 4:30 vespere.

La plej multajn flugojn inter Eŭropo kaj Usono mi faris sabate kaj dimanĉe, kaj daŭrigis komercan agadon de lundo ĝis vendredo, kaj revenis hejmen du aŭ tri semajnoj poste. Dum du semajnoj mi elspezis ĉirkaŭ 350,000 enojn, kaj se viziti 20 kompaniojn dum 10 tagoj, tio kostas po 18,000 enojn por ĉiu kompanio, 35,000 enojn, se viziti nur 10 kompaniojn, kaj se mi aldonus al ĝi personan salajron, la kosto duobliĝas!

Iun tagon, mi spektis televidon, kaj aĉetanto de la ĉiovendejo Tokyu Hands aperis sur la ekrano. Laŭdire, en unu tago li vizitas averaĝe 4.2 kompaniojn en sia eksterlanda komerca vojaĝo. Estas mirige, ke li vizitas pli ol 20 kompaniojn dum 5 tagoj semajne!

Ekde 1996, kiam mi dediĉis mian tempon por la evoluigo de la Swany bag, ĉiumonate mi flugis al

Tajpeo aŭ Ŝanhajo. Mi negocis dum ĉirkaŭ unu horo kaj duono kun fabrikantoj de sakoj aŭ ties pecoj, en la kafejo de flughaveno, kaj poste mi tuj min returnis por reveni al Japanio; tian agadon mi ripetis. En la revenflugo, la kajuta deĵoranto de JAL min konsolis, “Vi ankaŭ ĉeestis matene, ĉu ne?” Mi revenis hejmen posttagmeze je la 9-a. Dum la translokiĝo mi povis disponi pri la tempo por legado. Jenaj estas miaj havaĵoj:

Razilo, dentobroso, kombilo, pomado por hararanĝo en rezina botelo, diametra je 3.5 centimetroj, Oronine-ungvento, sapo, kudriloj kaj sigelilo — ĉi tiuj ĉiuj estas konservataj en sako 18 x 13-centimetra. Mi ne portas medikamenton. Eĉ nun ili troviĝas en mia Swany Bag, kaj ili promenas kun mi ĉiutage. En mia domo mi ĉiam konservas en ĝi eĉ monujn kaj ne lasas atendi kurieran serviston.

Envolvinte en paktukon kvar aŭ kvin librojn, vestaĵojn kaj saketon, mi sterne metis ĝin sur la fundon de la kofro kun 75-milimetraj radoj, fabrikita en NY. Sur ĝin mi orde metis 100 aŭ 150 specojn de unumanaj ganto-specimenoj, kaj ĝi pezis ĉirkaŭ 20 kilogramojn. Mi ofte iris rekte al la klientoj de la flughaveno, kaj la paktuko ludis la rolon de utila monkaŝejo. Mi dankas al la kulturo de la tradicia japana paktuko!

Mi portis la unusolan malhelbluan jakon, kaj mi havis po unu rezervajn kravaton kaj ĉemizon, kaj unu paron da ŝtrumpetoj — koncerne subvestojn,

mi lavis ilin kune kun mia korpo en la ĉiunokta banado. Mi envolvis ilin en bantuko kaj eltordis: ili estis sekiĝintaj ĝis mateno. Kelkfoje ili estis duone sekaj, sed ili sekiĝis per mia korpa varmeco dum tiom mallonga tempo, ke mi eĉ ne rimarkis.

Iutage en konstruejo, asfalta nigraĵo resaltis kaj algluiĝis al mia ĉemizo, la sola krom nur unu alia. Reveninte al la hotelo, mi furioze ĝin ensuĉis kaj elkraĉis; tiel mi ripetis dum ĉirkau 10 minutoj. Danke al tio, la ĉemizo estis repurigita preskaŭ perfekte; mi ja trankviliĝis.

Min multe embarasis tensioj kaj ŝtopilingoj, malsamaj laŭ landoj. Mi aĉetis ingojn, britan, germanan, francan kaj italan, kaj kunportis ilin kun ŝnuroj dum 20 jaroj. Ekde ĉirkaŭ 1990-a jaro komencis aperi en la merkato universalaj superetaj ŝtopilingoj.

Komerca vojaĝo de handikapulo 2

En 1987, mi vojaĝis al Usono kun nur valizeto por la geedziĝo de Naomi kaj Bruce, vendisto de Swany en Usono. Vicprezidanto Tom prezentis min, “Estonte, prezidanto Miyoshi alportos ĉiujn havaĵojn en siaj poŝoj.” Ĉiuj ekridegis.

Unufoje elirinte el la hotelĉambro, puŝante mian valizon, mi ne revenis al la ĉambro; post la matenmanĝo mi rekte celis al la kliento. La nombro

de vizitatoj por tiu tago estis decidita laŭ tio, ĉu plej frue matene mi povis aranĝi rendevuon aŭ ne. Kiel mia patro kutimis diri, “la kvanto da mendoj ricevitaĵoj proporcias al la tempodaŭro de interparolo.” Ankaŭ estis gajno redukti la ŝarĝon sur la kruroj.

En la urbo, mi komencis agi, post kiam mi demandis la plej proksiman personon pri la vojo. Kiam oni akompanas iun, oni ofte ekscias, kiel malŝparema estas la irado de nehandikapitoj. Por ŝpari tempon, mi finis tagmanĝon ĉe vendejo, proksima de la kliento, kaj iris al la komerca renkontiĝo.

Por tagmanĝo mi manĝis kradrostitajn fiŝojn kaj legomojn ĉe ĉinaj restoracioj kaj fiŝsandviĉojn kaj oranĝsukon ĉe restoracioj McDonald's. La glaciaĵo estis bongusta! Kiam la kliento estis iom for, mi aĉetis tagmanĝon ĉe McDonald's kaj manĝis ĝin en taksio.

Koncerne aviadilon, mi sekvis miajn gepatrojn kaj uzis ekonomian klason. Ili zorgis pri la tutmonda varmiĝo kaj pri ekonomio.

Tiu persono, kiu rekomendas ekonomian klason, estas s-ro Kagijama Shuuzaburoo, la fondinto de “Flava Ĉapelo”. Al li ŝuldis la starigo de la “Societo por Beligi Japanion” kaj la disvastigo de la “kampanjo de purigado de necesejoj” al la mondo.

Estis la afero, kiam li aŭskultis la prelegon de JAL-estrarano, kiu asertis, “Se en unua klaso oni servas vinon kontraŭ dekoj da miloj da enoj, la kliento

petas, ‘Donu al mi bonan kaviaron.’” Ili diris, ke la ekonomia klaso estas la melk-bovino de JAL ĉar ĝi estas enspeziga.

En 1997 okazis en Jokohamo “la 92-a Universala Kongreso de Esperanto”. En la hotelo, kie okazis la aranĝo, mi lasis noton en la ĉambro: “Mi restos unu semajnon. Bonvolu ne ŝanĝi la littukojn.” Tio estis ankaŭ la instruo de s-ro Kagijama. Kiam mi vespere revenis al mia ĉambro, la servistino sidis sur la planko kaj profunde klinis la kapon kaj diris, “Dankon pro la zorgo pri la littukoj. Koran dankon.” “Ho! Vi ne necesas sidi sur la planko!” Senkonscie mi sufokiĝis de emociaj larmoj.

Mi sekvis la konsilon de s-ro Kagijama kaj viŝis mian ĉirkaŭaĵon per viŝtuko, kiam mi estis en la necesejo de hotelo aŭ aviadilo. Mi prenas kaj forĵetas polvon kaj foje eĉ harojn. Eĉ ĉe aŭtovojaj busfinstacioj kaj stacidomoj, mi sekvas la principon de “la postprocedo estas kliento”. Mi ne uzas la razilojn, vizaĝajn purigilojn, pomadon ktp. de hotelo. Mi uzas sapon, nur kiam mi ne havas ĝin.

La reguloj pri vojaĝaj elspezoj de Swany estas la samaj por prezidanto kiel por dungitoj. Mangelspezoj estas subvenciataj je 1,500 enoj unufoje. Transportkostoj estas kalkulitaj surbaze de realaj elspezoj kaj por veturkostoj ni postulas po 20 enojn por 1 kilometro.

For de dormigaj piloloj

Dum troviĝas granda nombro da homoj, kiuj suferas pro hordiferenco, troviĝas malmultnombra homspeco, kiu restas tute senĝena. Bedaŭrinde mi estas en la unua grupo. Iuj dormas profunde eĉ en aviadilo, malgraŭ tempodiferenco. Mi vere envias ilin.

Antaŭlonge en Frankfurto, Germanio, nokte mi suferis pro sendormeco. Kiam mateniĝis, mi, nepova trinki alkoholaĵon, trinkis duoblan viskion, kaj mi ebriiĝis kaj ekdormis. Kaj matene, mi ne povis maldormiĝi; mi haltigis taksion kaj vomis ĉe la vojrandoj. Kun honto, mi renkontiĝis kun mia vizitoto. Iam kliento en Nov-Jorko riproĉis min proodoro de alkoholo. Ambaŭkaze estis fiaskoj kaŭzitaĵoj de hordiferenco.

Kiam mi flugis al Eŭropo kaj Usono nokte, mi vekigis ĉiun horon kaj malbonfartis. La sufero daŭris dum kelkaj tagoj, kaj kiam mi apenaŭ alkiutimiĝis, mi jam devis reveni al Japanio. Kaj denove nokte mi komencis suferi pro sendormeco eĉ en Japanio. Post nelonge, mi komencis fidi dormpilolojn, kiam mi flugis inter kontinentoj. Post kiam mi fariĝis 60-jara, la situacio plimalboniĝis kaj mi iom post iom fariĝis grave malsana paciento, kiu prenis medikamenton de du malsamaj kuracistoj kaj uzis du dozojn.

Ekde februaro 2019, mi ne povis dormi eĉ post

kiam mi prenis la medikamenton trioble pli multe. Mi ektimis kaj decidis “fuĝi for de dormigaj piloloj”. Sendorme mi eltenis longajn noktojn dum kvin tagoj, mia makzelo tremis matene kaj mi grincis la dentojn dum 1-2 horoj ĝis la tagiĝo dum du tagoj. Post tio, mi ekdormis malpeze kaj kvankam mia konstipiĝo daŭris, mi povis dormi proksimume duonon de la nokto.

La dormeto revenis post kelkaj semajnoj, kaj post tio sekvis kelkaj sendormaj noktoj kaj denove sekvis pluraj semajnoj da dormeto. Post duonjaro ripetante tian suferadon, mi finfine tute liberiĝis de piloloj.

Dum tiu tempo, mi dormis 1-2 horojn kaj kiam mi vekigis, mi faris 30 minutojn da Niŝi-stila sanekzerco kaj kuŝigis. “Se mi ne sciis ĉi tiun ekzercon, kiu efikas por rigidaj ŝultroj, estus terure!” mi sentis hororon. Ĉi tiu gimnastiko tiom savis min.

Efikeco de registrado

Jam de antaŭe mi konservas klaran registron pri okazaĵoj, unue en raportoj al la funkciuloj pri ĉiuj miaj komercaj vojaĝoj, kaj due kiel enskriboj en miaj kajeroj. Tamen en 2018, kiam mi ekŝiĝis kiel prezidanto kaj fariĝis konsilisto, kvankam mi pensis, ke mi alportis ĉiujn miajn dokumentojn al mia hejmo, mankis la raportoj pri komercaj vojaĝoj. Ili estis registro de ne nur kiam kaj kun kiu mi

renkontiĝis kaj pri kio ni parolis, sed ankaŭ pri miaj propraj pensoj. Tial, la enhavo de ĉi tiu libro estas bazita sur nur la registro de miaj kajeroj.

Miaj kajeroj jam ampleksas duonjarcenton. En unu linio mi skribis la nomon de la persono, al kiu mi sendis poŝtkarton, kaj la ĉefajn punktojn dekstre, kaj sur la sekva linio la enhavon de la respondo ricevita.

Krome, mi povis memori la vizaĝon de la persono, desegnante diagramon de la loko, kie mi sidis kun la renkontito, kaj skribante la ĉefajn punktojn de la konversacio. Mi ankaŭ registris la vortojn kaj datojn, kiuj restis en mia memoro. Mi ankaŭ resumis la ĉefajn punktojn de la intervjuo kun la aŭtoro de Swany News en unu linio.

La enhavo de la vojaĝraportoj kaj kajeroj ĝis nun estis utilaj por eksteraj raportoj. Estas multaj kontribuoj al gazetoj kaj revuoj, inter kiuj la plimulto naskiĝis el tiuj ĉi kajeroj.

En 1966, kiam mi veturis per trajno de Nov-Jorko al Gloversville, baskulkamiono koliziis kun la trajno kaj mi estis ĵetita en la koridoron. Feliĉe mi ne estis vundita.

En 1970, kiam mi fotis la internon de la grandmagazeno Karstadt en Germanio starante sur rulŝtuparo, mi falis ne sciante, ke mi atingis la supron de la rulŝtuparo. Multaj homoj ridis pri mi.

En 1980, mi renkontiĝis kun Jack Nicklaus en Florido kaj en 2011, Akahoŝi Norihiro, ludanto de

profesia bazopilko, apartenanta al la teamo Hanshin Tigers, vizitis mian domon por la filmado de la televidprogramero Ĵaro de Luzono de NHK.

En la notlibro de 2012, estis registritaj la tagordo de la fonda memorceremonio de Swany Cambodia en Pnompeno kaj la sidordo de la gastoj.

Kiam mi legis la kajeron de 2020, estis skribite, ke kiam mi estis la vicprezidanto de “la Bestprotektita Asocio de Kagaŭa”, mi seniluziigis s-inon Jamamoto Miĉikio, kiu kolektis 200 subskribojn. Kiam mi pardonpetis per bildpoŝtkarto, mi ricevis longan leteron pri ŝiaj aktualaj protektitaj tagoj kaj lastatempa raporto.

Mi estas dankema, ke mi povos vojaĝi al la venonta mondo post plibonigo de mia rilato kun ŝi.

Perfektigi la komunikkapablojn

Libro, de kiu mi multe lernis, estas “Arto pri Komunikado de Welch”, pri J. Welch, ĝenerala direktoro de General Electric (GE). Li estas legenda administranto, kiu gvidis la kompanion GE dum 20 jaroj ekde 1980, kaj pliigis ĝian merkatan kapitalon 40-oble. Li diris, ke kiel la centrajn aferojn de administrado li metis la temojn “elekto kaj koncentriĝo de entreprenoj” kaj “rafinado de la kapablecon de komunikado”.

Koncerne la antaŭan, mi forte konsentas,

konsiderante mian antaŭan komercon “gantkomerco”.

Koncerne la lastan, “Mallongigu frazojn kvar- aŭ kvinfoje,” “ĉu vi forigis malfacilajn vortojn kaj teknikajn terminojn?” kaj “ĉu vi jam ne plu povas mallongigi ĝin?” “Ĉi tiujn ĉiujn aferojn vi demandu vin mem ĝisfunde!” tiel mi estis instruita kaj tio por mi estis ege utila. Welch ja estis la persono, kiu mallongigis la nomon “General Electric”, la plej granda en la mondo, al GE.

Lia teorio: “simple, facile kaj kompreneble” estas oredoloriga kaj malfacila por mi!

Iam oni petis min fariĝi prezidanto de la turisma asocio de la urbo, kaj ĉiujare ni okazigis ekspozicion pri pupoj de la mondo. La paneloj, klarigantaj la ekspoziciajn landojn estis komence skribitaj en 5-6 linioj en etaj literoj, sed la plej multaj homoj ne legis ilin. Tial, de la sekva jaro, la literoj estis ŝanĝitaj al unu centimetro pli grandaj kaj la klarigoj estis mallongigitaj al du linioj.

Ekzemple, la priskribo de la malgranda lando Belizo fariĝis: “Angleparolanta lando en la nordoriento de la Mezameriko, iomete pli granda ol Ŝikokuo kun loĝantaro de 310,000 kaj meza jara enspezo de 800,000 enoj, tielnomata juvelo de la Kariba Maro, ĉirkaŭata de koralrifoj. Fama kiel feriejo, havante 450 foraj insuloj.” La afiŝoj estis taksitaj kiel bone kompreblaj pri ĉiu lando.

En miaj prelegoj, mi sekvis la instruon, ke mi

povas persvadi pri ajna afero, kiom ajn malfacila, en 10 minutoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, en la Esperanto-Kongreso de Ĉuugoku-Ŝikoku en Kotohira, la parolado de mia antaŭulo estis 15 minutojn pli longa kaj mi luktis por redukti la hordaŭran enhavon. Mi povis sekvi la instruojn de Welch por konservi la fintempon. Tio malpezigis mian koron.

Grafikpapero estas fonto de saĝo

Dum multaj jaroj, kunportante paperujon en formato A4 kun 30 truoj, ĉie ajn mi strebe desegnadis planojn pri pendantaj problemoj. La grafikpapero aktive laboris ankaŭ en la evoluigo de la sako Swany Bag kaj la rulseĝo Swany Mini, kiuj faris la ŝancon por disvolvi la komercadon preter gantoj. Mi skribos pri tio en la sekvanta dua ĉapitro. Koncerne la konstruadon de la eksterlandaj fabrikoj, estis ankaŭ la vico de la grafikpaperoj.

En 2008, utiligante la spertojn ĉe fabrikoj en Japanio, Koreio, kaj Ĉinio, dum unu semajno mi dronis en la desegnado de la nova fabriko “Swany Cambodia”. La tri principoj de desegnado estas “strukturo de trabaĵo, provizado kaj elfluigado de akvo, kaj bondeseĝneco”. Kaj plue, zorgante pri “enlumigeco, varmizoleco, kaj hermetikeco”, mi celis al tia desegno, ke en la konstruaĵo estas lume

kaj oni facile moveblas. La konstruaĵoj de Swany Cambodia konsistis el: fabriko, granda je 108×40 metroj, oficejo je 24×10 metroj, teretaĝa manĝejo je 24×15 metroj, kaj unuetaĝa loĝejo je 16×8 metroj (64 kvadrataj metroj \times 4 domoj). Tamen, mi surpriziĝis pro la postulo, ke la plafono de la teretaĝa fabriko estu alta pli ol 6 metroj; tiu alteco egalas je duobla de unuetaĝo. Per tio oni celis malvarmetigi la laborejon, supren levante varman aeron.

Surbaze de ĉi tiuj principoj kaj celoj, mi daŭrigis cerbumadon laŭvice: konservejo \rightarrow tajlado \rightarrow kudrado, sed mi stumblis ĉe la klimatizo, kies elektropova prezo kostis kelkoble pli ol en eksterlandoj. Mi ripetis provon kaj eraron surloke dum kelkaj jaroj, kaj fine atingis la metodon: cirkuligi la aeron per 12 ventosendaj maŝinegoj, instalitaj antaŭ la varmo-interŝanĝa maŝino, en kiu fluadas subtera akvo. La malfacila punkto estis ŝimado pro malsekeco. Mia tuta laboro estis do ripetado desegni kaj forviŝi sur la grafikpaperoj.

Ĉe la konstruado de fabriko mi spertis grandajn malsukcesojn. Tiam, kiam finkonstruiĝis Swany Azia en Koreio, mi surpriziĝis pro tio, ke ĉe la enirejo de la oficejo troviĝis ĉirkaŭ kvin centimetroj da niveldiferenco, kaj mi malfacile luktis kun ĝi. En Kamboĝo inter fabriko kaj oficejo troviĝis 15 centimetroj da elstara parto. Mi multe surpriziĝis. Kvankam mi sukcesis platigi la parton, la graveco de la administrado penetris en mian koron.

Miaj laboroj estis komplikitaj pro diversaj aferoj, nome, desegno pri fabrikoj, produktado de sakoj kaj rulseĝoj, ktp. Tiakaze, la grafikpapero estis fonto de “saĝo”. Antaŭ ĉio mi prideseignis planon sur grafikpaperoj, kaj poste mi enlitiĝis. Kaj, bona ideo ofte venis al mi en frumatena sonĝo.

7. Ĉiuj estas instruistoj

Lerni de aviadilo

Estas malnova okazaĵo. Dum ĉirkaŭ 20 jaroj ĝis la mezo de la jaro 1980, la solaj pasaĝeraj aviadiloj en la mondo, kiuj povis veturi supersone, estis Douglas DC-8 aŭ Boeing 707. Ilia krozrapideco estis 870 km/h, kaj en la jaro 1961, tri jarojn antaŭ ol mi unuafoje veturis eksterlanden, aviadilo DC-8 iom superis la rapidecon de 1 maĥo (1225 km/h).

Dekstre kaj maldekstre de la trairejo de ĉi tiu aviadilo vicoj de po tri seĝoj estis dismetitaj, kaj la plej malantaŭaj seĝoj estis rezervitaj al la stevardinoj por ilia ripozo. Post la estingiĝo de la signo “almetu sekurzonon”, mi transiris malantaŭen, kie troviĝis seĝoj tute vakaj. La probableco por gajni tri seĝojn estis 70 aŭ 80 procentoj. Suprenlevinte du kubutapogilojn mi kuŝiĝis surdorse sur tri seĝoj, fiksas mian korpon per la meza sekurzono, kaj plue tenis unu brakon per la alia sekurzono. Kvankam la stato estis iomete mallibera, mi povis trapasi la kontinenton kuŝante, kiel en litvagono.

De la flughaveno Haneda al Nov-Jorko, mi veturis

per la flugo JAL 005 kaj revenis per la flugo 006. En la 1970-aj kaj la 1980-aj jaroj, kiam mi tre ofte uzis aviadilon, okazis tia afero: la stevardino, kun kiu mi amikiĝis, iam donacis al mi tuĉŝtonon, memoraĵon por la unuaklasaj gastoj, kun la vortoj “Sekrete, nur al vi!” La kvar aŭ kvin stevardinoj, kiuj zorgis pri mia kajuto, flugis de Haneda al Anchorage en Alasko kaj faris unu tranokton, en la sekvanta tago flugis al Nov-Jorko kaj tranoktis, post du tagoj revenis al Anchorage kaj tranoktis, kaj revenis al Japanio post kvar tranoktoj.

Tio okazis en la lasta duono de la 1960-aj jaroj. La aviadilo Modelo 707 flugis de Frankfurto al Nov-Jorko, kaj tri horojn post la deteriĝo, malaltiĝis preskaŭ tuŝante la marsurfacon. “Ne zorgu! Ĉar funkcias tri motoroj el kvar,” diris al mi najbare sidanta persono. Aŭdante tion, mi estis tute surprizita. La aviadilo neplanite alteriĝis ĉe Islando, kaj oni bezonis ses horojn por ripari ĝin.

En la manĝejo de la Internacia Flughaveno Kuala-Lumpuro de Malajzio, mi kune tagmanĝis kun la familio de la piloto de la aviadilo, en kiu mi veturis. Tiam li diris, “Poste mi invitos vin al la pilota kajuto, kaj li bonvolis fari ĝuste tion tuj post la deteriĝo. La aviadilo alteriĝis sur la Flughaveno Kota Kinabalu de Borneo, kaj ĝis Manilo mi povis ĝui la senkompare belajn pejzaĝojn el la kajuto dum la flugado — estis tempo, kiam oni povis fari tiajn aferojn.

En la 70-aj jaroj, kiam kun la filo de la prezidanto

de la kompanio “Gates” mi flugis per Air Arabia de Haneda al Manilo, la aviadilo ekvibris pro la influo de la ventego de tajfuno. La sakoj kaj la pakaĵoj elflugis el la superkapa pakaĵrako, kaj falis al la planko ĉirkaŭ la seĝoj kun albatigaj sonoj. La aeroframo de la aviadilo bruis “knar’ knar”. Virinoj kriis, “Kja—! Helpu min!”.

La persono sur la najbara seĝo ekrecitis sutron. Dum ĉirkaŭ unu horo, ĝis kiam la balanciĝo kvietiĝis, mi daŭrigis reciti la preĝvortojn “Amacu-Norito” de Oomoto.

“Tro frue venas morto al mi! Bonvolu lasi min viva por miaj filinoj Ajako, Masako, kaj Jasuko.”

Tiam al mi ne venis la nomo de mia edzino Yoshiko nek tiu de la kompanio. Povis esti ke ankoraŭ miaj infanoj estis tre junaj, sed krom tio, mi konjektas, ke en urĝa okazo la homoj pripensas unue pri siaj infanoj. Tiam, kiam la aviadilo alteriĝis sur la Internacia Flughaveno de Manilo, spontanee okazis aplaŭdo de la pasaĝeroj.

En la lasta duono de la 80-aj jaroj mi flugis de Montrealo en Kanado al Helsinko en Finnlando. Kiam mi eniris en la aviadilon de la nokta flugo “Finnair”, la transa flanko de la kvina seĝo estis septita per muro kaj en la aviadilo troviĝis nur 30 pasaĝeroj. Ĉi tiu estis aviadilo, kiu ŝarĝis sin per pasaĝeroj kaj ankaŭ kargo: mallevente la dorsapogilojn de seĝoj, tie oni metis la kargon.

Mi flugis 100-foje inter Japanio kaj Usono, 50-foje

inter Japanio kaj Eŭropo, 150-foje inter Japanio kaj Koreio, 300-foje inter Japanio kaj Ĉinio, kaj tiel mi rondiris la terglobon 150-foje.

Mi ne povas min montri antaŭ f-ino Greta Thunberg, kiu estas aktivistino pri la mediaj problemoj, kaj prezentas sian opinion: “Ne veturu per aviadilo, kiu uzas multe da energio.”

Lerni de hoteloj

Ĉi tiu estas hontinda aferoj, kiujn mi spertis en la 1970-aj jaroj.

En la ĉambro de la 4-a etaĝo de la hotelo en Duseldorfo, Germanio, mi estis trinkanta kolaon. Senkonscie mi malfermis la fenestron kaj metis la botelon sur la fenestra framo. En la sekva momento, la botelo falis. Mi eligis etan krion “Aĥ”, sed jam estis malfrue. Tuj poste aŭdiĝis la krako “gaan”, kiam la botelo frapis la malantaŭan parton de aŭtomobilo inter viro kaj virino sur la strato. Mi estis surprizita, kaj ŝajnis dormadon sub la lankovrilo en la lito.

Tuj poste dungito de la hotelo kun la viro venis en la ĉambron. “Ĉu vi ne ĵetfaligis kolaon?” ili demandis min. Kvankam mi devis tuj pardonpeti, mi mensogis, “Mi nenion rimarkis, ĉar mi dormis!”

Ili unufoje eliris sed poste revenis, kaj diris, “La kulpulo povas esti neniu krom vi.” Post severa kaj ĝisfunda admono mi pagis la monon samvaloran je

ĉirkaŭ 50 mil enoj, kaj la afero finfine estis solvita. La vortoj “Mensogo estas komenco de ŝtelisto,” penetris al mi en la koron.

En 1971, mi estis konsternita, kiam mi vidis eksteron el la fenestro de Royal Hotel ĉe Myeong-dong en Seulo: Fumego amase leviĝis el la 22-etaĝa hotelo “Daeyeonggak”, kiu troviĝis proksime de mia loko. Kaj el la fenestroj homoj ĵetis sin unu post alia. Helikoptero giranta malsuprenigis ŝnuritan ŝtupetaron sur la terason, kaj elsavadis homojn. Iam ĝi levante du gevirojn komencis transporti ilin al najbara konstruaĵo, sed meze de la klopodo, la manoj de la paro deiĝis de la ŝtupetaro, kaj ili denove falis sur la tegmenton.

Mi tremegis pro la teruraj scenoj. Mortis 163 personoj kaj vundiĝis 63. Multaj helikopteroj alvenis al la loko, sed tamen la plejmulto nur girflugis ĉirkaŭe. Ĉar la antenoj de la tegmentoj estis ĝenaj, ili ne povis surparki. Dum la fajrego, per trajno mi moviĝis al la urbo Daegu, kiu troviĝis 200 kelkdek kilometrojn sude, kaj en la hotelo mi petis loĝi “en ter- aŭ unuaetaĝa ĉambro”, sed la servisto diris, “Escepte de la ĉambroj pli altaj ol la kvaraetaĝaj, ĉiuj estas jam okupitaj.” Ĉiuj gastoj fortenis sin de la altegaj etaĝoj.

Sekvis afero en la 80-aj jaroj. Kiam mi dormis en la hotelo “Statler Hilton” en Detrojto, noktomeze sonoris la telefono de la ĉambro. La rapidegan parolon mi tute ne povis kompreni. Samtempe mi

aŭdis la bruon de homoj ekkurantaj sur la koridoro. Ĉu brulego!? Mi vestis min per jako kaj viviriske malsuprenkuris la ŝtuparon. Ĉe la vestiblo kolektiĝis centoj da personoj.

“De kie?” “De la insulo Ŝikokuo en Japanio. Ĉu vi scias pri Ŝikokuo?” komenciĝis interparoloj inter loĝantoj. Kiam lumiĝis la ĉielo, trinkaĵoj kaj sandviĉoj estis servitaj. Ĉiuj ĉambroj estis esplorataj de la policaĵoj pri bomboj. Ili devigis min resti en la ĉambro ĝis tagmezo; kvankam mi pensis, ke mi estis sekure liberigita, laŭdire, ĝi estis telefona petolaĵo, t.e. falsa anonco por eksplodo. He, ne faru tian stultaĵon!

Sed tiuj spertoj donis al mi instruon. Onidire, kaze de hotelfajrego, multaj personoj eliras sen ŝlosilo de la ĉambro, kaj ili ne povas reveni en la ĉambron kaj mortas sur la koridoro. Mi pensas, ke se oni rampirus preskaŭ tuŝante la plankon, oni povus supervivi almenaŭ kelkdek minutojn, kaj plue reiri en la ĉambron, kaj elsaviĝi per eskalkamionoj, aŭ povus kapti la ŝancojn rifuĝi eksteren. Antaŭ ĉio, ne forgesu kunporti la ŝlosilon!

Lerni de judoj

Tio estis tempo de “Strong” en ĉirkaŭ la jaro 1960. Komerca intertraktado kun Grisman, la plej granda firmao en Kanado, estis aranĝita inter s-ro Grisman

Jr. (filo); s-ro Cohen, la estro de la Tokia filio; kaj la sekciestro de Strong, en apuda konstruaĵo de la Imperia Hotelo. Ĝi estis aranĝita en ĉiu novembro, kiam la stato de la vendado fariĝas klara. Dum tagmanĝo ĉe la Imperia Hotelo, falis mia bifstekoj sur la plankon kaj mi embarasiĝis kaj rapidis al la necesejo. Eble ĉirkaŭ kvin minutoj pasis. Kun honto mi revenis al la tablo kaj trovis novan bifstekon sur la telero.

S-ro Cohen laŭdis min, “S-ro Miyoshi estas Doktoro Ganto!” tiel li ŝanĝis la etoson.

Li administris la komercajn intertraktadojn. “Jelmin kostas 740 enojn por unu metro, ĉu ne? Kiom vi bezonas por dekduo?” “Ni bezonas 0.43 metrojn.” “Ĉe Fuji-Sangyo estas nur 0.41 metroj,” li marĉandis. Poste li mem kalkulis internan ŝtofon, laborpagon kaj pakadon, kaj demandis, “Kiom da malneta profito vi bezonas?” “Ni bezonas 30 procentojn.” “Ni ne povus vendi ilin! Ni ne povas pagi pli ol 25 procentojn,” li marĉandis. Ĉio okazis tiom rapide, ke mi ne povis sevi la abakon kaj glitkalkulion per miaj okuloj. Post kiam ni ricevis la mendon, ni petis ilin redukti la koston de la materialoj, kaj certigis la malnetan profiton, nome, 30 procentojn de la venda prezo (43 procentoj de la neta prezo).

Li, Judo, venis al Japanio kiel unu el la ses interpretistoj de Generalo MacArthur. Li aĉetis ĉirkaŭ 100 cubojn (proksimume 330 m²) da tereno

en la urbocentro de Tokio per dumonata salajro, t.e. unu miliono da enoj, kaj loĝis en novkonstruita domo kun sia japana edzino. En tiu tempo, kiam la komenca salajro por viraj universitataj diplomiĝintoj estis 10,000 enoj, li gajnis altan salajron de 500,000 enoj. Post lia emeritiĝo, la terkotizo subite plialtiĝis kaj vendiĝis por proksimume 300 milionoj da enoj, kaj ili transloĝiĝis al domo kun naĝejo en la urbo Guadalajara, Meksiko.

Kvankam li estis ege strikta en komerco, li estis afabla al mi, handikapulo, kaj estis dankindulo, kiu donis al mi seriozan gvidadon. Li tre atente instruis al mi, kiel kalkuli. Li instruis anglan konversacion en la flua japana lingvo, emfazante la gravecon de laŭvoĉa ripetado. Li estis la unua instruisto, de kiu mi lernis anglan konversacion.

Mi lernis ankaŭ tian skribmetodon, kia ebligis registri unu varon en unu linio kun bildo por dekoracio en la dekstra rando. Du metroj da ekstera materialo \times 500 enoj = 1000 enoj, Du metroj da interna ŝtofo \times 300 enoj = 600 enoj, 800 enoj por salajro + 100 enoj por pakado = 2500 enoj por kostoprezio. Se la malneta profito estas 30 procentoj de la venda prezo + 5 procentoj por Strong, la indico estas 4.3-oblo (je la kurzo \$1 = ¥360), kio estas \$10.70 por dekduo. Kvar- aŭ kvindek komercaĵojn ni povis registri sur ĉiu paĝo.

Pli ol dek jarojn poste, profitante artan ekspozicion de Oomoto en Nov-Jorko, mi vizitis

Usonon, akompanante mian edzinon por la unua fojo. Ĉar la flugprezo tra Meksiko estis sama, ni vizitis la domon de gesinjoroj Cohen por esprimi mian dankemon. Ni tranoktis du tagojn en domo kun gastejo, ĝardenisto kaj servistino.

Ni ĝuis turismon en la urbo per Mercedes Benz. Poste, dum ni havis vespermanĝon, tio okazis. Mi diris senintence "Mi esperas, ke ni povos interrilati amikece kun la araboj." Tiam li subite ruĝiĝis pro kolero kaj diris, "Mortu la sovaĝuloj." Ni miregis. Eĉ lia edzino ne povis helpi min en mildigo de la etoso. La vizito en Meksiko fariĝis tre bedaŭrinda.

Mi supozas, ke interamikiĝi kun araboj estas ne akcepteble por judoj, kiuj kredas je judismo. S-ro Cohen estas afabla kaj ĝentila homo, tamen... Troviĝas muroj historia, kultura kaj religia, nekomprenblaj por japanoj. Komerco konsciigis al mi la malproksimecon de monda paco.

Lerni de akcidentoj

Mi spertis ankaŭ ĉi tian aferon. En la nokto de la 13-a de julio, 1977, mi estis invitita de la rezidanto de New York Glove kaj lia edzino. Ni vespermanĝis sur la kontraŭa bordo de Manhattan. Post la 8-a horo, subite, la brilantaj ĉielskrapantoj antaŭ mi fariĝis tute mallumaj. Okazis granda elektrorompo. Per kandela lumo sur la tablo, servistinoj komencis

kolekti la monon por la manĝoj.

La lumoj de semaforoj estingiĝis, kaj la vojo al la hotelo estis ŝtopita per aŭtoj en longa vico. Mi iamaniere sukcesis alveni al la hotelo, kaj kompreneble la lifto haltis. Mi kuris supren laŭ la savŝtuparo ĝis la 10-a etaĝo, sed la klimatizilo en la ĉambro ne funkciis kaj mankis akvo. Mi havis nenian elekton ol lavi mian vizaĝon per kolao, kaj ĝi gluiĝis. Mi lavis min denove per biero, kaj ĝi refreŝigis min. Kiam mi malfermis la fenestron, la kriza sireno daŭre sonoris, kaj mi neniom povis dormi ĝis la mateno.

Laŭdire, en la flughavenoj Kennedy, LaGuardia kaj Newark, la aŭtaj lumoj de la laborantaro ĉiuj estis mobilizitaj por surterigi la aviadilojn. Ŝtelado, rabado, kaj perfortaĵoj ĉirkaŭvagas. Televido dissendis la aktualajn scenojn en la malluma urbo.

Miloj da homoj estis enfermitaj en liftoj, kaj oni mane manipulis la liftojn por suprenigi kaj por malsuprenigi ilin. Troviĝis lokoj, kie oni trarompis la muron por savi la enfermitaj homoj. Sepdek tri tiaj liftoj ekzistis en la Empire State Building. Feliĉe jam multaj estis revenintaj hejmen, ĉar ĝi okazis je la oka horo en la vespero.

Jen estas alia rakonto. 10 monatojn kaj 10 tagojn post la kurenta interrompo “naskiĝis multaj beboj” — tian filmon mi vidis en aviadilo post pluraj jaroj.

Jen alia sperto, kiu okazis al mi, kiam mi kunportis faldeblan biciklon el Japanio al Nov-

Jorko. Servistino en la restoracio rapidis por informi min, ke la ĉeno de mia biciklo estis tranĉita. Kiam mi eliris, mi vidis nur tranĉitan pecon de ĉeno sur la vojo. Ĝi estis ŝtelita en nur kelkaj minutoj. Estis strange, ke ĉiuj bicikloj en Novjorko havis nur malantaŭajn radojn. Sed mi eksciis, ke la antaŭaj radoj estis alportitaj al la oficejo dum la laboro.

Iun tagon, mi estis vekita per frapado de pordo noktomeze. Kiam mi malfermis ĝin timeme, afrikdevena virino staris tie kaj petegis min: "Mi estas gasto en la apuda ĉambro, sed mi forgesis mian ŝlosilon en la ĉambro. Bonvolu pruntedoni al mi vian telefonon." Mi surpriziĝis, ĉar la virino puŝis la pordon tre forte por eniri. Mi fermis la pordon per ĉiuj miaj fortoj, dirante: "Iru al la akceptejo." Antaŭe kliento en Nov-Jorko diris al mi, "Mia vivo estis en danĝero, ĉar aliaj personoj invadis mian ĉambron per koketa tekniko."

S-ro Ed de la kompanio Handal en Nov-Jorko estis sufiĉe sperta homo. Ĉiufoje, kiam mi vizitis lin, "Swanee, Swanee", li kantis por mi la kanton "Swanee River". Kiam li estis invitita al tagmanĝo, li intence parkumis en la parkejo malpermesita kaj enmanigis al la polico dek-dolaran bileton. La sistemo funkciis, ĉar ili gardis la aŭton.

Ĉe la japana restoracio "Mikado" en Nov-Jorko mi ofte vidis duopajn policanojn manĝantajn vespermanĝon. Ĉe la reveno de la posedanto estas danĝere, ĉar ŝtelisto gvatas la ŝancon por rabi la

vendmonon. Do, ĉiunokte, tuj antaŭ la fermotempo, ili venas kaj akompanas hejmen la mastrinon kaj la enspezitan monon.

Lerni de parolmaniero

Tio okazis en malnova tempo.

Mi ĉeestis la kurson “Parolmaniero por ŝanĝi la vivon”, okazinta en la hotelo de la urbo Takamacu, en la daŭro de tri tagoj kaj du noktoj, sub la gvido de s-ro Egaŭa Hiroŝi (la fondinto de “Japana Centro por Lingva kaj Komunika Trejnado”). Mi pasigis la tagojn atenteme kaj kontente.

La ĉefaj punktoj de la leciono estis “Maniero por ne perdi trankvilon antaŭ publiko”, “Kiel oni trovas la temojn?”, “Kiel oni ligas bonajn interrilatojn?” ktp. Efike uzante la manierojn lernitajn mi prezentis min al ĉiuj partoprenantoj. Kaj rigardante la videofilmon mi ricevis gvidon, kiel mi plibonigu la kutimaĵon, parolrapidecon, intonacion ktp.

Pri la temoj “miaj fiaskoj”, “se laŭdi aliajn homojn” kaj “memoraĵoj ĉe la kurso”, ĉiuj ĉeestantoj faris tri-minutan paroladon. Bonaj punktoj estis laŭditaj kaj koncerne la malbonajn, oni instruis la manierojn por plibonigi ilin.

Mi tro laŭdis la kravaton de viro, kiun mi hazarde renkontis en la lifto de la hotelo dum la trejnado. “Ĉu vi sentas, ke ĝi tiom konvenas al mi?”, li ĝojegis kun

vizaĝo ruĝiĝinta kaj tuj ĝin demetis. “Ĝin li donacis al mi,” mi parolis kaj ĉiuj partoprenantoj aplaudis min. Mi klare memoras la scenon, kiu okazis antaŭ pli ol 40 jaroj. Ekde tiam mi daŭre sendis la dungitojn de mia kompanio al la kurso.

Mi sendis al la kurso por parolmaniero s-rojn Nakaniŝi Joŝiharu, Okudai Jasuŝi, Imataki Sakuĵi, Iŭaki Takaaki ktp. kiam ili estis novaj dungitoj. Unu el la kursanoj, kiuj lernis kun ili, poste sendis al mi leteron plenan je varma koro: “Mi vidis la dungitojn aktive kaj laŭte paroli en la kurso. Kaj mi emociiĝis pro la interna ideo de via kompanio, kiu rigardas grava la evoluon de homaj rimedoj.”

Jen alia okazintaĵo — kelkaj estraranoj de la virina asocio en la urbo vizitis mian hejmon. Ili petis mian 40-jaraĝan edzinon fariĝi la prezidanto, sed ŝi rifuzis ĝin, “Mi ne meritas la postenon, cetere mi ne havas memfidon paroli antaŭ publiko.”

Mi do multfoje rekomendis al ŝi ĉeesti la kurson “Parolmaniero por ŝanĝi la vivon.” Malgraŭvole ŝi ĝin vizitis, sed daŭre ŝi diris, “Mi restas sen memfido.” Mi plue rekomendis ĝin, kaj ŝi diris, “Mi ĉeestu ĝin”, kaj ekiris al la kurso. Ŝajne en la dua vizito ŝi havis iom da memfido.

Klara estis la efiko. Unu post la alia ŝi okupiĝis je: la prezidanto de la virina asocio de la kvartalo Honmaĉi, la prezidanto de la virina asocio de la urbo Higaŝikagaŭa, la prezidanto de la virina sekcio de Ookaŭa-Hooĵinkai, la prezidanto de

la filio Shirotori-bunŝo de Oomoto, kaj unu el la reprezentantoj de Oomoto.

S-ro Tom, la vicprezidanto de Swany America, diris al mi, ke la edukado de parolarto estas nepre necesa en Usono. Mi komprenis, ke pro tio usonanoj ne lasas la mikrofonon, dum japanoj emas fuĝi de la mikrofono — denove mi sentis grandan diferencon inter la du popoloj.

Ravite aŭskultante la triumfajn deklarojn de Prezidento Biden kaj Vicprezidento Harris, mi rememoris tiun impreson.

Lerni de prelego

Mi havis multajn ŝancojn paroli antaŭ la dungitoj ekde la juneco; mi spertis multfoje tian animstaton, ke mi, konfuzita, perdis konscion kaj povis rememori nenion, kion mi parolis. Mi neniom embarasiĝas, se ĝi estas normala konversacio. Kial do mi ne povas bone paroli antaŭ publiko! Mia patro multfoje riproĉis min dirante, “Kiel mallaŭta estas via voĉo! Mi ne povas aŭdi, kion vi diras.”

Ĉirkaŭ la jaro 1970, mi legis la libron “Parolmaniera kurso de Carnegie”, verkita de Dale Carnegie. Tiu ĉi libro estas utila ne nur por parolarto, sed ankaŭ por klerigado. Ĝi klerigas pli profunde kaj vaste ol la kadro de parolarto, kaj ĝi estas plena je diversspecaj parolartoj. En ĝi estas skribite, “Parolu pri viaj

travivaĵoj. Sorĉu per la unua voĉo. Postulu levi la manojn.” Ĉi tiun libron legis naŭ milionoj da homoj en 100 landoj kaj en 30 lingvoj; ĝi estas superfurora libro, eĉ nun daŭre vendata.

Kiam mia legado atingis ĝis la trifoja, venis al mi la peto de prelego, tiel ke mi parolu ion sub la temo “Ŝanĝo de Vidpunkto.” Kvankam al mi mankis memfido, mi rememoris unu frazon en la libro, “Vi havas ŝancon, nur kiam oni petas vin! Eĉ se vi varbus aŭskultantojn pagante po 50 dolarojn, neniu venus en alia okazo!”

“En la stato animforesta mi subite elkuris el mia domo rajdante sur skotero,” siatempe tiamaniere mi komencis la prelegon. Ĉi tiu estas rakonto pri la tempo, kiam mi perdis mian amon. Mi obeis al la instruo “Ne faru enkondukon.” Poste mi povis paroli sen perdi trankvilon. Troviĝis ankoraŭ nekontentigaj punktoj, sed mi sentis min jam sufiĉe kreskinta, kompare kun mi en la tempo, kiam mi estis riproĉata de mia patro kaj kiam mi hontis perdinte trankvilon antaŭ publiko.

Post tio, la ŝancoj de prelego plimultiĝis kaj ilia okazigo superis 200 fojojn en diversaj lokoj de la tuta lando. “Travivaĵoj pri administrado” estis la ĉefa temo.

Sed estis ankaŭ tia afero. Kiam mi faris prelegon en la loka elementa lernejo, la lernantoj de la unua kaj la dua lernojaroj en la plej antaŭa vico komencis ĵeti siajn ŝuojn unuj al aliaj. Konfuzita,

mi ne povis paroli plu, kaj la lernantoj ne ĉesis, kvankam ilin skoldis la instruisto. Tiam mi ŝanĝis la parolmanieron kiel la infana, “Pardonon, ĉu vi povas kompreni ĉi tian rakonton?” Ja teruraj estas amindaj infanoj.

Lerni de laborpropono

En la 70-aj jaroj fariĝis urĝa tasko la dungado de talentuloj, sed tio estis ne facile realigebla, malfacila entrepreno.

Iun jaron kvar aŭ kvin studentoj varbiĝis, kaj ni aranĝis la informkunsidon en hotelo antaŭ la stacidomo de Hiroŝimo. Sed venis nur unu studento, dum ĉe nia flanko ĉeestis mi kaj du oficistoj, kiuj respondecis pri la dungado. Antaŭ mi nur unu studento sidis. Dekomence fariĝis la buŝekzameno de la kompania prezidanto, kaj do la studento ŝajne tre embarasiĝis.

Krome, la homoj, al kiuj mi havis simpatian, ĉiuj senescepte rifuzis dungiĝi. Same kiel geedziĝo, ambaŭ flankoj devas ami unu la alian, se ne, ne iros bone, ĉar ambaŭ estas vivriske seriozaj. La ĉefa punkto estas, kiamaniere ni igu sian amaton turni sin al nia flanko.

Nu, mi pripensis. “La vojo al venko estas nur unu. Nia flanko devas esti ĉarma. La ĝenerala “gvidlibro de kompanio”, “materialoj, kiuj donas komprenon,

ĉu la prezidanto estas fidinda persono aŭ ne”, “taksoj de loka socio pri la kompanio” — ĉi tiuj ĉiuj devas esti klaraj al la studentoj. Por atingi la celon unue ni aldonis la takson pri Swany fare de s-ro Kanajama Nobuo, la pioniro de samtempa interpretado, kaj plie ni aldonis skribaĵon de la verkisto Fukada Juusuke pri Swany. Ni aldonis ankaŭ la artikolojn, raportitajn de amaskomunikiloj, kronologie aranĝitaj por ilia legado.

En la jaro 1979 Swany ricevis la premion “Elstara Reklamado-Premio” de la ĵurnala eldonejo Ŝikoku-Ŝinbun kune kun Sunnymart (la superbazaro, kies ĉefsidejo situas en la urbo Kooĉi). Koncerne la reklamon de dungpropono, ni uzis la foton de s-ino Diane, anglalingva instruistino el Florido, kun la fot-teksto “Jen, fariĝis tiel bona ŝia ĉanoja metodo”. Tia klopodo fruktiĝis kaj Swany estis elektita de studentoj en Kagaŭa, kiel unu el la plej popularaj dek kompanioj. Dank’ al tio, talentuloj komencis kolektiĝi.

Sed ne ĉiam bone iris la aferoj. Iun jaron la studento de Universitato Tokuŝima, kiu restis en la fina elekto, diris al mi, “Mi rifuzu labori en Swany, ĉar oni traktas ledon en la fabriko.” Mi tuj rimarkis, ke li surmetas ledajn ŝuojn, kaj diris, “Ankaŭ vi estas kunkulpa pri bestmortigo!”

Ĉirkaŭ la tempo, kiam Swany fariĝis populara, mi petis dungitojn, ke ili prezentu talentulojn al mi. Iu intense respondis, “La prezidanto estas tro elektema

kaj netolerema, kaj ĉiam serĉas la difektojn de homoj. Se vi plibonigus vian imagaĵon, certe talentuloj varbiĝus.” Ekde tiu nokto flagris en mia kapo la vortoj, “Elektema, Toleremo, Plibonigo de mia imagaĵo,” kaj mi daŭre turmentiĝis, tagon post tago. Mi portis pezan ŝarĝon per mi mem.

La supera administranta direktoro s-ro Micunaka kvazaŭ doni mortobaton diris, “Ĉar la industrio de gantoj faras laŭsezonajn produktojn, ni ne povas akiri talentulojn, kiajn ni atendas.” Mi ne havis vortojn por respondi.

Lerni de konsilo

Por verki ĉi tiun libron mi relegis la kajerojn kun notoj dum duonjarcento. Ĉar multaj postulis mian reripenson, mi deprimiĝis, kaj la kajero registris ankaŭ la rimarkigojn de s-ro Jagi Ĵunĵi, dungita en la jaro 1976.

Ili estis jenaj sep: 1) Avertu vidalvide, tuj kiam vi rimarkis. 2) La salajra nivelo estas tiel malalta, kiel tiuj de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. 3) Neniam vi aŭskultas nian opinion. 4) Nur s-ro Iŭasaŭa, malnova administranta direktoro, povas regi la prezidanton. 5) Nefidinda estas elekto al postenoj senplana. 6) Estas maltrankviliga la emeritiĝo de veteranaj estraranoj. 7) Agu pli ĝentile al via patro, la honora prezidanto.

Malalta salajra nivelo, malatento al la opinio de la dungitoj, manko de homo, kiu povas ludi la rolon regi min, elektoj al postenoj, pri kiuj neniu kontentiĝas, tromulto da emeritiĝoj, sinteno al mia patro — ĉi tiuj ĉiuj estis opinioj neniel refuteblaj. Mi forte sentis, kiel kulpa mi estis. Tiam aperis al mia menso la instruaĵo de la Kungvidanto de Oomoto, Majstro Deguĉi Hidemaru, “Se vi povos reformi vin mem eĉ iomete, via homa vivo ŝanĝiĝos 180-grade.”

La administranta direktoro s-ro Iŭasaŭa, jam eksiĝinta, sentis dubon pri la administra gvidado de ekstera instruisto, kiun li ricevis en la daŭro de 10 jaroj. Li diris: “Eĉ se ni lernus la komercan planadon kaj la manieron fari manlibrojn, ni povus rikolti nenian rezulton, sen scii pri nia kompanio mem. Ni devus sufiĉe diskuti ene de la kompanio kaj antaŭenpuŝi la aferon, kaj tiel ni povus pli bone trakti la dungitojn, sen vana elspezo.”

Por skizi la administran planon por sekvanta monatfino, mi pensis, ke estas valore ripeti la procedon, “Plan-Do-Check-Act (plani-fari-kontroli-agi)”, kaj konsulti kompetentulojn por kulturado de talentuloj. Sed, ĉe lia aserto: “povus esti plenumita pli bona traktado”, antaŭ ĉio mi havis bedaŭron.

Miaj antaŭuloj en diversaj fakoj instruis al mi, “Kiam vi laŭdas iun, faru per skribaĵo, kiam vi riproĉas, faru parole.” Sed reale mi faris la malon, kaj mi faris kelkajn fuŝojn. “Se vi anticipe

dokumentus ilin, vi povus fari tion ene de 2 minutoj,” iun tagon mi rete riproĉis la administranton s-ron Iŭaki Takaaki, kiu kreis la movbildojn de Swany Bag. “La fotisto diris, ke mi parolu libere” li klarigis. Sed mi ne sufiĉe aŭskultis lin. “Ho, ve!” mi memkritikis tuj poste, sed jam vane.

Lerni de fremdaj lingvoj

Mi igis la kompanianojn lerni la anglan konversacion, ĉar mi mem longe suferis pro tio.

De la jaro 1970, Swany invitis multajn instruistojn de la angla lingvo, kaj totale ĉirkaŭ 100 personoj lernis de ili. Sed pro la nesufiĉa administrado de la instruistoj ni ne povis vidi tiom bonan fruktiĝon, kiom mi esperis. Kvankam estas fakto, ke la kompanianoj al kutimiĝis al la angla...

En la jaro 1977, en la lernejo de la fremdlingva konversacio en la urbo Takamacu, s-roj Go Yeong-bae kaj Ju Bjeong-su, koreaj dungitoj, lernis la japanan konversacion, kaj s-ro Itano Cukasa la anglan kune kun kelkdek japanoj. La lernokotizo de persona leciono kostis 4,000 enojn por 40 minutoj. Kvankam ĝi estis fruktoriga, mi devis pagi milionon da enoj ĉiumonate por ĉiu lernanto.

En la jaro 1975, tri jarojn post nia elpaŝo en Koreion, mi komencis lerni la korean lingvon. Invitante instruiston el Berlitz, mi ricevis la lecionon

ĉiutage dum kvar monatoj. Por japanoj la korea lingvo estas la fremda lingvo plej facile lernebla kun partikuloj similaj al la japanaj *te*, *ni*, o kaj *ha*; mi eĉ pensis, “Ĉu el la korea lingvo naskiĝis la japana lingvo?”

Iam ĉe la Flughaveno Pusano mi ricevis de la kontrolisto de enlandiĝo la demandon, “Via prononco estas korekta. De kiu vi lernis?” “Mi lernis ĝin en la lernejo Berlitz” mi respondis. “Bela prononco!” li diris kaj donis al mi firman manpremon.

Let's start the lesson!

Ekde la jaro 2017, prezidanto Itano, la heredanto de mia kompanio, komencis igi 13 kompanianojn ricevi la enretan lecionon de la angla konversacio “*Biz mates (Komercaj Amikoj)*”. Kie ajn ili restis, ili povis ricevi la lecionon, se ili havis personan komputilon. Tiu ĉi estis speciala lernejo de la angla konversacio, limigita nur por profesia celo kun 400 instruistoj. Ĉiuj instruistoj estis filipinanoj, kiuj spertis la instruadon de la angla en universitato, kaj malkara estis la monata honorario: 12,000 enoj por ĉiu.

La instruistoj estis amikemaj kaj lertaj. Lernantoj do havos sufiĉan lingvokapablon post unu jaro, mi pensis.

Lerni de necesejo

Mi embarasiĝis pro la alteco de la neceseja pelvo de urinado ĉe “Paris Glove” en la urbo Montrealo, Kanado. Al mi, malaltstatura, tro alta estis la pelvo. Mi, atinginta la ekstremon de embarasiĝo, provis demandi Direktoron Fischer, samstaturan kun mi. “Kio! Uzu do la sidan necesejon!” li respondis.

Mi rememoris la devizon, kiun en mia juneco mi vidis en la domo de estrarano de Oomoto, apud la ŝtuparo al la jaŝiro de la ŝipdio Kumbhiro. “Trankvile apogante per mano ne preterverŝu eksteren la roson de fungo.”

En la vira necesejo de la tiama Internacia Flughaveno Hongqiao en Ŝanhajo, kiun mi vizitis en la jaro 1988, troviĝis la skribo “Iru ankoraŭ unu paŝon antaŭen”. Eĉ mi, ne kapabla je la ĉina lingvo, povis kompreni, kion ĝi signifas, dank’ al nia komuna skribsistemo!

En la necesejo de la kompanio “Avon” en Nov-Jorko estis skribite “*Don’t believe yours not so long*” (*Neniam fidu la vian: ne tiom longa*).

Kiam mi partoprenis en la Universala Kongreso en la urbo Vilno, Litovio, mi veturis en malgranda buso al la kongresejo de Varsovio en Pollando, najbara lando de Litovio, kune kun la polaj amikoj. Litovio estas la lando, kie la japana diplomato Sugihara Ĉiune liveris viziojn al 6,000 judaj rifuĝintoj kaj savis ilin komence de la Dua Mondmilito. Transirinta la

landlimon, mi vizitis benzinstacion por deprunti necesejon, sed, ĉar ĝi estis tro pura, mi hezitis kaj foriris sen uzi. Mi do plenumis en arbaro.

Tiajn spertojn mi multe akumulis en Koreio, Ĉinio kaj eĉ en Etiopio. En la 1960-aj jaroj de Japanio, kiam mi vizitadis subkontraktajn fabrikojn, mi ofte sentis naŭzon de la fetoro de la malnova necesejo sen akvoŝpruco.

En malnova tempo, ĉe “Tooa Hikaku” (Orient-Azia Ledo), en kiu mia patro oficis kiel estrarano, oni aŭkciis la altvaloran ekskrementon. Tiamaj kompanianoj rapide revenis hejmen, eltenante fekadon por fari sia riĉaĵo eĉ fekaĵpecon.

Tio okazis, kiam ni etendis nian entreprenon ĝis Tokuŝima. Mi plenumis naturan postulon en la necesejo de “Swany Tokushima”, kiun ni fondis en la urbeto Mijoŝi luinte lernejon. Sed mankis higiena papero. Senrimede mi deŝiris duonon de la suba parto de mia ĉemizo kaj plenumis la deviŝon. Mi rehejmiĝis kaj, kiam mi volis baniĝi, “Kio okazis al via ĉemizo!” diris Yoshiko kun konsternita mieno. Ĝis vespero jam defalis de mi la memoro.

Ĉe “Swany China” sub la truo de necesejo atendis malsataj porkoj. Malgraŭ ĉio, kompatindaj estas la ĉinaj porkoj, kiuj povas gajni nur la plej ekstreman “malluksan manĝaĵon”! Ĉu krom mi neniu pensas tiel?

En la jaro 2007 mi aŭskultis prelegon de ruso en la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la

urbo Jokohamo. Laŭ la ruso, surprizita de la vasta kaj pura necesejo por japanaj handikapuloj, li pensis, “Se meti liton, ĝi estas pli pura ol la dormoĉambro de mia domo.”

Lerni de Yoshiko

De post la geedziĝo mi daŭre baniĝis kune kun mia edzino Yoshiko. Kiam Jasuko, mia plej juna filino, estis elementa lernejano, ŝi diris post la vespermanĝo, “Paĉjo, ĉi-vespere mi helpu vian baniĝon. Vi ne povas sola baniĝi, ĉu ne?” Alvenante al vesperaj jaroj, mi denove komencis kune baniĝi intime kun Yoshiko. “Ho! Tro malvaste!” ŝi diras, kaj tamen kun rideto.

Post la Niŝi-sistema san-gimnastiko, mi prenis manĝon, senatente min apogante sur kubuto pro laciĝo. “Nu vi! Kia konduto!” “Pardonu, pardonu! Ĉar mi estas iom laca...” “Eĉ se vi pardonpetas al mi, neniom utilas!” de ŝi ektondris sur min.

En mia juneco iu gasto vizitis nin nokte. Ĉe la enirejo ni adiaŭis la gaston; ĉar la gasto jam eliris kaj fermis la pordon, mi volis estingi la eksteran lumon. “Ne, ne estingu,” ŝi riproĉis min. “Ĝis tiam, kiam la figuro de la gasto malaperos, nepre ne estingu.” “La koro de gasto ĉiam akompanas malantaŭ ties dorso!” min admonis Yoshiko.

Antaŭ la vizito de gasto Yoshiko nepre komencas

purigi ĉirkaŭe. Eĉ se mi diras, “jam sufiĉas”, “Tia ne sufiĉas!” ŝi diras, kaj daŭrigas la ordigon, kovrante per tuko la bretojn de razilo kaj de farboj k.a. “Jam sufiĉas!” mi diris, tamen ŝi tute ne aŭskultas. “Mi ne malvenku,” mi pensis, kaj klopodas por depreni rubaĵojn, irante tien kaj tien. La poŝo de Swany Bag estas nia rubujo.

Ĉiumatene mi razas min kaj kombas la hararon. “Malantaŭe fendiĝas la hararo,” ŝi diras kaj rekombas por mi. Kaj kiam ŝi iom akvumis la kombilon, la hararo jam ne fendiĝas facile. “Butonumi la ĉemizon ĝis la plej supra loko estas malelegante!” “Zipon de pantalono fermu ekzakte!” ŝi ĉiufoje min rimarkigas, kaj ŝi diras ankaŭ “Tuj prenu la telefonon, kiam ĝi sonoras!”

Antaŭ ĉirkaŭ du jaroj mi falis en embarasan situacion. “Ni kuiru alterne, ĉar vi kutime subtenas la ideon de ambaŭseksa egaleco,” ŝi komencis pretendi. Post sufiĉa konsidero mi proponis, ke mi masaĝu ŝiajn ŝultrojn kaj kolon plenforte dum 15 minutoj antaŭ enlitiĝo ĉiutage, kaj tiel mi sukcesis elturniĝi el ŝia atako.

La titolo de la felietona romano de *Nihon Keizai Shimbun* (Japania Ekonomia Ĵurnalo) en la jaro 2019 estis “Profesoro Miĉikusa”, kiu temis pri la fame konata romanisto Nacume Sooseki, verkita de Iĵuvin Ŝizuka. Sooseki lernis de sia pliaĝa frato: “Plejmulto da homoj mezuras la kapablon de homo laŭ ties figuro.” “Figuro? Kapablo?” “Jes, la grandecon de la

kapablo kiel homo. Tion oni juĝas rigardante ties sintenon.”

Nun, kiun mi volas prezenti, estas s-ino Ikeda Hiroko en la “Instituto de Homa Scienco”. Kion mi lernis de ŝi antaŭ 30 jaroj, estis tio: meti manspegulon sur la propran tablon. Mia vizaĝo en la speguleto, fiksita al la surtabla ujo por akcesoraĵoj, estas plej utila por observi min mem. Krome, se meti en unu loko akcesoraĵojn, ni povas mallongigi la tempon por serĉado ktp... La klara sentemo de mia edzino kaj mia obtuza sentemo ambaŭ kune fariĝas kapablo por unu persono.

Lerni de tajpilo

Ekde la jaro 1964, mi komencis kulturi novan merkaton en fremdaj landoj, uzante interpretiston. S-ro Macumura Hacu, veterana oficisto, tajpis la mend-detalon, kiun mi telefone sciigis, kaj ĝin kiel la mendateston li poŝte sendis al la kliento por la konfirmo.

Centojn da gant-terminoj, nome, pri mezuro kaj material-nomoj, k.a. mi tajpis, kaj estis Olivetti, kiu helpis tiun laboron. La tajpado estis facila. Per intensiva ekzercado, ĉiutage 30-minuta, daŭra je ĉirkaŭ semajno, mi mastris ĝis tia grado, ke sen vidi la klavojn mi povis tajpi latinajn literojn uzante ĉiujn fingrojn.

Kiam la komputilo anstataŭis la tajpilon, vendisto forte rekomendis al mi, “Per unu klavo oni povas tajpi du kanaojn, uzante la dikfingran klavon!” La tajpado estis multe pli malfacila, ol tajpi latinajn literojn, sed mi memoris la poziciojn post unu monato. Kaj ien ajn mi portis la komputilon “My Pocket” de Fujitsu, kaj kvankam necesis kelkaj jaroj, mi sukcesis tajpi eĉ en mallumeta buso. La raporto de komerca afero, ĝis tiam manskribata, ŝanĝiĝis al prestipo.

Intertempe Microsoft surlandiĝis sur Japanion. La komputilo por dikfingra konvertado fariĝis jam formortinta specio, kaj mi, pli ol 60-jaraĝa, devis defii la komputilon kun la sistemo JIS por tajpi en rondaj kanaoj, 20 procentojn pli malrapida.

Ĉe Swany, kie nur en la ĉefoficejo ĉirkaŭ 100 dungitoj uzas komputilon, de la jaro 2017 oni antaŭenpuŝas la tuŝ-tajpadon. Tiu, kiu estis klasifikita je la A-rango, ricevas la premion de 10 mil enoj kaj tiu, kiu estis klasifikita je pli supera rango, ricevas pliajn 10 mil enojn. Inkluzive de 11 personoj, jam dekomence kapablaj, 28 personoj ricevis premiemon. La nombro de tuŝ-tajpantoj plimultiĝis, de 10 procentoj ĝis 40 procentoj.

Laŭ s-ro Oomae Ken’iĉi, en Koreio kaj Ĉinio, oni antaŭenpuŝis la tuŝ-tajpadon: “Ne, ne!” frapis instruisto la ŝultron de mezlernejanoj, kiuj provis ŝtelrigardi tajperaron sub okulŝirmilo. Dudek jarojn pli malfruiĝas la ciferecigo kaj ankaŭ inter rapidecoj

de tajpado troviĝas granda diferenco — Ĉu ni povus lasi Japanion en la nuna stato?

Lerni de legado

Kiam mi estis lernanto de la dua mezlernejo, en la tria lecionhoro mi ofte manĝis portomanĝaĵon, kaŝante ĝin per la lernolibro. Ankaŭ mia lerneja poentaro estis tia, kia vagis ĉirkaŭ la loko, meza aŭ malpli alta. Tio ke mi ne lernis serioze, malhelpis mian progreson, mi pensas.

La lernejestro Page de “The Language House” en la urbo Takamacu kutime diris, “Se la homo estas lerta en karaokeo kaj parolas la japanan lingvon ĝuste kaj precize, li aŭ ŝi certe plibonigos la lingvokapablon de la angla konversacio.” Kvankam mi povas paroli iomete en la angla, mi ne povas skribi en ĝi. Estante en la stato, ke mi ne povas skribi poŝtkarton en la japana lingvo sen vortaro, eble mi pasigos mian tutan vivon.

“Eĉ se oni legus multajn librojn, verŝajne oni malŝparus tempon, se ili estus limigitaj je novelo, sed en nefikciaj verkoj troviĝas multe da utilaj aferoj lernindaj.” Jen estas la fragmento de *Tridek leteroj de komercisto al la filo*, verkita de s-ro G. Kingsley Ward. S-ro Carl Hilty diras en sia libro *Nutraĵo por la animo*: “La homo devas regule legi librojn jam de la juneco, kaj nenial legi senutilajn librojn.”

Kompreneble tio estas ia ekstrema ideo, kaj mi rigardas ankaŭ kelkajn romanojn elstaraj. Sed mi penis legi la verkojn laŭeble nefikciajn. Eĉ se oni demandas min, kion mi lernis de ili, reale mi ne povas respondi. Mia majstro pri la vivo, Majstro Deguĉi Hidemaru diras, “Iu ajn povas verki libron, sed akumuli spertojn estas plej grave en la vivo.” Tiel li klarigas la gravecon de spertoj.

En la jaro 2014 mi fariĝis membro de “Biblioteko Sapie”, publika servo aŭdigi voĉlegadon de rakontoj. Ĝi estas reta biblioteko por vidhandikapitoj, kiuj estas blindaj aŭ ne povas vidi senpene. La membroj povas aŭskulti ion ajn el 500,000 libroj, kiujn 220 societoj tutlandaj registris. Estas dankinde: se mi kuŝas kaj fermas la okulojn, mi povas aŭskulti ilin laŭplaĉe. Kaj mi povas havi realan senton surlokan kaj ili estas potencaj. Ekzemple, la verkoj de s-ro Donald Keene, kiu daŭre konigis la japanan kulturon tutmonde kaj fine estis naturalizita kiel japana civitano. Li verkis ĉirkaŭ 45 librojn en la japana lingvo, kaj 26 el ili estas konvertitaj en voĉon.

La kialo ke mi komencis uzi la bibliotekon estis jena: ĉirkaŭ la tempo, kiam mi ricevis la operacion por katarakto, mi komencis senti suferon ĉe la legado dum longa tempo, kaj s-ro Satoo Rikuo, unu el miaj intimaj amikoj ekde la dua mezlernejo, bonvolis sciigi al mi pri la biblioteko. Mi mem iris al la gubernia biblioteko de Takamacu, kaj tie enskribis la nivelon de mia handikapo k.a., kaj mi sukcesis

aliĝi al la biblioteko. Parenteze dirite, se oni instalas en sian komputilon la aplikan programon, kiu kostas 20 mil enojn, oni povas aŭskulti deklamon per bela voĉo kiel tiu de voĉaktoro.

Nur mirinda estas tio, ke la legado de alia homo ne bone restas en la memoro. Tial la librojn, kiuj donis al mi emocion, mi aĉetis kaj relegis. Ĉe la retvendejo troviĝas eĉ tia libro, kiu kostas nur unu enon; do ĝin oni povas aĉeti nur per sendkosto de ĉirkaŭ 250 enoj. Se ni enŝaltas komputilon, ni povas aĉeti ian ajn libron nur per kelkaj minutoj kaj jam en sekva tago ĝi atingas. Nun mi estas kutima uzanto de Amazon kaj Rakuten.

Lerni de preĝado

Jam de antaŭ duonjarcento, ĉe la Oomoto-filio Ŝirotori, oni komencas la matenan preĝon je la sesa kaj duono ĉiutage, kaj la unuan tagon en ĉiu monato oni kutime adorvizitas la jaŝiron Ŝirotori. Mia bedaŭrata patro komencis tion, kaj kvin aŭ ses homoj estis kutime partoprenantaj. Post la vizito en la jaŝiro, sen reveni hejmen, mi rekte eniris en la oficejon kaj enŝaltis klimatizilon. Jen estis mia tasko.

Efektive mi havis similajn spertojn ankaŭ en la mondo.

Dimanĉe en iu jarfino kun la genuoj tremantaj en

la malvarmo de minus 30 gradoj, mi piediris norden el la centro de la urbo Helsinko, kaj post 15 minutoj mi alvenis al la Preĝejo Temppeliaukio, konstruita tiel, ke oni elkavis rokegon; tiam mi estis surprizita. Malgraŭ neĝventego, tie troviĝis kelkcent homoj por la adoro, kaj solena meso daŭris, dum trasonoris orgeno. Mi estis unusola japano.

La preĝejo St Hugo of the Hills en la urbo Detrojto estas tiu, kiun s-ro Schiller, aĉetisto de Kmart, frekventas. “Mi estas la plej elstara aĉetisto en la mondo! Alportu al mi nur la plej bonajn kaj malmultekostajn gantojn!”, li forpelis min de la unua negoco. Li estas aĉetisto, kun kiu mi negocis dum kvin jaroj, kaj mia tenaceco finfine fruktiĝis. Ĉe la eklezio mi voĉlegis la preĝovortojn de Oomoto. Tio estis la unua kaj la lasta sperto por mi ĉeesti diservon kun aĉetisto.

Mi frekventis la Katedralon de Sankta Johano en Nov-Jorko, kie la eksterlanda ekspozicio de Oomoto okazis, en la jaro 1975. Iun dimanĉon mi ĉeestis la sanktan komunion, en kiu oni donas al la preĝantoj vinon, kiel sangon de Kristo. Post la meso la Dekano Morton prezentis min al kelkcent vizitantoj dirante, “S-ro Miyoshi, Oomotano, ĉeestas.” Kaj tio surprizis min.

Krome, mi vizitis la Preĝejon de la Enkarniĝo, la Katedralon de Sankta Mikaelo en Toronto, la Katedralon de Sankta Jakobo en Montrealo, kaj aliajn. Mi vizitis ankaŭ la japanajn sanktejojn,

Grandajn Jaŝirojn Heian kaj Kasuga ktp. Mi kredas, ke ĉiuj religioj tutmondaj devas esti ligitaj inter si.

En ŝintoismo oni rigardas “vortanimon” grava. Jesuo Kristo predikis, “En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio kaj la Vorto estis Dio.” La vorto havas forton vivi aŭ mortigi, laŭdire. Mi dankas la favoron de Dio, kaj esperas la progreson de ĉiuj religiaj, naciaj kaj lingvaj komunumoj laŭ la devizo de Oomoto, “Unu Dio, Unu mondo, Unu interlingvo.”

Mia duonvivo estis tia, ke mi klopodis lerni ĉion ajn de la ĉirkaŭa mondo, kaj apliki tion, kion mi lernis.

En la buso de Nov-Jorko homo, najbare sidanta, min avertis, “Tiamaniere vi estos gvatata de ŝtelistoj”, kaj atentigis, “Koncerne 20 aŭ 50 dolaran bankbiletan, ĉi tiujn involvu per la unudolara kaj enmetu en la monujon.” Mi eĉ nun kunportas la monujon, en kiu troviĝas dekmil-ena bankbileto, envolvita per la mil-ena. Ĝuste, “Najbaro estas instruisto.”

La dua ĉapitro

*Respondante al
Subtenaj Bezonoj*

Voĉoj de Uzantoj pri “subtenaj sakoĵ”

“Post kiam la kuracisto rekomendis promenhelpilon kaj mi ĝemis, mi trovis ‘Swany Subtenanta’ ĉe Grandmagazeno Keio. Mia infano akompanas min ĉiutage.” (N, Kvartalo Suginami, Tokio)

“La atendejo de Stacio Tokio estis plena, kaj la valizo kun sidloko bone funkciis. Krome, ĝi subtenis min en la longa kajo, do mi estas kontenta.” (Y, Urbo Iĉihara)

“Estas distanco de 100 metrojn de mia pordo ĝis la parkejo, kaj estas kvazaŭ songo, ke mi estas subtenata kun mia pakaĵo en ĝi. Ĝi estas bonega objekto, kiun mi tre amas, ĉar ĝi donas al mi senton de sekureco.” (H, Urbo Jokohamo)

“Kiam mi renkontas uzanton de Swany, eĉ kun nekonata homo tuj komenciĝas konversacio: ‘Jen ĉi tiu estas Swany!’ Mi estas tre ĝoja, ĉar unu post alia naskiĝas amikoj” (I, Urbo Kanazaŭa)

“En Singapuro, iu demandis min, ‘Kie vi aĉetis ĝin?’ Mi respondis, ‘En Japanio.’ Tiu ŝajne tre bedaŭris. Mi estas plena de dankemo al la persono, kiu pensis pri tia oportuna objekto.” (M, Urbo Fukuoka)

La ekspedo de Swany Bag superis 110,000 ekde la jaro 2013. Ĉiujare pli ol 8,000 enket-kartoj atingas la kompanion kaj en plimulto da ili troviĝas la vortoj laŭdaj kaj dankemaj. Tamen, antaŭ ol tiu

“korpoapoga valizo”, kiu helpas niajn paŝojn, fariĝis populara, ankoraŭ troviĝis sennombraj altaj obstakloj, kiujn ni devis transiri.

Eltrovo de “subtena valizo”

Estis en 1966, ke mi faris la trian travojaĝon tra la mondo. Sur la suda flanko de la Empire State Building en Nov-Jorko, mi estis altirita al la surskribaĵo de ŝildo "Garrard Bag". En la montrofenestro brilis la valizo kun radoj de 75 mm. “Kun tiaj solidaj radoj, oni ne necesas ĝin levi!” Momenton surprizita, mi dubis miajn okulojn.

Mi tuj aĉetis ĝin por 70 dolaroj (25,000 enoj), kaj en ĝin pakis la specimenojn de gantoj kaj personajn objektojn. Kaj mi promenis, min apogante sur la valizo. Mia tuta korpo estis apogita sur la valizo kun la pakaĵo ene, kaj mi sentis min centoble pli kuraĝa. Ĉar ĝis tiam, mi timis, ke la valizo de ĉirkaŭ 15 kg estas tiom peza, ke mi jam ne plu povos vojaĝi eksterlanden.

Mi aĉetis tiun valizon ĉiufoje, kiam mi iris al Usono kaj revenis kun ĝi, do troviĝis ĉirkaŭ dudekelkaj valizoj tie kaj tie en la kompanio. Ĝi rapide akiris popularecon, kaj ĉiuj dungitoj komencis uzi ĝin. La partoj de kudromaŝino kaj aliaj aĵoj, pezaj je pli ol 100 kg, estis facile transportataj.

Dum la vojaĝo tra la mondo, mi metis miajn

posedaĵojn en la tirkestojn de la hotelĉambro, kaj portis kun mi la malplena valizo kiam mi iris por manĝi, kaj min apogis al ĝi. Ĉiufoje, kiam mi faris merkatan esploron ĉe magazeno, la sekurecaj gardistoj rigardis min kaj diris: “Montru al mi kio estas en ĝi.” Tamen la enhavo estis malplena, do li klinis la kapon kaj diris: “Pardonu. Bonvolu eniri.”

Tamen, kiam ĝi estis plene ŝarĝita per gantoj, ĝi pezis ĉirkaŭ 20 kilogramojn. Sur ŝtuparo, mi kaptis la manrelon per la maldekstra mano, grimpis ŝtupon per la maldekstra piedo sola, kaj suprentiris la valizon per la dekstra mano. La maldekstra piedo estis trouzata duoble ol tiu de sanuloj. Eĉ malplena, ĝi pezas 7 kilogramojn, kaj mi sentis grandan laciĝon, kiam mi enportis ĝin en taksion.

Sed ĉi tiu valizo donis al mi grandan sugeston. En granda flughaveno, estas malfacile por homoj kun handikapo marŝi, ĉar mankas mansubtenilkooj.

Ĉu eblas apogi la korpon eĉ sur malgranda portsako same kiel valizo? Mi ekpensis, kiel komferte estus, se malgranda sako povus subteni mian korpon.

La defio evoluigi “subtenan sakon”

“Post la depono de la valizo en flughaveno, de ĝi oni ŝanĝas al valizeto kun radoj kaj teniloj! Oni povas marŝi facile kun subteno ie ajn!” Ĉi tiu ideo trakuris

mian menson. Sed, dum mi estis urĝata de mia ĉefa laboro t.e. komercado pri gantoj, kiel reprezentanto de Swany, aŭ dum mi revis pri “korpoapoga portilo”, paŝante en larĝa flughaveno, pasis 30 jaroj.

La ekonomia bobelo krevis kaj tutmonda varmiĝo evidentiĝis, kaj la vendoj de la gantindustrio falis de 66 miliardoj da enoj al 35 miliardoj da enoj. Fariĝis urĝa tasko trovi trajarajn artiklojn, kaj en 1992, strategiorenkontiĝo estis lanĉita por esplori kravatojn, ĉapelojn, kaj laborgantojn. Ĉiuj troviĝis meze de troa konkurado, kaj montriĝis, ke al ni mankis la rimedoj por venki.

En tiu tempo, mia pli juna frato Asao, ĉefa administra direktoro, sugestis ke ni faru valizojn, similajn al tiu, kiun mi aĉetis en vojaĝo kaj portis hejmen. Ni faris kelkajn, imitante tiun valizon, sed la rezulto estis nenio krom amatora malsukceso. Do, mi decidis akcepti la defion krei “korpoapogan malgrandan sakon”, kiun mi deziris dum multaj jaroj.

En 1995, la prova produktado de la “korpoapoga sako” komenciĝis. La problemoj estis “tenilo kiu subtenas la korpon sen tordiĝi” kaj “rado kiu libere turniĝas”.

Mi ekhavis la ideon septi la centron de la sako per muro kaj fiksi tenilon al la muro. Ĉar ĝi estis dividita en du ĉambrojn, ĝi povis akcepti nenion alian ol nur maldikaj aĵoj, kaj do, kiam ni komencis vendi ĝin, ni

devis fari malfacilan lukton. Tamen, atingis serio da reagoj de aĉetantoj: "Mi volis havi ĉi tian saketon."

Mi daŭre serĉis tian sakon, kiu kaj tenu grandajn objektojn kaj subtenu mian korpon. Se la tenilo ne estas en la centro, ĝi ne povas bone apogi, kaj se la tenilo estas en la centro, grandaj objektoj ne povas esti enmetitaj. Dank' al la lerteco de s-ro Takahara Joŝio, kiu havis kompleton da ilmaŝinoj, la evoluigo progresis. Ni provis la supren etendeblan eskalan aranĝon, tamen, ĝi ne estis uzebla pro malstabileco.

En 1996, mi flugis al Ŝanhajo kaj ripetis diskutojn kun la fabrikisto de sakpartoj, sed nenio naskiĝis el ĝi. Tiun nokton, elĉerpita, mi ekdormis en la hotelĉambro kaj vekigis kun sonĝo "fleksu la tubon". Mi eksaltis kaj desegnis diagramon sur grafikpapero. Se oni fleksos la flankan tubon laŭ radiuso de 5 metroj kaj tiros supren la tenilon, ĝi proksimiĝos al la centro! Kun ĉi tio, mi konvinkiĝis, ke mi povos marŝi apognte mian korpon.

"Mi elfaris!" mi kriis en tiu momento.

Sed tio estis nur sukceso surpapera. Ni demandis al kvin ĉefaj japanaj fabrikantoj de aluminio, ĉu ili povus fari kurbajn tubojn kun tri malsamaj dikecoj (dikaj, mezaj kaj maldikaj), sed ĉiuj diris "neeble". Poste, mi vizitis 10 tajvanajn tenilfabrikojn, sed la respondo estis la sama. Tamen nur unu kompanio asertis, ke ĉiu tubo povas esti tranĉita je la bezonata longo kaj fleksita en kvinmetran radiusan kurbon per hidraŭlika maŝino. Jen estas "Swany Bag",

kompletigita post ripetaj eksperimentoj por kiuj mi faris dekojn da iro-reirojn. Naskiĝis la "movanta manrelo", kiun mi deziregis dum 30 jaroj.

La portsakon, kiun mi trenis ĝis tiam, mi ŝanĝis tiel ke mi apogis mian korpon sur la sako, antaŭenpuŝante ĝin flanke. Ĉi tio fariĝis invento, kiu ŝanĝis mondajn tendencojn.

Edison diris, "Invento naskiĝas el 99 procentoj da klopodo kaj unu procento da inspiro", kaj ĝuste tio okazis — unu procento da inspiro rekompencis mian tutan klopodon, kiom mi faris ĝis tiam.

Ĝis la "subtena sako" fariĝos populara

Dum mi estis kontenta pri la kompletigo de la "subtena sako", kiun mi serĉis, mi alfrontis la malfacilecon ĝin vendi. Kvankam ĝi estis komercigita, la vendo ne pliiĝis dum tri jaroj, kontraŭe al atendoj.

Mi volis fari ĉi tiun sakon pli populara, do mi iris al sakobutikoj tra la lando por vendi ĝin. Multaj komercistoj neis tion, "Ne ekzistas sako, kiu subtenas la korpon," kaj eĉ diris, "Ne necesas tia afero." Sed, ĉirkaŭ 10 procentoj da vendejestroj diris, "Povas esti ke mia avino ĝojos," kaj iom post iom multiĝis vendejoj, kiuj komencis trakti la artiklojn. Baldaŭ sinsekve atingis reagoj: "Ili kontentigas uzantojn" kaj "aperas homoj, kiuj volas aĉeti la

sakon por la subteno.”

Sed, tiam aperis potenca “interna malamiko”. La ses sanaj fakestroj en la kompanio ne komprenis la bezonojn de handikapuloj. En ĉiumonata kunveno estiĝis tia situacio, ke ĉiuj estraranoj postulis al mi retiriĝi de la sakkomerco. Mi povas kompreni la senton de estraranoj, kiuj zorgas pri bankroto, kaj mi estis turmentata de soleco kaj persistemo. Mi elspezis kelkdek milionojn da enoj ĉiujare por sakoj, kiuj ne vendiĝis, kaj iuj eĉ diris: “Mi volas, ke la prezidanto faru tion memstare.”

En septembro 2000, kiam la akumula deficino atingis 400 milionojn da enoj, ni estis devigitaj elekti ĉu retiriĝi aŭ daŭrigi. Eĉ post ĉiuj malfacilaĵoj, el mi neniom malaperis la penso, “iam nepre komprenos min la publiko”, kaj post angoro dum tri jaroj, mi decidis salti de la scenejo de Kijomizu.

** la scenejo de Kijomizu: ĝi troviĝas en la budhisma templo Kijomizudera en Kioto. Jam de malnova tempo japanoj diras, “saltfali de sur la scenejo de Kijomizu”, kiam oni faras la plej grandan decidon en sia vivo.*

Mi deklaris al s-ro Isei Ŝuuĝi, estro de la fako de sakoj, “Mi petos ĉiujn estraranojn, kiuj kontraŭas min, ke ili eksiĝu kaj anstataŭigos ilin per junuloj.” “Se vi faros tion, nia kompanio bankrotos!” estis lia respondo.

Kiel rimedon por reviviĝo, mi pligrandigis la etikedon ĝis la grandeco de poŝlibro kun mia foto

(apogita sur Swany Bag). Tie, mi metis komenton, "Suferante pro la postefikoj de poliomjelito, mi daŭre volis fari la sakon pli malpezan dum centfojan vojaĝado ĉirkaŭ la terglobo. Fine, mi perfektigis la sakon, sur kiu mi povas apogi min dum marŝado. Miyoshi Etsuo, prezidanto de la gantokompanio Swany."

Ĉu la etikedo altiris simpatian? Mia "subtena sako" komencis laŭgrade akiri popularecon, kaj ankaŭ kompanio de koresponda vendo komencis reklami mian evoludramon. Ni provizis 700 sakojn por "Flora Ekspozicio Aŭaĵi" kaj pruntedonis ilin senpage, por ke multaj homoj konu la nomon de nia kompanio. Favoroj sekvis unu post alia: *Nihon Keizai Shimbun* (Japania Ekonomia Ĵurnalo) prezentis la sakon, kaj ĝi aperis ankaŭ en tutlanda televido. En tiu aŭtuno, feliĉe la vendocelo atingiĝis, la emeritiĝkonsilo malaperis kiel fantomo, kaj la voĉoj de opozicio kvietiĝis.

Dum du jaroj, kiam la daŭrigo de la saksekcio estis necerta, mia plej aĝa frato Tani Haĵime flugis el Tokio kaj partoprenis en ĉiumonataj kunvenoj. Li agis kiel bastiono kontraŭ la ses kontraŭuloj, kaj ni iel povis trapasi la malfacilaĵojn. "Swany Bag" nun okupas 25 procentojn da vendoj, farante sin promesplena komercaĵo.

Silente kaj glate turniĝantaj ruliloj

Dum la “subtena sako” komencis vendiĝi, klientoj ofte plendis, “La radoj estas bruaj! Mi devas levi la sakon kiam mi marŝas en loĝkvartaloj.” Tio tiom ĉagrenis mian cerbon, ke mi serĉis solvojn, cerbumis kaj perdis dormon nokte. En 2003, kiam mi zorgadis pri tiu problemo, mi trovis rulseĝon kun nur unu lagro en la centro de la antaŭaj radoj ĉe la “Internacia Ekspozicio de Hejma Zorgado kaj Rehabilito” ĉe Tokyo Big Sight. Ekbrilis momente en mia menso, ke “la kosto, bruo kaj pezo duoniĝos”.

Tamen, pro teknikaj problemoj, Swany sola ne povis ĝin komercaĵigi. Mi vizitis la kompanion Hammer Caster, kiu estas la unuaranga en Japanio rilate al tiuspeca fako. Mi petis la prezidanton Joŝida Haruiĉi, pri “teknika gvido por trankvilaj kaj glitigaj ruliloj.” Inĝenieroj tuj kolektiĝis kaj diris al mi, “Se vi metos la oleplenan lagron sur ĝian flankon, ĝi turniĝos senbrue.” Tamen, ĉar la forto pli malaltiĝis je ĉirkaŭ 30 procentoj, ni ellaboris plifortigan metodon, pri kiu ni akiris patenton.

Por komercaĵigi ilin, mi faris 100 vojaĝojn al Ŝanhajo dum sep aŭ ok jaroj. Kun la investo de kelkdek milionoj da enoj, estis kompletigita la rulilo, kiu povis esti movita silente per unu fingro, eĉ kiam ses 2-litraj boteloj estis enmetitaj. Ĉi tiu estas la produkto de la oka generacio, kaj naskiĝis 60mm-rulilo, la plej altnivela en la mondo, kiu subtenis

la akson kaj direktoŝanĝilon per ok oleaj lagroj. Krome, la radoj povas esti anstataŭigitaj uzante nur ŝraŭbilon.

“Ĝi turniĝas kiel sonĝo, kaj la ruliloj ne rompiĝas eĉ post la uzado dum 10 jaroj. La prezo estas alta, sed ĝi valoras.” (I, Gubernio Ibaraki)

“Ĝi turniĝas kaj moviĝas glate. Por iu kiel mi, kiu havas problemojn ĉe la kruroj, estas nenio, kio igas min pli feliĉa ol ĉi tiu. Mi faris la aĉeton tiom valoran, kvazaŭ mi supreirus al Paradizo.” (S, Urbo Akaŝi)

Amata de nehandikapitoj

“Kial vi aĉetis la sakon Swany Bag?” — por tiu demando 41 procentoj da respondoj estis “pro glata kurado”, 36% “pro apogebleco”, kaj 22% “pro facila direktoŝanĝo”. Ŝajne multaj nehandikapitoj uzas ĝin, ĉar la respondoj “pro glata kurado” estas pli multaj ol “pro apogebleco”. Jen kelkaj el la komentoj, kiujn ni ricevis:

“La interno estas hela kaj facile videblas, kio estas ene, kaj oni povas puŝi ĝin nur metante manon sur ĝin, do estas pli facile ol marŝi kun malplenaj manoj. En ĝi mi povas konservi kaj porti ian ajn aĵon, ĝi estas mia bona kunulo.” (M, Kvartalo Suginami, Tokio)

“Mi pensis, ke ĝi estas por maljunuloj, sed mi

sentas, ke mi estas tirata de Swany. Eĉ se mi metas 5 kg da pakajo en ĝin, mi povas marŝi komforte." (R, Urbo Jokohamo)

Sako kun anstataŭigeblaj radoj

Ĝis nun, la sako estis kudrita, la kadro estis enmetita, la tenilo kaj tubo estis fiksitaj, kaj la radoj estis fiksitaj per nitoj: estis multaj procezoj kaj partoj, fragilaj kaj multekostaj. Tial ni celis unikan strukturon, kiu ebligus meti ajnan sakon sur bazo kun radoj kaj teniloj.

En la kompanio la impreso pri tiu sako ne estis bona, "ĉar la pipo estas tute elmontrita, eble la vendo estos malfacila." Sed, la sako povas esti facile demetebla, tial la malpuraj radoj povas esti lasitaj ĉe la enirejo de la domo — tio estis la decida faktoro por akiro de la patento. Dudek jarojn post kiam mi ekhavis la ideon, 90% de niaj produktoj nun ŝanĝiĝis al la "tipo anstataŭigebla".

"La avantaĝoj estas la enhaveco, leĝereco kaj facileco de veturado, sed la decida faktoro estis, ke la sako povas esti demetebla. Mia filino estas tre purema, kaj se la radoj estas malpuraj, ŝi ne lasos min porti la kadron en la ĉambron!" (S, Urbo Macudo)

"Mi ĉiam demetas la sakon kaj alportas ĝin en mian ĉambron. Mi estis impresita pri la produkto,

kiu naskiĝis el la vivo de la antaŭa prezidanto Miyoshi, kaj mi bedaŭras, ke mi ne povis aĉeti ĝin pli frue.” (I, Urbo Tamba)

La signifo de evoluigo far handikapuloj

Estis la afero, kiam mi fariĝis 60-jara kaj aldonis balustradon ĉe la enirejo de mia domo. Kiam mi alvenis al la hejmo, ĝi iom moviĝis flanken. Mia edzino diris: “Mi metis ĝin en la spacon belaspektan”, sed mi refutis de mia starpunkto kiel handikapulo: “Ol aspekto pli gravas tio, kiom facile oni povas ĝin uzi.” Okazis iom da kverelo, sed mia edzino diris: “Ĉu ne estus ne eble, ke sanuioj sukcesas Swany Bag, ĉu?” Mi surpriziĝis. La bezonojn de handikapuloj nur handikapuloj povas kompreni. “Jes, ni do dungu handikapulon!” mi decidis surloke.

Tiam, la persono, kiu aliĝis al la kompanio, estis s-ro Bandoo Keiĵi, vicfakestro, kiu vundis al si la koksartikon en akcidento. Li estas handikapula dezajnisto kapabla uzi komputilizitan dezajnon. Li opinias, ke “aĵoj amataj de handikapuloj estas amataj ankaŭ de homoj sen handikapoj.”

“Kiam mi provis kunporti mian sakon sur la aviadilon, la oficisto de la flughaveno haltigis min kaj mi diris: ‘Mi ne povas marŝi sen la sako.’ La oficisto lasis min trairi.” (Y, Urbo Maĉida)

“Mi havis malbonan kruron kaj falis en la staton

de malespero, sed kiam mi renkontiĝis kun Swany, miaj tagoj ŝanĝiĝis al tiuj, plenplenaj de dankemo. Mi nun aktivas en la komunumcentraj agadoj kaj la koruso.” (A, Urbo Kooĉi).

Komercaĵojn por respondi al deziroj de virinoj

En 2003, la mastro de iu sakovendejo en Tokio demandis min, “Ĉi tiu sako estas elstara pri la funkcio, sed pri la dezajna aspekto estas malsupera. Verŝajne, viro produktas ĉi tiun, ĉu jes?” Pro la mencio mi hontis, ĉar mi havis respondecon pri tiu produktado. Kaj mi komencis multigi virinajn stabanojn pri produktado. Tiam s-ino Ŭatanabe Misuzu, kiu laboris en la fako por ĝeneralaj aferoj, esprimis la deziron; “Ankaŭ mi volas partopreni en tiu ĉi projekto.” Ŝia patrino havis korpan handikapon, kaj ankaŭ ŝi perdis sian infanon pro grava malsano. Ŝi deziris utiligi tiajn travivaĵojn, kaj esprimis sian volon partopreni en la projekto de “Universala Dezajno”.

La serio “Monogramo” por “brilantaj mezaĝuloj” estis unu el ŝiaj furoraj produktaĵoj: oni vendis pli ol 50,000 dum dek jaroj. Mi aŭdis, ke ŝi produktis la sakon kun intenco, ke “la glaceo de la Emajlo sur bazo de nigro estu pompa,” kaj ke “ĝi povu facile transporti pezajn pakaĵojn, kaj estu utila por

elirado same kiel por laboro.” Ŝi klopodis bele finfari la brodaĵojn. Krome, ŝi ekpensis kaj efektivigis saketon kun nova funkcio por pligrandigi kapaciton: ekŝvelas supra parto, kaj oni povas facile malfermi kaj fermi per zipo ktp.

Ŝ-ino Ŭatanabe, kiel stabano de la projektorealigo, aŭskultante la opiniojn de la klientaro, kuras de loko al loko, kaj informas la dezirojn al la fabriko. Dirante, “Mi volas, ke iu homo, kiu ne povis eliri, ekpaŝos, kaj eĉ faros cent paŝojn, kaj finfine vojaĝos eĉ eksterlanden!” ŝi montras fervoron por produkti tian komercaĵon, kiu “subtenas homan vivstilon”.

“Ĝi estas malpeza, bondezajna kaj ŝika. Tial multaj personoj laŭdis, ‘Ĝi estas bonega!’, kaj ĉiufoje mi ridetis.” (K, Urbo Jokohamo)

“Ĝia dezajno estas luksa kaj eleganta, kaj iu laŭdis ĝin, demandante, ‘Ĉu ĝi estas farita en Italio?’ Ĝi estas senbrua kaj havas elstaran funkcion. Ju pli mi poluras ĝin, des pli ĝi brilas. Ĝi estas mirinda eltrovo.” (O, Urbo Kaŭasaki)

Apogante sin sur mansaketo

En 2007, atingis min leteroj de virinaj uzantoj: “Mi volas paŝi apogante min sur la mansaketo.” “La mansaketo estas tre peza, kvazaŭ en ĝi troviĝus orbrikoj.” Tial mi esploris la mansaketon de mia edzino kaj konstatis, ke ĝi estas certe

masive peza. En ĝi troviĝis kosmetikaĵoj, spegulo, poŝtelefono, okulvitroj, notlibreto, ktp. Por viro estis nekomprenebla sento. “Aha!” mi konvinkiĝis.

Mi komencis produkti la portsakon, la plej malgrandan en la mondo. Krom du grandecoj de bazo M kaj L, mi aldonis la bazon S, kaj decidis, ke la funda grandeco estu 21.5×15 centimetroj, kaj la alteco estu 27 centimetroj.

Etendeblan tubon de mantenido, mi ŝanĝis de tri sekcioj al kvar sekcioj. Kaj malgraŭ ke la alteco de la portsako estis 27 centimetroj, mi devis plialtigi la tenilon ĝis 90 centimetroj. Komparante la tenilon kun tiuj de kvin aliaj kompanioj, mi absorbiĝis en la desegnado ĝis milimetraj unuoj aŭ eĉ pli detalaj, por malaltigi ĉirkaŭ 20 partojn en la tubo. Kvankam la rando estas iom anguleca, tiu tenilo ne dolorigas la manplaton, eĉ se oni metas sian tutan korpan pezon sur ĝin.

“Kvankam la teniloj de aliaj kompanioj estas fluliniaj kaj elegantaj, ili dolorigas mian manplaton duoble aŭ trioble pli ol tiu de Swany. Kiel supozite, estis prave, ke mi elektis produktaĵon de Swany.” (T, Urbo Ŝiĵoonaŭate)

“Mia aĝo estas tia, ke mi ne emas uzi bastonon. Ĝia kapacito estas sufiĉa, kvankam la tipo estas mansaketa. Ĉiutage mi plezure promenas kaj eliras kun gaja humoro.” (K, Urbo Naha)

Mansaketo kun sidloko

Sekvante, “Mansaketon kun sidloko mi deziras” — multajn tiujn dezirojn mi akceptis en la jaro 2003, kaj kompletigis la unuan sakon, kiu portas sidplaton. Tamen, ĉar mi enkondukis la sistemon remeti la sidplaton per kaŭĉuka ŝnuro, ĝiaj uztaŭgaj jaroj estis mallongaj.

Koncerne la duan, mi povis sperte remeti la sidplaton uzante mekanikan sistemon, sed ne unutuŝe. Ĉi tiu artiklo vivdaŭris dum pli ol 5 jaroj, kiel sako amata de klientoj.

La tria, kun grandaj peno kaj cerbumo, naskiĝis en la jaro 2015. La sidplaton oni povis eligi kaj remeti unutuŝe tre facile. Multe da homoj nun uzas tiun sidplaton, sed la seĝa parto estas iom peza.

“Post sidado sur la seĝo dum iom da tempo, mi revigliĝis. Tiam, kiam mi atendas trajnon, sur ĝi mi povas sidiĝi. Kaj subtenata de la sako, mi povas komforte paŝi. Ĝi estas unu el la plej bonaj sakoj en la mondo.” (A, Urbo Niigata)

“Mia filo vizitadas privatan lernejon kun la sako de Swany. Li diras, ke li volas enmeti lernilojn en ĝin, kaj studi sidante ĉe la pasaĝerkajo dum li atendas trajnon. La parto, kiu plaĉas al li, estas la seĝo.” (H, Kvartalo Adaĉi, Tokio)

Preventi lumbalgion per duobla fundo

Sekvante, responde al la deziro de tiuj homoj, kiuj ne povas sin klini ĉe talio, aŭ kiuj suferas pro la lumba doloro, mi plibonigis la sakon tiel, ke oni povu enmeti aŭ elmeti objektojn ne klinante sian lumbon. La nomo de la artiklo estas “Dumano”.

“Ĉar mi difektis la lumbon kaj klinado fariĝis malfacila, mi uzas kutime la sakon ‘Dumano’, kiu konsistas el duobla fundo. Ĝi estas taŭga por vojaĝo unu- aŭ dutaga. Bonvolu provizi multajn sakojn kun duobla fundo.” (T, Urbo Mino)

“Mi ne povas klini la lumbon pro lumbalgia doloro. Mi deziras ke vi multigu la specojn de Dumano. Swany sako estas mia grava necesajo, kiu venas post mia vivo.” (Y, Urbo Tokorozaŭa)

Dumano estas kunmetita vorto el du Esperantaj vortoj, nome, ‘du’ (2) kaj ‘mano’.

Mi estas esperantisto, parolanta la internacian lingvon, libere kunmetebla kaj facile ellernebla. Ni povas libere kunmeti vortojn de la lingvo. La marka registro en la angla lingvo fariĝis malfacila jaron post jaro. Tial, koncerne la komercan nomon de Swany Bag, mi alprenas Esperanton, proksiman al la angla lingvo. Ĉar Esperanto estas lingvo uzata de nur miliono da homoj en la mondo, ĝi estas sfero ankoraŭ plenplena de ebleco.

Naskiĝo de kvarrada haltigilo

Novaj komercaĵoj ĉiam naskiĝas el la voĉoj de la uzantoj. “Ili kuras tro rapide. Necesas haltigilo,” alvenadis al mi postuloj pri radetoj. Kaj finfine naskiĝis du- kaj kvarradaj haltigiloj.

En trajno oni devas perfekte haltigi la kvar radetojn. Mi ripetis multfoje veturon kaj revenveturon en la trajno de la fervoja linio inter Takamacu kaj Tokuŝima, kaj konkludis, ke se eĉ unu radeto turniĝas, la sako ekkuras. Por haltigi la kvar libermovajn radetojn necesus tia tekniko, kia meritis Nobel-premion. Malgraŭ la malfacilaĵo, tamen, kaj dank’ al la persista klopodo de s-ro Haŝimoto Goroo en la sekcio de riparo, naskiĝis nova tekniko kun tia haltig-sistemo, kia alfiksas la kvar radetojn rektangule por ke ili bremsu inter si.

Sed, ĉar la levilo situas supre, oni ne povas manipuli ĝin sen klini sin. Ideala estas la rimedo funkciigi ĝin tenante la mantenilon, sed pro la karaktero de oscilantaj radetoj nin atendis diversaj malfacilaĵoj. Tamen estas Swany, kiu ebligis maleblecon. Ni intencas daŭrigi la defion koncentrate nian tutan forton.

“Mi ĝojas, ke la sako komencis malfacile fali en fosetojn, ĉar la radetoj grandiĝis. Kaj plie, estis instalita la haltiga sistemo. Mi plezure atendas la aĉeton de nova plibonigita sako.” (K, Kvartalo Oota, Tokio)

“Kun la haltigilo nove instalita mia maltrankvilo malaperis. Mi estas volontulo pri muziko; se komencas kuri la trajno, ekfalas ukulelo aŭ pupitro k.a. metitaj sur la sako. Sed mi jam trankviliĝis!” (K, Urbo Odaŭara)

Kun Swany Bag en ĉiu mano

Ne malmultaj estas tiuj homoj, kiuj vivas subtenataj de Swany Bag, en ambaŭ manoj, dekstra kaj maldekstra, same kiel mi. Ĉe la ŝtuparoj, ni povas supreniri, tirante alterne du sakojn, kaj malsupreniri po unu ŝtupo. Rulseĝoj estas senrimedaj kontraŭ ŝtuparoj, tial por mi la kunuzado de du sakoj ja valoras super rulseĝoj. Jenaj estas efektivaj ekzemploj.

“Ĉar miaj genuoj konsistas el artefaritaj ostoj, Swany Bag, la sakoj dekstra kaj maldekstra subtenas min. Kaj samtempe mi povas transporti aliajn aĵojn; mi do ĉiutage elkore dankas. Koran dankon!” (I, Kvartalo Ŝinagaŭa, Tokio)

“Kun nur bastono miaj paŝoj limiĝas je cent metroj. Sed kun du sakoj Swany Bag al mi prosperas paŝadi senlime. Vere supera sako!” (Y, Urbo Funabaŝi)

Pligrandigi la radojn

En la jaro 2013, laŭ la deziro de la uzantoj ni elfaris radeton 75-milimetran. Ĉar nin atingis multaj voĉoj postulantaj la “pligrandigon de la rado”, ni klopodis ŝanĝi la grandecon, de 45 milimetroj al 50 milimetroj, de 50 milimetroj al 60 milimetroj kaj plue al 75 milimetroj. Multaj uzantoj deziras ŝanĝi al 75-milimetra rado, sed troviĝas unu speco, neŝanĝebla al la 75-milimetra.

Swany Bag devas subteni homan korpon en trajno, aviadilo k.a. Ĉe la direktŝanĝo batiĝas rado, se ĉi tiu estas pli granda ol 75 milimetroj. Eblas la rado 100-milimetra, sed ni devus plilarĝigi la valizon, se ne, en malvasta loko oni ne povus apogi sian korpon. Estas tre ĉagrena temo, tamen ni maksimume klopodos por respondi al la voĉo “pligrandigo de la rado”.

“Baldaŭ pasos 15 jaroj, iam ajn kaj ie ajn mi estas kun Swany Bag. Dank’ al la pligrandiĝo de la radoj mi povas paŝi pli facile ol antaŭe. Mi kore dankas vin!” (S, Urbo Kanazaŭa)

“Ĉar la rado ŝanĝiĝis al pligranda, mi facile piediras eĉ sur malglata vojo. Laŭcele mi nun uzas tri valizojn, kaj inter ili unu min eskortas ĉiutage.” (N, Kvartaro Suginami, Tokio)

Kvietaj radetoj

La dua deziro de la uzantoj estas “bonvolu plikvietigi la radojn”. Estas grava problemo, kiun ni daŭre defias; dum oni diras, “la radoj estas kvietaj”, ankoraŭ necesas pli da rebonigo.

“Danke al Swany Bag, ĉi tiu plenumas la rolojn de valizo, tirĉaro kaj tirkesto. Ĝi estas malgranda, malpeza kaj bonstila. Sed ĉu vi povus fari pli kvietajn radojn?” (K, Urbo Kobeo)

“Mi havas handikapon ĉe la kruro. Per Swany Bag pli facile mi paŝas, ol per bastono. Mi unuafoje uzis la valizon kun radetoj 75-milimetraj, mi tamen atendas pli kvietajn radetojn” (Y, Urbo Nagajo)

Pli malpeza rulvalizo

Swany bag devas tenadi la intenson por subteni la korpan apogon, tial ĉi tiu temo estas tiom malfacila, ke ĝis nun ne montriĝas okulfrapa progreso. Kun ĉi tiu afero mi volas daŭre lukti kiel la plej grava problemo, dum mi ankoraŭ vivas.

“Pro mia malsano ĉe duoncirklaĵaj kanaloj, Swany Bag kondukas kaj helpas min ĉiam kaj ĉie. Ĉar al mi mankas energio, ĝia malplipeziĝo vere feliĉigos min.” (Y, Kvartalo Oota, Tokio)

“Mi vizitadas al kurso de japanstila pentrado per trajno kaj aŭtobuso. Tiam la plej bona partnero estas

Swany Bag, en kiu mi povas meti la kompletan de la pentrilulojn, kaj krome ĝi subtenas min. Tamen, ĉu vi povus fari ĝin ankoraŭ iom pli malpeza?" (T, Kvartalo Nerima, Tokio)

Urĝa servado

En mia kompanio tri inĝenieroj interŝanĝas radojn aŭ fustojn, riparas stiftojn, kiuj alligas la metalajn tubojn, kaj resendas la riparitaĵojn al klientoj ene de unu semajno. Ĉar ĉiuj kompanianoj fidis, ke "Swany Bag estas tiom valora, kiom nenie alie troveblas." Ankaŭ telefonistoj tuj solvas la problemojn telefone.

Laŭdire, kiam en iu vendejo stabo respondis al uzanto, "Por riparo de tiu ĉi artiklo necesas unu semajno." "Sen Swany mi ne povas plu marŝi," diris la uzanto. Kaj ĉi tiu volis porti la artiklon en tiu vendejo, anstataŭ la difektitan. Ekde tiam la vendejo komencis alprunti anstataŭaĵon.

"La duan vi bonvolis ripari kiel antaŭe; mi do elkore dankas vin. Ĉi tiu estas mia amatino, nemankebla ĉe ĉiutaga ekstereniĝo. Eĉ mia edzino ne povas venki la valizon Swany." (Y, Urbo Kobeo)

"La riparita valizo min atingis kelkajn tagojn pli frue ol mi supozis. Purigita ĝis ĉiu angulo kiel nova artiklo, ĉi tiu fariĝis kvazaŭ nova aŭto ĵus aĉetita!" (K, Urbo Hirakata)

Responde al deziroj

Jen kelkaj komentoj, kiuj indikas la de nun traktendajn problemojn.

“Mi deziras ujon por bastono aŭ ombrelo, se ne, sufiĉas ingo nur por iliaj pintoj.” (K, Kvartalo Setagaja, Tokio)

“Mi volas, ke ĉe la mantenilo oni aldonu kroĉilon, por ke oni pendigu aĉetaĵojn.” (H, Kvartalo Ŝinjuku)

“Kvankam mi aĉetis malgrandan mezuron “S”, verdire mi volas pli malgrandan” (H, Umeda)

Lojalaj klientoj

S-ro Uŝiro Ŝigenobu, prezidanto de la sakvendejo “Lovely” en Osako, estas fama kiel Doktoro Swany sintitolinta. Li detale klarigas la distingaĵojn de Swany Bag al siaj klientoj, konsumante 30 minutojn, kaj troviĝas pli ol 1,000 nomoj en la registroj, uzataj dum pli ol 10 jaroj, tial oni povas tuj vidi, kiu aĉetis kion, kaj kiam. En tiu vendejo Swany Bag vendiĝas plej multe en la lando, kaj ĉiuj valizoj estas vendataj je la neta prezo sen rabato aŭ aldono de poentoj.

En la jaro 2014, s-ro Takagi Buu, unu el la membroj de “The Drifters” (Fama muzika kaj komedia grupo en Japanio 1956~) venis al mia kompanio Swany. Puŝante la jam ĉesigitan fabrikaĵon “Tino”, li admiris, “Ho, kiom multe estas!”

Tiam li pririgardis nur malgrandajn valizojn kaj mendis la plej malgrandan. Li estas peza uzanto de Swany Bag, kun 6 specoj, kiujn li uzas laŭ sia celo, rilate al tempo, loko kaj okazo. En Havajo, li diris, li ofte ricevis demandon, “Kie vi aĉetis ĝin?” Kaj plue li diris, “Ĉiutage, antaŭ ol mi uzas, mi atente purigas.” Mi do multe dankas pro liaj vortoj.

Al landoj en Azio

En la jaro 2012, s-ino Wong, posedanto de la tradicia magazeno “Metro” en Singapuro, venis al Japanio. Kiam ŝi renkontiĝis kun Swany Bag en Tokio, ŝi tiu multe ĉarmis ŝin; ŝi tuj aĉetis du sakojn por si mem kaj por sia patrino. Ankaŭ poste ŝi bonvolis aĉeti multajn artiklojn por aĉetado, vojaĝo, promenado k.a.

Poste Swany bag estis ekvendata ankaŭ en ŝia magazeno en Singapuro. Pro la veturkosto, importa imposto ktp, la prezo altiĝis 1.5-oble kompare kun tiu de Japanio, sed, entute 10 miloj da valizoj vendiĝis kaj nun disvastiĝas en burĝa klaso de altaĝuloj. Mi aŭdis, ke ankaŭ malajzianoj kaj indonezianoj samfoje aĉetas multajn kaj kunportas al siaj landoj.

Konsiderante tiujn ekzemplojn, ni planas disvastigi nian merkaton al Honkongo, Tajvano kaj Ĉinio, kaj antaŭenpuŝas la projekton disvolvi cele al

“Granda Ĉinio”.

Diagnoza kunsido por Swany bag

La “Valiz-diagnoza kunsido” por la uzantoj de Swany komenciĝis en 2017, kaj daŭre okazis en 13 enlandaj lokoj, kaj superis 80 fojojn ĝis la fino de la jaro 2020. Unu el la lokoj estis la magazeno Keioo, tie fakestro Kaŭatani Hiroki ĉefe kontaktis kun la klientoj kaj aŭskultis jenajn dezirojn:

“La mantenilo ne bone malaltiĝas,” “La altecon mi ne povas ĝustigi,” “Radoj defrotiĝis.”

“Se la rada arkaĵo defrotiĝis, ŝanĝu la radon, mi petas” li petis kaj sciigis, “Ankaŭ en la malnovaj artikloj troviĝas specoj, eblaj munti haltigilon.” Iam, kiam ni laboris ĝis meznokto pro troa okupiteco, iu kliento bonvolis nin regali per Ooban-jaki (japana tradicia populara kuko) kun la vortoj “Mi kore dankas vin pro la riparado kun tiom da malpuriĝo.” Nun en diversaj lokoj de Japanio, multiĝas tiaj uzantoj, kiaj kore atendas la diagnozan kunsidon, kiu estas propra sistemo de Swany.

Malgrandigo de rulseĝo

En la jaro 2003, mia maldekstra piedo, pli bona ol la dekstra, komencis malfortiĝi. Mi konsultis

kuraciston en la gubernia hospitalo Ŝirotori. “Vi tuj uzu rulseĝon, ĉar vi suferas post-poliomjelitan simptomaron,” diris la kuracisto. De tiam mi estis devigita vivi sur rulseĝo.

Sed, ĉar mi ekhavis dubon pri la diagnozo, mi denove konsultis la doktoron Jonemoto Kjoozoo, aŭtoritatulo pri la post-poliomjelita simptomaro en Medicina Universitato Tokio-Ĵikeikai. Ĉe la kliniko de Tokio ses aŭ sep pacientoj rigardis mian vizaĝon, kaj demandis, “Ĉu vi ne estas la prezidanto de Swany Bag?” Kia surprizo! Kvar el ili havis la valizon “Swany Bag”. Dum mi babilis kun ili, venis mia vico. “Miyoshi-san!” vokis Doktoro Jonemoto mem, kvankam ĝis tiam flegisto vokis la pacientojn!

“Ĉar mi aŭdis, ke vizitos la elpensinto de Swany Bag, mi atendis senpacience,” li diris ĉe la unua parolo, min bonvenigante. Kaj tre dankinda estas tio, ke la doktoro bonvolis rekomendi la uzadon de la valizo al siaj pacientoj.

“S-ro Miyoshi, vi povas marŝi per viaj propraj piedoj, ĉu ne? Ne uzu la rulseĝon ĝis tiam, kiam vi ne plu povos marŝi. Se ne, viaj muskoloj malfortiĝos,” plie dankindan konsilon mi ricevis de la doktoro. Ekde ĉi tiu tempo, ne sur rulseĝo, sed kun Swany Bag ĉe ambaŭ manoj mi marŝadas dum 15 jaroj dank’ al d-ro Jonemoto.

En mia trijara vivo kun rulseĝo min ĉagrenis ĝia grandeco: ĝi ofte koliziis kun tablo kaj muro, kaj plie, estis malfacile meti ĝin en la kofrujon de taksio.

Ankaŭ la piedmeteĵo malhelpis mian proksimiĝon al lavtablo.


En Francio kaj Pollando en la lifton por du homoj mi ne povis eniri kun la rulseĝo, kaj tial mi, lasante ĝin sur la teretaĝo, vizitis komercistojn. Kiam la pneŭmatiko krevis, mi enkuris ciklovendeĵon, sed tie ne troviĝis la samtipa, kaj neniu adaptiĝis al la japannorma. Mi do mendis ĝin kune kun rado kaj atendis ĝian alvenon el Japanio dum 4 tagoj.

Aliflanke, mi sentis ankaŭ la varmecon de la homa koro. Kiam mi atingis ŝtuparon aŭ ŝtonozan vojon en Eŭropo aŭ Usono, tuj al mi venis kelkaj homoj kaj bonvolis porti min, tenante de ambaŭ flankoj kune kun la rulseĝo. En flughaveno oficistoj enbusigis min dum kelkaj sekundoj: ili renversis malantaŭen la rulseĝon kune kun mi, tiel ke ĝi preskaŭ horizontaliĝis, kaj enŝovis ĝin en la buson de la antaŭaj radoj. Estis eĉ tia afero, ke iu portis min sur la dorso kaj igis min sidi sur la seĝo de aviadilo. Samtempe mi konsciis la ĉagrenon de uzantoj pro troa grandeco.

Post tiaj spertoj, mi ekhavis ambicion, ke mi mem faru rulseĝon, kiun mi povas faldi en malgrandan spacon. Jes! Trijara vivo sur rulseĝo estis vana neniom.

Post 80 jaroj, rulseĝo malgrandiĝis en duonan mezuron

En la hejmo aŭ dum vojaĝo mi desegnadis la figuron de rulseĝo plimallarĝigitan. La afero, pro kiu mi trabaraktis dum kelkaj jaroj, estis ke la metala garnaĵo X ne pinĉu sidlokon kiam ĝi estas faldita. Mi desegnis kaj desegnis, sed la problemo ne solviĝis. Nur tagoj pasis vane.



Mallongiĝas je 30 cm, larĝas 22 cm kaj plimallarĝiĝas je 6 cm dum uzado

En la jaro 2005, en la aviadilo al Nov-Jorko, por mallarĝigi rulseĝon mi provis igi ronda la garnaĵon X, desegnante ĝin kun kurbaj anstataŭ rektaj linioj sur grafikpapiro. Kiam mi faldis la malsupran parton internen, la sidloko estis enmetita en la supran spacon perfekte. Mi trovis, ke tio mallarĝigos la rulseĝon je 7 centimetroj. La kurbigo de garnaĵo X ebligis min trapasi unu barieron.

Sekvanta bariero temis pri la malgrandigo de la larĝeco de la radoj, t.e. meti bremsen en la nabon.

Ĉe la ĝisnuna artiklo, la bremsio estis muntita alligite al la nabo; pro tio ĝi okupis larĝecon. Por solvi la problemon mi ofte vizitis Ĉinion, liverantan landon de rulseĝoj, kaj serĉis fabrikantojn de ennabaj bremsioj. Mi sukcesis trovi kredindan fabrikanton en la urbo Dongguano kaj investis 10 milionojn da enoj por muldilo, kiu ebligas plimalgrandan rulseĝon. Ni faris la nabon kun larĝeco de 7 centimetroj; ĉi tiu estis 3 centimetrojn mallarĝa ol komerce haveblaj artikloj, kaj tiel ni sukcesis faldi entute 6 centimetrojn mallarĝe.

Rezulte de tio, ni sukcesis mallarĝigi entute 13 centimetrojn: per kurba metala garnaĵo 7 centimetrojn kaj per ennaba bremsio 6 centimetrojn, t.e. naskiĝis epokfara rulseĝo faldebla en la larĝecon de 22 centimetroj, dum la larĝeco de la komerce haveblaj estis 35 centimetroj.

Alia tasko temis pri tio, kiel trakti piedapogilojn. Troviĝis nur du eblecoj, aŭ suprenfaldi ilin aŭ enmeti ilin en la malsupran parton de la rulseĝo. Desegnante multajn figurojn, mi serĉis la taŭgan rimedon. Sed, ĉar mi ne povis trovi la spacon, mi rezignis la tipon de la enmeto.

Sed, koncerne la alian suprenfaldeban tipon, ĝi tuŝis objektojn de antaŭo, de supro kaj de flankoj: ĉiufoje, post kiam mi desegnis tuŝparton, mi glitiĝis en la liton kaj cerbumis. Venis al mi diversaj ideoj unu post alia kaj ĉe ĉiu cerbumado mi malgrandigis la rulseĝon kun milimetra unuo, kaj konsumante

kelkajn monatojn, mi sukcesis redukti la tutan longecon je 30 centimetroj.

Per la aranĝo de la kurba garnaĵo X kaj de la ennaba bremsio mi sukcesis mallarĝigi ĝin je 13 centimetroj, kiam ĝi estis faldita. Kaj la volumeno, kiam ĝi estis faldita, fariĝis malpli ol duono: de 220 litroj, ĉe la komercaj haveblaj, al 100 litroj.

En la jaro 1933, la usona kompanio E & J inventis la garnaĵon X kaj sukcesis faldi ĝin en la volumeno, duona ol la ĝistiam. Ĉirkaŭ 80 jarojn poste, nome, en la jaro 2014, Swany sukcesis produkti la rulseĝon kiel artiklon, faldeblan en duonan grandecon, ol tiu de la usona kompanio. Finfine ni reskribis la historion de la rulseĝo!

Oni povas facile kaj enmeti eĉ du rulseĝojn en la kofrujon de taksio, kaj alproksimiĝi al lavtablo sur la rulseĝo kaj eĉ konservi ĝin en malvasta vestiblo. Do sendokosto duoniĝis. Kaj la rulseĝo fariĝis 6 centimetrojn pli mallarĝa ol tiuj jam publike vendataj, kaj oni, sidanta sur la seĝo, povis trapasi preskaŭ ĉiujn aŭtomatajn kontrolejojn.

Forpuŝante prioritatan patenton

Sed, ĝis tiam, kiam ĉi tiu epokfara rulseĝo ekaperis en la socio, ni devis transiri multajn grandajn murojn. La muroj atendis nin, ne nur sur la vojo de evoluigo, sed ankaŭ sur la vojo, de

produktaĵigo ĝis vendo —.

Somere en la jaro 2006, eĉ en tia stadio, kiam al ni finfine prosperis la ŝanco de ekvendo, venis la anonco de la ministerio de patentaj aferoj: “Via patento estis nekoncesiita”, ĉar jam troviĝas prioritata patento pri la kurba garnaĵo X. Dum kompletiĝis jam 10 produktaĵoj kaj eĉ debutis en amaskomunikiloj, trafis nin tute ne atendita afero: ni falis en embarasan seneliran situacion.

Ni tuj havis la kunsidon pri administrado kaj atingis la konkludon: sen patento nova fabrikanto ne povas resti kiel venkinto. Ni decidis kaj forĵeti la kompletigitajn specimenojn kaj retiriĝi. Koncerne la amaskomunikilojn, ni rondvizitis ilin por klarigi la kialon de retiriĝo.

Sed por mi tio estis granda bedaŭro, ĉar la malgrandigo de rulseĝo estis afero realigita post 80 jaroj, nome, la volumenon de rulseĝo ni sukcesis igi ĝis malpli ol duono, kaj ĉi tio devis esti nemezureble bona novaĵo por uzantoj. Ni do decidis cedi al iu granda fabrikanto la rajton de la komercaĵigo, dezirante ke ĝi laŭeble frue aperu en la socio. “Por ke handikapuloj povu uzi ĝin eĉ unu tagon pli frue,” mi diris, vizitante la fabrikanton, “mi donacas al vi la novan teknikon senpage.”

“Mi do deziras, ke vi laŭeble frue penetrigu ĝin en la merkaton, mi petas.” Tiel dirante, mi transdonis la desegnaĵon ĉe la foriro.

Sed, eĉ kvankam pasis multaj jaroj, tute ne

komenciĝis la vendo de la rulseĝo.

Du jarojn post kiam mi preskaŭ perdis la toleremon, de la kompanio atingis la novjara karto kun la mesaĝo tre pozitiva. Dumtempe mi trankviliĝis, sed poste neniam atingis bona novaĵo, kvankam mi atendis senpacience. La prezidanto de la kompanio, kiu estis sanulo, eble ne povis kompreni, ke la malgrandigo de la rulseĝo estas granda socia bezono, same kiel ĝia malpezigo.

Mi deziris nepre realigi mian profundan revon bazitan sur spertoj — en 2012 cele al ĉi tiu revo mi komencis labori denove. Mi multfoje diskutis pri bona solvo kun s-ro Tojosu Yasuŝi, la agento por patento. Rezulte de tio, naskiĝis la dua projekto, ne kolizia kun la leĝo pri la plifruie petita patento. Estis sperto, ke oni povas eltrovi neimageblan teknikon per la profunda fosado. “Nerezigna obstino” ja alportis al ni frukton same kiel la disvolvado de klientoj.

La ganto, nia origina profesio, kaj la rulseĝo, ĉi tiuj du estas tre malproksimaj komercaĵoj inter si. Sed, feliĉe, ankaŭ la valizo Swany Bag ĉefe dependas de Ĉinio, kaj ĝia produktejo koincidas kun tiu de la ganto. Kaj la valizo Swany Bag kaj la rulseĝo kompletiĝas tra la prilaboroj de ŝtofo, aluminio kaj rezino. Ankaŭ la industria mondo de ŝtofo, aluminio kaj rezino havas rilaton kun valizo kaj rulseĝo.

Dezajno apartenas al la kampo de mekaniko kaj geometrio, sed la rezulto de la valizo kaj la rulseĝo

estas decidita laŭ la forteco de materialoj kaj iliaj strukturoj. Kaj, antaŭ ĉio, ni eltiris la komunajn saĝojn de la fabrikantoj de la valizo aŭ la rulseĝo, kaj ilin detale kontrolante, ni esploris neordinaran solvon. Rezulte de tio, finfine realiĝis la hodiaŭaj produktaĵoj.

Farante tian ĉirkaŭiradon, ni iel realigis la denovan debuton de komercaĵo en la jaro 2014, jen tio estas la rulseĝo “Swany Mini”.

La unua en la mondo ! Rulseĝo kun poŝo

Du jarojn post la vendo de Swany Mini, alvenis la leteroj de uzantoj: ili postulis rulseĝon kun poŝo. Mi telefonis al pli ol 40 klientoj. Unu el ili, s-ro Okumura Ŝinĵi, diris: “Nepre necesas poŝo, kie oni povas gardi kaj ŝlosilon, kaj okulvitrojn, kaj telefonon. Li ne malŝaltis la telefonon, ĝis mi respondis “jes!”

“Mi pendigas sakon sub la seĝo,” li klarigis la nunan situacion, “kaj enmetas kaj elprenas objektojn, malfermante aŭ fermante zipon per la mano, kiun mi etendas sub la femuroj. Por mi kun malfortaj piedoj kaj manoj estas tre malfacila laboro.”

“S-ro Miyoshi, Vi estas inventinto de la apogvalizo, ĉu ne? La poŝon de rulseĝo multaj homoj atendas

senpacience. Nepre ĝi akiros grandan furoron, mi grantias. Bonvolu do fari vian plej eblon!” li kuraĝigis min.

Rezulte de tio, ni almetis la poŝojn por portaĵetoj al ambaŭ flankoj ĉe la kubutapogiloj super kaj antaŭ la pelradoj, unuafoje en la mondo. Mi prezentu dankesprimojn de klientoj:

“Vasteco de 22 centimetroj surprizis min, kaj facile enmetebla en aŭton: vere multe helpis min.” (S, Kvartalo Kootoo, Tokio)

“Mi povis sola ŝarĝi aŭton per Swany Mini tiamaniere: unue levante la antaŭajn malgrandajn radojn supren, kaj poste suprenpuŝante la grandajn radojn, de malantaŭe. Cetere, ĉar la rado estas senpneŭmatika, t.e. senkрева, oni ne bezonas zorgi enpumpi aeron (S, Kvartalo Ŝinĵuku, Tokio)

“Ŝarĝi la kofrujon de aŭto per du rulseĝoj estas tre facile kaj krome ankoraŭ troviĝas pli da spaco. Kaj eniri necesejon estas tre facile. Konservante ilojn en la poŝo, kaj levante la piedmetojn supren, mi laboras en la ĝardeno. (M, Gubernio Aiĉi)

La dialogo kun uzantoj pri rulseĝo daŭras.

Ĝenerala administrado

Ĉi tie mi volas rigardi la totalan figuron de la komercado de Swany, kiu jam finfine trovis la vojon “preter gantoj”

Tio, kio montras la sukceson de kompanio, estas la raporto pri profito kaj perdo kaj la bilanco. La unua montras ĉiujaran vendosumon, kaj la lasta montras la tiutempan kompanian kapablon. Diskutante laŭsekcie surbaze de antaŭsupozo pri la raporto pri profito kaj perdo kaj la bilanco ĉe monاتفino kaj post tri monatoj, ni celas sekuran operacion. Plue, inkluzive de la ekzamenendaj problemoj, aperintaj el ĉiu sekcio, ni decidis la gvidprincipon en kunsido, interrete ligita kun ĉiu bazo, okazanta tra la tuta tago dufoje en monato.

La jara vendosumo de Swany restas pli-malpli stabila dum longa tempo, t.e. 3 miliardoj~4,5 miliardoj da enoj en 1980~2000, kaj 4 miliardoj~5 miliardoj en 2000~2020. En la lasta duono la vendo de Swany Bag plimultiĝis je 1.2 miliardoj da enoj, sed tio signifas, ke tiom pli falis la vendo de gantoj. Feliĉe, tamen, de la jaro 2018, ankaŭ en Japanio la produktokvanto de gantoj okupadas la 1-an lokon. Plue, ĉirkaŭ 1 miliardo da vendosumo en Usono, kiu okupis la 1-an lokon per ski-gantoj dum 7 jaroj.

Koncerne al ganto-produktado, nia origina profesio, ŝajne ni povos konservi ĝian konkurencon forton pro la mendo de grandaj klientoj, sed la aziaj fabrikantoj kiel tiuj en Indonezio kaj Vjetnamio k.a., kiuj administras la fabrikon tutfamilie, plifortikigas la ekipaĵojn. Ni do bezonas ankoraŭ pli da klopodo por la progresigo de la produktivo, t.e. malmulta produktado de multaspecaj artikloj, aŭ por la sistemo

de dumjara funkciigo. Urĝas respondi ankaŭ al la tutmonda varmiĝo, t.e. kulturi la merkaton por sportaj komercaĵoj, printempaj kaj someraj.

Nun igas min maltrankvila la fakto, ke laŭgrade malaltiĝas malneta profito, kiu okupis 30 procentojn ĝis ĉirkaŭ la jaro 2000. Sed, se ni povos produktadi la komercaĵojn proprajn al nia kompanio kaj se ni povos kreskigi la markojn Swany Ski kaj Elmer, por kiuj ni investis en Japanio kaj Eŭropo en la jaro 2018, veraŝjne ni povos regajni la antaŭan prosperon. Plie, se skigantoj denove prosperos en Usono, en Japanio ni povos aktive labori kiel la originala dezajna fabrikanto de fasonaj sportaj gantoj.

Kia do estas la situacio de la valizo kaj la rulseĝo? Koncerne la valizon, eble ni povos teni ĝian konkurkapablon per la kvarrada haltigilo, unua en la mondo (sen libera rulilo), per la originala valizo kaj per la hoko por instali la valizon al la bazo. Kaj la plibonigo de funkcieco, malpezigo kaj dezajneco devas esti niaj denunaj taskoj.

Aliflanke, la rulseĝo “Swany Mini”, kiun oni povas faldi en duonan volumenon, ol la artiklo kutima, kaj per kiu oni povas alproksimiĝi al kuirtablo, ĉiujare estas vendata en la nombro de ĉirkaŭ 1,000, nur en malgranda aĉetmerkato. La artiklo por la luo, laŭdire okupanta 90 procentojn, debutos en 2020.

Ĉi tiu “Swany Mini” jam sukcesis elŝeliĝi el la sezona komercaĵo kaj mi antaŭsupozas, ke ĝi fariĝos profitdona artiklo estonte. Aldone al la kompakteco,

unua en la mondo, oni povas duonigi kaj la spacon de parko, kaj la frajtkoston kaj sendkoston: ĝi fariĝos milda al medio, kio altiros multajn klientojn. Ĝi jam havas patenton en la landoj, nome, Japanio, Usono kaj Ĉinio, kaj la promocio al mezgranda kompanio ne estas nura revo.

Invitite al Ĝardenfesteno

En la jaro 2013, inventinta la korpapogan valizon, mi honore ricevis la Ordenon nomatan “Kjokuĵitsusookoo (*Ĝemelaj Lumoj de la Leviĝanta Suno*)”.

Mi estis invitita al la Aŭtuna Ĝardenfesteno ĉe Akasaka-gjoen en Tokio kaj, de ĉiu el la tennoa familio, mi ricevis dankvortojn.

Lia Tennoa Moŝto afablis min rigardi tuj proksime kaj kapsalutante kun rideto preteriris. Ŝia tennoedzina moŝto Miĉiko, kun vizaĝesprimo, plenplena je favoro, rigardis mian valizon Swany Bag kaj diris, “Ĉu vi fartas bone? Bonvole zorgu pri via sano!”

Ĉu pro tio, ke tiutage Kronprincdzino Masako ne povis ĉeesti, la Kronprinco ŝajnis iomete malgaja. La familianoj de Princo Akiŝinomija preteriris ĉiuj kun ridetoj, de Princdzino Kiko al Princfilino Mako, kaj plue sinsekvis la familianoj de Mikasanomija princdzino Akiko kaj princfilino

Jooko. Rigardante mian nomplaton Princino Hisako de la familio Takamadonomiya alparolis al mi, ŝajne iom surprizite, “Ĉu s-ro Swany!?”. Ŝia unua filino princino Cuguko preterpasis kaj princino Noriko, ŝin sekvanta, diris al mi, “Bonvole sidiĝu sur la rulseĝo.” Estis tago, kiam mi sentis la nemezureblan majestecon de la tennoa familio.

Mi renkontis s-ron Hanjuu Juzuru, fama artisma sketisto. Mi petis lin esti fotita kun mia edzino, mia plej juna filino (kiu zorgis pri mia rulseĝo) kaj mi.

Tiam alproksimiĝis al mi unu s-ino kaj alparolis: “Mi estas granda amanto de Swany. Swany Bag savis mian patrinon, kaj ankaŭ mi uzas ĝin. Anstataŭ mia panjo mi venis por saluti vin.” Pro la abrupta apero de la amanto de Swany mi elkore surpriziĝis.

La paraliza dekstra piedo, pro kiu mi suferis kaj turmentiĝis kaj eĉ volis memmortigi — sed, danke al tio okazis la renversa dramo: naskiĝis “Swany Bag”, kiu donis la ĝojon al multaj homoj.

Kaj, danke al la postpoliomjelita simptomaro, kompletiĝis “Swany Mini”, rulseĝo faldebla en la plej malgranda formo en la mondo. Krom tio, realiĝis la intervidiĝo kun la tennoj familianoj kaj parencoj, kiuj sciis pri Swany Bag. Estis unu tago, kiam mia koro fariĝis plenplena je la serena sorto.

La tria capítulo

Scienco pri fasta terapio

Fascinite de fastado

En la novjara tago, kiam mi fariĝis 43-jara, mi malvarmumis kaj mi haste vizitis la Gubernian Hospitalon Ŝirotori. La kuracisto proklamis al mi: “Vi havas kronikan nefriton. Tuj enhospitaliĝu”.

Dum mi estis en la hospitalo, mia dua frato Joriaki sendis al mi libron Scienco de fasta terapio verkita de d-ro Kooda Micuo. Ĝi predikis: “Fasti aŭ manĝi malpli da manĝaĵoj akcelas sangocirkuladon kaj plibonigas ĉiujn malsanojn.” Kaj mi estis tiritita de ĝia forta persvada potenco.

D-ro Kooda estis origine dolĉaĵamanto kaj kreskis manĝante multe da *zenzai* (dolĉega supo kun sukero kaj azukio). Post nelonge, diversaj internaj organoj malsaniĝis, kaj li suferis pro kronikaj gastrointesta kaj hepata malsanoj. Li sentis, ke tia situacio ne estas bona. Li studis modernan medicinon en la Medicina Fakto de la Universitato de Osako, kaj poste dediĉis sin al sia propra kuracado. Sed lia malsano neniam boniĝis. Li tiom suferis, ke li sin rulis pro akra doloro, kaj finfine li alvenis al la “Niŝi-stila sanmetodo”, elpensita de Niŝi Kacuzoo. Dum la kuracado li baraktis: “Mi volas manĝi dolĉaĵojn, eĉ se mi mortos!” Kaj li voris amanaton kaj jokanon (ambaŭ temas pri specoj de melase kuirita fabo en Japanio). Falinte en tian malsategan inferon, li finfine atingis fastadon.

En sia verko, li skribas, “La pasioj kondukas al la

bodio”. Homoj estas savitaj, ĉar ili havas angoron. La negocisto ĉiutage vivas kvazaŭ marŝi sur klingoj en la daŭro de vivriskaj luktadoj. Ĉar mi estas viro, foje ekflamas pasio. Ankaŭ mi volas provi la faston, kiun faris Gandhi kaj la bikŝuoj por sia spirita trejnado. Kaj en mi komencis kreski la espero, ke eble povos resaniĝi mia rena malsano.

Stranga fastejo

La “Kliniko Kooda”, kiun mi vizitis, estis vere stranga kuracejo. Tiu doktoro tute ne donis medikamentojn, kiujn li opiniis “venenaj miksaĵoj”, kaj eĉ ne ekzistis injektiloj. Ne troviĝis blankvesta anĝelino, nek naŭzis fortaodoro de desinfektaĵoj. Laboris tie nur d-ro Kooda, kaj ĉefoficisto, kiu asistis la doktoron, dietisto kaj kuiristoj. Se oni lernas kaj praktikas la Kooda-medicinon, laŭdire, kanceruloj pluvivos, malaperintaj haroj rekreskos, kaj lernantoj kun muskola distrofinio ekkuros en lerneja sport-festivalo.

La pacientoj ĉi tie ne ŝajnis malsanaj. Aspektis kvazaŭ sport-kluba trejnejo. En la centra halo, ĉirkaŭ dudektatama, troviĝis pli ol 20 homoj, kiuj skuis la korpon kiel horloĝ-pendolo aŭ kiuj levis siajn manojn supren en la ĉielon kaj skuis ilin. Jen, praktikas kaj praktikas! Tio ja estas “Niŝi-stila san-ekzercado”.

“Kian malsanon vi havas?”

“Mi suferas pro reŭmatismo!” tiu respondis.

Estis persono, kiu unuvorte diris, “Kancero.”

Ĉiuj el ili estis proklamitaj: “nekuraceblaj” per la moderna medicino.

Maldekstre de la halo troviĝis malgranda kampo nomata “Kooda-ĝardeno”. La abundaj verdaj folioj estis freŝaj. Por la krud-vegetara terapio nomata “aodoro” oni uzis rikoltitaĵojn de ĉi tiu kampo.

Ekskreĉii retenitan fekon

En la tago, kiam mi enhospitaliĝis, mia tagmanĝo konsistis el duontaso da kaĉo de kruda rizo kaj duonpeco da tohuo. “Eh! Ĉu nur tiom?” mi surpriziĝis. Verdire, la kruda rizo kaj tohuo gustigitaj nur per natura salo multe diferencis de la kutimiĝinta intima gusto en mia vivo; mi ja embarasiĝis. Sed post kelkaj tagoj, mi al kutimiĝis al la gusto, kaj pro la malsato mi komencis eĉ senti ĝin “bongusta”!

Post ĉirkaŭ unu semajno, mi timeme provis 11 tagojn da “supa fastado”. Unu goŭo (180 ml) da legoma suko, farita per spinaco, laktuko k.a. estis matenmanĝo. Mi havis tage kaj vespere po unu goŭo da klara supo, kuirita tiamaniere, ke oni gustigis la supon de sekigitaj sardinoj per sojsaŭco kaj kruda sukero. Aldone mi intermite ĉiutage trinkis

1.8 litrojn da kruda akvo kaj persimon-teon kun vitaminoj. Entute iom pli ol 150 kilo-kalorioj tage.

Mi havis fekadon proksimume dufoje en tago. Iom post iom ekskreciis manplenon da bruna, sabla retenita feko. Dum kelkaj tagoj la suma kvanto estis duono da lavpelvo. Ordinare iu ajn havas sitelon da retenita feko en sia intesto. “S-ro Miyoshi, vi ankoraŭ nur ĉirkaŭ trionon elpuŝis,” diris la doktoro. Retenita feko estas fekaĵo, kiu akumuliĝas en la intesto pro daŭre troa manĝado pli ol digest-potenco. Oni diras, ke la gaso el la retenita feko en la intestoj estas la “fonto de ĉiaj malsanoj”, kiu malbone efikas al la korpo tra la sangovaskuloj.

Ĉar ekster mia imago estis facile praktikebla la enkonduka “fastado de klara supo”, kio daŭris dum 4 tagoj, kun avida deziro forigi ĉiom da retenita feko mi ĵetis proponon: “Doktoro! Mi faros ĝin eĉ dum 15 tagoj, aŭ 20 tagoj.” “Ĉar ĝi enhavas salon, tial vi povis fari ĝin facile. Do provu praktiki ‘veran fastadon’ dum 2 tagoj.” respondis la doktoro.

Mi tuj falis en la fundon de malespero, kiam mi komencis veran fastadon nur kun akvo kaj persimona teo. Mi sentis malfacilon eĉ levi mian korpon. Mi apenaŭ povis legi libron. Manĝo sensala kaj sensukera estis ege suferiga. En la “fastado sen manĝbastonetoj” mi sentis tagon vere longa, kaj netolerebla sento min turmentis.

Mi daŭrigis legi librojn dum la tuta tago por batali kontraŭ la malsato, kaj tiel pasis naŭ tagoj. En la

momento, kiam d-ro Kooda diris al mi: “Vi manĝos brunan rizon de postmorgaŭ”, la vermoj en mia stomako komencis ĝemi.

Laodoro de kareo kaj fritita rizo venis de ie, “Ojako-donburi (rizaĵo kun ovo kaj kokaĵo)” aperis kaj malaperis en mia kapo, kaj ankaŭ “Tenpura-soba (nudeloj kun frititaĵoj)” aperis kaj malaperis. Dum plenaj du tagoj, mia menso estis okupita nur de manĝaĵo kaj mi ne povis regi ĝin. Mi ja surpriziĝis pro mia propra avideco. Tiel mi finfine plenumis la 11-tagan fastadon.

Fine mi ja plenumis! Mi kriis: “Banzai! (Hura!)”

Mi estas eta kaj krome mi havas maldikan dekstran kruron: mi perdis 10 kilogramojn, kaj mi malpeziĝis ĝis 43 kilogramoj. Ĉu la doktoro zorgis pri volvulo? Li estis tre atentema pri la renormaligo de mia manĝo. “Doktoro, mi jam ne povas toleri la malsaton!” mi plorpetis lin, dum mi prenis la renormaligan manĝon, nome, de brunriza kaĉo 30-procenta al la 50-procenta. “Rigardu vian pezon. Vi peziĝas po 0.5 kilogramojn ĉiutage. Nu, s-ro Miyoshi, vi tro manĝadis ĝis lastatempo.” Tiel li konvinkis min.

Dum kvar tagoj, mi iom post iom revenis al 1,650 kilokalorioj da bruna rizo por unu tago. Matenmanĝo estis nur 180 ml da legoma suko kun 50 kilokalorioj, tagmanĝo kaj vespermanĝo konsistis el 800 kilokalorioj da laŭsezonaj krudaj legomoj, sale rostita fiŝo, malvarma tohuo, marherboj kaj

bruna rizo. Ŝajnis al mi, ke ili brilas kiel suŝio aŭ vaporkuirita ovaĵo. Ju pli malsata estas homo, des pli li fariĝas humila. “Eĉ en tiu ĉi momento la mondo estas plenplena je maldikaj malsataj infanoj,” mi ĝustigis la pensmanieron.

Ĉiutage mi malsatis tiom, ke mi ne povis atendi la sekvontan manĝon. Dum 33-taga restado en hospitalo mi manĝis nur sep tagojn da normala manĝo; sed ju pli malmultiĝis la retenita feko, des pli boniĝis la intesta sorbado. En la momento, kiam mi elhospitaliĝis, mia pezo jam revenis al 47 kilogramoj.

Jen estas tankaĵoj de Deguĉi Sumi, la Dua Spirita Gvidantino de Oomoto, kiujn mi deklamas kutime antaŭ manĝoj.

Nur senutila ne lasu eĉ peceton legomfolian
naskitan el favoro de l' ĉielo kaj tero.

Favoron Dian forgesu ni neniam: eĉ en rizero
troviĝas la Tri Dioj de l' ĉielo kaj tero.

De l' fajro, akvo kaj tero, la favoroj kiuj nutras nin—
jen Di-figuro vera de l' ĉielo kaj tero.

24-hora laborplena hospitalvivo

Ĉiutage je la 5-a atm. mi vekiĝis kun la sono “pipi” de mia horloĝo, tia estis la komenco de tiu tago en la hospitalo. Mi formetis miajn litaĵojn kaj iris al la lavejo. “Bonan matenon,” mi serene interŝanĝis salutojn kun aliaj.

Sidante en rekta pozo sur la lito, mi recitis la preĝvortojn “Amacu Norito” fronte al la direkto de la preĝejo “Mirokuden” en Oomoto, en la urbo Ajabe, la gubernio Kioto. Kaj mi preĝis al Dio: “Koran dankon pro la sperto pri fastado kaj malmultaj manĝoj ĉiutagaj, kaj laŭeble fruan realiĝon de la devizo ‘Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo’”.

En glaso da akvo mi diluis 40 mililitrojn da natura laksigilo “Suimag” (ĉefe magnezia hidrokso), farita el “nigari” (mineralaĵo el marakvo). Mi trinkis ĝin ĉiutage. Tio estas akceligilo por elpuŝi la retenitan fekon, sed ĝi ne estas medikamento.

Mi praktikis nudan sanmetodon de la 5-a kaj duono ĝis la 6-a matene. Malferminte fenestrojn mi duŝis per freŝa aero mian haŭton, kaj tuj enmetis min en la liton. Kaj denove mi nude staris, kaj denove enmetis min en la liton. Mi ripetis tion, kaj iom post iom plilongigis la nudan tempon. Laŭdire, la metodo efikas plifortigi la haŭton kaj forpeli akumulitan karbonan monooksidon, kaj tio tre efikas pri kancerkuracado, se oni ĝin daŭrigas ĉiutage.

Ĉi tie mi prezentu pri Niŝi-stila sanmetodo, kiun mi kutim-kostume praktikas unu horon ĉiutage.

1. Orfiŝa ekzerco, 200 fojoj = kuŝu surdorse, faldu viajn manojn sub la kolo, skuu korpon per abdomen-muskolo (ventr-muskolo) kiel orfiŝo naĝas.

2. Kapilar-aga movado, 2 minutoj = kuŝu surdorse, supren levu ambaŭ brakojn kaj krurojn kaj mallarĝe vibrigu ilin.

3. Movado de kunmetitaj manplatoj kaj plandoj, 200 fojoj = kuŝu surdorse, kunmetu viajn manplatojn kiel preĝo, kaj tielsame ankaŭ la plandojn, kaj etendu kaj altiru ilin laŭ direkto de korp-akso.

4. Dorsa ventra ekzerco, 200 fojoj = sidu surgenue kun larĝe malfermitaj genuoj, krucigu ambaŭ manojn malantaŭ la dorso, skuu la korpon dekstren kaj maldekstren kiel pendolo.

5. 11-specaj kap-moviĝoj, po 20 fojoj = klinu kapon dekstren, maldekstren, antaŭen kaj malantaŭen, turnu maldekstren kaj dekstren.

De la ekzerco 1-a ĝis la 5-a, oni bezonas sume preskaŭ 20 minutojn, kaj la doktoro rekomendis ĝin ripeti plurfoje ĉiutage. Necesis multe da energio, sed

kiam mi finis ĝin, mi sentis min plena je energio tutkorpe kaj sentis min reviviĝinta.

La oficeja direktoro klarigis, “Jen estas plata lito, kiu rektigas la spinon.”

“Ho ve, ĉu tiel maldikan matracon?” mi skeptike tirprenis la litaĵon maldikan je ĉirkaŭ 1 centimetro, kaj sub ĝi aperis nur tavolo-ligna platpanelo.

Onidire, kuŝi en tiu lito rektigos la spinon, kaj akceligos la funkciojn de hepato, renoj, kaj intestoj. Tamen, ĉar mi tute ne povis dormi pro doloro de dorsosto, mi kuŝis tie nur dum legado en tago, kaj en nokto mi metis 3 maldikajn futonojn. Almenaŭ savo estis, ke la supra futono estis agrable dika.

Plue mi surpriziĝis, kiam li unuafoje montris duonrondan lignan kapkusenon dirante: “Vi bezonas iom da pacienco.” Laŭklarige, kiam oni dormas kun la nuko sur la cilindra parto, la korpopezo puŝas la sangon cirkuladon pli rapide, estiĝas stato de malvarma kapo kaj varmaj piedoj, la cervika spino estas korektita, kaj tio instigas trankvilan dormon. Mi bezonis unu monaton por al kutimiĝi al la malmola ligna kapkuseno.

Post la vespermanĝo, estis tempo de varma-malvarma bano, kiun ĉiuj ĝojatendis. Oni enmetis sian korpon ĝis la kolo dum unu minuto en la akvo, 15-grada dum la tuta jaro, pumpita el subtero, kaj poste banis sin en varman akvon dum unu minuto. Ni ripetis alterne varman kaj malvarman akvon, kvin fojojn en malvarma akvo, kvar fojojn en varma

akvo, fine malvarman. Varma-malvarma bano rekte akcelas sangan cirkuladon, kaj havas tujan efikon por malpezigi lacecon: estas tre komforta maniero. Multaj homoj facile komprenas ĝin, ĉar la principo estas simila al tiu de saŭno. En Kliniko Kooda mi legis librojn, kiujn mi anticipe sendis: 40 volumojn da *Reikai Monogatari* (Rakontoj el la Spirita Mondo) verkita de Deguĉi Onisaburo, krom ĉi tiu, librojn de Ikeda Daisaku kaj Kooda Micuo, librojn pri Kristanismo kaj la religio “Seiĉoo no Ie”, budhismaj religiaj libroj; mi legis sume 55 volumojn, inkluzive de la san-teorio de Gandhi. Mi pasigis hospitalan vivon, pli kontente, ol kutime.

Samĉambrano estis studento de la Unversitato de Kioto

La persono, kiu loĝis kiel mia samĉambrano en la dupersona ĉambro, estis s-ro I, studento ĉe la literatura fakultato de la Unversitato de Kioto. Dum 33 tagoj, dum mi daŭrigis la legadon, mi serĉadis kiel mi kuraĝigu lin.

Li foje instruis al mi nelegeblajn ĉinajn ideogramojn, bedaŭrinde, tamen, mankis al li pacienco. Dum tutaj tagoj de la fastado, li malfermis libron pri kuirado, kaj rigardadis fotojn de rosititaj birdaĵoj kaj tempuroj!

Li estis tia, kvankam li enhospitaliĝis por kuraci

stomakan ulceron kaj intestitan kataron. Evitante la okulojn de d-ro Kooda, li aĉetis kukojn kaj delogis min, “Sinjoro Miyoshi, ĉu ankaŭ vi volus manĝi?” Kial li kondukas min sur vojon de malbono! “Ne, ne! Ĉu vi intencas min mortigi?” mi fortigis la tonon de mia voĉo. Kaj tiam li haste formanĝis ĝin. Kiel supozite, la sekvantan matenon li havis severan diareon.

“S-ro I, post kiam vi decidis fari ion, plenumu ĝin ĝis la fino kun la firma koro, se ne Ĉielo neniam helpos vin.”

“Ne dependu de la socio. Ne dependu de d-ro Kooda. Ne dependu de viaj gepatroj. Ĉar vi estas inteligenta kaj bonkora, vi povos nepre plenumi,” mi forlasis kuraĝigan mesaĝon kaj elhospitaliĝis. Kia li estis poste? “Faruplejblan klopodon, s-ro I!”

Lerni de matena orientado

La specialaĵo de Kliniko Kooda, t.e. matena orientado, nepre komenciĝis je la sepa kaj duono, eĉ se pluvus aŭ falus lancoj. Ĉiuj membroj prenis noton sur kajero aŭ surbendigis sur registrilo, tio ŝajnis sama kiel prelego en universitato.

Ĉiuj 24 membroj el 12 ĉambroj levis kaj kunigis manplatojn, kaj ĵuris plenumon de severa fastado kaj malpeza manĝado, ĉantante deklamojn “Gokan no Ge” (antaŭmanĝaj kvin ĵuroj de monaĥoj). “Ĉu

ne troviĝas tiu, kiu fartas malbone?” demandis d-ro Kooda kun plena rideto. Poste komenciĝis prelego: “Nu... en la bruna rizo troviĝas 15.5 procentoj da akvo, 6.8 procentoj da proteino, kaj graso”

Bruna rizo estas la reĝo de manĝaĵoj, kaj oni diras, ke en la brano kaj ĝermo de bruna rizo koncentriĝas 95% da vitamino kaj mineralo.

Kompare al blanka rizo, bruna rizo havas duoblajn cindron, kalcion, fosforon, kaj 2.3-oblajn kalion kaj lipidon, 3-oblajn fibron kaj feron, 4-oblajn vitaminojn B1 kaj B2. Cindro, natrio, kalcio, fosforo kaj fero, kiuj troviĝas en nigra sukero, kalkuliĝas al 3-oble ĝis 90-oble, kompare kun tiuj en blanka sukero.

Multe da fero necesas por kreskigi korpon, kaj necesas 1 gramo da kalcio en ĉiu tago. Kalio necesas por forpeli rubaĵon el la hepato, kaj vitamino B1 necesas por preventi diabeton. Vitamino B2 efikas kontraŭ haŭt-problemoj, natrio nepre necesas por teni vivon. Fosforo fariĝas materialo de ostoj kaj dentoj, tiamaniere ni lernis sinsekve.

Li rekomendis, ke ni uzu dolĉan (malfortan) salon de Akoo aŭ rokan salon, ĉar en tiuj riĉe troviĝas kalcio, mangano kaj fero. En la salakvo, farita de natria klorido, kiun la ŝtato liveras, eĉ konkuloj ne povas vivteni.

Ne prenu blankan sukeron, ĉar ĝi estas ŝtelisto de kalcio. Por plenkreskuloj, la maksimumo estas malpli ol 30 gramoj da blanka sukero tage, dum

bruna sukero estas permesita ĝis 90 gramoj. Plue, laŭ li, se temas pri mielo, ĝis 100 gramoj ne donas la damaĝon de sukero.

Lerni de enhospitaligitoj

Post la lekcio de la doktoro, pacientoj rakontis pri siaj spertoj.

En iu mateno, estis vico de s-ro Muraĵi Kinnosuke, 65-jaraĝa.

Li suferis pro reŭmatismo kaj hipertensio (alta sangopremo) dum sep jaroj, daŭrigis krudan vegetaran dietoterapion dum 17 tagoj, kaj elpuŝis retenitan fekon.

La altaflanka sangpremo malaltiĝis de 198 ĝis 143, kaj la malalta flanka de 125 ĝis 93. Lia hipertensio tuj resaniĝis. Ĝis tiam lia vidkabablo estis 0.2, kaj li ne kapablis legi vortaron sen okulvitroj, sed li resaniĝis al 0.8.

Post kelkaj tagoj, mi aŭskultis historion de s-ino Ŝimamoto Hisami, kiu vizitadis universitatajn hospitalojn unu post la alia, ĉar ŝia haŭto parte blankiĝis ekde la infanaĝo pro vitiligo. Laŭ ŝi, en iu nokto aŭdiĝis voĉo de gepatroj el la apuda ĉambro: “En ŝia nuna stato, ni ne povos lasi ŝin edziniĝi.” Kaj ĉe la hospitalo, ŝi larmis, kiam ŝi, senvestigita, estis fotita antaŭ flegistoj kaj junaj studkuracistoj. Ŝi venis informita, ke la vitiligo estis resanigita per

“kruda vegetara dietoterapio”. Ĉar ankaŭ mi havis similajn spertojn, kiam mi estis infanaĝa, la rakonto larmigis min.

S-ino Kaŭamura Joŝiko, 77-jaraĝa, diris post 55 tagoj ekde la kruda vegetara dietoterapio: “Kreskis 1 cm da nigraj haroj meze de la blanka hararo.” D-ro Kooda ilin fotis deproksime. Pro la surprizaj efektivaj ekzemploj, ĉiutage montrataj, la atendo de la matena orientado fariĝis senpacienca.

S-ro Fuĵita Miĉiaki, instruisto de elementa lernejo, nomis sin “granda magazeno de malsanoj”, kaj lin la Universitato de Oosaka prezentis al d-ro Kooda. “Dum la tria fastado, 180 ml da karbogudro-forma fekaĵo kaj 70 koturn-ov-formaj pecoj elpuŝiĝis,” li raportis. Laŭdire, la nutraĵo ne povis esti sorbita, ĉar la aĵoj ekloĝis sur la intesta mukozo mielĉel-forma. Neforgesebla estis lia ridvizaĝo, kiam li diris: “Mi unuafoje gustumis sanecon ekde mia naskiĝo, tuj post la elpuŝiĝo de la retenita feko.”

Mi aŭdis ankaŭ rakonton de la universitata profesoro Muŝa Sooiĉiroo, kiu faris la krudan vegetaran dietoterapion por kuraci urinvezikan kanceron. Oni diras, ke multaj grimpistoj trinkas senbakterian urinon kiel akvon de la vivo, por multigi leŭkocitojn (blankajn sangoglobetojn), mortigi bakteriojn kaj plifaciligi sangofluon. Tio surprizis min.

Post la matena orientado, 24 personoj kune daŭrigis Niŝi-stilan san-ekzercadon, konsistantan

el 15 specoj, dum unu horo ĉiutage.

Kuraci nefriton per kruda vegetara dietoterapio

Ĉe mia elhospitaliĝo, d-ro Kooda donis al mi kuraĝigajn vortojn: “Vi povos kuraci vian nefriton per kruda vegetara dietoterapio.” Kaj mi praktikis ĝin tuj post la reveno al mia hejmo. Matenmanĝo konsistis nur el suko, farita de sezonaj legomoj kirlitaj per miksilo kun 90cc da akvo. Tagmanĝo kaj vespermanĝo konsistis el kruda legom-salato, brunriza faruno, rafanoj, karotoj, ignamoj kaj 4 gramoj da natura salo. Unu porcio entenas 500 kilokaloriojn, kaj inkluzive de la 50 kilokaloria matena legomsuko, entute fariĝas 1,050 kilokaloriojn tage.

Por tagmanĝo kaj vespermanĝo mi trinkis 250 gramojn da legomsuko, kaj prenis 70 gramojn da brunriza faruno (tio estas ne bongusta, sed havas iel unikan guston), 120 gramojn da raspita karoto, 100 gramojn da raspita rafano kaj 30 gramojn da ignamo, kaj al ili mi aldonis 4 gramojn da natura salo. Tio estas ĝuste manĝaĉo de kuniklo, vere malespera asketa manĝaĵo. “Se tio estas tiel efika, ankaŭ mi faru,” diris mia patro, kaj komencis ĝin praktiki. “Ĝi tamen rabas al mi la apetiton,” post nur tri tagoj rezignis eĉ mia patro, kiu iam antaŭe

eltenis la noktan trajnveturon dum unu semajno.

La telero kun nur raspita rafano, sen rostita salgusta fiŝo, estis tute sengusta. Nur rigardante 120 gramojn da raspita karoto, mia gorĝo ĝemante rifuzis. Tamen, la salita ignamo estis laŭkutime bongusta, kaj la legomsuko havis la saman guston kiel ĉiam.

Daŭrigante tian asketan dieton, mi kontrolis la sangon kaj proteinon en mia urino, ĉe loka kliniko Kamada kaj mi ĉiumonate raportis telefone al d-ro Kooda la rezulton.

Unu monato, du monatoj kaj tri monatoj pasis, tio tamen ne pliboniĝis. “Mi ne plu povos pacienci,” mi plendis, “Pensu pri tio kiel la militaga trejnado de la sankta monto Hiei kaj eltenu dum pliaj kelkaj monatoj,” li forte kuraĝigis min. Kiel li antaŭdiris, la sango kaj proteino komencis malmultiĝi ekde la sesa monato. Kun pacienco la nefrito tute malaperis en la naŭa monato.

“Hura!” mi kriis.

Sed mi ŝrumpis ĝis 40 kilogramoj. D-ro Kooda instruis min, “Ĉar la kuracisto ne komprenas tion, vi devas ne diri al li.” Sed mi estis tiel feliĉa, ke mi konfesis al la kuracisto, “Mi daŭrigis krudan vegetaran dieton dum naŭ monatoj.” Kiel antaŭvidite, li tuj neis, “Tio tute ne rilatas.” Post kelkaj jaroj, tiu kuracisto mortis pro pulma kancero en juna aĝo.

Malpli ol 2,000 kilokalorioj ĉiutage

Tridek ok jaroj pasis ekde tiu fasto.

Nuntempe mia matenmanĝo konsistas el nur suko de unu karoto, papera pako da suko de Itoen, nomata “ĉiutaga legoma suko”, kaj peco de pano el brunriza faruno, kvankam ĉi tiu spitas al regulo.

Por tagmanĝo kaj vespermanĝo mi klopodas manĝi nenion krom kvin specoj de manĝaĵo: “bovlo da bruna rizo”, “tohuo kaj faboj”, “malgranda fiŝo manĝebla kun kapo, kiel osmero”, “alĝoj” kaj “legomoj kaj radiklegomoj”.

Tiuj dufojaj manĝoj konsistas el ĉirkaŭ 1,600 kilokalorioj, kaj se oni aldonas matenmanĝon de pano el brunriza faruno, tio estas ĉirkaŭ 1,800 kilokalorioj tage.

Brunan rizon oni povas kuiri bonguste per premkuirilo, se lasi en la akvo dum ĉirkaŭ 3 horoj anticipe. Se oni daŭre manĝas la kvin specojn de manĝaĵo, oni fekas komforte; ili estas kiel brunaj bananoj. Sed se oni ne celas sanon per malmulta manĝado, ĝusta manĝado kaj tutkorpa ekzercado, ne resaniĝos ankaŭ lokaj malsanoj de okuloj, nazo kaj oreloj.

Oni diras, ke ju pli bestan proteinion, inkluzive de fiŝo, oni manĝas, des pli la fekaĵo fariĝas nigra, fetora kaj glueca kaj kaŭzas konstipiĝion kaj visceran malsanon. Precipe pri viando, “Ĉar viando malpurigas la sangon, laŭeble ne manĝu ĝin.”

D-ro Kooda ripete emfazis la gravecon de malmulta manĝado, “Se oni vivas ĉiutage kun kilokalorioj malpli ol 2,000, oni povas havi korpon, kiuj ne bezonas kuraciston.” Li diras, ke kiam homoj malsatas, iliaj ĉeloj tiras sangon kaj fluo de sango pli rapidiĝas. Li estas en opozicio al la “korpumpila teorio” de la moderna medicino.

Oni diras, ke la potenco de korpumpilo estas sama kiel tiu de hejma kudromaŝino. Li klarigas, ke laŭ mekanika vidpunkto la koro ne povas pumpi sangon al 60 duilionoj da ĉeloj dum 20 sekundoj per 1/4 ĉevalpovo.

Sango elfluas el la korpo okaze de akcidento, sed sango ne elfluas el natura kadavro. Dum homoj vivas, sango troviĝas entirita ene de ĉeloj, tial ĝi restas nur nevidebla. Eĉ en ameboj, kiuj ne havas koron, sango cirkulas, kaj fasto kuracas timpaniton kaj empiemon ktp. — ĉi tion oni ne povas klarigi per la korpumpila teorio.

Laŭ la korpumpila teorio de brito William Harvey, “sango eliras el la koro, cirkulas tra la korpo kaj reiras al la koro.”

“Tio estas aŭtokratisma ideo de la feŭda epoko. Multaj kuracistoj ankoraŭ blinde kredas la medicinan teorion bazitan sur tia ideo. Kia absurdeco!” (El *Sanmetodo de fastado kaj malmulta manĝado* de Kooda Micuo)

Mi aŭdis de d-ro Kooda jene, “Mi demandis la medicinan komunumon per malferma letero, sed ili

ankoraŭ ne respondas.”

Dume, ankaŭ tiu, kiu laŭdas la okcidentan medicinon, kapablan mezuri fizikajn kondiĉojn kiel sangopremon kaj sangosukeron, ja estas d-ro Kooda.

Mi longe daŭrigis malmultan manĝadon de kvin specoj de manĝaĵo kaj Niŝi-sisteman sangimnastikon, kaj en 2015 mi spertis sankontrolon en la urba hospitalo de Sanuki.

Ventromezuro estis 70 cm, sangopremo 93/60, neŭtrala graso 39, HDL-kolesterolo 96, kaj sanga sukero en malsato 86; mi ricevis perfektan poentaron de “kvin steloj” en ĉiuj kvin indikiloj. Mi estis laŭdita de la kuracistino, “Bonvole prelegu kaj rakontu al multaj homoj pri viaj dieto kaj gimnastiko, s-ro Miyoshi.”

“Malmulta manĝado” bazita sur amo kaj kompato

La kosto de enhospitala vivo dum 33 tagoj en la Hospitalo Kooda estis nur 90,000 enoj. Ĉar pacientoj dormas sur maldika matraco sur tavolligno, kaj ili preskaŭ ne povas manĝi. Sed, kvankam tio estas la plej efika terapio, oni ne povas uzi sanasekuron. Kia paradokso!

Nu, kiel devas fari homoj, kiuj malŝatas manĝadon de bruna rizo? Unue, vi mem poluru

brunan rizon kaj manĝu la blankan rizon. Rostu la restantan rizbranon en pato, kaj estingu la fajron, kiam ĝi fariĝas bruna. Trinku tri kulerojn da tiu “rostita rizbrano” kune kun legoma suko ĉiutage. Ĉi tia metodo donas la saman efikon kiel manĝado de bruna rizo. Antaŭ kvin jaroj ankaŭ mi fariĝis “ŝatanto de rostita rizbrano”.

D-ro Kooda ofte ridigis pacientojn, “Se ĉiuj adoptus Niŝi-sistma sangimnastikon, multaj kuracistoj kaj apotekoj perdus siajn laborojn.”

Li diris, “Mi kuracis dumil kaj kelkcent kancerulojn per fasto kaj kruda vegetara dieto, sed kiam la kanceraj ĉeloj de malsana areo superis 70%, la pacientoj ne povis vivi.” Mi dubas pri la unujara kuraca kosto de pli ol 40 duilionoj da enoj, rigardante la fakton, ke tiom pliboniĝas malfacila malsano, kiu ne estas kuracebla de moderna medicino.

Lastatempe pli kaj pli grandiĝas la voĉo de averto pri “simptoma terapio, kiu ne rigardas grava la preventan medicinon”, “kuracado por plilongigi vivdaŭron al vivofina paciento” kaj “organgrefto, kiu rigardas la cerban morton kiel homan morton”. Ankaŭ jeno estas esprimita realisme en la usona dokumenta filmo *Nekonata fakto — Kiel kuracisto fariĝis murdisto, kaj kial ni restis indiferentaj* (reĝisoro kaj produktoro Ken Stone).

Plie, kiam la doktoro estis juna, li ankaŭ havis amaran sperton, ke li diris al si mem, “Ne manĝu

tro multe” kaj “Praktiku malmultan manĝadon.” La rezulto estis la respondo: “Malmulta manĝado signifas honori ĉiujn vivantaĵojn.”

Ĉi tiu “praktiko de amo kaj kompatato” fariĝis la vivcelo, kaj ekde tiam li povis fari predikon pri severa fastmetodo dum 50 jaroj.

Plie, bovoj manĝas dekoblan grenon de sia pezo, kaj la fiŝo seriolo manĝas sepoblan engraŭlon de sia pezo, do li plurfoje diris, “Anstataŭ manĝi tiajn luksaĵojn, manĝu grenon kaj engraŭlojn, kio estas pli bone ekologie.”

Antaŭ nur kelkaj tagoj mi aŭskultis intervjuon de la forpasinta d-ro Kooda en “Noktomeza flugo de radio” de NHK. La karmemora voĉo de la savanto de mia vivo donis al mi larmojn en la okuloj. Pensante pri la malproksimaj tagoj, kiam mi suferis de nefrito, de tiam mi vojaĝis tra stranga mondo. Multaj homoj povas timi, aŭdante la vorton “fasto”.

Sed nuntempe mi manĝas ankaŭ glaciaĵon, kaj mi ĝuas frukton post tagmanĝo kaj manĝeton je la 3-a.

La kvara ĉapitro

Mondlingvo en Estonteco

Ĉu la angla estas vera komuna lingvo ?

Inter la romanoj de Hajaŝi Mariko estas verko kun la titolo *Juraku nite* (En Plezuro), kaj en ĝi aperis la sekvanta paragrafo.

Kusaka, la ĉefrolulo, diras:

“Mi pensas, ke la japana lingvo malaperos post cent jaroj aŭ pli.”

“La japana... ĉu? Mi dubas...”

Nacuko klinis sian kapon kun dubo.

“Mi pensas, ke la malapero de lingvo signifas la malaperon de nacio. Japanio ne malaperos.”

“Ankaŭ mi volas pensi tiel, sed eble post cent jaroj, la japana lingvo ne ekzistos, nek Japanio.”

“Ĉu vere?”

“Kvankam tio estas bedaŭrinda, mi pensas tiel. Eĉ en entreprenoj, homoj, kiuj ne povas uzi la anglan lingvon, estos ekskluditaj. La anglan oni komencis instrui jam de la elementa lernejo. Pli aŭ malpli frue, la angla fariĝos la oficiala lingvo en Japanio. Se la nuna stato daŭros, kia estos nia lando, Japanio mem? Mi supozas, ke Japanio eble ne povos postvivi.”

Nun ni devas solvi “mediajn problemojn”. Post ili sekvas “problemo de komuna lingvo”, per kiu ni ne havu konflikton. ĉu ni povas akcepti, ke oni donu la pozicion de komuna lingvo al la angla, kiu estas

malfacila kaj nur loka lingvo? Ekzemple, la litero A havas sep prononcojn, kaj la klarigoj de esceptoj okupas pli ol duonon de vortaroj.

Se ĉi tiu situacio daŭros, ni trompiĝos laŭ la strategio de Britio kaj Usono, kiuj investis grandegajn monsumojn kaj talentulojn!

La nederlanda lingvo, kiu venis en Japanion en la epoko Edo, estas en krizo de malapero. En la Flughaveno Schiphol de Amsterdamo, oni ne uzas la nederlandan kaj ĉiuj indikoj ŝanĝiĝis al la angla.

El la proksimume 8,000 lingvoj nuntempe uzataj tra la mondo, unu lingvo malaperas ĉiun duan semajnon, kaj ankaŭ la japana povus malaperi post 100 jaroj.

Precipe en la EU, la politikistoj, kiuj ne povas paroli la anglan, havas limigitajn ŝancojn ludi aktivan rolon, kaj homoj, kiuj havas bonegajn karakterojn kaj juĝpovojn, estas puŝitaj al angulo. Tial, la subpremitaj kaj akumulitaj malkontentoj iam eksplodos.

Eĉ en Japanio, novaj vortoj de la angla inundas. La lastatempaj novaj vortoj, rilate al la koronavirusa pandemio estas teruraj. Oni diskutas, ĉu ni “Go to” (vojaĝi, por helpi la ekonomion), aŭ “Stay Home” (resti hejme, por ne infektiĝi); oni parolas pri “Social distance” (interhoma distanciĝo) kaj “Overshoot” (plimultiĝo de nombro de infektitoj) ... La situacio jam estas anarkia. En kiu lando ni estas? La mencio en la romano *Juraku nite* (En Plezuro), ke post 100

jaroj Japanio kaj la japana lingvo malaperus, havas realan senton.

La angligo en la mondo ekstermos milojn da lingvoj kaj eĉ iliajn kulturojn.

Kiel ni alfrontu tiajn tro grandajn perdojn kaj diskriminaciojn?

Mi eklernis Esperanton

Mi unue sciiĝis pri la internacia lingvo Esperanto en 1965, kiam mi legis la libron *Rondvojaĝo en Esperantujo* (en 1968 Oomoto aperigis la anglan tradukon de la libro: *My Travels in Esperanto-land*) de s-ro Deguĉi Kiotaro, eksprezidanto de Oomoto. S-ro Deguĉi partoprenis en la Universala Esperanto-Kongreso (UK) en Sofio, en Bulgario, kaj vojaĝis tra la mondo uzante nur Esperanton dum duonjaro.

Kio surprizis min, estis, ke li restis en sia ĉambro dum 100 tagoj kaj memstudadis Esperanton, partoprenis en oratora konkurso de UK kaj akiris la duan premion. Mi legis la libron ĝuste tiam, kiam mi luktis por ellerni la anglan.

De tiam mi interesiĝis pri Esperanto kaj pensis, ke mi iam lernu ĝin. Sed mi estis tre okupita de la lernado de la lingvoj korea kaj angla. La fakto estas, ke mi komencis lerni Esperanton post 30 jaroj. Tiam mi estis 55-jaraĝa kun malfortiĝanta memoro.

Mi eĉ ne sciis la prononcon de la literoj A, B kaj C,

sed mi komencis legi la monatan revuon *Esperanto*, eldonitan de la Universala Esperanto-Asocio. Ĉar mi ne konis ĉiujn vortojn, mi skribis la signifon flanke de la frazo per maldika plumo, konsultante vortaron. Sed, dum mi fervore konsultis vortaron, konsumante unu monaton, jam atingis la sekva numero. Furioze, mi lernadis ĉiutage de la 4-a matene, en la daŭro de du horoj. Sed dum la unua jaro estis kvazaŭ mi vane kuras en vetkuro. En la dua jaro mi sentis ĝin iom pli facila, kaj en la tria jaro mi finfine kuratingis la gazetojn. Kiom ajn malfacilaj estis la vortoj, mi povis parkerigi ilin post 20- aŭ 30-foja ripetado. Kvankam la plimulto da vortoj estis nekonataj, por pli ol 60 procentoj da ili sufiĉis, nur ke mi ŝanĝu la finaĵojn de la anglaj vortoj. Kaj mi povis ekmemori pli rapide ol mi antaŭsupozis.

Post tiam, por serioze lerni Esperanton, mi invitis sinjorinon Sutton, kiu estis prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, kaj ŝian edzon, kaj de ili mi ricevis la gvidon de la konversacio ĉiuvespere de la sepa horo ĝis la deka horo. Kaj poste, mi invitis al Japanio esperantistojn el diversaj landoj de la mondo, kaj daŭrigis la lernadon dum ĉirkaŭ 20 jaroj ĝis la jaro 2016.

En tiu periodo, antaŭtagmeze mi komunikiĝis rete kun kelkcent esperantistoj de la tuta mondo. Tiam mi parolis esperante, kaj miaj instruistoj enmetis la frazojn en la komputilon. Tial mi preskaŭ ne skribis Esperanton dum 20 jaroj. Rezulte, mi povas

paroli, sed ne povas skribi. Mi elkreskis kiel stranga esperantisto.

En Monda Kongreso de Mondfederacio

La maksimumo de Oomoto estas “Unu Dio, Unu Mondo,

Unu Interlingvo (internacia lingvo)”.

Unu Dio temas pri religia kunlaboro. Ekzemple, centoj da religiaj reprezentantoj el la tuta mondo kunvenas ĉe la Templo Enrjakuji sur la monto Hiei por “Kunveno de Preĝo por Monda Paco”, kiu estas organizata dum pli ol 30 jaroj per la alvoko de Oomoto.

“Unu Mondo” temas pri la movado de Mondfederacio, kies ideo estas, ke unu registaro regu la mondon. Ĝi estas ideo proponita de Einstein kaj Schweitzer tuj post la finiĝo de la Dua Mondmilito. Alivorte, ĝi estas EU-igo de la mondo. Nobel-premiito pri fiziko d-ro Jukaŭa Hideki ludis centran rolon en vokado: “Mondfederacio estas hieraŭa revo kaj morgaŭa realo. Hodiaŭ estas la unua paŝo de hieraŭ al morgaŭ.” La movado daŭras seninterrompe ĝis hodiaŭ.

“Unu Interlingvo” estas akcelata koncentre sur la Esperanto-movado. Oomoto laboras por Esperanto ekde la 1920-aj jaroj, kaj ĝis antaŭ la Dua Mondmilito, duono de ĝia agadkosto estis elspezita

por internaciaj aktivecoj.

En 2002, la 24-a Monda Kongreso de Mondfedreacio okazis en Londono, kun la partopreno de ĉirkaŭ 250 homoj el 36 landoj. Ankaŭ mi partoprenis en ĝi. En la Fakkunsido de Esperanto, esperantisto profesoro Ron Glossop, de la Universitato de Southern Illinois, faris la jenan ĉefparoladon.

“700,000 homoj el la tuta Eŭropo ĉiam studas en Britio por lerni la anglan, kaj la totala kosto por lernado estas taksita je 17 miliardoj da eŭroj (ĉirkaŭ 2,5 duilionoj da enoj) ĉiujare en la tuta EU. Ĝi estas enorma sumo. Tamen en Bruselo, kie estas la ĉefsidejo de EU, mi vidis multe da rubrikoj por dunganoncoj kun la kondiĉo, kiu postulis posedon de la angla lingvo. Kaj en la suba parto mi vidis rimarkigon, ke oni bezonas homon, kies angla lingvo estas instruita de la patrino. Nome, ĝi signifas postulon de denaska anglaparlanto, kio estas ege maljusta al la plimulto de la kandidatoj. La movado de la Mondfederacio povas fari trarompon nur kiam ĝi laboras kun la Esperanta movado.”

Tiam, okazis severa kontraŭatako de la kunsideo. “Esperanto ne havas kulturon!” “Oni ne povas esprimi emociojn en artefarita lingvo!” “Oni ne povas skribi literaturajn verkojn!” Aktivuloj de la Mondfederacio neis lian aserton unu post la alia.

S-ro Kelso, direktoro de la Brita Esperanto-Asocio, argumentis kontraŭ ili. “Miloj da infanoj, naskitaj

en la hejmoj de esperantistoj, parolas Esperanton nature, kaj ankaŭ parolas la nacian lingvon ekstere. Estas fakto, ke ili nutris Esperantan kulturon. Dekmiloj da tradukaĵoj estas eldonitaj en Esperanto; troviĝas dekmiloj da libroj originale verkita en Esperanto, kaj centoj da specoj de periodaĵoj estas eldonataj ĉiujare.”

Poste, itala federisto ekstaris kaj argumentis, ke “Artefarita lingvo ne estas utila”, kaj brita partoprenanto respondis, “La angla kaj la germana estas lingvoj faritaj de homoj – niaj prauloj! Kion vi diras?” Dudek ok literoj estas uzataj en Esperanto, kaj la literumo mem estas prononca simbolo. Ankaŭ la gramatiko estas resumita en 16 artikoloj, kaj tute malsame kiel la angla, ne ekzistas esceptoj. Sekve, eŭropanoj povas lerni Esperanton per nur dekono da peno kompare kun la angla, kaj miliono da homoj en la mondo jam uzas ĝin. Ĝi estas la plej rafinita lingvo en la mondo!”

Tiam, usona oficisto de la Monda Banko diris: “Lerni Esperanton de nun estas absurde!”

Fine, la jena rezolucio estis adoptita: “Mondfederaciistoj rekomendas la lernadon de sennacian lingvon Esperanto.” En la retpaĝo de la Mondfederacia Movado ĉi tiu rezolucio estas klare deklarata.

Tutpaĝa reklamado en la ĵurnaloj de EU-landoj

Dum longa tempo, mi pensadis, ĉu ne ekzistas ia pli bona maniero por disvastigi Esperanton tra la mondo. En 1985, okazis drameca afero, rilate al la naskiĝo de “Takkjuubin” (kurierservo), kiu estas jam vaste konata. Iun tagon, s-ro Ogura Masao, prezidanto de la kompanio Transporto Jamato, subite aperigis tutpaĝan reklamon en la tutlandaj ĵurnaloj “Agnosku nian hejmliveran servon”. Li senpacienciĝis pro tio, ke la Ministerio pri Transporto ne agnoskis kurieran servon laŭ longdaŭra kutimo de Japanio. La reklamaĵo estis tia, kia rekte kritikis la ekzekutivon por protekti la profiton de konsumantoj. Ĉar multaj legantoj de la ĵurnaloj kaj aliaj industriuloj subtenis la kompanion Jamato, la Ministerio pri Trafiko ne povis rifuzi la apelacion pri kuriera servo. Tiu reklamaĵo servis kiel eksplodigilo, kiu alportis grandan ŝanĝon al la mondo.

Ekde 1992 mi ĉiujare partoprenas en la Universala Kongreso de Esperanto, organizata en ĉefaj urboj de la mondo, kaj mi aŭdis de la ĉefaj esperantistoj el diversaj landoj: “La estonteco de Esperanto dependas de EU”. Tiam mi rememoris la aferon de la kompanio Jamato kiel rimedo de trarompo al EU.

Jen ĝi! Estas taŭga rimedo ke mi metu tutpaĝan reklamon en la ĵurnalojn de eŭropaj landoj! Tiel

mi decidis, kaj petis kunlaboron al la Esperantaj organizoj de EU-landoj.

Unue, en 2002, mi metis reklamojn en 2 belgajn ĵurnalojn sub la helpo de la Prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, kaj en unu el ili, la ĵurnalo *Metro*, anstataŭ la reklamo oni publikigis tutpaĝan artikolon “La problemo de komuna lingvo de EU ne estos solvita per la angla”. Mia privata instruisto de Esperanto s-ro Lode, kiu tiam restis reveninta en tiu lando, ĝojegis kun granda rido.

En la sekva jaro, mi publikigis la reklamon en la itala potenca ĵurnalo *La Repubblica*. Tuj poste, ses parlamentanoj de Italio komencis siajn agadojn: “Ni konsilu al EU pri la lingva problemo.”

Itala radiostacio “DJ” eĉ dufoje elsendis tutlanden, kaj onidire la enhavo de la elsendo tute similis al la reklamo. Kelkmil homoj vizitis la retpaĝon de la Itala Esperanto-Federacio, kaj mi aŭdis, ke 33 novaj esperantistoj naskiĝis dum mallonga tempo.

En 2004, mi reklamis en pola ĵurnalo *Rzeczpospolita*. Tiam la fama direktoro de Pola televido s-ro Dobrzyński intervjuis min, kaj plie, danke al la ĵurnala kompanio, tiu tutpaĝa reklamo transformiĝis al ĝenerala artikolo. Ĝis nun, oni pensis, ke la internacia lingvo apartenas al la kategorio de ŝatokupo, tamen 117 jarojn post la naskiĝo de Esperanto, la lingvo estas agnoskita de legantoj kiel “la komuna lingvo, kiu kondukas al mondopaco.”

En la sama jaro, mi sinsekve aperigis la reklamojn en *Le Monde* en Francio, *Die Zeit* en Germanio, *La Libre Belgique* en Belgio, *Lietuvos rytas* en Litovio, kaj poste en ĵurnaloj de Slovakio, Estonio, Latvio, Ĉeĥio, Hungario, Slovenio ktp., sume 25 ĵurnalojn en 13 landoj.

Sed, mia dua pliaĝa frato, kiu helpis min redakti la reklamon mokis min pri la efiko “kvazaŭ pisi en Pacifikon”. Tiutempe, mi legis la felietonan romanon de la ĵurnalo *Nikkei* “Ĝingis-Ĥano”, kaj en ĝi mi trovis la parton: “Tiam la heroo trarompis la Grandan Ĥinan Muron, li kolektis siajn tutajn armeojn kun 200,000 soldatoj tien, kie estis unusola loko, malplena je gardantoj, kaj li sukcese malfermis la ĉevalvojon, larĝan je kvin metroj, dum tri tagoj.” Ho jes, mi imitu lin, Ĥanon! Mi ŝanĝis mian direkton al nur unu potenca lando Francio, kaj mi komencis publikigi la reklamojn en la fama ĵurnalo *Le Monde*.

Kiam mi faris la 10-fojan reklamon en *Le Monde*, dum du semajnoj 2,300 homoj vizitis la retpaĝon de la landa Esperanto-asocio Espéranto-France, kaj sume 7,000 paĝoj estis foliumitaj. Eĉ en la radio oni komencis ripete dissendi pri la lingva problemo kaj, laŭdire, dum kelkaj semajnoj naskiĝis pli ol 30 esperantistoj.

Mi petis la nepon de doktoro Zamenhof, kreinto de Esperanto, nun loĝanta en Parizo, “Bonvolu vin prezenti en la ĵurnalo, mi petas,” sed li longtempe

ne respondis al mi. Post nelonge, mono, kiu estas la plej grava kondiĉo por reklamado, elĉerpiĝis ĉe mi.

Mia ĉefa posadaĵo estis 1,650 kvadrataj metroj da tereno, kie iam troviĝis Swany, tamen duonon de la tereno mi jam donacis al mia boflo, kiu estas administra direktoro de Swany. Kiam mi konsultis lin pri la situacio, li respondis, “Do, vendu duonon da mia tereno kaj uzu por la reklamo.” Kaj la tero transformiĝis al dupaĝaj reklamoj.

Koncerne la tagon de publikigo, mi elektis la 15-an de decembro 2010: la naskiĝtago de Zamenhof. Sur la dekstran paĝon mi metis intervjuan artikolon kun la nepo de d-ro Zamenhof kaj sur la maldekstran reklamon.

Koncerne la reklamon, mi pezentis plejsupre portretojn, nomojn, kaj hejmlandojn de kvar denaskaj esperantistoj: ili denaske scipovas paroli Esperanton.

Kaj sube, mi metis la prelegon de la profesoro Reinhard Selten, Nobel-premiito pri Ekonomiko. “La superrego de unu nacia lingvo ne povas esti la solvo de EU. Facile lernebla Esperanto ebligas neŭtralan solvon de la lingvoproblemo.” Pli sube, mi menciis la movadon de Nitobe Inazoo, kaj laste mi skribas pri la kialo, kial mi reklamis ĉi tie.

En la sekva jaro, ni havis grandan rikolton. Kelkdek parlamentanoj de Francio alvokis al la membroj de Eŭropa Unio kaj okazis simpozio en Parizo fare de pli ol 100 parlamentanoj de EU, en

kiu, laŭdire, oni arde diskutadis pri Esperanto. Kaj mi aŭdis, ke amaskomunikiloj alprenis la temon de lingva problemo.

Lingva debato en Varsovio

En Pollando, nome, la patrujo de d-ro Zamenhof, mi organizis lingvan debaton en 2004. Tie partoprenis kvar EU-parlamentanoj, ok hejmlandaj parlamentanoj kaj 54 esperantistoj.



Ĉe la bankedo post la lingva debato en Varsovio, 2004

S-ino Barbara Pietrzak, apartenanta al la Esperanta sekcio de Pola Radio, ricevis la respondon (konsenton de ĉeesto) de fame konata s-ro Bronisław Geremek, la eksa ministro pri eksterlandaj aferoj. Laŭdire, li estis la plej potenca kandidato je la unua prezidanto de la Eŭropa Konsilio.

Ŝi diris al mi, “ĉi-foje ĉeestos eminenta gravulo

en la debato, tial vi devas viziti lin por esprimi antaŭdankon”. Mi do aranĝis biletojn por flugi al Pollando, sed li rifuzis lastminute. “Post tio, mi pripensadis multfoje, tamen mi komencis pensi, ke Esperanto ne povos venki konkure kun la angla, kaj eĉ se mi renkontus vin, ne ŝanĝiĝus mia opinio.” Tio estis tre bedaŭrinda rezulto.

En la debato, kiel unu el la organizantoj mi ekstaris unue. Mi parolis: en 1921, Nitobe Inazoo el Japanio, tiam Ĝenerala Vic-sekretario de la Ligo de Nacioj, ĉeestis en la Universala Kongreso de Esperanto en Prago dum unu semajno; ĝin partoprenis dumil kaj kelkcent homoj el 70 landoj, tie li simpatiis kun la ebleco de Esperanto kiel komuna lingvo, kaj li individue diskonigis tiun eblecon. Li proponis al la membriĝintaj pli ol 40 landoj de la Ligo alpreni Esperanton al la deviga edukado, sed fine ne povis atingi sian originan intencon pro la opozicio fare de Francio.

En Indonezio, estis uzataj pli ol 700 lingvoj dum multaj jaroj, tial estis malfacile regi politike, do oni ordigis la malajan lingvon, kaj naskis komunan lingvon el ĝi. Oni instruas tiun komunan lingvon en deviga edukado, kaj sukcesis kiel dulingva nacio kun komuna lingvo kaj insulaj dialektoj, tiel mi parolis. Kaj mi komunikis al ili, ke Indonezio estas ideala lando, kiu atingis antaŭ ol la realiĝo de nia celo, nome, “dulingvigo” de komuna kaj etnaj lingvoj.

Sekvis la nepo de d-ro Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, kiu alvenis el Parizo.

Li diris: “Mi estas specialisto pri betono, kaj mi gvidadis projektojn en diversaj landoj. Kiam estis konstruita la ponto Akaŝi-Kaikjoo en Japanio, mi prelegis invitite de la Ministerio pri Transporto de Japanio. La aŭskultantoj ofte kapjesis, do mi estis kontenta. Tamen, kiam mi poste interparolis kun ili individue en bankedo, evidentiĝis, ke multaj personoj ne komprenis mian anglan prelegon. Estas dubinde, ĉu la angla povos servi kiel internacia lingvo. Esperanto, kreita de mia avo, estas lingvo, kiun ĉiu povas facile lerni kaj ne estas miskomprenbla. La komuna lingvo estu Esperanto, kaj ene de ĉiu lando oni uzu sian propran lingvon! Tio estas la Esperanto-movado.”

Poste, Nobelpremiito pri ekonomiko, Prof. Reinhard Selten el Germanio (vizitante el Frankfurto) prezentis.

“Iamaj komunismaj landoj kiel Ĉeĥio, Rumanio kaj Hungario, eĉ tiuj, kiuj povas aliĝi al EU, nun troviĝas en kaosa periodo. Nekredeble, eĉ la Berlina muro disfalis. En tia tempo, mi volas iel ĉesigi la eraron devigi la tutan homaron uzi unu lokan lingvon, la anglan. Mi pensas, ke eblas. En 2001 mi insistis en la EU-parlamento, ke ni celu instrui Esperanton en deviga edukado,” li asertis.

Sekve, oni diskonigis al ĉiuj la retmesaĝon de Seán Ó Riain, kiu estas prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio.

“En la Konstitucio de EU oni specifas pri lingva egaleco. Estas kontraŭ demokratio kaj justeco antaŭenigi angligon sen ajna diskutado. Mi volas fari fortan proteston kontraŭ la malobservo de la konstitucio.”

Lastavice, parolis profesoro Renato Corsetti, Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, kiu vizitis el Romo.

“Neakceptebla estas la nuna situacio, ke anglalingvanoj havas la superecon kaj aliaj homoj estas diskriminaciataj, eĉ kiam temas pri geedziĝo kaj dungado. Ni devas ĉesigi la invadon de anglalingva imperiismo, kiu formanĝas eĉ kulturon kaj historion,” li konkludis.

Interkonsento estis atingita, kaj poste formiĝis la Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton.

Lingva Debato en EU-Parlamento

S-ro Geremek en Pollando rifuzis la renkontiĝon kun mi, sed tio ne signifis, ke li rezignis Esperanton. Poste en la jaro 2008, al ĉiuj membroj de EU, li, vicprezidanto de la EU-parlamento, sendis la invitilon pri la kunveno sub la temo “Ĉu Esperanto

estas amiko de multlingvismo aŭ malamiko?”

Ĉar troviĝis 160 homoj t.e. 20% da parlamentanaro de EU, kiuj volis, ke Esperanto estu la oficiala lingvo de EU.

“Eĉ japano faras sian plej eblon” li konfesis al sia amiko, ĉar li legis la reklamojn en *Le Monde*, kie mi aperis unu post la alia.

La kunsido estis la atesto de lia decido, ke li aktive agadu por la oficialigo de Esperanto, starante ĉe la kapo en EU. Sed okazis neatendita afero. Ĝuste antaŭtage de la kunsido li renkontis akcidenton survoje al Varsovia Flughaveno kaj li fariĝis la homo, kiu jam povos reveni al ĉi tiu mondo neniam. Mi estis tiel ŝokita, ke mi apenaŭ povis stariĝi. Tio estis vere lamentinda tragedio por la esperantistaro.

Prelegvojaĝo en Francio

En la jaro 2010 mi faris malgrandajn prelegojn en naŭ francaj urboj, inkluzive de Parizo, Liono kaj Marsejlo. En Parizo pli ol 40 esperantistoj kunvenis kaj tre fervore aŭskultis mian mallertan prelegon en Esperanto.

Mi aperigis la tutpaĝajn Esperantajn reklamojn pli ol 10-kelkfoje en *Le Monde* kaj mi petis al la respondeculo de *Le Monde*, ke li raportu pri la problemo de komuna lingvo per retroŝto kaj fakso ktp. Mi agis tiamaniere, ĉar *Le Monde* neniam

skribis pri la lingva problemo, kvankam la franca gazetaro ofte alprenis la aferon.

En la sekvanta tago en la urbo Vannes en okcidenta Francio, preskaŭ 50 homoj kolektiĝis. Sed post la kunveno mia sano subite ŝanĝiĝis; mi ne povis endormiĝi pro malvarmeco. Mi havis malfacilaĵon en spirado. Mi telefonis al mia edzino en Japanio kaj ŝi respondis al mi, "Via celo en la vivo estas Esperanto-movado, ĉu ne? Vi ne rajtas reveni hejmen!" Kaj ŝi malŝaltis la telefonon.

En agonio mi turnis min ree al Parizo kun la helpo de s-ro Atilio, mia Esperanto-instruisto, kaj apenaŭ mi revenis hejmen. Feliĉe, mi povis akiri forton post ripozo en kotaco (japana tradicia varmigilo) dum unu semajno. Fakte, kelkajn jarojn antaŭe kuracisto deklaris, ke mi suferos pro la post-poliomjelita simptomaro, kiu estas kaŭzata de maljuneco. Li diris, ke ĝi estas nekuracebla malsano, kiu povas kaŭzi la malvarmon de membroj, malfortecon de muskoloj, paralizon kaj spirmalfacilaĵon.

La prelegon s-ro Atilio faris anstataŭ mi al 300 homoj.

Ĉar la novaĵo de mia urĝa reveno al hejmlando disvastiĝis interrete, preskaŭ 500 petoj al *Le Monde* kolektiĝis, sed la firmao rifuzis cedi.

Pollando donacis al mi ordenon

Tio okazis tuj post la Tertremego en Nordorienta Japanio en la jaro 2011. Mi estis surprizita de la informo ke la prezidento de Pollando donacos al mi ordenon de “Kavaliro de Kruco” agnoske al mia klopodo por la disvastigo de Esperanto en Eŭropo.

En la sekvanta jaro okazis simpozio memore al la 125-a jubileo de la naskiĝo de Esperanto en la Pola Parlamento. Tiam mi ricevis la honoron saluti kiel ĉefgasto. Oni donis al mi 20 minutojn, inkluzive de interpretado en la polan lingvon. Mi konsumis du tagojn por poluri mian tekston kun neta longeco de 10 minutoj. Mi ekzerciĝis en laŭta voĉo pli ol milfoje.

Post la saluto senatano kaj antaŭa Ministro pri Edukaj Aferoj Edmund Wittbrodt, prezidanto de la Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton, etendis sian manon por manpremo kaj diris al mi, “Excellent!” Mia klopodo kun milfoja ekzerco estis agnoskita.

Mia amiko estas Nobelo-premiito

Kiam la Universala Kongreso okazis en Kroatio en 2001, germana profesoro Selten sidanta apud mi alparolis al mi. “Mi rimarkis multe da homoj starantaj ĉirkaŭ mia domo, kiam mia edzino kaj mi revenis hejmen post la butikumado. Mi demandis

ilin, ‘Ĉu okazis ia akcidento?’ Ili respondis, ‘Gratulon pro via ricevo de Nobel-premio!’ kaj tio surprizis min.” Tio okazis en la jaro 1994, kiam li ricevis Nobel-premion. Laŭ lia diro la fakto estas jena: komitato de Nobel-premio telefonis al li 30 minutojn antaŭe, sed li forestis kaj ĝi anoncis lian ricevon de la premio laŭ la regulo.

Ĉi tiu bona edzo, kiu kutime puŝas rulseĝon de sia edzino, rakontas, “Mia vivo subite ŝanĝiĝis post la ricevo, kaj mi prelegadis preskaŭ ĉiusemajne ekz. en Kameruno, Romo, Pollando k.t.p.

“Ludo-teorio”, la kialo de lia premiigo, aplikiĝas en la decidprocedo en ĉiuj sferoj de administrado, politiko, scienco, ktp. Oni diras, ke la teorio estas nepre necesa, precipe por komputilo, sed mi devas konfesi, ke ĝi estas por mi ja galimatia mondo. Poste, plurfoje mi renkontis lin en diversaj lokoj en la mondo, kaj pro tio pli kaj pli intimiĝis ni.

En la jaro 2007 li vizitis Japanion speciale por ŝtata universitato Kagaŭa. Li prelegis energie en Esperanto paŝante en grandaj paŝoj antaŭ ekranego, kaj 1,070 homojn absorbis admirinda interpretado de profesoro Nagamaĉi Ŝigeaki de la ŝtata universitato Tokuŝima.

Post la parolado bonveniga kunsido okazis en Royal Hotel Sanbonmatsu. Tie trasonoris ĥoro de “La Espero” pere de 22 esperantistoj.

En la sekvanta tago mi gvidis lin al la Muzeo Oocuka en la urbo Naruto apud mia hejmo. Ĝi estas

fenomena muzeo, kies kolektaĵoj estas ceramikaj kopioj de majstraj pentraĵoj, kiujn posedas diversaj muzeoj en la mondo.

Li admiris kaj diris, “Se mi volus vidi la originalojn, mi bezonus kelke da jaroj, ĉar mi devus vojaĝi tra la mondo.”

Unu Dio, Unu Interlingvo

En la jaro 1995, mi partoprenis en la Grupo Viziti Usonon por Partopreni en la Interreligiaj Okazaĵoj Memore al la 50-jara Jubileo de la Fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj. Mi vizitis Usonon, kun la prezidanto de la sekta asembleo de Tiantajanismo Fuĵi Kooken, la estro de la adminstrejo de Meiĵi-ĵinguu Nakajima Seitaroo, kaj s-ro Deguĉi Kiotaro de Oomoto, ktp, entute kun 56 personoj.



En Prago kun Dekano Morton kaj s-ino Morton, angla tradukisto s-ro Charles Rowe, kaj s-ino Rowe, 1996

En la kunsido mil religiuloj el la mondo kunvenis en unu halo en Nov-Jorko. Mi proksimiĝis kaj prezentis min al la estro de la Katedralo de la Sankta Johano la Teologo en Nov-Jorko, Dekano Morton, la tiama prezidanto de la kunsido. Al li mi enmanigis la invitleteron al la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la venonta jaro en Ĉeĥio, kaj mi diris, “Bonvolu legi poste.”

En tiu invitletero mi skribis, “Mi pensas, ke por la religia kunlaboro mondscale disvolviĝanta, kaj plue por realigi la mondpacon, oni bezonas la internacian lingvon kiu estas senpartia kaj egaleca. Mi invitas vin al la 81-a Universala Kongreso de Esperanto en venonta somero en la urbo Prago (la ĉefurbo de Ĉeĥio), kaj vi geedzoj bonvolu sperti la mondon kie per unu lingvo oni reciproke interŝanĝas siajn animojn.”

Venis jarfino, kaj pasis printempo, sed respondo ne venis. En majo, tiam, kiam mi komencis rezignition, atingis min la respondo ke li volas partopreni. En la kongreso kunvenis ĉirkaŭ 3,000 esperantistoj el la mondo. Geedzoj Morton aktive partoprenis en la diversspecaj okazaĵoj. Kaj, en la fakkunsido de Oomoto, Dekano Morton parolis:

“En la jaro 1975, en la Katedralo de la Sankta Johano la Teologo en la urbo Nov-Jorko, ni rompis la tradicion kiun oni observis dum dumil jaroj, kaj okazigis la feston de Oomoto, kiu estas ŝintoismo de Japanio. Tiam el la kristana mondo de la tuta Usono

ekokazis la diskuto por min riproĉi, ke oni min 'forpeli el la urbo Nov-Jorko'. Sed tamen, mi kredas, ke jenaj tri konceptoj de Oomoto havas la ŝlosilon realigi la mondan pacon: la koncepto 'Unu Dio', kiu antaŭenpuŝas la kunlaboradon de la diversaj religioj en la mondo, la koncepto 'Unu Mondo', kiu celas mondon senmilitan, kaj 'Unu Lingvo', Esperanto, kiu estas senpartia kaj egala al la tuta homaro. Mi do sekvas la doktrinon dum mia tuta vivo."

Oni ne bezonas diri, ke ĉiuj personoj en la kunvenejo estis kortuŝitaj.

Fame konataj esperantistoj

Nun mi volas mencii la esperantistojn kaj fame konatajn personojn, kiuj subtenas Esperanton.

·Kita Ikki (*pensulo, socia aktivulo, 1883~1937*) = “La veneno, kiun angla lingvo alportas al la ideoj de japanoj, egalas al la importo de opio, per kiuj angloj faris la ĉinojn ruiniĝinta popolo.”

·Nitobe Inazoo (*edukisto, pensulo, 1862~1933*) = “Se ni povos interparoli en la sama lingvo unu kun la alia pri niaj ideoj, kiel feliĉa estos la mondo.”

·Futabatei Ŝimei (*romanverkisto, 1864~1909*) = Tradukis la libron Mondlingva Legaĵo, verkita de Zamenhof, kaj ĝi fariĝis furora libro.

·Romain Rolland (*verkisto de Francio, 1866~1944*) = “La tuta vivo finiĝas, dum ni ellernas ses landajn lingvojn. La nova vivo komenciĝas, de kiam ni ellernas Esperanton.”

·Josip Broz Tito (*politikisto de Jugoslavio, 1892~1980*) = “Morton al faŝismo! Liberon al popoloj! La potencaj regnoj deziras potenci per siaj lingvoj, sed Esperanto vere havas universalan karakteron”.

·Leo Tolstoj (*romanverkisto de Rusio, 1828~1910*) = “Mi povis legi kaj skribi post du horoj da lernado. Disvastigi Esperanton estas krei Dian Regnon.”

·Charles Richet (*fiziologo de Francio, 1850~1935*) = “Esperanto estas plena de muziko kiel la itala lingvo, klara kiel la franca lingvo, kaj perfekta kiel la greka lingvo.”

·Esperantistoj kaj subtenantoj en Japanio inkluzivas Oka Asaĵiroo (*zoologo*), Iŝihara Kanĵi (*militisto*), Inoue Hisaŝi (*romanverkisto*), Umesao Tadao (*etnologo*), Oosugi Sakae (*pensulo*), Katajama Sen (*laborista aktivulo*), Kobajaŝi Erika (*verkisto, mangaartisto*), Sakai Toŝihiko (*socialisto*), Sasaki Takamaru (*aktoro*), Takagi Ĵinzaburoo (*fizikisto*), Hasegaŭa Teru (*kontraŭmilita aktivulo*), Honda Kacuiĉi (*raportisto*), Mijazaŭa Kenĵi (*poeto*), Janagita Kunio (*folkloristo*), kaj Joŝino Sakuzoo (*politika scientisto*).



S-ino Erika Kobayaŝi (foto danke al Ĵurnalo Tokio)

·Aliaj Esperantistoj kaj subtenantoj en la mondo inkluzivas Henri Barbusse (*verkisto de Francio*), Vasilij Eroŝenko (*poeto de Rusio*), Zhou Enlai (*ĉefministro de Ĉinio*), Ho Chi Minh (*prezidento de Vjetnamio*), Ba Jin (*romanverkisto de Ĉinio*), Max Müller (*naskiĝis en Germanio, naciანი in Britio, scienculo pri indologio*), Mao Zedong (*prezidento de*

Ĉinio), Reinhard Selten (*ekonomikisto de Germanio*), kaj Lu Xun (*romanverkisto de Ĉinio*).

Zamenhof, kiu aspiradis la pacon

En la jaro 1859, Zamenhof, kiu estis okulkuracisto, naskiĝis en la urbo Bjalistoko en Pollando, kie aŭdiĝis ĉirkaŭe la lingvoj rusa, pola, germana, kaj jida. Li naskiĝis kiel judo kun malsamaj lingvo, kutimoj, kaj religio ol aliaj, kaj multege travivis kaj vidis la konfliktojn kaj perfortaĵojn, kiujn kaŭzis la lingvaj baroj. Li transiris la malfacilajn situaciojn kaj antaĵuĝojn, kaj dediĉis sian vivon al kreado de neŭtrala lingvo, kiu ebligis interparolon liberan kaj egalan.

Kiam li estis knabo, lia patrino instruis al li “ĉiuj homoj estas gefratoj”, kaj poste li havis la celon realigi la ideon de homaranismo: “Homo estas membro de la homaro antaŭ ol aparteni al nacio aŭ raso.” Li kreis la internacian lingvon, por disrompi la miljarajn murojn, kiuj dividis la popolojn, kaj por ke ĉiuj homoj povu interparoli libere, respektante aliajn lingvojn, kulturojn kaj religiojn.

En la mondo, ĉirkaŭ 800 artefaritaj lingvoj estis kreitaj ekde la mezepoko, sed nur Esperanto pluvivas pro la nobla karaktero kaj spirito de sia kreinto, kiu celis la mondan pacon.

En Esperanto, la 28 literoj estas samtempe

fonetikaj simboloj, ĉiam prononcataj same. Sur la antaŭlasta silabo estas akcento, kaj ne ekzistas esceptoj al verbaj konjugacioj, kaj uzado de prefiksoj kaj sufiksoj povas pliigi la vortprovizon dekoble. Oni povas libere krei pruntvortojn kaj novajn vortojn, sed la sola malavantaĝo estas, ke ĝi ne estas rilata al arabaj kaj orientaziaj lingvoj. Tamen, novaj vortoj povas esti kreitaj el aliaj lingvoj, inkluzive el la japana. Ĉar substantivo finiĝas per o, ekzemple, *kabuki* fariĝas “kabuko”, kaj *tatami* fariĝas “tatamo”.

Zamenhof elĵetis nenecesajn formojn unu post la alia, kaj kompletigis regulan gramatikon, kiu konsistis el nur 16 reguloj kaj okupas nur du paĝojn. Tiel naskiĝis la esprimplena lingvo, kaj tial, oni diras, Esperanto estas facile lernebla, kompare kun la angla kvinoble, kun la rusa dekoble, kaj kun la araba dudekoble.

Hodiaŭ ĉirkaŭ unu miliono da esperantistoj en cento kaj dekoj da landoj interrilatas en diversaj kampoj, kiel interreta komunikado. Esperanto estas la 15-a el 229 lingvoj por internacia komunikado en sociaj retoj.

La kaoso en la mondo pli kaj pli profundiĝas, sed mi ne povas ne preĝi ke Esperanto estu lumradio.

Mi Celas Finan Venkon

En 2021, kvara generacio de miaj nepoj ne heredos Swany, kaj mi ne havas alian vojon ol vendi la kompanion, kiu celas daŭrigi kaj prosperigi ĝin, farante al mi neatendite grandan monon. Kvankam mia familio diris ke tio estas "forĵeti al polvujon", mi klarigadis ilin, ke la monon donis al ni Dio por reklami Esperanton, kaj konsentis kunlabori kun gazeta tutpaĝa reklamo lastfoje al legantoj kaj gvidlandoj de EU.

En Germanio, la Frankfurter Allgemeine, Süddeutsche Zeitung kaj Die Zeit, kaj Le Monde, Le Figaro kaj Les Echos en Francio kiel grandaj landoj de EU. Entute ok gazetoj kun polaj Gazeta Wyborcza kaj Rzeczpospolita, kiel naskiĝlando de Esperanto. Hazarde, la loĝantaroj kaj EU-deputitoj de tiuj tri landoj ĝuste trionas en EU. Alie, iliaj retversioj kaptos la junulojn.

Ĉar mi kredas ke gvidantoj de Germanio kaj Francio faĉile povas persvadi alajn 25 landanojn de EU, eĉ se mi ne havas fizikan forton kaj financan rimedon. Tial mi esperas por la estonteco.

Dum unu jaro en 2022, ni diskutadis pri la enhavo de la reklamoj kun eksa prezidanto de UEA Renato Corsetti, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain kaj aliaj.

Titolo de reklamo A: EU Jes! € Jes! Esperanto?

Fotoklarigo: Esperantistoj tra la mondo strebas plifortigi lingvan demokration kaj internaciajn rilatojn.

Mia foto: Eksa prezidanto de Swany Etsuo Miyoshi perdis sian dekstran kruron pro poliomjelito tuj post sia naskiĝo, kaj luktis kun la angla dum siaj mondvendaj vojaĝoj. Mi lernis Esperanton kvinoble pli rapide ol la angla, kaj konvinkiĝis, ke ĝi ŝlosilas por daŭra paco, do Esperanto fariĝis mia vivocelo.

Kio estas Esperanto?

·La alfabeto fonetikas, unu sono unu litero, ne estas esceptoj, verboj regule ŝanĝiĝas, kaj adoptis 70% da okcidenteŭropaj vortoj.

·"Esperanto lerneblas rapide kaj facile." Mi afiŝis ĝin en Esperanto ĉar ĝi estas komprenebla de EU-anoj.

·Foto: La Universala kongreso de Esperanto okazas ĉiujare en urboj de la tuta mondo ekde Boulogne-sur-Mer en 1905, kaj 2005 estis la 100-a UK en Lille, Francio.

·Esperanto naskiĝis antaŭ 137 jaroj kaj havas riĉan literaturon. La Aŭstra Nacia Biblioteko havas pli ol 35,000 librojn.

·Ĝi instruiĝas en universitatoj en Aŭstrio, Anglio, Hispanio, Nederlando, Pollando, ktp.

- Unu el ĉ. 14,000 proponoj en Estonta Konferenco de EU, temis pri Esperanto, kiu multe faciligus la lernadon de fremdaj lingvoj.
- Indonezio unue atingis la Zamenhofan mondmodelon kiel dulingva lando kun pli ol 700 insulaj lingvoj kaj plibonigita malaja kiel la komuna.
- Vortoj de Margareta Zaleski-Zamenhof, esperantistino kaj pranepino de la fondinto: La internacia lingvo Esperanto ebligas egalan komunikadon.



Titolo de reklamo B: Daŭra paco Esperante!

Zamenhof: Kiam pola kuracisto Ludoviko Zamenhof estis 15-jara, li adoptis la fortojn de 10 eŭropaj lingvoj kaj forigis la neraciajn partojn, kaj en la aĝo de 29 jaroj li kompletigis sian internacian lingvon. Li daŭre plibonigis ĝin en respondo al kritiko kaj rezignis pri siaj patentrajtoj je la avantaĝo de reciproka kompreno kaj samideanaro.



Tolstoj (1828-1910): Li kapablis legi kaj skribi ene de du horoj post studado. Disvastigi Esperanton estas krei regnon de Dio.

Romain Rolland (1866-1944): Nia tuta vivo

finiĝas kiam ni lernas ses lingvojn, sed nova vivo komenciĝas kiam ni lernas Esperanton. Ĝi estas la armilo de homa liberigo.

Kulturo: Miloj da denaskaj esperantistoj, naskitaj per esperantistaj geedzoj, kultivas Esperanto-kulturon dum kvin generacioj.

Ekonomio kaj Medio: Anglaj frazoj pli longas 1,2 fojojn, kaj germanaj 1,5 fojojn, kaj etnlingvaj vortaroj ĉ. duono okupas nememoreblaj esceptoj, kiuj povas ŝpari paperon, energion kaj laboron. Ĝi atutos por kontraŭi mondvarmiĝon.

Facileco: Ĝi koncizas, regulas, kaj uzas multajn latinajn vortojn, lernablas kun kvinona peno de la angla kaj dekono de la rusa aŭ la araba, kaj havas afiksajn sistemojn por novaj vortoj.

Justeco: Eĉ ekzamenas per "Super C-1" diplomatie, la diskriminacio inter angloj kaj neanglalingvanoj nemalgrandiĝos.

Kontribuo: Savis 577 mortantajn lingvojn, savos 7,150 lingvojn vivantajn.

Paco: Se EU adoptos Esperanton, ĝi fariĝos komuna lingvo kun la angla, kaj ĉiuj povos ĝui kaj regi ĝin, kaj la homaro miros pro la revolucia facileco de Esperanto kaj ĉesos lerni la anglan.

Lernometodo: www.esperanto.net

Titolo de Anonco C: Daŭra paco Esperante

Subtitolo, dufojo emfazis diklitere: Se EU adoptos Esperanton, ĝi fariĝos komuna lingvo de la mondo kun la angla, kaj ĉiuj povas lerni ĝin amuziĝante. La homaro miras pro la revolucia facileco de Esperanto kaj ĉesos lerni la anglan.

Malhavante kvara-generacian heredanton, mi vendis Swany por financi reklaman kampanjon. Miaj bofiloj Itano kaj Kawakita dekstre kunlaboris kiel en la Zamenhofa poemo "Paca-militisto".

Reklamanto Etsuo Miyoshi: Mi kreis la "Swany Bag" por subteni mian korpon kaj la plej malgrandan faldeblan rulseĝon de la mondo "Swany Mini", pro miaj malfacilaĵoj.

Bv. legi mian libron, "Mia Poliomjelito Malŝlosas la Pardon por Daŭra Paco - Invento, Sano, Lingva Egaleco." Postparolo, mi klarigas kiel legi.

Respondas al demandoj

Mi metis la supran skatolon responde al kelkaj opinioj.

La reklamo eble surprizis vin, sed ĉio veras. Esperanto nutras kulturon kaj esprimas emociojn

precize. La oficiala opinio de The Guardian: Esperanto lerneblas kun kvinona peno kompare kun la angla aŭ la franca. La Eurobarometer 386 (2012): Nur 35% de EU-civitanoj averaĝe regas la anglan. Brusela BRIO-Enketo: La anglalingvanoj ne pliiĝis dum kvarona jarcento kaj samas en la mondo. Se EU adoptos Esperanton, atendas ideala mondo, kie ĉiuj povas ĝui lernadon kaj mankas tradukistoj.

Mi metas skatolon sube, kiel facilas Esperanton!
Vidu Esperanton: delikata, egala, minuto, naturo ktp.

Estas 36 sufiksoj (ejo, ktp.), kafo plus ejo: kafejo, trinki plus ejo: trinkejo; 23 prefiksoj (ne, ktp.) "mallonga: nelonga", "malpura: nepura", ni povas fari kelkmilojn da vortoj.

Paco: substantivo, Pacis: pasinteco, Pacas: nuno, Pacos: futuro, Pacu: ordono, Pacus: supozo, Pacigi: transitiva verbo, paciĝi: evolui al paco. Esperanto ŝanĝeblas ĉiaspece kaj frazoj draste pli mallongaj.

Rezultoj

Marto en 2023, la nederlanda gazeto Argus raportis dupaĝe, japana Asahi Shimbun kaj Yahoo News aperigis grandajn artikolojn. En julio, germana raportisto Felix Lill intervjuis min, kaj tuŝante la agadon de Nitobe Inazo kaj kaŭzis lingvan

revolucion. Ŝtata germana radio elsendis tion dum sep minutoj kaj raportis la gazetoj Badische kaj aŭstria Kleine, tutpaĝe. Krome, ĉiuj ok gazetoj prezentadas reklamojn sur la unua paĝo, en kiu reklamas; mi dankas subtenon de la gazetfirmaoj.



Ankaŭ en la 16-17-a de septembro, simila artikolo titolis "Vojo al Paradizo", en Süddeutsche Zeitung tutpaĝe. Krome 24 germanaj gazetoj kiel Göttinger Tageblatt. En oktobro, gazetoj kiel Dewezet, Aller-Zeitung, pliiĝis al 3 kaj 4 gazetoj en Ruhr-regiono, kaj ne plu konservas tiun nombron. La legantaj okuloj fokusiĝas al "Eterna paco Esperante,"

Ili menciis: Japano forĵetas kelkajn milionojn da eŭroj por bremsi militon de Ukrainio kaj la leviĝon de naciismo, kreu la bazon por paco Esperante, internacia lingvo, justa por ĉiuj etnoj kaj lernebla kun kvinona peno kompare kun la angla.

Fakte, mi timegis, ke multos la protesto pro la enhavo, sed "Eterna Paco Esperante", "Se ĝi fariĝos komuna lingvo por EU, la homaro scios, kvinoble pli facile lernebla ol la angla", "Anglaj frazoj 1,2 fojojn pli longaj, kaj la germana 1,5 fojojn. Etnalingvajn vortarojn ĉ. duone okupas nememoreblaj esceptoj, ĝi ŝparas paperon, energion kaj laboron, atutos por batali mondvarmiĝon." Ŝajnas, ke ĝi estas facile akceptita.

Mi esperas, ke ni jam solvis tri punktojn de obstinaj miskomprenoj, kiuj diris, "Artfaraĵoj ne havas kulturon, ne esprimas emociojn, kaj ne verkeblas literaturaĵojn", la miskompreno ne estis ŝanĝita dum la 137 jaroj post naskiĝo de Esperanto.

Historiaj timoj kaj suferego

En 1965, kio estis la kialo, ke Unuiĝintaj Nacioj ne malkaŝis al UEA-prezidanto Ivo Lapenna, ke ĝi decidis ne adopti Esperanton? Eĉ li donis UN-n 925,034 individuaj subskriboj de 77 landoj.

Mi jam menciis ke en la Monda Federacia Kongreso en Londono en 2002, plie la Lingva Debato en Bruselo kun EU-gravuloj en 2006, tri fortaj miskompreniĝoj estis levitaj, Kiel "artaĵoj ne havas kulturon ktp." Tiel ili konfuzis min kaj Esperantistojn.

Plie, mi suferegas, ke preskaŭ mankas artikoloj pri reklamkampanjoj en Francio kaj Pollando. En 2022 lastjare, mi petis anoncon de la franca Le Figaro, sed

ili ne respondis, do mi elektis la ekonomian gazeton Les Echos.

Feliĉe, nuligis kelkja vortoj tie Le Figaro akceptis 7-fojan anoncojn dum ĉi tiu novembro ĝis majo 2024, en kvaraj vendredoj. Rezulte, francaj amaskomunikiloj atentis pri ĝi kun Le Monde kaj Les Echos, kiel nuna vigleco en Germanio. Mi antaŭĝojas ĝin kvazaŭ mi preĝus.

Parolo de la kvina gvidantino de Oomoto

Majstrino Kurenai Deguĉi organizis La 100-jara memorfeston de Esperanto Populariga-asocio, kiu sloganis, "Ni faru la mondon plena je Esperanto," en la 16-18a de septembro 2023 en Oomoto.

En 2003, ĉe la 90-a Japana Esperanto-Kongreso en Oomoto, ŝi Esperante prelegis, kaj laste menciis kiel sube.

"Estas lageto 'Kinryukai' en Oomoto, kaj tie estas kvin insuloj kiel modelo por la kvin kontinentoj. En 1914, kredantoj fosis lageton sub la instrukcioj de la fondinto, Onisaburo. Ĉirkaŭuloj timis ke, kion ili farus, kiam ne estos akvo. Kiam ili finfosis la lageton, la urbo petis ilin uzi ĝin por akvovojo, kaj ĝi ankoraŭ akvoplenas.

La rakonto similas al Esperanto-agado. Eĉ se iu ridindigas, ni devas klopodi kaj persisti. Mi certas,

ke venos la tago, kiam kvin kontinentoj pleniĝos Esperante."

La Universo kaj la Homa Vivo

La paragrafoj el la verko de s-ro Deguĉi Hidemaru, *Esplorado de vivĝojo*, kiu estas mia amata legaĵo dum mia tuta vivo.

La mondo estas senlime vasta, la materialoj estas senlime multaj. Senti malvasta la vastan mondon, malmultaj la multajn materialojn, estas nur respektiva koro. Se oni povas havi nur larĝan sentimenton, vere fandiĝantan en la universon, ĉi tiu mondo mem estas la plej bona kaj bela paradizo. Ne postkuru tiun, kiu volas foriri; akceptu tiun, kiu nur volas veni. Forigu la etan memon kaj obeu al la granda memo.

Levu la okulojn kaj rigardu la ĉielon—
jen la mistero de steloj sennombre brilantaj,
la grandiozo de la suno kaj la luno eterne
radiantaj.

Mallevu la okulojn kaj rigardu la surteron—
jen arboj kreskas kaj birdoj pepas,
bestoj multiĝas kaj homoj prosperas.
Kvintaga vento kaj dektaga pluvo ne eraras la
tempon,


kvar sezonoj ja ripetas la cirkulon.
Maroj dancas, ventoj melodias,
montoj sin ŝminkas kaj nuboj petolas.
Estas Dio, estas mikado, estas gepatroj,
ĉiuj min nutras kaj min favoras.
Amatino, koramiko kaj popolo,
ĉiuj min prizorgas kaj al mi oferas.
Senlima estas homa plendo,
eĉ falo de folio fariĝas semo de ofendo.
Zumado kula, ĉirkaŭflugo muŝa,
vizaĝo homa kaj eĉ la aspekto de l' ĉielo,
ĉiuj fariĝas la kialo de kolero.

Absolute senmanka
de infinitezimo ĝis infinito,
la universo superba.
Do, forlasu tiujn bagatelajn kaj malpurajn,
kaj alprenu la pli larĝajn kaj belajn.
Jen tiu estas Dio, kiu ĉiumomente ĉiujn donas,
jen tiu estas homo, kiu ĉiumomente iun prenas.
Oni ne perdu la eternan grandan valoraĵon,
blindigite de malgranda tuja profitaĵo.
Ne haste, sed iom post iom trankvile.
En la sfero atingebla per la mano kaj piedo
oni laŭdu la belecon de donitaj floroj
kaj gustumu la maturiĝintajn fruktojn.
Ripozu, se vi laciĝas,
trinku, se vi soifas.
Marŝu dum la tago,

dormu dum la nokto.
Jen glata estas la natura vojo.

Ĉio en la mondo ekzistas laŭ Dia permeso.
La malamiko de A estas amiko de B.
La malamiko de B estas amiko de C.
A, B, C, Ĉ jen ĉiuj estas Diaj filoj.
Indulgu la malamikon.
Sin oferu homoj unu al alia.
Revenu al Dio, al koro Lia!

Esperanta Movado de Oomoto komenciĝis de la
propono de Majstro DEGUĈI Hidemaru.
Estis la afero antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj.



Hidemaru Deguĉi (foto danke al Oomoto))

Ĉe la Fino

Skribante ĉi tiun rakonton, mi ofte tempoglitis en mian infanecon.

En la sama urbeto, tien, kie mi nun loĝas, mi transloĝiĝis, kiam mi estis lernanto de la kvina lernoĵaro de elementa lernejo. La loko troviĝis sur la bordo, iom ekstreme de la urbo. En la domo de mia samklasano tatamoj estis uzataj nur en la periodoj de la ulambanaj tagoj kaj la novjaraj, kaj kutime la domanoj enlitiĝis sternante litaĵon sur la pajlmato. Mi estis surprizita, ĝin vidante unuafoje.

Samklasanoj falĉadis herbojn por doni furaĝojn al bovoj, kunportante korbegon sur sia dorso, tiom grandan, ke ili povis enmeti sian tutan korpon. Por mi sufiĉis, ke mi falĉu nur unu korbeton da herboj: plantago, leontodo ktp, por doni furaĝojn al kuniklo. Mi nutris ses aŭ sep kuniklojn, farinte enirejon de ligna bariero, kaj disetendinte pajlojn en la pomarba kesto. Ili vokis min frapante plankon per postaj kruroj. Laŭ iliaj deziroj mi parigis virseksulon kun virinseksulo; ili naskis kvin aŭ ses kuniklidojn en ĉirkaŭ unu monato. Post la nutrado de ĉarmaj idoj, mi gajnis po sepdek enojn da mono por unu

kuniklido. Sed mi sentis kordoloron, kiam mi pripensis la estonton de la kuniklidoj, kiuj ŝanĝiĝis al la mono.

Mi estis plena amanto de animaloj. Mi rigardis senfine la laboraspektojn de bovoj ĉe la angulo de rizkampo. Al ili estis permesata nenia maldiligento eĉ dum unu momento. Ili tiris senvoĉe plugilojn kaj disfosis la teron ĝis malluma horo. Ili estis skurgataj, laborigataj; ili salivumis, kaj spiris anhele.

Korŝire kompatindaj estis patrinaj bovinoj, kies idoj estis venditaj. Ĉiunokte ili plorkriis, vokante siajn idojn, elpremis voĉojn, “Bonvolu redoni mian idon.” Kiam aŭdĝis de proksime la lamentaj krioj, mi ne povis endormiĝi.

Ili estis vendataj kiel bovoviando, kiam ili fariĝis nelaboreblaj. Ili estis metitaj sur kamionojn, malgraŭ ke ili vivriske rezistadis. Daŭre aperis ankaŭ tiaj bovoj, kiuj, sopirie al la staloj, kutimiĝintaj, kaj al sia mastro, revenis de la buĉejoj distancaj je kelkdek kilometroj.

Mi kompatis la samklasanojn, kiuj, ĉiutage falĉadis herbojn, kaj estis normumataj plenigi korbegojn per herboj. Kaj samtempe mia koro doloris pro la bovoj turmentataj.

Miaj suferoj en infaneco ŝanĝis la formojn kaj eksplodis en la juneco. La poliomjelito, kiun mi suferis tuj post la naskiĝo, kondukis min en la profundejon de malespero. Kial mia korpo estas ne kompleta? En tiuj tagoj furiozis tempesto,

kaj eĉ memmortigo trapasis la kapon. Tiam, mi renkontis Oomoton, kaj fine eltrovis la lumon. Por konkeri mian propran handikapon, de tiu tempo, mi korfunde gravuris la ideon, “ĉiuj estas miaj instruistoj”, kaj mi dediĉis mian tutan energion al la prospero de Swany. Jen komenciĝo de mia vivo — mi defiu min por renversi abomenindan estintecon.

Mezaĝa, mi malsaniĝis je la nefrito. Mi frapis la pordon de fastoterapia ekzercejo, praktikis la sanmetodon manĝi la krudajn legomojn, kaj mi povis depuŝi de mi malsanon kaj povis vivi ĝis hodiaŭ, kiam mi estas 81-jaraĝa.

Kaj, laŭ la instruoj de Oomoto, mi studis la lingvan problemon, kaj dediĉis la klopodon, kvankam etan, por popularigi la internacian lingvon Esperanto, kiu povas fariĝi komuna lingvo en la mondo anstataŭ la angla lingvo.

En ĉiuj okazoj, tio, kio donis al mi fortojn en mia vivo, estis la sorto, nomata “malfavora situacio”. Krom tio, ĉiu okazo instruis al mi, ke Ĉielo ne igas homojn ŝarĝi per pakaĵoj, kiujn ili ne povas elteni.

En la koro la instruojn de la Majstro Deguĉi Hidemaru, “Danku al la malfavora situacio! Ne havu dependemon! Ne timu riskon!” mi povis transpasi diversajn malfacilaĵojn. Ĝuste tial, nun ĉi tie, mi povas rakonti eĉ iomete.

Mi dankas al vi ĉiuj, kiuj legis mian mallertan longan skribon ĝis ĉi tie. Se ĉi tiu libro estos iom utila por vi, tio estos mia ekstersupoza feliĉo.

Okaze de verkado de ĉi tiu libro, mi ricevis multajn opiniojn de s-ro Deguĉi Kiotaro, la konsilanto de Oomoto; de s-ro Kosaka Kijojuki, la prezidanto de la Esperanto-Societo de Kagaŭa kaj docento de germana lingvo; de s-ino Kojama Mariko, la reprezentanto de la Japana Polio-Asocio; en Swany, de s-ro Iŭasaŭa Hirojoŝi, eksa administranta direktoro, kaj multaj dungitoj; de s-ro Nakagaŭa Tamocu kaj s-ro Jamasaki Satoru, miaj amikoj; kaj de s-ino Macumoto Teruko kaj s-ino Sejasu Minori, amikinoj de mia edzino.

Kaj s-ro I, kiu deziris anonimon, bonvolis multe helpi por la eldono de ĉi tiu libro. Mi denove danku, ke mi povis ĝin elfari, ĉirkaŭite de multaj entuziasmaj subtenantoj.

Fina peto mia: Mi komencis reklamkampanjon en januaro 2003, kaj en aŭtuno, mi multigis ĉ. 700 Fejsbukajn amikojn. Tamen mi havas problemojn, ĉar ĉ. 10% el ili petis financan helpon. Restas al mi nur miaj vivrimedoj por 84 jarulo kaj elspezas ĉion por reklamado. Bv. kompreni kaj ne perdi vian tempon.

En marto, 2024

MIYOSHI Etsuo

Miaj libroj

Angla: My Polio Unlocked the Door to Sustainable Peace - Invention, Health, Linguistic Equality, Kindle €9,00 ASIN (BOBTXY31DL)

Franca: Ma poliomyélite m'a ouvert le monde à une paix durable - invention, santé, équité linguistique, Libro €12,99 ISBN (978-2-3224-7425-7), Kindle €9,00 ASIN (B0BS3VXRFM)

Germana: Meine Kinderlähmung öffnete die Tür zu anhaltendem Frieden - Erfindungen, Gesundheit, sprachliche Gleichberechtigung, Libro €12,99 ISBN (978-3-7347-2225-7), Kindle €9,00 ASIN (B0BQBK863L)

Pola: Heinemedina otworzyła mi drzwi do trwałego pokoju - Wynalazek, zdrowie, równość językowa, Libro €11,00 ISBN (978-83-968529-0-8), Kindle €7,00 ASIN (B0CBIXTHM)

Esperanto: Mia Poliomyjelito Malŝlosas la Pardon por Daŭra Paco: Invento, Sano, Egala Lingvo. Senpage retversion aperos en majo 2024.

著者紹介

三好 鋭郎 (みよし・えつお)

株式会社スワニー相談役

1939年、香川県に生まれる。生後6ヵ月で罹った小児麻痺の後遺症で、右足が不自由になる。

1964年より、株式会社スワニーの後継者として、スキー・防寒用手袋のセールズに世界中を飛び回る。

ニューヨークで見たキャスター付きトランクを機内持ち込みサイズに小型化し、身体を支えながら運べる「スワニーバッグ」や、世界一小さく折りたためる車椅子「スワニーミニ」を考案し、ヒットさせた。

社長、会長を経て、現在は相談役。

株式会社スワニー

769-2795 香川県東かがわ市松原 981

URL <http://www.swany.co.jp>

不自由な足が世界を広げてくれた

—スワニーバッグ誕生物語—

(検印省略)

2022年 12月 28日 第1刷発行

著者——三好 鋭郎 (みよし・えつお)

発行者——佐藤 和夫

発行所——株式会社あさ出版

〒171-0022 東京都豊島区南池袋 2-9-9 第一池袋ホワイトビル 6F

電話 03 (3983) 3225 (販売)

03 (3983) 3227 (編集)

FAX 03 (3983) 3226

URL <http://www.asa21.com/>

E-mail info@asa21.com

振替 00160-1-720619

note <http://note.com/asapublishing/>

facebook <http://www.facebook.com/asapublishing>

twitter <http://twitter.com/asapublishing>

Copyright © 2022 Etsuo Miyoshi

本書を無断で複写複製（電子化を含む）することは、著作権法上の例外を除き、禁じられています。また、本書を代行業者等の第三者に依頼してスキャンやデジタル化することは、たとえ個人や家庭内の利用であっても一切認められていません。乱丁本・落丁本はお取替え致します。